

JUAN MANUEL SANTOS

ŜAKON AL LA TERORO

LA JAROJ HORORAJ POR LA FARK

Prologo far Carlos Fuentes



Tirofijo



Reyes



Ríos




Caballero



Cano



César




Acacio



El Paisa



Sombra




Jojoy

JUAN MANUEL SANTOS

**ŜAKON AL
LA TERORO**

LA JAROJ HORORAJ POR LA FARK

Prologo far Carlos Fuentes



© Mauricio Vélez
Komplezo far la revuo *Diners*

JUAN MANUEL SANTOS

(n. Bogoto, 1951) estis kadeto en la Ŝipa Lernejo de Kartageno (Kolombio); li studis Ekonomikon kaj Entreprenan Administradon, kaj faris postdiplomitajn studojn en la Londona Altlernejo de Ekonomiko, la Universitato Harvard, kaj la Altlernejo Fletcher de Leĝoj kaj Diplomatio.

Li estis ĉefo de la kolombia delegitaro en la Internacia Kafa Organizaĵo, en Londono; li estis la lasta *Designado*¹ por la prezidenteco de la respubliko, kaj la unua ministro pri Ekstera Komerco. Li ankaŭ estis ministro pri Trezoro kaj Financoj² kaj pri Nacia Defendado. En ĉi-lastata posteno li responsis pri gvidi la politikon de Demokratia Sekureco.

Li kreis la Fondaĵon Bona Regado³ kaj estis kunfondanto de la Partio de la U (Socia Partio de Nacia Unuiĝo).

Li laboris en ĵurnalismo kiel artikolverkisto kaj kiel subdirektoro de la ĵurnalo *El Tiempo*; ricevis li la Premion Reĝo de Hispanio, kaj prezidis la Komisiitaron pri Esprimlibero de la Interamerika Ĵurnalisma Asocio. Li publikigis plurajn librojn, inter kiuj menciindas *La Tercera Vía*⁴, kunverkita kun la brita eksĉefministro Tony Blair.

¹ NT Nomumito por anstataŭi la prezidenton okaze de ties manko, morto, aŭ nekapablo estri la ŝtaton; jam ne ekzistas, la vicprezidento anstataŭas.

² NT En Kolombio: *Hacienda y Crédito Público*.

³ NT *Fundación Buen Gobierno*.

⁴ NT "La Tria Vojo".

Fotoj de la kovrilo: Arkivo de la ĵurnalo *El Tiempo* kaj Kolombia
Ministrejo de Defendado

© Juan Manuel Santos 2009

© Eldonejo *Planeta Colombia* S. A. 2009

Hispanlingva originalo: *Jaque al terror*, ISBN 978-958-42-2302-9

Tradukis el la Hispana: Luis Guillermo Restrepo Rivas

*Al la viroj kaj virinoj de
la Militfortoj kaj la Polico
de Kolombio.*

*Al ilia honoro, al iliaj kuraĝo kaj sindonemo,
kiuj rehavigis al nia nacio ne nur la sekurecon
sed ankaŭ la rajton je la espero.*

Enkonduko pri la Esperanta eldono

Leginte tiun ĉi libron en ĝia originala hispanlingva eldono, rimarkeblas ke ĝi estas verkita por legantoj kolombiaj pli ol por eksterlandaj, ĉar en la teksto aperas aferoj historiaj kaj nomoj personaj, geografiaj kaj instituciaj, kiuj supozeble estas sufiĉe konitaj de la plimulto el la kolombianoj kaj ne tiel de eksterlandano. Tial, mi kiel tradukinto juĝis necese aldoni piednotojn por klarigi kelkajn aferojn al nekolombiaj legantoj.

Nu, la originala verko ankaŭ havas kelkajn piednotojn, kaj tal stariĝis la neceso diferencigi tiujn notojn de la originala verko disde tiuj aldonitaj far la tradukinto. Do, ĉi lastaj piednotoj aperas per **bluaj** literoj kaj estas komencitaj per la literparo “NT” (noto de la tradukinto). La originalaj piednotoj aperas sen tiu mallongigaĵo kaj per nigraj literoj.

Tamen, eĉ per multegaj, troaj, piednotoj ne eblus bildigi la historion kaj kulturon de Kolombio en la dezirinda grado por perfektigi la plenkomprenon flanke de tia leganto. Tial estas dezirinde ke la nekolombia leganto helpu mem sian komprenon per kromaj legoj kaj mapoj pri Kolombio.

Alia rimarko kiun mi taksas necesa rilatas la demandon ĉu traduki aŭ ne traduki la geografiajn proprajn nomojn: urboj, riveroj, k. s. Pri tio, kelkaj lagantoj eble volas absolutan respondon jesan aŭ nean. Tamen, malgraŭ la ŝajno de nereguleco, mi decidis fari tiurilate simile al tiel kiel oni faras en aliaj “fremdaj” lingvoj, tio estas: Uzi la esperantajn nomojn

kiam temas pri geografia propra nomoj pli gravaj, pli konitaj internacie, kaj nomoj kiuj jam havas plimalpli tradicie uzitan esperantigon, kaj lasi la originalan nomon sentraduke kiam temas pri nomoj malpli uzitaj internacie aŭ en “esperantujo”, nomoj kiuj ne havas tradicie uzitan esperantigo. Tio povas aspekti nekohere, tamen tio estas kio okazas en naciaj lingvoj, ekzemple: la germanan “München” oni tradukas en la hispana per “Múnich”, tamen la plimultego el germanlingvaj geografiaj propraj nomoj ne havas hispanigojn vaste akceptitajn kaj uzitajn.

Kompreneble, tiu solvo lasas spacon por miaj subjektivaj elektoj, pri kiuj mi kiel tradukinto povas nur peti al la leganto bonvolan akcepton.

Ne troestas rimarkigi, temante nun pri la libro mem, ne pri la traduko, ke la verko estis publikigita en decembro de 2009, kaj tial pri kelkaj faktoj disvolviĝemaj ĝi prezentas la staton tiaman, stato kiu eble evoluis ekde la apero de la libro ĝis la momento de via lego.

Mi elkore dankas vian intereson legi tiun ĉi tradukaĵon.

Luis Guillermo Restrepo Rivas
Medegino, marto de 2010

Enhavtabelo

Dankoj	1
Prologo	2
<i>Annus horribilis</i> (Antaŭparole)	11
REVIVIGO DE LA MONTOJ DE MARÍA	18
ĈAPITRO 1-a La elliberiĝo de Fernando Araújo	19
ĈAPITRO 2-a Martín Caballero faligita	35
ĈAPITRO 3-a Kvazaŭ kastelo el ludkartoj	45
ĈAPITRO 4-a La reveno de la paco	50
MENSOGOJ KAJ FIASKOJ	56
ĈAPITRO 5-a La trompo de la Kagŭano	57
ĈAPITRO 6-a La murdaro de la deputitoj	61
ĈAPITRO 7-a “Ĉi tie ni vivas mortintaj”	69

ĈAPITRO 8-a	
Emmanuel	72
ĈAPITRO 9-a	
Lando unuiginta kontraŭ la FARK	81
REPACIGANTE LA PACIFIKON	84
ĈAPITRO 10-a	
La ostaĝiginto de la deputitoj	85
ĈAPITRO 11-a	
La kuracisto kaj la kapulo	91
ĈAPITRO 12-a	
Kapto kineska	95
ĈAPITRO 13-a	
La havenurbo renaskiĝas	100
INFORMIĜPOVO DE LA PLEJ ALTA NIVELO	104
ĈAPITRO 14-a	
Internacia kunagado	105
ĈAPITRO 15-a	
La Ĉefinstanco de Specialaj Kunfarataj Operacoj	110
LA KARTELO DE LA SUDORIENTO	114
ĈAPITRO 16-a	
En la koro de la FARK	115
ĈAPITRO 17-a	
Ofensivo en la ĝangaloj de la sudoriento	120
ĈAPITRO 18-a	
La Negro Acacio faligita	131
ĈAPITRO 19-a	
Monrimedoj falantaj	138
ĈAPITRO 20-a	
La triumfo de la persisto	147
DU VETERANAJ VULPOJ	152
ĈAPITRO 21-a	

“Oni nomas min Ombro”	153
ĈAPITRO 22-a	
La morto de unu mito	160
LA OPERACO FENIKSO	169
ĈAPITRO 23-a	
La militon oni gajnas en la aero	170
ĈAPITRO 24-a	
Unua homperdo de la Sekretariaro	174
ĈAPITRO 25-a	
Post la bombado	183
ĈAPITRO 26-a	
La sekretoj de la komputilo	188
ĈAPITRO 27-a	
La laŭleĝa defendo	203
PERFIDOJ KAJ DIZERTOJ	209
ĈAPITRO 28-a	
Teroro en la teroj de la koloniado	210
ĈAPITRO 29-a	
Bataliono en la eĝo de la montoĉeno	214
ĈAPITRO 30-a	
“Jen Iván Ríos!”	220
ĈAPITRO 31-a	
“La milito lacigas ... kaj oni laciĝas”	224
LA PERFEKTA OPERACO	230
ĈAPITRO 32-a	
La plej feliĉiga tago	231
ĈAPITRO 33-a	
“Plena sukceso !”	238
ĈAPITRO 34-a	
Disfalas la maĥinacio	247

BATOJ AL LA TERORISMAJ ĈELOJ	250
ĈAPITRO 35-a	
La sikarioj de la FARK	251
ĈAPITRO 36-a	
La defendado de Kundinamarko	258
LA PLEJ BONA DECIDO	268
ĈAPITRO 37-a	
Ostaĝoj kun fusiloj	269
ĈAPITRO 38-a	
La fuĝo de Lizcano	273
ĈAPITRO 39-a	
La ekzemplo imitiĝas	279
ĈAPITRO 40-a	
La sekreta armilo	283
LA KAMPANJO POR LA LAŬLEĜECO	288
ĈAPITRO 41-a	
Unu politiko modelo en la mondo	289
ĈAPITRO 42-a	
La “falsaj pozitivajoj”	298
ĈAPITRO 43-a	
La imperiado de la vivo	312
LA PLEJ MALBONA TEMPO DE ĜIA HISTORIO	316
ĈAPITRO 44-a	
La fino de la violentuloj	317
ĈAPITRO 45-a	
La hororaj jaroj	322
Fotaro	326

Dankoj

Fari la rakonton pri tiuj ĉi tri historiaj jaroj da batalado kaj frapoj kontraŭ la FARK ne estis facila tasko. Tio postulis streĉon ne nur de la memoro, sed ankaŭ esploradan, kio bezonis la alportaĵojn el multaj fontoj por solidigi ateston adekvatan al la laboro plenumita kaj al la sukcesoj atingitaj.

Multaj homoj en formo malavara kaj senprofitema kontribuis per siaj rememoroj, analizoj kaj anekdotoj por kompletigi ĉi tiun grandan mozaikon el agadoj kaj rezultoj, kiu alimaniere, se ĝi dependus nur de miaj memoroj kaj senperaj travivaĵoj, ili estus nesufiĉaj. Mi dankas speciale la kunlaboron de la komandantoj kaj oficiroj kiuj partoprenis en la operacoj. Ankaŭ mi dankas al la okupiĝantoj pri la Agprogramo por Humana Zorgo al la Malmobiliziĝintoj, kaj al tiuj kiuj estis miaj vicministroj, Juan Carlos Pinzón kaj Sergio Jaramillo.

Ankaŭ, kaj speciale, al Juan Carlos Torres, kiu metis sian tutan esploradan talenton kaj organizpovon serve al tiu ĉi libro, kiel same al tiuj kiuj kun akademia rigoro kaj konfidenceco reviziis kaj prikomentis kelkajn el ĝiaj partoj.

Evidente, al mia admirata amiko Carlos Fuentes, kies prologo malfermas mirinde tiun ĉi verkon, kaj ĝin gloras.

Prologo

Far CARLOS FUENTES

En 1988, instruadis mi kurson pri hispan-amerika kulturo ĉiun mardon kaj jaŭdon en konstruaĵo ĉe la periferio de la “Yard” de la Universitato Harvard, ĉirkaŭ kiu centriĝas la vivo universitata.

La kapacito de la aŭditorio estis de proksimume kvarcent sidlokoj kaj mi havis la fortunon ke okazis plenoj en ĉiu el miaj lekcioj. Ĉeestis studentoj bezonantaj diplomojn, paŝtitaj far mia asistanto, la tre agema ĉilia profesorino Verónica Cortínez. Tamen ankaŭ ĉeestis homoj el la komunumo, el aliaj kursoj kaj, precipe, el la eminenta Fondaĵo Nieman, kiu ricevadis dek du ĵurnalistojn, ses usonajn kaj ses eksterlandajn, liberigante ilin, jaron post jaro, el iliaj taskoj en la gazetaro kaj permesante al ili dek du monatojn da legado, dialogado kaj universitata ĉeestado.

Pluraj ĵurnalistoj junaj ĉeestis mian kurson en Harvard. Mi rememoras pri Frank del Olmo, tiu tre talenta meksikano-usonano kiu, antaŭ ol forpasi, supreniris ĝis la postenon de eldonisto en *Los Angeles Times*. Pri Gustavo Gorriti, perua ĵurnalista verkisto kaj, antaŭ ĉio, pri Juan Manuel Santos, juna kolombia ĵurnalista, subdirektoro de la ĵurnalo *El Tiempo* en Bogoto kaj politikisto ekfloranta.

Ĉi tio estas biografio kaj ankoraŭ, fortune, ne finiĝas. Mi tiam ne estis konanto pri lia biografia slipo, nu, kio impresis min, eĉ antaŭ ol rilatiĝi kun Santos estis lia aspekto en la unua vico de la aŭskultantaro. Lia feliseska rigardo, liaj okuloj de kato iĝinta pumo, barometro de sincera rideto, ĉiama, kaj tial, preskaŭ minacanta. Rigardado de kontinua atento, de scivolemo severa, de averto kaŝita.

Poste mi lin sumigis en mian grandiozan liston da kolombiaj amikoj, sinsekvo kiun komencis Jorge Gaitán Durán, direktoro de la mita revuo *Mito* kiu, en la Kolombio de la jarcenta mezo sukcesis kombini la prezentadon de avangardaj tekstoj kun politikaj raportaĵoj pri la violento — kreskanta, ĉiama, ripetata— de la interna mondo kolombia. Miaj amikecoj kolombiaj debutis, unue, pro la najbareco de Alfonso López Michelsen en la unua kunposedata konstruaĵo de Meksikurbo, en la avenuo nomata tiame de la Fandejo¹, hodiaŭe de Rubén Darío, kvazaŭ la industrio cedus la pason, neprobable, al la poezio (aŭ kvazaŭ ĉi-lastata, la poezio, ne povus ekzisti sen la industrio). López Michelsen okupis la duan etaĝon de la konstruaĵo; mi la trian. Li estis skribanta *Los elegidos*; mi *La región más transparente*. Niaj respektivaj klavadoj, male ol kunfandiĝi poezie, ili sin difuzadis en sonbatalon. Ni alvenis al interkonsento: ke li skribu matene, mi vespere. Tio signifis ke mia unua renkonto kun Kolombio tradukiĝis en intertraktadon kaj konsenton.

La vico de miaj kolombiaj amikecoj sekvis kun Fernando Botero, juna pentristo, tiutempe pri toreado kaj intensaj aranĝitaĵoj, kiu al mi prezentis verkiston Álvaro Mutis, ĉi-lastata ĵus alveninta en Meksikon kaj centro de festo kiun mi oferis al li en la Fandejo de Rubén, festo en kiu Mutis ekkonis unufrape sian tutan meksikan amikaron, favoro kiun li reciprokis prezentante al mi, iom poste, verkiston Gabriel García Márquez en la koridoroj de la kinoproduktejo Barbachano Ponce, moknomita taŭĝe far Mutis “La Domego

¹ NT Hispanlingve: *la Fundación*.

de Drakulo”. La ĉeesto gaja, feliĉa kaj ŝercema de García Márquez dispelis la brumojn transilvaniajn per tropika lumradio. Mi estis koninto pri liaj rakontoj, publikigitaj en mia propra revuo *Meksika Revuo de Literaturo*, tamen ekde antaŭe, en la revuo *Mito* de Gaitán Durán, fermante tiel la cirkon de mia rilato, varma, por ne diri pasia, kun Kolombio kaj la kolombianoj.

Mia amikeco, pli proksimdata, pli juna, kun Juan Manuel Santos, venis, tiel, por malfermi novan ĉapitron de tiu rilato: kontinuada, renovigo. Mi, kiam ekkonis lin en Harvard, estis entreprenanta la unuan redakton de novelo pri la gerilo en Kolombio. Mi havis foton pri mia patro, kaptitan en 1938 en Bogoto, en kiu li aperas apud la tiama prezidento de Kolombio, Alfonso López Pumarejo, patro de mia najbaro López Michelsen. En la foto, la prezidento kaj mia patro estas vestitaj per rigora frako tagmeze. Tiu ĉi bildo pri Kolombio eleganta, civilizita, klera, kontrastos monstre kun la violento—konstanta, subkuŝanta, malnova kaj profeteca samtempe—kiun priskribadis Gaitán Durán. La kolombia kulturo estis forta, vera, kaj ĝin signifis la amikoj kiujn mi menciis. La violento ankaŭ estis vera, kaj malnova. La emfazon oni ofte metadis en la murdon de la gvidanto Jorge Eliécer Gaitán¹ la 9-an de aprilo de 1948, unua ago de la “Bogotazo”², eksplodo de malespera violento kiu poste trovis tri fluejojn de organiziĝo.

La FARK (Fortoj Armitaj Revoluciaj de Kolombio), proksima al la Komunisma Partio, direktita far la kvazaŭ-nevidebla *Tirofijo*³ *Marulanda*, kaj portanto de la promeso terkultivista: la tero por tiuj kiuj ĝin prilaboras. La NLA (Nacia Liberiga

¹ NT Politikisto de la Liberala Partio, gvidanto de homamaso movado, murdita kiam li estis porprezidenta kandidato.

² NT El “Bogotá” kaj la sufikso “-azo” (frapo aŭ pligrandigo): nomo por la masiva tumulto kaj violento post la murdo de J. E. Gaitán.

³ NT Alinomo signifanta “trafa pafo” kaj elparolata: “tirofiño”, plia alinomo, krom *Manuel Marulanda*, de la gerilano Pedro Antonio Marín.

Armeo¹), analoga al la Kuba Revolucio tamen kun ia religia subsenco ekzempligita far la pastro Camilo Torres kaj konsistanta el furiozaj junuloj de burĝa origino kaj hispana pastro kredrifuzinta, *la Pastro Pérez*².

Pli interesa por mi rezultis la M-19 (Movado 19-a de aprilo), ne tiome pro ĝiaj taktikoj sed pro ĝiaj personecoj. La unuaj etendiĝis ekde pirabi riĉulojn por donaci al malriĉuloj ĝis la perforta kapto de la Suverena Kortumo en 1985, kun ĝia fisekvaĵo da mortoj; ekde la rabo de la spado de Simón Bolívar ĝis la konvinkigo ke nur la violento alportus la ŝanĝon al Kolombio.

Interesis min pli la M-19, antaŭ ĉio (atribuante tion al mia novelista imagemo) pro la trajtoj de ĝiaj direktantoj. Carlos Pizarro Leongómez, la “komandanto paĉjo”³ de la Movado M-19. Pizarro devenis de familio el la kolombia burĝaro. Lia patro estis mararmeisto de kariero, arma ataseo en Vaŝingtono kaj homo de elpruvita honesteco. La patrino, ĉilia, estis instruistino de lernejo kaj virino proksima al la socia problemaro de la malriĉaj kvartaloj. Kune kun siaj gefratoj, Pizarro estis ricevinta tradician edukadon, hejme kaj en la religia lernejo. Tio estas: li kreskis en tia bredbulĵono por la latinamerika ribelismo kia estas la hejmo de mezalta klaso, klera, nekonformeca, eldemandema. Ankaŭ estis tie Jaime Bateman, gaja marbordano, emanta “naciigi la revolucion” kontraŭ la dogmoj de la Komunisma Partio. Estis Álvaro Fayad, alligita al la monto kaj al la kampularo, por doni al la M-19 sencon “naciisman, demokratian, revolucion”. Estis Iván Marino Ospina, portanto de propra memoro pri la violento, pruvo de la interna milito, mala al la kunvivado “civilizita” inter konservativuloj kaj liberaluloj. Ĉiuj mortis. Estis Antonio Navarro Wolf, la postvivanto, la atestanto, kiu redonis la spadon de Bolívar.

¹ NT Hispanlingve: ELN (“Ejército de Liberación Nacional”).

² NT “El Cura Pérez”.

³ NT Hispanlingve: “comandante papito”, kie “papito” (paĉjo) en Kolombio ankaŭ signifas: ĉarma kaj alloga por virinoj.

Ĉe 1988, kiam mi ekkonis Juan Manuel Santos, jam la prezidento Belisario Betancur, kontraŭ vento kaj tajdo, estis proklaminta (en 1982, tre antaŭe ol Barack Obama) “ja ni povas”¹, malfermante la vojon al procezo de integriĝo en la politikon. Nu, la procezo de ŝanĝiĝo de gerilo al politiko samtempis kun la leviĝo de la karteloj de narkotaĵoj kaj la murdado de politikaj gravuloj kiel la ministro pri Justico Rodrigo Lara Bonilla, la kandidatoj Jaime Pardo, Luis Carlos Galán, Bernardo Jaramillo kaj, en 1990, Carlos Pizarro mem, kiu forlasis la armilojn per la balotiloj kaj estis murdita dum kampanjo, veturanta en komerca aviadilo, far juna sikario kaŝiĝinta en la necesejo de la flugmaŝino. La gardistoj asignitaj al Pizarro ne povis protekti la kandidaton. Ili mortigis aliflanke, la knabon murdintan kaj pretan por morti, en kies ŝuo oni trovis komisinoton pri doni al ties patrino la kvanton interkonsentitan pro la murdo.

La prezidento César Gaviria (1990-1994) malfermis la pordon al eniro de la gerilo en la politikon, tamen plifortigis la agadon kontraŭ la drog-ŝakristoj per la ofero ne ekstradicii tiujn kiuj sindonu memvole al la aŭtoritatoj, deklarante sin kulpaj. Ĉi tiuj ne estus ekstradiciataj al Usono, sed juĝataj en Kolombio. La kapulo Pablo Escobar konsentis tiun oferon, nur por eskapi en 1992, finigante la batalhalton de Gaviria kaj provokante la batalojn de la karteloj kiu fine ensorbis la movadojn de la gerilo politika, asociante ilin kun la ĝenerala milito de la fidrogaj.

La prezidento Andrés Pastrana (1998-2002) klopodis denove la repaciĝon, asignante teritorion propran al la narkot-geriloj kaj iniciatante interŝanĝojn de kaptitoj, kio provokis la plietendiĝon kaj rekrudiĝon de la paramilitistaj fortoj de la AUC².

Juan Manuel Santos, ministro pri Nacia Defendado dum

¹ NT La gvidfrazo estis: “*Si se puede*” (laŭvorte: “ja oni povas”, “ja eblas”).

² NT Laŭ ĝiaj hispanlingvaj komencliteroj: [Autodefensas Unidas de Colombia](#) (Memdefendantaroj Unuiĝintaj de Kolombio).

la regado de Álvaro Uribe, sekvinto post Pastrana, heredis tiele longan historion de konfliktoj. Ĉi tiuj, oni povas pludiri, ne komenciĝis per la murdo de Gaitán kaj la “Bogotazo” en 1948. La “violento” estas endemia en la kolombia historio de post la sendependiĝo en 1819: de la banditado far la senoficaj veteranoj el la revolucio al la ribelo de Urdaneta en 1830, ĝis la konspiro de Sardá en 1833; de la ribelo far loĝantoj de Pasto kaj la Milito de la Superuloj¹ en 1840 ĝis la civitanaj militoj en Bukaramango kaj Palonegro ĉe la finiĝo de la 19^a jarcento, kun cent mil mortintoj; de la Milito de la Mil Tagoj kaj la perdo de Panamo en 1903 ĝis la striko en bananplantejoj de 1928, rakontita far García Márquez en *Cent jaroj da soleco*, kaj la murdaro en Ciénaga samjare, la violento markis la historion de Kolombio antaŭ la “Bogotazo”.

Tio kio rimarkindas estas ke la violento kunvivadis kun la kreo de politika sistemo dupartia (Liberala kaj Konservativa) kaj kun florado kultura kiu transformis Bogoton en la “Atenon de Sud-Ameriko”. Kvankam la dupartia povo ne malhelpis la violenton kampan inter liberaluloj kaj konservativuloj, nek la antagonismon pri la reformo liberala de la edukado, pri la renovigaj leĝproponoj de la prezidentoj Tomás Cipriano de Mosquera (1845-1849) kaj José Hilario López (1849-1853), pri la konservativa kontraŭstaro de la prezidento Mariano Ospina Rodríguez (1857-1861), kaj pri la provo pozitivismista de “Ordo kaj Progreso” de la prezidento Rafael Núñez (1880-1882) kiu malfermis la vojon al la regado de la Konservativa Partio ĝis 1930.

Mi volas diri ke la administrado priskribita far Juan Manuel Santos en sia libro ne estas naiva, en la senco ke ĝi ŝarĝitas per la prapekoj de la historio de Kolombio kiujn ĉi tie mi elvokas, ĝi konscias pri la pezo de la pasinteco tamen ne rifuzas la esperon de la estonteco. Memevidente, mi ne akordas pri ĉio kion diras, laŭdas aŭ kondamnas mi amiko

¹ NT Hispanlingve: “*Guerra de los Supremos*”, civitana konflikto nomata tiele pro la partopreno de regionaj gvidantoj kiuj opiniis sin superaj ĉefoj.

Juan Manuel Santos. En Meksiko ni vivas en violenta landlimeco kun Usono kaj al mi ŝajnas ĉiufoje pli klare ke nur la nepunindigo (aŭ la laŭrajtigo) de la konsumado de narkotaĵoj, kiom ajn iom-post-ioma ĝi estu, povos lasi sen klientaro la mafiestrojn. En 1933 la prezidento Franklin Roosevelt finis la malpermeson pri alkoholaĵoj. Estadis daŭre ebruiuloj, tamen jam ne plu estis Al Capone.

Laŭdinda ĉe Santos estas lia intenco krei la bazojn juĝajn kaj politikajn kiuj ebligu gajni la militon sen malrespekti la homajn rajtojn. “Oni ne povas defendi la instituciojn agante ekster la kadro institucia”, deklaras la aŭtoro, kaj pludiras: “La antaŭkondiĉo fundamenta de triumfa armeo estas ĝia laŭleĝeco, ĉar tiu kiu triumfas tretinte la leĝojn kaj la rajtojn, faras tion je la kosto de si mem kaj de tio kion tiu asertas defendi”.

Tiucele, la ministro Santos proponis plurajn “kolonojn” kiuj elvokas, sendube, la “sep kolonojn de la saĝo” far T. E. Lawrence, kie la tiel nomata “Lawrence de Arabio” informas pri siaj militkampanjoj en la dezerto kontraŭ la turkia dominado. Santos proponas kolonon el instruado pri la temo de homaj rajtoj. Kolonon el militista disciplino kaj el reformo al la Militkrima Justico. Kolonon el protektado al vundeblaj popoloj (afriko-kolombianoj, sindikatanoj, indiĝenoj) kaj kolonon el kooperado. Nulo da tolero al malobservo de homaj rajtoj. “Armeo kiu ne gajnas, per sia sinteno honesta kaj respekta al la komunumo, la apogon kaj konfidon de la popolo, estas armeo venkita anticipe ...”. Pli da malmobiliziĝoj ol da kaptoj kaj pli da kaptoj ol da viktimoj, estas la devizo de la ministro Santos.

Multaj faktoroj submetis ĝin al testo. La afero pri la “falsaj pozitivaj”, tio estas, prezenti junulojn kun leĝo-rompaj antecedentoj, tamen nerilataj al la gerila batalado, kvazaŭ narkot-gerilanoj ekzekutitaj far la armeo. Klarega ekzemplo de perforto de rajtoj kiu, laŭ vortoj de Santos, konsistigis la “plej seriozan situacion kiun mi devis surprizi”. Aliflanke,

Santos sentas sin elrevigita ĉar li ne povis antaŭenigi plu la firmigon de la defendado por soldatoj kaj policistoj. Tiu ĉi estas la kolono kies konstruo mankis kaj kiun Santos, lasinte la ministerion, heredigis al siaj sekvantoj.

Li heredigis ion pli: ŝtatan politikon kiu koncernas ne nur Kolombion, kaj kiu baziĝas sur kvin punktoj. Unua, la volpovo por agi: elekto de celoj, pripensado, decido kaj realigo. Tute mala al nevolo, deteniĝo, kompulsio kaj, eĉ, eta volo. Dua, la strategio kiu artiku la instituciojn kaj donu al ili intencon (volon). Tria, la solidigo de la ŝtata regado sur la teritorio. Kvara, la protektado de la loĝantaro. Kaj kvina, la forigo de la komercado de narkotaĵoj.

Tiatipa politiko implicas unuigi la ŝtatajn agentejojn (rigardu, Meksiko); reatingi la regionojn okupitajn far la narkotmondo; provizi servojn de sekureco, justico kaj edukado, kaj religi la soldatojn kun la popolo el kiu ili devenas, donante sekurecon al ilia propra regiono. Agoj armeaj kaj por elliberigo de ostaĝoj (operacoj Ŝakon kaj Fenikso) kiujn Santos priskribas en sia libro atestas pri la strategio laŭirita far la aŭtoro.

“La Ŝtato alvenis por restadi”, Santos proklamas, kaj mi miras ke, dum mia vivo, ekzistis opinioj kiuj postulis la foreston de la Ŝtato kaj la imperiadon de la merkato. Hodiaŭ ĉiuj komprenas ke la merkato estas nur parto de la ekonomia kaj socia vivo, kaj ke la Ŝtato, ne estanta ĉio, estas pli ol la merkato, kvankam malpli ol la socio.

Volas mi nun, lasi, miavice, la esprimadon al Juan Manuel Santos. Multaj legantoj de tiu ĉi libro akordos kun Santos. Aliuloj, pridisputos liajn asertojn. Jen estas la sorto de ĉiu libro vivanta, kia estas tiu ĉi: ne kontentigi ĉiujn tuttempe. Ke “la kampanjo por la laŭleĝeco” restos kiel referenco tre grava pri tiu ĉi epoko de la kolombia vivo, al mi ŝajnas nedubinde. Ke la tempo donos pravigojn, malpravigojn kaj oponojn al ĉio legebla tie ĉi, ankaŭe. Ke la libro de Juan Manuel Santos ne estas komprenebla sen la historia pasinteco de Kolombio, ĉi

tio estas memorenda. Ke, fine, kion mi intencis en tiuj ĉi paĝoj estis klarigi, eĉ al mi mem, mian personan rilaton, kiel meksikano, kun Kolombio kaj la kolombianoj, ĉi tio estas la plej certa rimarko el ĉiuj.

Mi taksas lin, Juan Manuel Santos, kiel Sarmiento Domingo-n, mia plej bona lernanto. En mia romano *La seĝo de la Aglo*¹ mi aŭguris al li la prezidentecon de Kolombio en la jaro 2020. Estu tiel pli frue.

¹ NT Hispanlingve: “*La silla del Águila*”.

Annus horribilis

(Antaŭparole)

La ĵaŭdon 6-an de decembro de 2007, en la paradejo de la Militlernejo de Kadetoj Generalo José María Córdova, ĉe la fino de ceremonio por promocio de superaj oficiroj, mi prezentis, fronte al aŭskultantaro el uniformuloj kaj civiluloj, densan raporton pri la sukcesoj atingitaj de la Armitaj Fortoj dum la jaro tiame finiĝanta.

Ĝi ne estis ajna bilanco.

La jaro estis komenciĝinta kun la fuĝo, danke al la premo aplikita far la publiksekuriga agentaro¹, de Fernando Araújo, eksministro kaj unu el la ostaĝoj plej valoraj de la FARK, al kio sumiĝis, monatojn poste, la nekredinda odiseado de la subintendanto de la Polico John Frank Pinchao, kiu forfuĝis el siaj torturistoj kaj supervivis 17 tagojn en la ĝangalo, ĝis kiam li estis savita per helikoptero de la Polico mem.

Oni malaktivigis strategiajn kapulojn de la FARK kiel la alinomitaj *JJ*, *Negro Acacio* kaj *Martín Caballero*, kun granda povo ene de la organizaĵo, plus aliaj meznivelaj estroj kiel *Cristian Pérez*, *Hugo Sandoval*, *Felipe Arango*, *el Campesino*², *el Indio*³, *la Burra*⁴ kaj *Diego Cristóbal*. Aliaj danĝeraj estroj de

¹ NT Per “publiksekuriga agentaro” mi tradukas la kolombian koncepton “Fuerza Pública”, kiu ĝenerale inkluzivas samtempe la Militfortojn kaj la Policon, kvankam en kelkaj kuntekstoj verŝajne temas pri nur unu el tiuj ĉi institucioj.

² NT “la Kamparano”.

³ NT “la Indiĝeno”.

⁴ NT “la Azenino”.

la FARK, kiel *Hernán* kaj *Embera*, estis kaptitaj.

Tiame, dum nur la unuaj dek unu monatoj de 2007, estis malmobiliziĝintaj el tiu terorisma grupo 2.370 el ĝiaj apartenuloj, lacaj pro misuzo de siaj vivoj en projekto destinita al malsukceso, eĉ pluraj kun pli ol dek jaroj da apartenado al la gerilo. La meznombro estis preskaŭ po sep militantoj de la FARK malmobiliziĝintaj ĉiutage.

La publika opinio nacia kaj internacia estis versiĝinta kontraŭ la FARK, kaj postulinta, unuvoĉe, la elliberigon de la centoj da ostaĝoj en ties haveco. La fia murdaro de dek unu el la dek du deputitoj de la Valo de la Kaŭko¹ kiuj estis forrabitaj ekde aprilo de 2002, murdaro kiun la FARK intencis maski per cinikaj komunikaĵoj, estis levinta grandegan ondon da indigno, kio elmontriĝis en la sentofrapaj marŝadoj civitanaj de la 5-a de julio.

Konsidere al ĉi tia panoramo ĝenerala, en mia prelego de la 6-a de decembro mi resumis la rezultojn de tiu jaro per frazo kiu utiligis latinan esprimaĵon: “2007 estis la *annus horribilis* de la FARK!”.

Mi uzis esprimaĵon kiun, siamomente, popularigis la reĝino Elizabeto la 2-a de Anglio kiam ŝi deklaris ke 1992, la jaro dum kiu finiĝis la edzecoj de siaj filoj Karlo kaj Andreo, kaj dum kiu okazis brulo en la Kastelo Windsor, estis *annus horribilis* (jaro horora aŭ katastrofa), kontraste al la pli konata esprimaĵo *annus mirabilis* (jaro mirinda aŭ mirakla). Poste Kofi Annan, ĝenerala sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj, diris en prelego ke la jaro 2004 estis jaro speciale malfacila, *annus horribilis*.

Tiame pensis mi ke 2007 estis la jaro plej katastrofa por la FARK en ĝia tuta historio. Tamen, feliĉe, mi estis misa, ĝia *annus horribilis* apenaŭ estis komenciĝanta.

Kiu estus supozinta tiam ke, en la unua duonjaro de

¹ NT Kolombia departemento, hispanlingve: “Valle del Cauca”, foje nomita mallonge: “Valle” (Valo).

2008, finiĝus subtere tri el la sep membroj el ĝia sekretariaro, eĉ la alinomita *Manuel Marulanda*, ĝia fondinto kaj ĉefkapulo? Kiu estus antaŭvidinta ke la marŝadoj kontraŭ la FARK de la 5-a de julio estus superkreskata per la imponaj manifestacioj de la 4-a de februaro kaj la 20-a de julio de 2008, kun eĥo en ĉiuj anguloj de la planedo? Kiu estus imaginta ke la Armitaj Fortoj de Kolombio, en operaco senmanka, kia merito la admiron de la tuta mondo, estis elliberigonta sinjorinon Ingrid Betancourt, tri usonanojn kaj dek unu oficirojn kaj suboficirojn de la publiksekuriga agentaro ostaĝigitajn de la FARK, sen fari eĉ unu pafon?

La gazeto *Cambio*, en sia eldono de la 12-a de junio de 2008 reprenis la esprimadon kiun mi uzis en decembro kaj titolis artikolon de analizo pri la FARK per la vortoj “Annus horribilis” kaj jenan subtitolon: “La 18-a de junio kompletigas unu jaron ekde la murdaro de dek unu deputitoj de la Valo, komenco de la katastrofo por la FARK”. Laŭ *Cambio*, la 18-an de junio de 2007 (...) iĝis la unua ero el ĉeno da fiaskoj kiu igis el tiuj ĉi lastaj dek du monatoj la plej malbonan jaron el la 45 da historio de la FARK, tiom en la milita aferaro kiom en la politika”. Malgraŭ ke ankoraŭ ne estis okazinta la Operaco Ŝakon!

Kun tiuj ĉi novaj faktoj en la bilanco, mi estis rekonsideranta mian unuan analizon: La *annus horribilis* de la FARK ne estis nur unu jaro sed, reale, du jaroj: tiuj pasintaj ekde la liberiĝo de la eksministro Araŭjo, dum la eklumo de 2007, ĝis la komenciĝo de 2009, kiam ni daŭrigis la malfortigadon de tiu ĉi terorisma organizaĵo en la tuta nacia teritorio.

La spektindeco de la Operaco Ŝakon, kiu finiĝis per la elliberigo sensanga de dek kvin ostaĝoj kaj kiu estas, sendube, la operaco milita kaj de strategia informiĝado¹ plej

¹ NT Mi uzas “informiĝ-” por signifi ne nur la sencon “informokapta” aŭ “informkolekta”, sed ankaŭ la ligitan sencon de “informoanaliza”, sencoj korespondaj al la hispana *Inteligencia*, la angla *Intelligence* kaj la rusa *Разведка*, kiel ĉi tiuj estas uzitaj en la fakoj de spionado kaj sekurecaj agentejoj.

grava en la historio de la luktado kontraŭ la FARK (multaj homoj konsideras ĝin la plej spektindan mondscale kontraŭ la terorismo), povas opakigi procezon kompleksan kaj senhaltan el frapoj kontraŭ tiu ĉi grupo narkotnegocaterorisma, kio portis ĝin, post preskaŭ duono de jarcento da durkapa obstino en la metodoj de la perfortado kaj la timigado, al ĝia plej malbona tempo en ĝia tuta ekzistado.

Tial estas grave ke ni rakontu la procezon en ĝia tuto. Tio estas kontribuado al la memoro de lando kiu, kiel Kolombio, travivis pli ol ses jardekojn sen koni unu tagon da paco kaj tamen ekvidas, fine, danke al unu regado malhezita pri la afero de la sekureco —la regado de la prezidento Álvaro Uribe—, kaj danke al unuj fortoj armeaj kaj policaj kiuj estas en sia maksimuma nivelo, kaj kiuj faris heroajn sinoferojn, estontecon de trankvilo, ŝancoj kaj libero por ĉiuj.

Por fari tian rigardon tutecan al la duobla, preskaŭ triobla, “katastrofa jaro” de la FARK estas destinata tiu ĉi libro kiu estas, samtempe, atesto historia kaj omaĝo al nacio kuraĝa kaj suferinta ekvekiĝanta el la longa terursonĝo kian signifis tiu ĉi grupo kaj ties agado krima kaj terorisma.

Mi povus skribi ankaŭ pri la decidaj batoj ellasitaj kontraŭ aliaj krimaj organizaĵoj. La NLA¹, enmetita pli kaj pli en la malgravecon, estas perdinta, per la manoj de la publiksekuriga agentaro, plurajn el siaj kapuloj. Oni dispecigis la du plej povajn organizaĵojn de la narkotaĵkomerco, kiaj estis la kartelo de la nordo de la Valo, kaj la organizaĵo de la ĝemeloj Mejía Múnera, kaptinte aŭ malaktiviginte ĝiajn kapulojn. Oni batalas kontraŭ la krimbandoj ekaperintaj en teritorioj kiuj estis sub influo de grupoj de neleĝa memdefendo, nune malmobiliziĝintaj.

Tamen, mi decidis koncentri tiun ĉi libron sur la luktadon kontraŭ la FARK, la gerila organizaĵo plej malnova de la kontinento, konsiderata kiel terorisma far pli ol tridek ŝtatoj

¹ NT Hispanlingve: ELN (Ejército de Liberación Nacional).

—inter ili tiuj de la Eŭropa Unio— ĉar ĝi estas la precipa instiganto de la violento kaj narkotajkomerco en la lando. La FARK havas responson eĉ pri la formiĝo de la neleĝaj grupoj de memdefendo, kiuj kreiĝis kiel kontraŭago al ties ostaĝiga kaj murdĉantaĝa agado, kaj kiuj poste iĝis organizaĵoj tiel teruraj kiel tiu kiun ili volis kontraŭbatali.

Dum la Militfortoj kaj la Polico, registras en la enketoj favoran opinion kiu superas 70%, la FARK apenaŭ havas simpatian opinion en malpli ol 2% el la popolo, kaj estas abomenataj far la giganta plimulto el la kolombia popolo, kiu vidas en ĝi sian plej gravan malhelpon por atingi disvolvadon harmonian kaj pacan. Tial estas tiel grave rakonti la formon kiel, dum tiuj ĉi lastaj jaroj, la registaro kaj la Armitaj Fortoj estis cedigantaj tiun ĉi organizaĵon, transirante senrevenan punkton kiu kondukos, en venonta tempo kiun ni esperas proksiman, al ĝia submetiĝo al la normoj de la demokratio kaj de la Laŭleĝa Ŝtato.

Mi finas ĉi tiun antaŭparolon per kroma pripenso. La granda geniulo kaj fondinto de la moderna scienco, Isaac Newton, skribis al amiko tiun ĉi frazon saĝan: “Se mi vidis pli malproksimen ol aliuloj, tio estas ĉar mi staris sur ŝultroj de gigantoj”. La samo aplikeblas al ĉiuj ni kiuj havis la honorigan responson stiri la gvidrimenon de la Politiko de Demokratia Sekureco de la prezidento Álvaro Uribe dum ĉi tiuj historifaraj jaroj. Se hodiaŭ ni rikoltas rezultojn, kiaj neniam estis viditaj, tio estas “ĉar ni staras sur ŝultroj de gigantoj”.

Kiel ministro pri Defendado, nomumita por tiu ĉi ofico far la prezidento Uribe en julio de 2006, koncernis min la gvidado de tiu ĉi procezo ĉar mi troviĝis “en la konvena loko en la konvena momento”. Tamen mi devas fari ĝustan omaĝon al miaj antaŭuloj kiuj glatigis la vojon, per taŭgaj politikoj kaj daŭra strebado de plifortigo kaj kompetentigo de la publiksekuriga agentaro, por atingi la rezultojn pri kiuj ni hodiaŭ raportas.

Ekde la regado de la prezidento Pastrana¹ —kiu samtempe kiam li dialogis kun la gerilo, komencis tiun ĉi procezon de plifortigo arma kaj polica, kun la impulso de la Plano Kolombio— estis fundamentaj la kontribuajoj de la ministroj Rodrigo Lloreda (forpasinta), Luis Fernando Ramírez kaj Gustavo Bell. Mi reliefigas kaj dankas la laboron faritan, dum la unua periodo de la prezidento Uribe, far la ministroj Marta Lucía Ramírez, Jorge Alberto Uribe kaj Camilo Ospina.

Mi havis, ankaŭ, la bonan sorton kalkuli kun laborteamo mirinda kaj harmonia, tiel en la Ministerio —kun la apogo de la vicministroj Juan Carlos Pinzón, Sergio Jaramillo kaj la generalo (r.) Fernando Tapias— kiel en la armitaj institucioj.

Ekde la komenco de mia agado kiel ministro mi estis akompanata far brilaj strategiuloj kaj realigantoj kiel la generalo Freddy Padilla de León, komandanto de la Militfortoj; la admiralo David René Moreno, ĉefo de la Kuniĝinta Stabo² de la Militfortoj; la generalo Mario Montoya, komandanto de la Armeo ĝis la unuaj tagoj de novembro de 2008, kaj lia posteulo, la generalo Óscar González; la generalo Jorge Ballesteros, komandanto de la Aerarmeo, kaj la admiralo Guillermo Barrera, komandanto de la Mararmeo. En la Nacia Polico, mi havis la kunlaboradon de du elstaraj direktoroj, kiaj estis la generalo Jorge Daniel Castro kaj, speciale, la majoro-generalo Óscar Naranjo. Ili ĉiuj, krom grandaj patriotoj, estas ankaŭ eksterordinaraj homoj kiuj honoris min per sia amikeco kaj respekto.

Sub ilia direktado, pli ol 420.000 kolombianoj kiujn vestas la uniformo de Kolombio —oficiroj, suboficiroj, soldatoj, infanterianoj mararmejaj, policistoj— estis la heroaj kaj kuraĝaj realigantoj de la Politiko de Plifirmigo de la Demokratia Sekureco kiu hodiaŭ produktas historifarajn rezultojn. Ili ĉiuj, kaj precipe tiuj kiuj forfalis dum la plenumo de sia misio, kiuj perdis siajn membrojn aŭ suferis seriozan

¹ NT Andrés Pastrana Arango.

² NT Hispanlingve en Kolombio: “Estado Mayor Conjunto”.

san-damaĝon protektante siajn kunlandanojn, meritas nian plej grandan dankon kaj admiron. Ili estas vivantaj kaj ĉeestantaj en la koro dankema de la kolombianoj kiuj hodiaŭ, denove, ree trairas la vojojn, vilaĝojn kaj kampojn de nia teritorio sen timo kaj kun fido pri la estonteco.

Nenion el tio, tamen, oni estus povinta atingi sen la gvidkapablo, la inspiro kaj la subtenon de la prezidento Álvaro Uribe Vélez, reganto kiu ĉiam scias klare —kiel diris la romanoj kiam elpensis la respublikon— ke la sekureco estas la unua kondiĉo por la disvolviĝo. En ĉiu agado, kiom ajn riska ĝi estis, ni kalkulis kun la certecon de la apogo de la prezidento Uribe, kiu ĉiam restis informata pri ĉiu movo kaj ĉiu antaŭeniro, plenumante sian funkcion konstitucian de Supera Komandanto de la Armitaj Fortoj de la Respubliko, kaj injektanta fervoron kaj sindevontigon al la soldatoj, infanterianoj kaj policistoj kiuj daŭrigas la bataladon por la paco.

Mi ne havas ajnan dubon: se ni estas kie ni troviĝas, tio estas ĉar ni iras “sur ŝultroj de gigantoj”. Ili estas la ĉefroluloj de ĉi tiu historia epepeindaĵo kiu signifis la plej malbonan tempon por la FARK en ĝia tuta ekzistado kaj, konsekvence, la plej bonan tempon por Kolombio.

REVIVIGO DE LA MONTOJ DE MARÍA

*Karmen' amata, tero de amoj,
sub la ĉielo revoj kaj lumo,
printempo ĉiam en via grundo
sub via suno plena de ardoj.*

Fragmento el *Karmena de Bolívar*¹,
Porro² far Lucho Bermúdez³

¹ NT Hispanlingve: “*Cármén de Bolívar*”, Kanzono kun nomo de municipo de Departamento Bolívar. La municipo situas sudoriente de la urbo Kartageno, regiono de la Montoj de María.

² NT Muzika subĝenro de Kolombio.

³ NT Kolombia komponisto (1912 – 1994)

ĈAPITRO 1-a

La elliberiĝo de Fernando Araújo

Sendube, la fundamenta fakto kiu signis la komenciĝon de la plej malbonaj jaroj de la FARK estis la armea agado kiu kondukis al la elliberiĝo de la eksministro Fernando Araújo Perdomo, ostaĝigita ekde decembro de la jaro 2000, kaj tenita dum jaroj en la regiono de la Montoj de María, sub la responso de la fronto 37-a kiun estris la alinomita *Martín Caballero*¹.

Antaŭ ol tiu bona okazintaĵo, ni havis gravajn atingaĵojn, inter kiuj elstaras la aresto de la alinomita *Chepe*² aŭ la *Boyaco*³, en senmakula operaco bazita sur procezo de informiĝado farita de la Polico dum pli ol ok monatoj, kaj kiu havis la partoprenon de la Armeo, la Mararmeo kaj la Aera Forto. La Boyaco, unu el la kaŝkomercantoj de armiloj kaj drogoj plej gravaj de la FARK, estis arestita la 17-an de oktobro de 2006, kune kun sia kamaradino, la alinomita la *Negra*⁴, kaj aliaj 19 gerilanoj, en ĝangala regiono de la municipo El Retorno, de la departemento Güavjaro⁵. Tio estis

¹ NT Elparolu: *martIn kabaĝEro*.

² NT Elparolata “ĉEpe”, en Kolombio estas alinomo aŭ karesvorto por viro nomata “José” (Jozefo).

³ NT Elparolata “bojako”, vulgara vorto por homo de la kolombia departemento Boyacá (Bojakao), anstataŭ la preferinda “boyacense” (bojakaano).

⁴ NT Laŭsignife “Negrino”.

⁵ NT Hispanlingve: (el) Guaviare.

bato de granda efekto por la teroristoj, ĉar tiu ĉi deliktulo estis la liganto por la kunordigo de la narkotaĵkomerca agado kun kapuloj kiel la alinomita *Negro Acacio*, de la fronto 16-a, kaj la alinomita *César*, de la unua fronto, retenanto de la ostaĝoj kiuj estis elliberigitaj poste per la Operaco Ŝakon.

La operaco kontraŭ el Boyaco estis, ankaŭ, la unua farita post serio da kunsidoj kiujn ni havis kun la komandantoj kaj la oficiroj komisiitaj por la agoj, kie ni emfazis la koncepton de operacoj “kunfarataj”. La principaro estis sekvita laŭvorte, kaj la laborojn oni distribuis milimetrie kaj kunordige inter la diversaj Fortoj. Ĝi estis operaco en kiu oni ne faris eĉ unu pafon. Venki sen batali!, kiel konsilis Sun Tzu.

La Boyaco kaj la Negra estis ekstradiciitaj al Usono, kie ili alfrontas akuzojn pro narkotaĵkomerco kaj terorismo.

Alia aresto grava en la dua duonjaro de 2006 estis tiu de Horacio Castro, alinomita *Fernando Caicedo*, kiu estis lokalizita la 18-an de novembro far elitaj trupoj de la Armeo en densloĝata kvartalo de la sudo de Bogoto. Pli antaŭe Castro estis kunordiganto de unu tema diskutrondo dum la dialogprocezo iniciatita far la registaro de Andrés Pastrana kun la FARK en San Vicente de la Kagŭano¹, kaj estis ano de la internacia fronto de la FARK, de kie li estis kontaktinte organizaĵojn en eksterlando, anstataŭante en tiu rolo la alinomitan *Rodrigo Granda*, kiu tiam estis mallibera en prizono de la lando.

Sen malplivalorigi arestojn tiom signifaj kiel la du menciitaj, la Operaco Raso², realigita far la Kuniĝinta Komanditaro de la Karibo³ ekde la 31-a de decembro de 2006 por elliberigi sinjoron Fernando Araŭjo el lia ejo de kaptiteco, en loko nomata Aromeras⁴ norda, en la regiono de la Montoj

¹ NT "San Vicente del Caguán", municipo sude de Kolombio.

² NT "Operación Linaje".

³ NT "Comando Conjunto del Caribe".

⁴ NT Loknomo kiu devenas de arbusto tiea nomata "aromo".

de María, estis de tia amplekso kaj havis rezulton tiom spektindan kaj tiom dolorigan por la FARK, ke mi lokas en ĝi la komencon de la majstrofrapoj kiuj estas kaŭzantaj, unu post alia, la dekadencan de tiu terorisma organizaĵo.

La Montoj de María

La Montoj de María estas natura regiono situanta inter la departementoj de Bolívar kaj Sukro, en la Kariba parto de la lando, kiu ampleksas areon pli granda ol 6.000 kvadrataj kilometroj kaj inkluzivas sep municipoj de Bolívar (Córdoba, Cármen de Bolívar, Marialabaja, Sankta Jacinto, Sankta Juan Nepomuceno, El Guamo kaj Zambrano) kaj ok de Sukro (Coloso, Chalán, Morroa, Ovejas, Sankta Antonio de Palmito, Los Palmitos, Sankta Onofre kaj Toluviejo).

Geografie, la Montoj de María, estas la strategia centro de unuiĝo inter la norda parto kaj la suda parto de la Kariba marborda zono, kaj de tiu ĉi kun la ceteraĵo de la lando. Ĝi situas inter du gravaj ŝoseoj: la ĉefvojo de la Karibo, ligilo inter Sincelejo¹ kaj Kartageno tra Sankta Onofre, kaj a ĉefvojo de la Okcidento kiu portas de Sincelejo al Barranquilla² tra Cármen de Bolívar.

El la ekonomia vidpunkto, ĝi estas unu regiono el la plej riĉaj kiuj ekzistas en la kariba marborda zono. Tie ekzistas gravaj kultivejoj de tabako, ignamo kaj avokado, plus kultivejoj lignodonaj kaj grundoj taŭgaj por la brutobredado.

En la kultura kampo, la diverseco de ĝiaj esprimoj famigis ĝin en la lando. Lucho Bermúdez, la granda komponisto kaj orkestrestro, kiu popularigis la ritmon “porro”, estis naskita en Cármen de Bolívar. De Sankta Jacinto estas La Sakflutistoj de Sankta Jacinto³, kaj la hamakoj plej famaj de Kolombio. Tie troviĝas, eĉ, arkeologia muzeo kiu ekspozicias

¹ NT Elparolu: sinselĤo.

² NT Elparolu: barranklĝa.

³ NT “Los Gaiteros de San Jacinto”.

objektojn konsideratajn kiel el la plej antikvaj de Ameriko. Ovejas estas la sidejo de la Nacia Festivalo de Sakflutoj, kaj Morroa ne estas malpli grava kun sia Nacia Festivalo de la “Pito Atravesao”¹, muzikilo indiĝena de la regiono.

Pro ĉi tiuj karakterizaĵoj, la Montoj de María estis destinita iĝi regiono prospera kaj trankvila, kiu ne konu pluajn agitiĝoj ol tiuj de produktataj far la sakflutoj, la flutoj kaj la tamburoj. Malfeliĉe, la perversa krucado de interesiĝoj de la narkotaĵkomerco, la grupoj de memdefendo kaj la geriloj, en sia batalo por regi tiun ĉi regionon kernan, kiu estas trairejo deviga ekde Medeĝino² kaj la kafa akso³ ĝis la kariba marborda zono, ŝanĝis ties historion kaj igis el ĝi unu el la plej danĝeraj regionoj de la lando.

Kvaronon da jarcento antaŭe alvenis la gerilo kaj ekdetruis la stabilecon ekzistintan en la regiono. Poste alvenis la memdefendantaroj. Ĉe la komenciĝo de la 21-a jarcento, la Montoj de María (samkiel okazis en granda parto de la lando) estis preskaŭ prizono en kiu la enloĝantoj ne sentis sin liberaj por trafiki pro timo pri la konstantaj ostaĝigoj survoje, konataj kiel “miraklaj fiŝkaptaj”. En la jaro 2000 okazis preskaŭ po unu trafikhaltigejo neleĝa kun ostaĝigoj ĉiusemajne. La murdĉantaĝoj kaj murdoj estis ege oftaj. Ambaŭ la geriloj kaj la memdefendantaroj pribatalis la regadon por krei pasejojn por moviĝi kaj starigi zonojn de influo. Ilia furiozo ne konis limojn.

Tie agadis: la PLA⁴, ĝis sia malmobiliziĝo en 1991; la nomata Revolucia Armeo de la Popolo⁵ (RAP); la NLA, kaj la FARK, per siaj frontoj 35-a kaj 37-a, dependantaj de la Bloko Karibo. Ili ĉiuj sin vivtenis per la murdĉantaĝado kaj la

¹ NT Fluto farita el kano.

² NT Hispanlingve: “Medellín”.

³ NT “Eje cafetero”: Nomo en Kolombio de la ĉefa kafprodukta regiono de la lando.

⁴ NT Popola Liberiga Armeo, hispanlingve EPL (“Ejército Popular de Liberación”).

⁵ NT “Ejército Revolucionario del Pueblo” (ERP).

ostaĝigado, kio kaŭzis delokojn kaj angoron kontinuan al ĉiuj enloĝantoj.

Siaflanke, la memdefendantaroj, en sia strebo por plifirmigi sian povon regionan, agadis kun egega brutalo kaj faris terurajn amasmurdojn kiel tiuj de El Salado, Chengue¹, Pichilín² kaj Macayepo³, pri kies makabraj detaloj ni nur nuntempe sciigas nin.

Iel ajn, geriloj kaj memdefendantaroj, kontraŭ ĉio kion oni povas imagi, respektis siajn teritoriojn unu al la alia. Ĉiu atingis la plej grandajn monrimedojn el sia agado de narkotaĵkomerco kaj el la timigo al la loĝantoj.

Komenco de la repacigo

Kiam la prezidento Uribe komencis sian regadon, en aŭgusto de 2002, la situacio en la Montoj de María estis alarmanta. Tial, unu el liaj unuaj decidoj esti krei teritorion de restarigo kaj plifirmigo por la regado de la publika ordo en dek kvin municipoj de Sukro kaj naŭ de Bolivaro, inkluzivitaj ĉiuj kiuj kunformas la Montojn de María. Li ankaŭ utiligis similan instancon en la departemento Araŭko.

Danke al tiu instanco, kiu validis inter septembro de 2002 kaj aprilo de 2003, kaj al la plifortiĝoj armea kaj polica en la regiono, la sekursituacio ekŝanĝiĝis. La NLA estis ĉiufoje pli etigita, kaj la FARK, vidintaj malkreski sian ostaĝigan povon kaj sian eblon por moviĝo, komencis procezon de retreto kaj de centrigo de fortoj kio devigis ĝin unuigi la kapablojn de siaj frontoj 35-a, komandita far la alinomita *Manuel* aŭ *Mañe*, kaj 37-a, subordigita al Martín Caballero.

Per la ekfunkciigo de la Politiko de Demokratia Sekureco kaj la monrimedoj atingitaj el la militimposto, la Mararmea

¹ NT Elporolu: ĉenge.

² NT Elparolu: piĉilln.

³ NT Elparolu: makajEpo.

Infanterio, komponanto de la Mararmeo kun pleja ĉeesto en la regiono, preskaŭ duobligis. Estis kreitaj du batalionoj kontarŭgerilaj kaj la Mararmea Infanterio de Mia Popolo, laŭ la origina ideo pri la Soldatoj Kamparanoj. Cetere, la Polico sin establis permanente en ĉiuj municipaj ĉeflokoj, garantiante tiel la ĉeeston de la aŭtoritatoj kaj gajnante la konfidon de la popolo, kiu dum longa tempo vivis timigite, ĝis tia grado ke en la vilaĝoj de la teritorio ofte neniu vendis skrapglaciaĵon aŭ friskan trinkaĵon al soldato, infanteriano aŭ policisto, pro timo al venĝoj far la gerilo.

Dum la jardeko de 1990 kaj ĝis la jaro 2004, la sekurigon de la teritorio plenumis precipe la Mararmeo, per sia Unua Brigado de Mararmea Infanterio, kun sidejo en Corozal¹ (Sukro), kaj la Ŝipa Forto de la Karibo, kun sidejo en Kartageno. En la municipaj ĉeflokoj kaj la plej gravaj ŝoseoj ekzistis ankaŭ permanenta apogo far la Polico.

Oni faris nekalkuleblajn agojn kontraŭ la diversaj malleĝaj grupoj en la areo, kaj por la lokalizo kaj liberigo de Fernando Araŭjo, kiel la Operaco Fenikso en marto de 2008, kun rezultoj laŭdindaj rilate la dismalaranĝon de tendaroj de la FARK kaj la nekapabligon de kelkaj el ties militantoj. Tamen, ankaŭ suferis la trupoj multajn homperdojn, efike de la minoj kontraŭhomaj enterigitaj far la teroristoj. Martín Caballero estis vera spertulo en la uzado de tiuj minoj, kaj tio faris multe pli malfacila lian areston.

Io tre grava estis la reakiro de sekureco en la ŝoseoj. Laŭ la grado en kiu la publiksekuriga agentaro sekurigis la komunikajn vojojn kaj la miraklaj fiŝkaptaj de la gerilo finiĝis, tiom plu la ekonomio ekfluis denove kaj la ĝenerala etoso pliboniĝis.

Je la jaro 2004 preskaŭ ĉiuj vojoj estis malfermitaj kaj kontrolitaj la 24 horojn ĉiutagajn. Nur kelkaj vojpecoj, kiel tiu kiu ligas la municipon Cármen de Bolívar kun Zambrano aŭ

¹ NT Elparolu: korosAl.

Sankta Jacinto kun Corozal, havis dum plua tempo kelkajn restriktajn punktojn, kiuj estis fine forigitaj en 2007. Mi mem nuligis, komence de tiu jaro, la lastan restriktion kiu pezis sur nacia ŝoseo, kiu estis la vojo Sankta Juan Nepomuceno—Kartageno.

Komencinte per la ŝoseoj sekurigitaj, la trupoj laŭleĝaj estis etendanta sian regadon ambaŭflanke de la vojoj, ĉiufoje enirante iom plu kamp-internen. Oni devas rememori ke la Montoj de María prezentas tre kompleksan terenreliefon kiu, kvankam ne speciale alta (ĝia maksimuma pinto, la monto Maco¹, apenaŭ superas 800 metrojn), tamen ĝi estas plena de nivelvarioj kaj profundaj rokokrutaĵoj kiuj disigas unu monton de alia, kun ravinoj meze kaj densa vegetaĵaro.

La 24-an de decembro de 2004 okazis fundamenta ŝanĝiĝo en la strategio por la reakiro de la sekureco en la Montoj de María kaj aliaj lokoj de publika senordo en la kariba regiono de la lando, per la kreo de la Kuniĝinta Komanditaro de la Karibo, kun sidejo en Sankta Marta² kaj jurisdikcio sur dek departementoj, kies unua komandanto estis la generalo Mario Montoya Uribe.

La Kuniĝinta Komanditaro de la Karibo reproduktis, en la regiona sfero, tion kion signifas la Ĝenerala Komanditaro de la Militfortoj en la nacia sfero: la kunigon de la informiĝpovo kaj de la logistikaj kapabloj de la Armeo, la Mararmeo kaj la Aera Forto sub ununura komandinstanco, por direkti la agadojn per unuigita kriterio en unu teritorio de la lando.

En tiu ĉi Komanditaro estis inkluzivitaj la Divizioj Unua kaj Sepa de la Armeo, la Ŝipa Forto de la Karibo, la unua brigado de la Mararmea Infanterio, kaj la bazoj de la Aera Forto en Barranquilla kaj Medeĝino, kun servareo de 250.000 kvadrataj kilometroj, kaj homforto kiu hodiaŭ superas la 64.000 homojn entute.

¹ NT Elparolu: mAko.

² NT Hispanlingve: “Santa Marta”.

Kiel esperinde, la kuna laboro de ĉiuj Fortoj per la Komanditaro, ĉiam kunordigite kun la Polico, la DAS¹ kaj la Prokurorejo², estigis pli grandajn rezultojn kaj progresojn de sekureco, atingitaj per multaj kaj sinsekvaj agadoj, en kiuj trupoj alte trejnitaj, kun kombino el ekipaĵoj teraj, riveraj kaj aeraj, faris ĉiufoje pluan damaĝon al la teroristoj.

Al tio kuniĝis du favoraj faktoj: unuflanke, la malmobiliziĝo de la memdefendantaroj kiuj agadis en la teritorio, kiel parto de la ĝenerala procezo de submetiĝo al la justico far la tiel nomataj paramilitistoj, dum disvolvo de la Leĝo de Justico kaj Paco. La grupoj kiuj agadis tie, kiel la nomata Bloko Herooj de la Montoj de Maria, malmobiliziĝis en la jaro 2005, kio mildigis la premon sur la loĝantaro. Kvankam kelkaj novaperintaj krimbandoj estas klopodantaj daŭrigi la narkotaĵnegocon de la memdefendantaroj, tiuj estis gandaparte nekapabligitaj far la Polico. Hodiaŭ oni povas diri ke la fatala epoko de la amasmurdoj far la paramilitistaro en la Montoj de Maria forpasis por ĉiam, kaj ke iliaj instigintoj kaj farintoj, en ties plimulto, estas enprizonigitaj kaj respondantaj antaŭ la justico.

Alia faktoro pozitiva por la sekureco en la teritorio estis la malmobiliziĝo, inter la fintempo de 2006 kaj majo de 2007, de ĉiuj membroj kiuj konsistigis la RAP, disiĝintaro el la NLA kiu dum pluraj jaroj sin dediĉis al la ostaĝigado en la regiono. Oni kalkulas ke la RAP estis responsuloj pri almenaŭ 140 ostaĝigoj, kaj sendube estis unu el la terorismaj organizaĵoj kiuj plejan damaĝon estis farintaj al la tiea ekonomio. Danke al la kontinua militista premo, kaj troŝargitaj ankaŭ pro la persekuto far la FARK, kiuj volis forigi ĝian konkurencon pri krimoj, proksimume 50 el ĝiaj lastaj anoj sin donis, kun siaj

¹ NT Departamento Administra de Sekureco.

² NT En Kolombio "Fiscalía". La funkciulo prokuroro ("fiscal") jure persekutas kulpulojn, prienketas krimojn, ekzamenas juĝajn procesojn kaj akuzas ĉe juĝistoj kaj tribunaloj de justico. La prienketo povas komenciĝi laŭofice pro iniciato de la Ŝtato mem, aŭ pro denunco de iu civitano.

armiloj, al la trupoj de la Kuniĝinta Komanditaro de la Karibo, markante la finon de tiu delikta organizaĵo.

La Operaco Raso

Martín Caballero, la kapulo de la 37-a fronto, fifieris pri la ostaĝigo de la eksministro pri Ekonomia Disvolvado Fernando Araújo, kiun li retenadis kiel sia plej grava predo, ĉar tio donis prestiĝon al li antaŭ siaj samuloj de la gerilo. Li neniam imagis ke tiu ostaĝigo estis fine okazigonta la preskaŭan estingiĝon de sia gerilfronto kaj de la 35-a fronto, kaj la fino de sia krima vivo.

Fernando Araújo, ostaĝigita en Kartageno la 4-an de decembro de 2000, ne nur estis parto de la registara stabo de la prezidento Pastrana sed ankaŭ ties persona amiko. Tial ne estas strange ke, pro la kvalito de la persono, la prezidento mem estis postulante al la Armitaj Fortoj unu agadon zorgege farotan por atingi la lokalizon kaj la elliberigon de la d-ro Araújo.

Tiucele, kaj sub la direktado de brigad-generalo de la Mararmea Infanterio, oni kreis taĉmentojn de informiĝado kun la specifaj celoj de elliberigi la eksministron kaj atingi la areston aŭ morton de lia ostaĝiginto, Martín Caballero, senbrida vipo en la regiono de la Montoj de Maria.

Tiu informiĝado estis daŭre perfektigita kaj nuntempigita dum la jarpasoj; ĝi farigis informiĝado kunhavata (koncepto pri kiu mi estis insistonta ĝissate) inter la diversaj Fortoj sekve de la kreo de la Kuniĝinta Komanditaro de la Karibo, kaj neniam ĉesis progresi al la du celoj fiksitaj. Ĉiutage des pli kompleta estis la informoj kiujn oni havis pri la agadoj de Caballero kaj la restloko de Araújo, kiu ĉekomence estis retenita far pluraj rotoj de la 37-a fronto, tamen lastatempe — kaj pro la kreskanta manko de homoj kaŭzita far la senĉesa militkampanjo— estis retenita far Caballero mem kaj ties sbiroj.

Oni kaŝaŭskultis komunikaĵojn, oni kontrolis la agadojn de la familianoj de la kapulo, kaj lian sistemon de provizado, ĝis atingi karakterizaĵon tre ĝustan pri la agadoj de lia fronto, kiu, ekde la sturmo la Ŝipa Forto de la Karibo en 2003, estis preskaŭ kunfandiĝinta kun la fronto 35-a direktita far Mañe.

Tiele, mallargiĝadis la sieĝo ĉirkaŭ la ostaĝigantoj kaj la ostaĝo. Pluraj operacoj estis lanĉitaj inter 2003 kaj 2006, tamen Caballero ĉiam sukcesis eskapi kaj kaŝi sian ostaĝon, kvankam ĉiufoje estis pli rimarkebla la nefirmeco de lia situacio.

Malgraŭ la pluraj klopodoj nesukcesaj, la Armitaj Fortoj ne perdis sian nordon. Sen la grupoj de memdefendado, sen la minaco de la RAP, kun la NLA en evidenta malantaŭeniro — parte ankaŭ pro la ĝenado far la FARK mem—, nur mankis fini la reduktejojn de tiu ĉi gerilo kaj elliberigi ties lastan ostaĝon en la teritorio, por solidigi la sekurecon en la Montoj de María.

En decembro de la jaro 2006, kiam la eksministro kompletigis ses jarojn da ostaĝeco, ne malpli ve, la konaĵoj akumulitaj far la informiĝfako de la Kuniĝinta Komanditaro de la Karibo, danke al informoj el malmobilizigintoj kaj aliaj homoj de la teritorio kiuj akceptis kunlabori kun la aŭtoritatoj, estis nedubeblaj: Martín Caballero kaj unu grupo de almenaŭ 200 gerilanoj retenadis la ostaĝon Fernando Araújo en tendaro situanta en la teritorio de la Aromeras norda, en la areo Cocuelo¹, en jurisdikcio de la municipo Carmen de Bolívar, preskaŭ bordumanta la riveron Magdalena.

La nomo “Aromeras” devenas de arbusto nomata “aromo”, densa kaj dorna, kiu proliferas en la regiono; ili malfaciligas la trairadon kaj limigas la videblon apenaŭ ĝis distancoj inter dek kaj dudek metroj, ĉar sia folibranĉaro ne permesas vidi preteren. Ofte la gerilanoj, por eskapi el la armeaj agadoj,

¹ NT Elparolu: kokŭElo.

estis devigataj rampi sub tiaj arbustoj ĉar alimaniere estus neeble moviĝi.

Kun la certeco pri la situo de Araŭjo —la precizan lokon konatigis homo enŝteliĝinta kiu kunlaboris kun ni pro la rekompenco—, la Ĝenerala Komanditaro de la Militfortoj, sub la direktado de la generalo Freddy Padilla de León, projektis agadplanon, kiun li submetis por konsidero al la prezidento Uribe kaj al mi, pro la graveco de la misio kaj la risko al kiu povus oni sin elmeti.

La ideo estis fari sturman operacon uzante helikopteroj de la Aera Forto kaj la Armeo, kun elitaj trupoj de la Armeo senditaj el Barranquilla, kun la klara intenco elliberigi sekura kaj senvunda la doktoron Araŭjo, profitante la faktoron surprizon. Tuj post la sturmo, anoj de la Mararmea Infanterio estos enirantaj por fari la fermojn de la tereno cele aresti aŭ malaktivigi la gerilanon Martín Caballero kaj ties grupon.

Kiel oni estis garantionta la faktoron surprizon? Dum la tagoj antaŭaj al tiu fiksita por la operaco oni faros kontinuajn flugadojn de helikopteroj super la teritorio, tiel do la gerilanoj toleremiĝos al ili, fidante ke temas pri agoj transportaj kaj ne ofensivaj. Tiel, kiam la 31-an de decembro alvenos la helikopteroj kun la sturmotrupoj, la avantaĝo de la surprizo intervenos favore al niaj homoj.

La operaco —kies komponanto de informiĝado estis nomata “Parizo”, kaj kies fina efektivigo estis nomata “Raso”— estis realigata far la Kuniĝinta Komanditaro de la Karibo, tiame direktita far la generalo Óscar Enrique González Peña, kiu estis ricevinta la komandecon el la generalo Mario Montoya en marto de 2006. Iel ajn estas simbole ke jarojn poste la generalo González sekvis ankaŭ la generalon Montoya en la Komandado de la Armeo.

Kune kun la generalo González, kiu havis ordonpovon super la sekcioj de la Armeo, la Mararmeo kaj la Aera Forto, laboris ankaŭ la admiralo Roberto García Márquez,

komandanto de la Ŝipa Forto de la Karibo, kaj la kolonelo Bautista Cárcamo, komandanto de la Unua Brigado de Mararmea Infanterio, kiu dum jaroj estis serĉante, kiel plejgrava celo, la elliberigon de Araújo.

La prezidento kaj mi komprenis ke tiu ĉi operaco, danke al la preciza informo akumulita kiun oni havis, estis unika ŝanco por elliberigi la eksministron kaj frapi la terorisman grupon kiu plejan damaĝon estis faranta en la Montoj de María, kaj donis do al tio la aprobsignaturon.

Tamen, la prezidento klarigis ke antaŭ ol lanĉi la operacon, li serĉus la konsenton de la familio de Araújo, kiu estadis ĉiam tre solidara kun la agado de la Armitaj Fortoj, kaj kun kiu li havis konstantan kontakton. Tiel estis ke kelkajn tagojn antaŭ la operaco, li vokis sinjoron Alberto Araújo Merlano, patro de la eksministro, kaj al tiu rakontis ke la armea informiĝpovo estis eltrovinta la precizan lokon kie oni retenis lian filon kaj ke ĉio estis preta por lanĉi elliberigan operacon.

Miaflanke, mi ankaŭ parolis kun S-ro Alberto kaj kun ties filo Gerardo, malnova amiko ekde miaj tempoj de ĵurnalisto.

— Ĉu ni kalkulas kun la permeso de la familio?— mi lin demandis.

La patriarko de la familio Araújo petis iom da tempo por tion pripensi kaj konsulti kun sia familio, kaj fine diris al mi ke antaŭen, ke la familio permesis. S-ro Alberto ankaŭ komunikis al la prezidento Uribe sian aprobon al la provo de elliberigo, ripetante sian konfidon pri la agado de la publiksekuriga agentaro.

Post plenumo de tiu paŝo, ekpretiĝis la diversaj trupoj kiuj estis partoprenontaj en la fazoj de sturmo kaj de fermo, tamen la informo estis fakigita tiel ke malmultaj homoj, nur la altaj komandantoj, sciis por kio tiuj estis pretiĝantaj.

Frumatene la dimanĉon 31-an de decembro de 2006, dum

la plimulto el la kolombianoj estis ellitiĝantaj kun la intenco pretigi la jarfinajn festojn, preskaŭ 1.800 membroj de la Armeo, la Mararmeo, la Aera Forto kaj la Polico, plus apogantaj homoj el la DAS kaj el la Prokurorejo, estis pretaj ekagi por atingi la liberon de homo kiu eltenadis, kun stoikeco kaj digno, la martirigon de pli ol ses jaroj da ostaĝeco.

Tiumatene, la prezidento, la supera komandantaro kaj mi troviĝis en la militista flughaveno de Rionegro (Antjokio), atendente ke la vetero pliboniĝu por vojaĝi al Ĉokoo¹. La operaco estis realigota tuj post ricevi aprobon el taĉmento kiun ni antaŭsendis por konfirmi la koordinatojn kaj precizan informon por la elveturiliĝo el la helikopteroj. Tamen, la taĉmento ne povis alveni ĝis la loko por havi vidkonfirmon pri la tendaro; kion ĝi ja povis konkludi estis ke la gerilanoj pretiĝis por formoviĝi. Tio starigis al ni seriozan dilemon: Ĉu ni faru la operacon sen la cent elcentoj da la informo kiun ni intencis havi, aŭ ĉu ni perdu tian ŝancon. La generalo Padilla prezentis al mi la urĝan dilemon.

Tia estas la tipa situacio en kiu estas multe pli komforte esti ministro ol prezidento. Mi konfesas ke mi estis tre timema, tamen, danke al Dio, mi havis la prezidenton Uribe pretan kaj apudan, kaj kiam mi lin konsultis, li ne hezitis. Tio estis konstantaĵo kun la prezidento Uribe: li neniam *sin lavis la manojn* kaj, male, li prenadis sur sin la responson pri la decidoj plej kompleksaj. Kompreneble, mi ĉiam dankis lin pro tio.

Estis uzitaj du artileriaj helikopteroj, kvin transportaj helikopteroj kaj unu aviadilo de la Mararmeo, el kiu la admiralo García Márquez direktis la operacon. Ili alvenis al la teritorio iomete post la deka horo matena. La gerilanoj, kiel okazadis dum la pasintaj tagoj, pensis ke temis pri rutinaj superflugoj kaj daŭrigis sian kutiman okupiĝon. Tamen ĉi-

¹ NT Departamento, hispanlingve “Chocó”.

foje estis malsame. La helikoptero Arpía¹ UH-60 de la Aera Forto identigis la atakcelon de la tendaro kaj pafis la unuan raketon, dum pafsprucoj de maŝinpafiloj eliradis el la kvar helikopteroj Black Hawk de la Armeo kiuj ĝin eskortis. Tuj, dekoj da soldatoj de la Specialaj Fortoj de la Armeo subeniris per ŝnuroj kaj ekavancis, kun malfacilo kaj tre eta videblo, inter la dornaj branĉoj de la aromo-arbustoj.

La sturmo rezultis tiom surpriza ke la du retenantoj kiuj akompanis s-ron Araújo en ties tendo, pro simpla instinkto de memkonservo, kaŝiĝis, okazo kiun profitis la eksministro —kiu havis projektita en sia menso fuĝplanon por okazo kiel tiu ĉi— por sin ĵeti planken kaj rampi for de la tendo.

Ekde tiu momento li komencis odiseadon dum kvin tagoj da piedirado tra lokoj nehomtaŭgaj, kun preskaŭ nenio por manĝi, kiun li finis la 5-an de januaro, kiam li alvenis, maldika kaj lacega, al la vilaĝaro² San Agustín, je rekta distanco de dek du kilometroj ekde la tendaro el kiu li eskapis, kie fine li kontaktis grupon de mararmej infanterianoj apartenantaj al la 2-a Bataliono de la Mararmea Infanterio. Tiel finiĝis la kalvaria vojo de tiu ĉi homo —kion poste li rakontis detale en sia libro emociiga *El Trapecista*³—, kies mensklareco kaj humana kvalito mirigis nin la kolombianojn, kiuj festis dum tiu unua semajno de januaro de 2007 lian revenon al la libero. Kelkajn monatoj poste li estis nomumita Ministro pri Eksteraj Aferoj far la prezidento Uribe, ofico en kiu li reprezentis digne la nacion, kaj montris al la mondo, per sia propra persono, la abomenindan realon de la FARK.

Mi rememoras tiun vendredon 5-an de januaro, kiam Araújo aperis en San Agustín, kiel tago de senlima feliĉo kaj korfaciliĝo. Ĉar la labortagoj antaŭaj estis de angoro terura.

¹ NT Konata per la usona nomo “Black Hawk”, estas helikoptero de Sikorsky, tamen modifita en Kolombio, pafilhava, kaj nomita “Arpía”.

² NT En Kolombio “corregimiento”.

³ NT *La Trapezisto*.

Kiam, la lastan tagon de 2006, la trupoj eniris la tendaron forlasitan de la gerilo, post batalo kiu finiĝis kun la morto de ses teroristoj —inkluzive la kunulinon kaj la plejaĝan filon de Martín Caballero— kaj la forkuro de la ceteraj, ili ektrovis la surprizon ke la ostaĝo ne ĉeestis, kio kreis en ni grandan zorgon. Ni supozis ke li estis povinta forgliti profitinte la konfuzon de la sturmo, tamen ni ne havis eĉ momenton da trankvilo, samkiel ankaŭ ne havis liaj familianoj, dum ni ne sciis plencerte ke li estis vivsekura. Centoj da homoj de la Mararmea Infanterio kaj de la Armeo sin dediĉis al serĉado, metron post metro, de Araŭjo, dum aliaj daŭrigis la persekutadon de Caballero, kiu estis eskapinta el la sieĝo kun la plimulto el sia bando.

Dum la tagoj postaj al la sturmo de la 31-a de decembro daŭris la bataloj, en kiuj estis novaj mortintoj kaj vunditoj en la gerilo. Malfeliĉe, ankaŭ estis unu mortinto kaj pluraj vunditoj en la trupoj laŭleĝaj. Mortis la infanteriano de la Mararmeo Tayron Almanza Martínez, kaj perdis la krurojn pro mino kontraŭhoma la infanteriano Enrique Alfonso Pérez, martiroj ambaŭ de operaco kiu signis la komencon de la dekadenco de la FARK.

Mi estis translokiĝinta al Kartageno ekde la vendredo 4-a vespere por kunsidi kun ĉiuj responsuloj de la operaco en la instalaĵejo de la ŝipa bazo kaj revizii paŝon post paŝo la situacion. La sciaĵoj de la informiĝado kondukis nin al konkludo kia estis samtempe kuraĝiga kaj zorgiga: la eksministro estis eskapinta kaj ni estis devontaj trovi lin antaŭ ol la gerilo, supoze ke ĝi ne havis lin jam.

Kiam Araŭjo alvenis vendrede al San Agustín kaj povis, fine, uzi la poŝtelefonon de la serĝento Morales, estro de la taĉmento de la Mararmea Infanterio kiu havis la unuan kontakton kun li, mi lin telefonis —samkiel faris ankaŭ la prezidento Uribe, la generalo Padilla kaj la admiralo Barrera— kaj konstatis per lia voĉo rompita kaj emociita, la bonegan novaĵon pri lia libereco. Finfine ni estis elprenintaj el la manoj

de la FARK la unuan ostaĝon el tiuj kiujn la gerilo nomis “interŝanĝeblaj” pro ilia alta politika valoro. Tio estis rezulto senprecedenta kiu nin plenigis per espero.

En tiu sama momento mi iris al la bazo por lin atendi, kaj gratuli lian familion kaj niajn homojn. Mi havis la okazon brakumi lin, interparoli kun li kaj admiri la kuraĝon de valora homo kiu ne venkiĝis far la cirkonstancoj malfavoraj. Mirigis min la mensklareco kun kiu li alvenis, kaj la maniero kiel li kondukis la ĵurnalistan intervjuon. La ĝojo de liaj gepatroj, de liaj filoj kaj gefratoj, de liaj geamikoj, estis la plej granda rekompenco al tiom da jaroj da penado kaj sinofero de la Armitaj Fortoj por lokalizi kaj elliberigi lin.

Fernando Araŭjo estis finfine libera, post ses jaroj kaj 26 tagoj da ostaĝeco, plus kvin tagoj da fuĝado. Nun mankis al ni nekapabligi la responsulon de tia abomenaĵo kaj de tiom da mortoj, ostaĝigoj, popoldelokadoj kaj murdcantaĝoj en la Montoj de María: Gustavo Rueda Díaz, alinomita *Martín Caballero*.

ĈAPITRO 2-a

Martín Caballero faligita

Kiel parto de la nova militplano de la Militfortoj nomita Firmigo¹, kiu anstataŭis la Planon Patriotan de la unua regperiodo de la prezidento Uribe, oni decidis krei unu kuniĝintan Forton de elita tipo, kun partopreno de la Armeo, la Mararmeo kaj la Aera Forto, kiu havu la kapablon alveni, en tempo ne tre longa, al iu teritorio de la lando por plenumi specifan mision.

Tiu Forto, kiu estis parto de tio kion oni nomis Kuniĝinta Forto de Decida Agado (FUCAD²), kun preskaŭ 7.000 homoj, ekagis en marto de 2007 sur la regiono de la Montoj de María, en operaco kvazaŭ rastilo³, simila al tiu utiligita sukcese en Malajzio kontraŭ la ĉinaj geriloj.

La saman monaton —kun partopreno de la ĵuskreita FUCAD— estis lanĉata, sub estrado de la Kuniĝinta Komanditaro de la Karibo, la militkampanjo Sulo⁴ en kiu estis atingataj la plej gravajn rezultojn kontraŭ la frontoj 35-a kaj 37-a de la FARK, ĝis tia ekstremo ke ili preskaŭ diseriĝis.

¹ NT “Consolidación”.

² NT “Fuerza Conjunta de Acción Decisiva”, elparolu: fukAd.

³ NT “rastillo”: nomo en Kolombio por detala skanado far policistoj aŭ armeanoj.

⁴ NT “Alcatraz”

La krimdosiero de Caballero

Post la fuĝo de Fernando Araújo, Caballero ekestis speciale damaĝita. Lia kunulino kaj lia plejaĝa filo mortis en la sturma ago de la Specialaj Fortoj de la Armeo la 31-an de decembro de 2006, kaj en la sekvintaj monatoj estis arestitaj lia kuzo, aliaj du filoj kaj lia nevino, al kiuj li estis engaĝintaj en sia krima agado.

La 25 jaroj kiujn li estis dediĉinta al la murdado, la terorismo, la ostaĝigado kaj la murdantaĝado pasigis al li rigoran pagpostulan fakturon.

Caballero, naskita en Barankabermeño¹, apartenis, estinta dekkelkjarulo, en la komunismaj junularoj kaj eniris ekde frua junaĝo en la bandojn de la FARK. Ĉe 1996 li instaligis en la teritorio de la Montoj de María, kie li faris vandalismajn agojn kiel la detrusieĝoj de la vilaĝoj Córdoba, San Jacinto, Macayepo kaj San Cayetano. Ekde tiam, li firmigis sian povon timigan sur tiu strategia regiono, etendinte sian kriman agadon ĝis la urboj Kartageno kaj Barranquilla.

Oni kalkulas ke Caballero estis responsulo pri eksplodigi almenaŭ kvindek latismastojn de elektrodistribuo kaj plurajn sekciojn de la naftodukto Caño Limón—Coveñas². Li direktis sennombrajn ostaĝigojn, inkluzive tiun de la eksministro Araújo, kaj li faris el tiaspeca krimo kaj ankaŭ el la murdantaĝo al entreprenistoj kaj brutobredistoj de la teritorio, siajn ĉefajn fontojn de enspezoj. Li ankaŭ estris la movadon de narkotaĵoj tra tiu teritorio al la Golfo de Morrosquillo³, de kie la kokaino estis enŝipigata en rapidboatojn por ĝia internacia distribuado. La fronto 37-a sub liaj ordonoj atingis proksimume 500 membrojn en sia tempo de plej granda kapablo, ĉe la jaro 2002.

Lia teroragado atingis celajojn kiuj estis neimageblaj por

¹ NT "Barrancabermeja".

² NT Elparolu: kovEnjas.

³ NT Elparolu: morrosklĝo.

alia ajn gerilano. En majo de 2002 li planis atencon, konventempe renversita far la aŭtoritatoj, kontraŭ la usona eksprezidento Bill Clinton, okaze de ties vizito al Kartageno, kaj en aprilo samjara li atencis kontraŭ Álvaro Uribe, tiame kandidato al la prezidenteco, al kies karavano li almetis bombon en la centro mem de Barranquilla. La kandidato restis senvunda danke al sia blendita veturilo kaj al la lerteco de sia kondukisto, tamen kvar homoj mortis pro la eksplodo.

Ne senkiale Caballero estis konsiderita kiel la plej grava homo de la FARK en la kolombia Karibo, des pli ekde kiam Iván Márquez, ĉefo de la Bloko Karibo, sin ŝirmis en la zono landlima kun Venezuelo. Iel ajn Caballero —eĉ sen aparteni al la sekretariaro— signifis en la nordo de la lando tion kion la alinomita *Mono Jojoy*¹ signifis en la sudoriento. Sendube li estis unu danĝera malamiko kiun devige estis nekapabligi.

Fermiĝas la sieĝo

Per la aktivigo de la FUCAD, la sieĝo ĉirkaŭ la frontoj 35-a kaj 37-a estis mallargigata ĉiufoje plu.

Samtempe kiam dum la unua duonjaro malmobiliziĝis ĉiuj anoj restintaj de la RAP, ankaŭ okazis gravaj dizertoj el la anaro de la FARK. Horacio, kun pli ol 22 jaroj en la gerilo, malmobiliziĝis la 31-an de januaro kune kun la alinomita *Judith*. Ankaŭ enlasiĝis en la agrogramon de resocianigo: Josefa, Toño Varita, Antonio kaj Henry de Jesús Serpa.

Ĉiu malmobiliziĝinto signifis novan kaj valoran informofonton por la Armitaj Fortoj kaj kialon de malkuraĝigo por tiuj gerilanoj kiuj daŭris en la montaro, en cirkonstancoj ĉiufoje pli senhavaj. Caballero mem komentis, okaze de la senĉesa puŝado far la FUCAD, kio devigis lin ŝanĝi tendarejon post ĉiu kvina aŭ deka tago, ke la situacio estis tiom serioza ke “eĉ unu jukao fariĝis milita celaĵo”.

¹ Elparolu: “mOno ĥoĥOj”, alinomo de alia grava krimulo de la FARK.

La 1-an de julio de 2007, fine, estis donita frapo en la jugularon de la sekuriga strukturo de Caballero. Trupoj de la 30-a bataliono de la Mararmea Infanterio, kun apogo de la Armeo kaj la Aera Forto, ekbatalis kontraŭ taĉmento de la 37-a fronto direktita far la alinomita *Humberto* aŭ *La Indiĝeno Emberaa*¹, la konfidulo de Caballero, kulpigita pri pluraj atakoj al policaj postenejoj, pri embuskoj kontraŭ la Polico kaj la Mararmea Infanterio en la ŝoseo kiu ligas la municipojn Cármen de Bolívar kaj Zambrano, kaj pri la murdoj de dekoj da civiluloj.

La batalo disvolviĝis en teritorio marĉohava de la municipo de Córdoba (departemento Bolívaro). Meze de la nokta mallumo, kaj post suferi du homperdojn, La Indiĝeno Emberaa kaj siaj homoj sin kaŝis en la akvon de marĉejo, kaj frumatene ili estis laŭvorte, kun la akvo ĝis la kolo, ĉirkaŭtiaj far la trupoj, pro kio ili ne havis alian eblon ol kapitulaci.

La generalo Freddy Padilla de León vojaĝis al la loko kun kelkaj ĵurnalistoj kaj ricevis formale la kapitulacion de la gerilestro kaj naŭ el ties homoj.

—Ni akceptas tiun ĉi agon de pento —diris la generalo—. Vi konstatos ke vi ne bedaŭros la paŝon kiun vi ĵus faris.

Kaj pludiris:

—Mi scias, Emberaa, ke vi estis la dekstra mano de la kapulo kiu krimas en la Montoj de María, de Caballero, kaj ĝojigas min la fakto ke vi kapitulacis al la trupoj por ke via konscienco trankviliĝu, por ke vi havu tempon penti pri tiom da damaĝo kiun vi faris al la kolombia popolo kaj por ke vi diru al viaj kunuloj kiuj persistas en havi la armilojn ke tio ne estas la vojo.

La kapitulacio de Emberaa, plus la konfisko de armilaro, municioj kaj eksplodaĵoj kiu estis farata tiam, signifis pezan frapon al tio kio restis el la FARK en la Montoj de María, frapo

¹ NT “*El Indio Embera*”.

kiu havis kontinuan la tagon 24-an sammonatan kiam la trupoj de la FUCAD paffaligis dumbatale la alinomitan *Oswaldo*, kapulo pri financo de la fronto 35-a, kiu ekde iom antaŭe estis unuiĝinta kun la 37-a.

Oswaldo, kun 15 jaroj en la FARK, estis la teroro de vilaĝoj de la departemento Sukro kiel El Roble, Sincé, Galeras kaj San Benito Abad.

Per ĉiu malmobiliziĝo, ĉiu aresto, ĉiu paffaligo, ĉiu renverso de tendaroj aŭ detruo de minitaj kampoj, la grupo de Caballero estis perdinta aeron kaj moviĝkapablon.

La Operaco Aromo

Fine, pli ol ses monatojn post lanĉi la Operacon Sulon, la konaĵaro el informiĝado, pacience kolektita dum tiu tuta tempo, kaj konfirmita per la precizaj konaĵoj alportitaj far du informantoj tute kredindaj, determinis la situon precizan de la tendaro kie troviĝis Martín Caballero, en teritorio nomita nomata Aromeras suda¹, en jurisdikcio de Cármen de Bolívar.

Dekoj da operacoj estis faritaj dum la pasintaj jaroj por lin kapti, sensukcese, kaj tiam finfine ni havis certecon pri lia situo. La matenon de la merkredo 24-a de oktobro estis faritaj la lastaj retuŝoj al la operaco de sturmo al la tendaro de Caballero, operaco eknomita “Aromo” pro la arbustoj kiuj karakterizas la regionon. Ĝi estos kombinita operaco, realigita far la FUCAD sub la direkto de la Kuniĝinta Komanditaro de la Karibo, en kiu oni bombos unue la tendaron kaj poste eniros la Specialaj Fortoj de la Armeo kaj la Mararmea Infanterio por fari la fermon kaj firmigi la agejon.

Ni sciigis pri la operaco la prezidenton Uribe, kiu deziris al ni plenan fortunon, kaj ni restis atendantaj la rezultojn. Ni sciis ke tiu tago povus signi la finon de terura epoko en la Montoj de María kaj en la tuta regiono Karibo de la lando.

¹ NT “Aromeras Sur”.

Je la kvina kaj tridek vespere, la generalo Óscar González, komandanto de la Kuniĝinta Komanditaro de la Karibo, ordonis la ekiron de la aviadiloj kaj artileriaj helikopteroj de la Aera Forto, kiuj elteriĝis al la loko El Aceituno, en Aromeras suda, kie troviĝis Caballero. Duonjaro poste, la flugmaŝinoj estis sur la celaĵo kaj verŝis siajn bombojn kaj pafojn kontraŭ la gerila rifuĝejo kamuflita perfekte inter la vegetaĵaro.

—Trafo perfekta ! - anoncis radiofunkciigisto al la generalo González.

Samtempe, soldatoj de specialaj trupoj de la FUCAD subeniris el la helikopteroj kaj eksekurigis la terenon, ne trovinte grandan reziston. La gerilanoj kiuj postvivis la bombadon fuĝis, forlasinte malantaŭe mortintojn kaj vunditojn.

Baldaŭ la trupoj alvenis al la kerno de la tendaro. Tie estis la kadavroj de 20 teroristoj, inkluzive tiu de Martín Caballero, ne malpli. Estis mortinta la kaŭzinto de tiom da doloro kaj tiom da mizero en la Montoj de María!. Aliaj tri gerilanoj kiuj estis vunditaj, inter kiuj estis Jorge Peligro¹, eksplodigisto sperta, estis arestitaj kaj zorgitaj per la unua flego.

Ĉi-foje la sorto —kiu helpis lin eskapi en tiom da fojoj— ne estis flanke de Caballero. Laŭ tio kion ni konis pro kelkaj el la postvivintoj, je la vesperiĝo li malŝaltis sian poŝtelefonon kaj malŝaltigis tiujn de siaj anstataŭontoj, por rigardi en sia televidilo la novaĵprogramon. Kiam eniris la trupoj en la tendaron kaj unu el la soldatoj forprenis la tornistran kiu restis apud la kadavro, li trovis la poŝtelefonon de Caballero kaj ĝin ekŝaltis. Tuj aperis averta tekstmesaĝo, ricevita kelkajn minutojn antaŭe, kie legeblas “Zorgu ĉar oni falos sur vin”. Caballero ne legis ĝin, kaj tie finiĝis siajn tagojn. Kompreneble, meze de la paradokso, atentigis nin tiu mesaĝo kiu montris ke restis informantoj de la gerilo kun ioma nivelo de aliro al la militistaj planoj.

¹ NT Tradukebla kiel “Georgo Danĝero”.

La konfirmo pri la morto de Caballero estis tuj informita al la generalo González kaj al la admiralo Guillermo Barrera, komandanto de la Mararmeo, kiuj siavice raportis tion al la generalo Padilla, kaj ĉi-lasto al mi kaj al la prezidento Uribe, kiu diris al li: Transdonu miajn gratulojn al ĉiuj soldatoj kaj oficiroj kiuj partoprenis en la operaco. Tio estis la triumfo de persista laborado.

Fakte, la persisto estis la ŝlosilo. Danke al kontinua plurjara strebado finiĝis la mito pri la gerilano kapabla eskapi el ĉiuj sieĝoj. Ĉi-foje falis unu el la plej malbonaj, kaj eĉ ni trovis unu komputilon kiu estis iĝonta fonto de multaj datenoj pri la strategio, financoj kaj moviĝadoj de la FARK. Alia dua komputilo kiu estis en la tendaro restis neuzebla pro la bombado.

En la ĵurnalistara intervjuo kiun ni faris por informi pri la morto de Caballero ni rimarkigis ke la rezulto ne estis hazarda sed produkto el pacienca laboro de konado pri la areo kaj de alproksmiĝo al la loĝantaro kion dum la lastaj jaroj estis farinta la Unua Brigado de Mararmea Infanterio, el superega laboro de informiĝado, kaj, precipe, el nova modelo de operacoj kunfarataj, kiu enkombinis ĉiujn kapablojn de niaj Fortoj por ununura celo.

Fronte al la amaskomunikiloj, ĉe la fino mi emfazis tri punktojn:

1. “Tiu ĉi estas plua bonega ekzemplo de la politiko de firmigo: kun la apogo de la loĝantoj, la publiksekuriga agentaro estas liberiganta el la FARK tutan regionon de la lando kiu estas la atlantika zono, kaj garantianta la revenon al la normaleco. Ni la kolombianoj estas teditaj de la FARK: ni turnas nian dorson al ĝi, dum la publiksekuriga agentaro ilin arestas kaj mortigas.”
2. “Caballero ne estas la unua kapulo grava kiu falas —ni ĵus trafis la alinomitajn JJ kaj Acacio— kaj li ne estos la lasta: sciu la ordonantoj de la FARK ke ili ne havas estontecon kaj

ke ni trovos ilin eĉ en la lasta kaŝloko de la lando.”

3. Kaj ke iliaj viroj kaj virinoj akceptu nian inviton kaj malmobiliziĝu. La popola festo de malmobiliziĝo kaj reakordiĝo kiun ni vidis proksimdate en Cármen de Bolívar estas la ekzemplo de la nova spirito kiu reĝas nun en la Montoj: la popolo volas labori, amuziĝi, studi: volas normalan vivon.”

Oni devas reliefigi la gravecon de la popola kunlaboro, kiu alportis la precizan informon por la lokalizo de la kapulo. A la efikaj informintoj oni pagis rekompencan de 1.700 milionoj da pesoj¹.

Preĝon pro la malamiko

Je la unuaj horoj matenaj de la 25-a de oktobro mi iris, kun la altaj ordonistoj de la Armeo kaj de la Polico, al Cármen de Bolívar, la “tero de amoj” al kiu kantis la majstro Lucho Bermúdez, por saluti la trupojn kaj la popolon.

Kiam ni alvenis al la flughaveno de la municipo, centoj da ties enloĝantoj nin ricevis per vivuoj kaj aplaŭdoj. Tiu estis momento tre emociiga. Mi sentis ke tio ne temis pri festajo rikananta la morton de homo kiu faris al ili multon da damaĝo, sed pri io pli pozitiva: estis festo de la espero, la konstato jubila pri ke novafoje ili estis mastroj de sia destino, pri ke ili povos labori kaj trairi siajn terojn sen zorgo pro timigo kaj perforto.

En improvizita akto, mi parolis fronte al la enloĝantoj de Cármen de Bolívar, kaj mi diris al ili:

—Hodiaŭ vi kaj la tuta Kolombio povas rigardi la futuron kun multe pli granda optimismo ĉar ni estas gajnante tiun ĉi militon al la FARK. (. . .) Jam kun Martín Caballero kaj liaj fisekvantoj forigitaj el batalo ni vidos progreson, plia laboreblo kaj ekonomia bonstato.

¹ NT Peso = la Kolombia monunujo.

Cetere, mi sendis mesaĝon al la gerilanoj kaj bandanoj kiuj ankoraŭ restis en la regiono:

—Tiu ĉi estas via ŝanco por ke vi malmobiliziĝu kaj reintegrigu en la socian vivon kaj viajn familiojn. Se ne, vi finiĝos en la prizono aŭ la tombo.

Mankis tiam nur tri tagoj por la balotelekto de urbestroj, departementestroj, deputitoj kaj magistratanoj en la tuta lando, kion la FARK intencis malhelpi, kiel ĉiam, per minacoj kaj murdoj. Tial mi diris al la enloĝantoj de Cármen de Bolívar, kiuj unuafoje, post multo da tempo, estis povontaj alveni al la balotujoj, ne timigataj far Martín Caballero, jenon:

—La plej bona respondo kiun vi povas doni al la teroristoj, kiuj daŭras kredantaj ke murdante civilulojn ili atingos iun celon, estas iri baloti amase por viaj kandidatoj preferataj.

En la sama flughaveno en kiu ni surteriĝis estis la 20 korpoj de la faligitaj teroristoj, en nigraj sakoj kiuj ne permesis vidi iliajn vizaĝojn, kun identigaj etiketoj. La enloĝantoj de Cármen de Bolívar aperis malantaŭ la palisaro kiu ĉirkaŭis la lokon kaj multaj homoj volis vidi tiun kiu timigis ilin dum tiom da tempo, kvazaŭ se ili volus certiĝi pri ke fakte li estis mortinta.

La admiralo Guillermo Barrera, komandanto de la Mararmeo, ankaŭ alproksimiĝis por rigardi la korpojn en la nigraj sakoj. Li baldaŭ trovis tiun de Martín Caballero, tamen ne volis vidi la vizaĝon de la krimulo kiun li persekutadis dum jaroj, ekde kiam li estis komandanto de la Ŝipa Forto de la Karibo. Li ne bezonis vidi lin. Dum tiom da tempo li estis spurinta la konaĵojn el informiĝado kiuj konsistigis tian portreton de la kapulo, ke li sentis ke li konis lin sufiĉe.

Rigardante lian korpon inertan, la komandanto de la Mararmeo ne povis ne rememori la mortojn de tiom da infanterianoj de la Mararmeo, tiom da kunuloj, tiom da civiluloj, kiujn tiu ĉi homo kaŭzis maljuste. Li estis la malamiko, tamen nun mankis nur preĝi pro li kaj peti al Dio

ke pardonu lin. La admiralo Barrera alproksimiĝis al la sako kiu havis la nomon “Martín Caballero” en la etikedo, almetis sian manon dekstran sur la brusto de la mortinto kaj diris preĝon pro lia animo. Poste li stariĝis kaj krucosignis sin.

ĈAPITRO 3-a

Kvazaŭ kastelo el ludkartoj

La organizaĵoj de deliktuloj, post kiam perdas sian kapon, fine disfalas kvazaŭ kasteloj el ludkartoj. Tio estis kio okazis al la frontoj 37-a kaj 35-a de la FARK post la faligo de Martín Caballero.

La Operaco Sulo ne finiĝis ĵus post tiu rezulto, sed daŭris senĉese dum la jaro 2008, kun la celo sarki definitive la teritorion de la Montoj de María el la violentaj agantoj kiuj ankoraŭ postrestis.

Post la morto de Caballero, la alinomita *Manuel* aŭ *Mañe* — kiu estis vundita dum la operaco de la 31-a de decembro de 2006 rezultiginta la elliberiĝon de Fernando Araŭjo —, ĝistiana komandinto de la fronto 35-a, prenis ties postenon en la fronto 37-a, kaj la alinomita *Dúber* prenis sur si la kapecon de la 35-a fronto. Temis pri grupoj jam tre malkreskintaj, kiuj pli ol havi damaĝpovon, havis kiel ĉefcelo supervivi la persekutadon far la publiksekuriga agentaro. Ili esperis ke la ofensivo estis ĉesonta en iu momento, tamen tio neniam okazis.

La 11-an de februaro de 2008, la trupoj de la Kuniĝinta Komanditaro de la Karibo, gviditaj laŭ informoj el helpantaj civiluloj de la teritorio, alfrontis batale la taĉmenton direktitan far *Dúber* kaj lin mortigis en kampara parto de la

municipo Ovejas (departemento Sukro), kune kun la alinomitan *Pedro Stalin*, konsiderita kiel la kapulo ideologia-politika de la fronto 35-a. Alia gerilano sin fordonis.

La krimdosiero de Dúber inkluzivis, krom ĉiajn teroragojn, ostaĝigojn kaj murdĉantaĝojn, ankaŭ la eksplodigon de azeno-bombo kontraŭ la policstacio de Chalán (Sukro) en marto de 1996, kruelaĵo kiu ŝokis la landon tiam.

Per lia morto, estis senefikigita la terorkapablo de la fronto 35-a, ĉar estis li kiu kunordigis la instaladon de minsemitaj kampoj kaj la murdĉantaĝojn.

Kaj la ludkartoj de la kastelo daŭre disfalis. La 29-a tago de la sama monato februaro venis la vico al Mañe, kiu estis komandante la restaĵojn de la frontoj 35-a kaj 37-a. Kun apogo de la DAS kaj la Teknika Fako de la Prokurorejo, membroj de la Unua Brigado de la Mararmea Infanterio arestis lin en kampara areo de la municipo Córdoba Tetón (Bolívaro), kiam li klopodis eskapi vestita kiel civilulo.

Mañe, spertega ĉantaĝisto, provis subaĉeti la infanterianojn oferante tri milionojn da pesoj kiujn li portis kiel monbiletoj, tamen ili plenumis sian devon kaj lin metis sub ordonoj de la Prokuroroj. Tiel finiĝis la longa kariero krima de la anstataŭinto de Martín Caballero, kiu lin helpis organizi la du frontojn agintajn en la Montoj de María kaj estis seminta per sango kaj doloro tiun teritorion. Inter multaj aliaj akuzoj, Mañe estas akuzita pri la murdoj de eksurbestro de San Benito Abad kaj ties ŝoforo, en marto de 2001, kiuj estis bastonitaj ĝismorte kaj poste dismembritaj per maĉetoj. Tiel granda estis la brutaleco de tiu krimulo.

Estis la prezidento Uribe kiu donis la novaĵon al la lando pri la aresto de Mañe, en diskutforumo pri infrastrukturo por la kariba marborda zono tiam okazanta en Sankta Marta. Kun nekaŝebla kompleziteco li petis al la ĉeestintoj aplaŭdon por la publiksekuriga agentaro, kaj li mem gratulis la ĝeneralan komandanton de la Militfortoj.

—Jen sendis al vi gratulojn ĉiuj departementestroj, urbestroj kaj deputitoj de la marborda zono, de la kariba regiono —diris la prezidento al la generalo, kiu lin aŭskultis aliflanke de la telefona komuniko—. Aplaudon al la generalo Padilla. La civitanaro estas tre kontenta, mia generalo. Mi vin gratulas.

Feliĉe, la frapoj estis daŭre produktitaj je akcelita ritmo. La 11-an de marto, troŝargitaj far la forta militista premo, malmobiliziĝis antaŭ trupoj de la Kuniĝinta Komanditaro de la Karibo, en kampara teritorio de Los Palmitos (Sukro), dek du membroj el la frontoj 35-a kaj 37-a, inter kiuj estis la alinomitaj *Arturo Katire* kaj *Albeiro* aŭ *Chicharrón*, Katire estis komisiito por la reteno de Fernando Araŭjo dum preskaŭ tri jaroj, antaŭ ol transdoni lin al la senpera reteno far Caballero mem, kaj estis la kandidato kun pleja ŝanco por anstataŭi la alinomitan Mañe en la direktado de la malfortigitaj frontoj.

Ĉe la fino de aprilo, la dua kapulo de la fronto 35-a, alinomita *Pollo Isra*, estis mortigita dumbatale en San Benito Abad (Sukro). La 19-a de majo estis arestita la trian de la sama fronto, la alinomitan *Federico* aŭ *Cortico*, en jurisdikcio de Majagual (Sukro), kune kun alia gerilano pli. Ili estis ĉiuj homoj kun mezumo de 20 jaroj da aneco en la FARK, tial, ĉiufoje pli, la frontoj 35-a kaj 37-a perdis ordonkadrojn.

Tamen mankis du pluaj batoj fino-faraj. Post la perdo de Dúber, la komandado de la fronto 35-a koncernis la alinomitan *Jáder*, kun tri kondamnaj verdiktoj sur sia kapo pro ĉantaĝaj ostaĝigoj, kiu estis akompaninta la alinomitajn Caballero, Mañe kaj Dúber dum ties longaj krimaj iradoj, Jáder estis kaŝinta en Medeĝino, kun virino kiu funkciis kiel sia eskorto, tamen li estis lokalizita danke al la informoj liverita far pluraj gerilanoj malmobiliziĝintaj.

La 22-an de majo de 2008, kiam la homoj de la TFE (Teknika Fakoj de Enketado¹) de la Prokurorejo kaj de la

¹ NT Hispane: CTI, “Cuerpo Técnico de Investigaciones” de la Fiscalía.

GAULA¹ de la Mararmea Infanterio alvenis ĝis lia rifuĝejo, Jáder provis ludi sian lastan karton prezentante sin per falsa identiga dokumento, tamen baldaŭ li estis malkaŝita kaj arestita kune kun sia kunulino. En la loko kie li estis kaŝinta oni trovis plurajn komputilojn kaj dek milionoj da pesoj en monbiletoj.

La alia fino-fara bato estis la aresto de la lasta signifa kapulo de la fronto 37-a kaj la restaĵoj de la fronto 35-a, la alinomita *Daniel King*, kiu estis anstataŭinta la gerilanon Arturo Katire post ties malmobiliziĝo. Li kaj sia kunulino estis trovitaj la 20-an de junio far homoj de la TFE kaj de la Mararmea Infanterio en apartamento en Sankta Marta. King estis aktive partopeninta en la ostaĝigo de Fernando Araŭjo kaj en la fiaskigita atenco kontraŭ Bill Clinton, kaj okupiĝis ankaŭ pri la organizado de apogantaj bandoj en Kartageno kaj najbaraj municipoj.

Tiel alvenis al sia fino, por la praktiko, la frontoj 35-a kaj 37-a de la FARK kiuj dum tiom da jaroj semis teruron en la bela regiono de la Montoj de María kaj en aliaj teritorioj de la kolombia Karibo. El la duonmilo da homoj kiujn ĝisatingis komandi Martín Caballero ili pasis al apenaŭ dek gerilanoj senrangaj kiuj hodiaŭ forfuĝas el la aŭtoritatoj, sen kapablo por rearmiĝi aŭ regrupiĝi, atendantaj sian malmobilizigon aŭ areston.

La frapoj sin sekvis unu la alian danke al la persisto de la Armitaj Fortoj kaj al la kuraĝo de ĝiaj homoj, al ĝia laboro kuna kaj kunordigita, al ĝia renovigita informiĝfako kaj ties kapablo enŝteliĝi en la malamikaron, kaj al la kreskanta kunlaboro civitana. Estis jaroj da peniga laborado, kiuj produktis sian unuan frukton kiam la eksministro Fernando Araŭjo, profitante la sentiman agon armean por lin elliberigi, rampis sub la aromo-arbustoj kaj forkuris al la libero.

¹ NT Elitaj taĉmentoj specialigintaj por lukti kontraŭ la ĉantaĝado kaj la ostaĝigado.

Post tio falis, kvazaŭ kastelo el ludkartoj, la alinomitaj La Indiĝeno Emberaa, Oswaldo, Martín Caballero, Dúber, Pedro Stalin, Mañe, Katire, Albeiro, Pollo Isra, Federico, Jáder kaj Daniel King, kaj kun ili multaj pli, senrangaj gerilanoj plus aliaj kiuj malmobiliziĝis.

Nedubinde, la 31-a de decembro de 2006, tago de la forkuro de Fernando Araújo, povas esti konsiderata kiel la komencpunkto de la plej malbonaj jaroj por la FARK en ĝia tuta historio.

ĈAPITRO 4-a

La reveno de la paco

La reakiro de la paco kaj la elpelo de la armitaj grupoj malleĝaj kiuj dum jaroj pridetruis la Montojn de María estas, ĝisnune, la plej sukcesa ekzemplo de Plifirmigo de areo de la nacia teritorio.

Pri kio mi temas kiam mi skribas pri Plifirmigo? Ĉi tio bezonas mallongan klarigon:

Dum la unua regperiodo de la prezidento Uribe la celo fundamenta de la Armitaj Fortoj estis atingi la teritorian regpovon en la plej granda parto de la landa areo, tio estas, elradikigi la terorismajn grupojn kaj reakiri la monopolon de la armiloj flanke de la Ŝtato. La politiko aplikita tiam estis la Politiko de Defendo kaj Demokratia Sekureco, kiu konkretiĝis en la operaca kadro per la militplano nomita Plano Patriota.

Kiam mi enoficiĝis en la Ministerio pri Defendado, en julio de 2006, ni trovis ke estis necese taŭgigi la politikon por la novaj defioj kiuj estis preter la teritoria regpovo. Okazinte la nivelo de antaŭeniro kian prezentis la Politiko de Demokratia Sekureco, jam ne plu sufiĉis ke la trupoj elpelu la violentulojn el la teritorio, sed necesis garantii ke tiuj neniam revenos, kio bezonis firmigi la ĉeeston de la Ŝtato en la reatingitaj areoj.

La kulturo de la neleĝeco trovas fekundan grundon tie kie la ĉeesto de la Ŝtato estas malfortika aŭ eĉ nula. Tial, nia

nova tasko estis garantii, per la kunordigita laboro de la Militfortoj kaj la Polico, ke la enloĝantoj de regionoj kiuj restis dum jardekoj submetitaj al la violento ricevu la servojn sociajn kaj publikajn el la institucioj de la Ŝtato. Tion ĉi ni nomas “socia firmigo de la teritorio”.

La nova politiko kiun ni efektivigis ekde 2006 nomiĝis, tial, Politiko de Firmigo de la Demokratia Sekureco, kaj la militplano eknomiĝis Plano Firmigo.

Ni havas nun du ilojn same gravajn por garantii sekurecon subteneblan: la ĉeeston de la publiksekuriga agentaro en la repacigitaj areoj kaj la alvenon, kun la celemo restadi, de la ŝtataj institucioj por provizi la loĝantaron per la bazaj servoj de justico, instruado, sanzorgado kaj infrastrukturo.

En tiuj areoj kie ankoraŭ ne ekzistas la kondiĉoj por deca funkciado de la institucioj de la Ŝtato, kion kunordigas la Centro por Kunordigo de Integra Agado (CCAI) ¹ de la prezidenta institucio, la publiksekuriga agentaro, per siaj batalionoj de inĝenieroj, faras la konstruaĵojn plej neprajn por la komunumo.

Friska trinkajo en la placo

En la tempoj de Martín Caballero, la vilaĝoj de la Montoj de María perdis la gajecon kiu antaŭe karakterizis sin. Oni ne plu okazigis la tradiciajn karnavalojn aŭ corrales ², la turismo malaperis kaj la placoj ĉiutage senhomiĝis je la sesa vespere, kiam ĉiuj sin ŝirmis hejme, evitante problemojn.

En Cármen de Bolívar okazis murdoj preskaŭ ĉiutage, unutage kaŭzita far la memdefendantaroj, alitage far la gerilo.

Tamen, la aferoj ŝanĝiĝis ekde tiu 24-a de oktobro de 2007

¹ NT “Centro de Coordinación de Acción Integral (CCAI)”.

² NT Elparolu: korralEñas, popola festo en kiu oni toreadas plurajn virbovojn samtempe.

en kiu Caballero falis mortigita pro la bombado de la Aera Forto. Unu loĝanto de la regiono diris al ĵurnalisto ke, la tagon post lia faligo, la terenoj plivaloriĝis inter dek kaj dudek milionoj da pesoj, kaj tiu ĉi ne estis troiganta. Hodiaŭ la nemoveblaĵoj en la Montoj de María valoras kvaroble aŭ kvinoble pli ol du jarojn antaŭe. Eksterlandaj investistoj denove rigardas tiun ĉi teritorion riĉa je resursoj, kaj taŭga por brutobredado. La Nacia Federacio de Kafkultivantoj¹ komencis projektojn por kultivi denove kafon en la teritorio, kaj la tabakaj kompanioj gvidas iniciatojn por revivigi la semadon de tabako.

Tagojn antaŭ ol rezigni la ministrecon mi ĉeestis ceremonion en Ovejas en kiu la Philip Morris donis al cento da kamparanoj la kreditojn necesajn por semi kultivaĵojn de tabako, kiujn la kompanio devontiĝis aĉeti. Unu el la favoritoj diris al mi: “Ni neniam imagis ke ni estos reakirintaj niajn terenojn”.

Hodiaŭ denove eblas io tiel simpla kiel preni friskan trinkaĵon en la placo de Cármen de Bolívar je la deka nokte, sentante la kareson de venteto kaj aŭskultante la gajan muzikon de la marbordo. Alivorte, la loĝantoj de la Montoj de María reakiris sian rajton je la feliĉo.

Ĉe majo de 2008 oni konsideris ke la laboro de la FUCAD estis plenumita, do ĝi estis retirita el la Montoj de María, redonante la responson pri la kontrolo sur la areo al la Unua Brigado de Mararmea Infanterio. Cetere, ene de la filozofio de la Politiko de Firmigo de la Demokratia Sekureco, oni kreis, kun sidejo en Kartageno, la Centron por Unuiĝo de Integra Agado² de la Montoj de María, komisiita pri kunordigado de la laboro de socia firmigo de tiu teritorio, kun la celo savi ĝin el la krimea minaco.

Per tiu ĉi Centro de Unuiĝo —simila al alia kiu funkcias en

¹ NT “Federación Nacional de Cafeteros”.

² NT “Centro de Fusión de Acción Integral”.

la areo de la Macarena¹ ĉe la sudoriento de la lando— oni celas: ripari la socitekŝaĵon, vunditan pro jaroj da angoro kaj timigo; stimuli kaj faciligi la kreadon de produktopovaj projektoj, kaj plibonigi la instalaĵojn sanzorgajn, instruejajn, publikservajn, kaj la vojan infrastrukturon de la regiono.

Iom post iom, la miloj da kampanoj delokitaj pro la violento estas revenintaj al siaj vilaĝoj. Artikolo de la ĵurnalo *El Tiempo*² rakontis la okazintaĵon de virino, Omaira Villegas, kiu estis devigita eskapi kun sia familio el Macayepo, vilaĝaro de Cármen de Bolívar, ĝis Sincelejo, en la jaro 2001 por eviti sian murdon. La FARK estis murdintaj dum du jaroj, pro ordono de Caballero, dek kvin familianojn ŝiajn. “Danke al la publiksekuriga agentaro”, deklaris Omaira, “iom post tiom la vivo ekrevenas al Macayepo”. Ĉi tiu estas nur unu inter miloj da historioj de doloro kaj fiekszilo kies travivintoj hodiaŭ eksentas la konsolon de la reveno de la sekureco al siaj vivoj.

La transversa ŝoseo de la paco

La inĝenieroj de la Armeo, dume, antaŭeniras en la konstruo de veturvojo kiu ligos la altan parton de la Montoj de María kun la du ĉefvojoj kiuj ĉirkaŭas ilin, tiu de la Karibo kaj tiu de la Okcidento, tiele ke iliaj enloĝantoj havu plian facilecon por elporti siajn rikoltaĵojn —avokado, kakao, maizo, ignamo— al la precipaj urbaj centroj de la marbordo kaj de la landinterno. Kaj poste al la merkatoj de Usono kiam estos aprobata la Traktato pri Libera Komerco.

Ĝi estas la Transversa Ŝoseo de la Montoj de María, veturvojo kiu povus esti nomata “la transversa ŝoseo de la paco”.

Tiu ĉi projekto, realigita en sia tuto far la armeaj inĝenieroj, ligos la municipon Cármen de Bolívar kun Sankta

¹ NT Elparolu: *makarEna*.

² Vivente Arcieri G. “Se unen esfuerzos por los Montes de María”, 8-a de oktobro de 2008.

Onofre (Sukro), kun longo de 38 kilometroj kaj investo proksima al 12.000 milionoj da pesoj, favorante proksimume 175.000 loĝantoj de la regiono.

La 9-a de aŭgusto de 2008, mi akompanis, kune kun la altaj ordonistoj de la Armeo, la prezidenton Uribe por kontroli la staton de progreso de la vojo, kiu devos esti kompletigita ĉe la fino de 2010. Post tiom da jaroj da militista penado, ni estis revenantaj al la areo, jam ne por konstati militan fakton, sed por inspekti la antaŭeniron de civila konstruaĵo. Tio estas bona ŝanĝo!

Feliĉe, ne necesas atendi ĝis kiam tiu ŝoseo estos jam konstruita, por senti la novan aeron kian kodiaŭ spiras la regiono. Jam la transportaj kompanioj denove trairas la vojon kiu portas de Sincelejo al Cármen de Bolívar, sen timoj pri ostaĝigoj aŭ detruaj agoj. Denove la turistoj alvenas veturvoje al la belaj strandoj de Tolú kaj Coveñas, en la Golfo de Morrosquillo, kaj ili eltrovas kilometron post kilometro, la belecon, la kulturon kaj la folkloron de la dek kvin municipoj de la Montoj de María.

Denove sonas la sakflutoj kaj la grakŝalmoj, la tamburoj kaj la “pito atravesao”, kaj la senmortaj porroj¹ de Lucho Bermúdez. La enloĝantoj de la Montoj de María denove dancas, semas, ridas kaj revas.

Post jaroj da sinofero, dum kiuj multaj homoj de la Armitaj Fortoj perdis siajn vivojn, sanojn aŭ korpintegrecojn por liberigi tiun teritorion, iĝis realaĵo la lasta strofo de “El Mochuelo”², populara kanzono de la komponisto Adolfo Pacheco, naskita en Sankta Jacinto, en la centro mem de regiono kiu travivis la inferon de la violento kaj kiu hodiaŭ esperplene rigardas futuron:

¹ NT Muzika subĝenro de Kolombio.

² NT Noktuo aŭ strigoforma birdo.

*“Sklavo nigra kantu,
tiun melodion vian;
kantu nun sen danĝero
kiel vi jam faris iam
kiam estis libero
en la Montoj de María”*

MENSOGOJ KAJ FIASKOJ

Pli facile falas mensoginto ol lamulo

Proverbo

ĈAPITRO 5-a

La trompo de la Kagŭano

La FARK konstruadis sian kriman karieron sur pado el mensogoj: tiuj kiujn ĝi diras al siaj anoj por endoktrinigi kaj konvinki ilin pri resti en la gerilo; tiuj kiujn ĝi dissemas per siaj komunikaĵoj, intencante misgvidi la atenton for de siaj teroragoj, aŭ eĉ fijustigante ĉi-lastajn, kaj tiuj mensogoj kiujn ĝi diras al si mem por konstrui kialon por vivi pludaŭre en la ĝangalo, atakante siajn samnacionojn, sen ia eblo de triumfo.

Eble la mensogo plej daŭra kiun la FARK vendis al la lando, dum jaroj, estis sia supozita pacvolo dum la procezo de dialogo kaj intertrakto kiun gvidis la registaro de la tiama prezidento Andrés Pastrana en la zono de malstreĉiĝo¹ de la Kagŭano. Kun pretendemo de ŝtatistoj la gerilanoj akceptis gravulojn naciajn kaj eksterlandajn kaj ĉeestis temajn diskutrondojn kaj debatojn. Tamen, ili havis klare ekde la komenco ke sia celo ne estis la paco sed la plifortigo de siaj trupoj kaj la akiro de militorajteco, kio estus la agnosko fare de la internacia komunumo.

La gerilon oni devas prijuĝi laŭ ĝiaj agoj anstataŭ ol laŭ ĝiaj vortoj. Samtempe kiam la gerilanoj parolis pri paco, ili

¹ NT “Zona de distensión”, kutima nomo en Kolombio por la senarmeigita areo Kagŭano, kiu havis partojn en la municipoj: Vista Hermosa, La Macarena, La Uribe kaj Mesetas (departemento Metao), kaj San Vicente del Caguán (departemento Kaketao).

ostaĝigadis, murdadis, ĉantaĝadis, detruis vilaĝetojn kaj daŭrigis siajn narkotajkomercan agadon. La samon ili faras hodiaŭ: dum ili reparolas pri hipotezaj humanaj interkonsentoj, ili retenas centojn da kolombianoj ostaĝigitaj, faras amasmurdojn kiel tiu sur indiĝenojn de la etno Aŭao¹ en februaro de 2009, rekrutigas perforte infanojn, murdĉantaĝas, almetas bombojn, komercas narkotaĵojn kaj eĉ faras ekocidon² pro helpi la renverson de ĝangalo por ebligi la semadon de plia kokao.

La rivelajoj de Fidel Castro

La granda de la trompo kiun maĥinaciis la FARK dum la procezo de la Kagŭano aperis malkaŝe per la proksimdata libro farita de Fidel Castro *La paco en Kolombio*³, en kiu la kuba eksprezidento rivelas la informon kiun sia persona sendito José Arbesŭ raportis al li pri sia interparolo kun Manuel Marulanda.

Laŭ la raporto, datita en februaro de 1999, la FARK laboris en du scenfakoj: politika kaj milita. Dum en la politika la gerilanoj partoprenis la dialogojn, en la milita ili sin pretigis “por avanci kaj atingi poziciojn kiuj ebligu al ili antaŭeniri tiel forte kiel la cirkonstancoj interna kaj eksterna permesas”.

Marulanda konfesis al Arbesŭ ke ili preferis intertrakti kun Pastrana ĉar li “donis pliajn garantiojn al la sistemo kaj al Usono kaj, tial, la tempon bezonatan por fortikigi nian laboron ne nur en la afero milita sed ankaŭ en la politika, precipe en la grandaj urboj”.

La jenaj rivelajoj el la informo de Arbesŭ al Castro, pri liaj interparoloj kun la ĉefo de la FARK estas eĉ pli harstarigaj:

“En la strategia militplano ili laboros por daŭrigi la militon

¹ NT “Awá”.

² NT Neologismo rilata al medio-detruo (hispane: ecocidio | angle: ecocide | france: écocide | germane: ökozid | ruse: экоцид.).

³ NT “*La paz en Colombia*”.

kaj bataladon malproksime de la municipoj senarmeigitaj kaj por iom-post-iome alproksimigi la gerilajn frontojn al la grandaj urboj, aktivigante la agadon de la propagando per armiloj en la urboj, kaj samtempe ili pretigas fortan militan ofensivon dum tiuj monatoj por frapi plue la Armitajn Fortojn kaj kreadi la kondiĉojn por finan ofensivon. Tio klarigis la neĉeesto de aliaj membroj de la sekretariaro en la kunsido kun ni”.

“Por tiu fina ofensivo necesas faktoroj en la nacia sfero, ekzemple, ke la registaro estu erodita pro la krizo ekonomia kaj financa, kio igos pli nepopulara la novliberalan projekton de Pastrana, kaj favoros la politikon de alianco de la FARK kun aliaj sociaj sektoroj. (. . .)”

“Antaŭe ol tia fina ofensivo, ili konsideras la alternativon dividi la landon en du, ekprenante la regpovon en du aŭ tri departementoj de la sudo (Kaketao, Putumajo, Metao)¹, dum en la nordo ili tenos sieĝitaj kaj blokitaĵ la grandajn urbojn. Ĉi-okaze ili serĉos solvon interkonsentitan surbaze de la dek programaj punktoj de la FARK kaj ili estos en pli granda avantaĝo por intertrakti; se ĉi tio ne eblus, ili daŭrigos la militon ĝis la ekpreno de la regpovo, kion ili praktikos transformante la 80 gerilajn frontojn en la kernan kolonon de popola povo kaj ke la plej bonaj komandantoj ekprenu la direktadon de la armitaj fortoj”.

Kiel estis esperinde, ĉe la fino de la renkontiĝo de Arbesú kun Marulanda, ĉi lasta diris al la kubano ke li povas rakonti al la prezidento Pastrana ĉion kion ili ambaŭ prikonversaciis “escepte de tio kio temas pri la strategia plano politika-milita”. Kaj tiel faris Arbesú. Ni nur ekkonis presliterajn la planojn de milito kaj ekspansio, kiujn prilaboris la FARK dum ĝi partoprenis la dialogojn en la Kagŭano, per la publikigo de la libro de Fidel Castro en 2008.

Rememorindas ke ankaŭ la prezidento Pastrana mem, en

¹ NT “(Caquetá, Putumayo, Meta)”.

la diskurso per kiu li metis finon al la pacprocezo, la 20-an de februaro de 2002, denunciis la mensogojn de la FARK, en emociplena paragrafo dediĉita al Manuel Marulanda persone:

“Mi donis al vi mian honorvorton kaj mi respektis ĝin, mi ĉiam respektis ĝin, tamen vi sturmis mian bonfidon, kaj ne nur mian sed tiun de la kolombianoj. Ekde la unua momento vi lasis vaka la seĝon de dialogo kiam mi estis tie, gardita far viaj propraj homoj, preta por paroli. Ni dekretis zonon por teni intertraktadon, ni plenumis ĝian senigon je la Armitaj Fortoj, kaj vi ĝin transformis en kaŝejon de ostaĝigantoj, en laboratorion de malleĝaj drogoj, en deponejon de armiloj, dinamito kaj forrabitaj aŭtoj. Mi oferis la limtempon de 48 horoj kaj ĝin plenumis, tamen vi, kaj via grupo, faris nenion alian ol trompi la nacion”.

ĈAPITRO 6-a

La murdaro de la deputitoj

La mensogo estas armilo de la FARK kaj, ju pli ĝiaj falsajtoj estas malkaŝitaj kaj eltiritaj ĉe la publika lumo, des pli ĝi perdas fundamentan ilon por sia agado de misinformado kaj politika milito kontraŭ la Ŝtato.

En la jaroj 2007 kaj 2008 la falsajtoj de tiu gerilo revenis, kvazaŭ bumerango, kontraŭ ĝi mem, kaj subfosis iun ajn kredindecon kiun ankoraŭ ĝi havus.

Unu el la plej mallumaj okazintaĵoj en la krimkariero de la FARK, kiu restis gravurita neforviŝeble en la konscienccon doloritan de la kolombianoj —kune kun aliaj kruelaĵoj kiel la amasmurdo de Bojayá en majo de 2002, la aŭto-bombo en la klubejo El Nogal en februaro de 2003 kaj la murdo de la ostaĝoj en Urrao en majo samjara— estis la murdaro de dek unu el la dek du deputitoj de la Valo de la Kaŭko kiujn ĝi ekostaĝigis en aprilo de 2002, kiuj estis murditaj, sen defendiĝeblo, far siaj kaptintoj la 18-an de junio de 2007, en la ĝangaloj de la kolombia sudokcidento.

Blindigitaj pro la makabra ordono de la sekretario mortigi siajn ostaĝojn, prefere ol permesi elliberigon far la Armitaj Fortoj, la homoj de la 60-a fronto de la FARK pafadis kovarde sur la sendefendajn ostaĝojn kredinte ke alvenis patrolo de la Armeo. La realaĵo estis ke grupo el la 29-a fronto de la gerilo mem ilin atakis konfuzinte ilin kun malamika

bando de la NLA, kaj okazis mallonga batalo inter la du bandoj terorismaj, sufiĉa por ke la kapulo de la grupo responsa pri la reteno de la deputitoj krii la teruran ordonon, kiu estis plenumita senhezite: “Mortigu ilin kaj foriru ni!”

La ununura elsavita el la murdaro, ĉar li estis enfermita en aparta loko pro disciplinpuno, estis la deputito Sigifredo López, kiu estis liberigita en februaro de 2009 kaj povis rakonti kion li travivis dum tiu fatala tago.

La murdaro estis ago terura, kaj same hontinda estis la maniero kiel la FARK klopodis ĝin kaŝi kaj kulpigi la agentaron publiksecurigan kolombian, malrespektante la doloron de la familianoj, por kiuj la gerilanoj prokrastis maksimume la redonon de la korpoj de ties karuloj.

“Piedbatoj de dronanto”

La sinsekvo de retmesaĝoj kiujn krucigis la membroj de la sekretariaro inter ili, planante la kielon kaŝi la amasan murdon, kion ni fine konis danke al la datenoj trovitaj en la komputiloj de la alinomita *Raúl Reyes*, estas unu el la pruvoj plej dirantaj pri la krueleco kaj sensenteco de tia grupo, kiu havas nenian konsideron pri la valoro de la homa vivo.¹

La alinomita *Afonso Cano*, tiama ĉefo de la okcidenta bloko de la FARK, sub kies responso estis la du frontoj kiuj koliziis hazarde la 18-an de junio, estis la unua kiu sciigis la ceterajn membrojn de la sekretariaro pri tio kio okazis:

“Pro zerioza konfuzo kun alia grupo el la FARK kiu konfuzis ilin kun ‘elenos’² kaj ilin atakis, la gardantoj mortigis dek unu ostaĝojn el la dek du ĉar ili pensis ke la Armeo ilin atakis. Serioza eraro kiu kreos al ni multajn problemojn. Se ekzistas

¹ La retmesaĝoj kiujn mi mencias estis publikigitaj far la gazeto *Semana* en sia eldono de la 2-a de junio de 2008, en la artikolo “Tiel estis la murdaro” (“Así fue la masacre”).

² NT La nomo “elenos”, vorto kreita surbaze de la komenditeroj de la ELN (“Ejército de Liberación Nacional”) estas populara nomo por la t. n. Nacia Liberiga Armeo (NLA).

armeanoj proksime al la loko kie okazis la fakto kaj se ni povas treni la kadavrojn tien, ni povos kulpigi pri la okazintaĵo la malamikon ”.

De la komenco, Cano videbligas la intencon kulpigi la Armeon pri la murdaro kiun la gerilo mem faris”.

Manuel Marulanda, frostasange, faris la 22-an de junio analizon pri la eblaj paŝoj sekvendaj:

¹“Pro la okazintaĵo en kiu mortis ili, por vidi ĉu ni ĉiuj kune sukcesas trovi eliron pli kompreneblan por la publiko kaj familianoj kaj se la sekreto estas konservita ĝis nun, venas en mian kapon du proponoj: la unua, prokrasti la komunikajon dum longa tempo ĝis tiam kiam ambaŭ partoj sidos ĉe la tablo parolantaj pri la temo de la interŝanĝo². Dua, informi ke la gardantoj de la kaptitoj, kune kun ili, dizertis kaj dum ilia persekutado falis ĉiuj, kies kadavrojn ni pretas doni al la familianoj prenante en konsideron ke la proverboj diras ‘ke ĉi tiuj estas piedbatoj de dronanto’. Ĉar la faktoj estas la faktoj”.

Marulanda jam antaŭvidis, kun ruzo propra de homo de la kamparo al kutimiĝinta trakti tiajn temojn, ke la vero baldaŭ aŭ poste konatiĝos, “ĉar la faktoj estas la faktoj”. Tamen, li kaj liaj kunkulpuloj daŭre maĥinaciis la kielon eskapi senvundaj el la konsekvencoj de siaj agoj.

Cano, en retmesaĝo de la 26-a de junio, donis pliajn detalojn pri kiel estis la amasmurdo:

“Ambaŭ la ĉefo de la gardistaro de la retenitoj, kiu estas la ĉefo de la fronto 60-a, same kiel la ĉefo de la 29-a fronto atribuas la fakton al la intensa streso en kia baraktas niaj grupoj pro la konstanta alfrontado kontraŭ la Armeo. Supervivis unu deputito kiu estis punita en alia loko, la

¹ NT Mi konscias ke la paragrafo ne estas tre bone redaktita: mi klopodis ne apartiĝi multe disde la esprimaj limoj de la alinomita *Manuel Marulanda*.

² NT Hipoteza liberigo de ostaĝoj far la gerilo kontraŭ liberigo de enprizonigitaj gerilanoj far la nacia registaro. Ofte nomata “humana interŝanĝo”.

supervivanta deputito vidis nenion, li nur aŭskultis”.

La debato daŭris interne de la komandantaro de la FARK. La sekvanta partopreninto pri la afero estis la alinomata *Timoĉenko*¹, la ununura kiu proponis diri la veron pri la faktoj:

“Pri tio kio okazis kun la deputitoj mi inklinas al ke ni prenu sur ni la responson pri la okazintaĵo, kaj responsigi la registaron pro ĝia neado pri interŝanĝo meze de konstantaj ofensivoj celantaj ilian elliberigon. Mi komprenis ke restis unu vivanta. Se ne ekzistas sekureca problemo, li povos porti la komunikaĵon”.

Kompreneble, la propono de Timoĉenko ne prosperis, kaj la sekretariaro decidis anonci la mortojn de la dek unu deputitoj per publika komunikaĵo, intence ambigua, konatigita la 28-an de junio, dek tagojn post la murdaro, en la interreta paĝaro de Anncol, kiu servas al la FARK.

En la teksto la gerilanoj sciigis pri la morto de la deputitoj, tamen ili havas egan zorgon ne ŝarĝi sin per ia responso kaj skribis, anstataŭe, pri militista grupo neidentigita, seminte la dubon pri ĉu temis pri la Armeo en operaco de elliberigo. La mensogo estis evidenta:

“La Kuniĝinta Komanditaro de Okcidento de la FARK informas ke la tagon 18-an de tiu ĉi monato, dek unu deputitoj de la Asembleo de la Valo, kiun ni ekretenis en aprilo de 2002, mortis meze de la parafado krucita kiam iu militista grupo, neidentigita ĝis nun, atakis la tendaron en kiu ili troviĝis”.

“Supervivas la deputito Sigifredo López kiu ne estis en tiu momento apud la ceteraj retenitoj”.

Ĉe la fino de la komunikaĵo, la cinikeco atingas grandon groteskan kiam la gerilanoj esprimas sian kondolencon al la familianoj kaj responsigas pri la situacio la prezidenton Uribe:

¹ NT Elparolu: “Timoĉenko”.

“Al la familianoj de la mortintaj deputitoj ni esprimas nian profundan bedaŭron pro la tragedio. Ni faros ĉion kion ni kapablas por ke vi povu preni la mortajn restaĵojn kiel eble plaj baldaŭ”.

“La demenca necedemo de la prezidento Uribe por alveni al humana interŝanĝo kaj lia strategio de perarmea elliberigo super ĉia konsidero kondukas al tragedioj kiel tia kiun ni nun priinformas”.

Unuaj reagoj

La novaĵo pri la morto de la deputitoj falis kvazaŭ sitelo da malvarma akvo sur la nacian animon. Neniu atendis tragedion de tia grandeco.

Tuj mi komunikiĝis kun la generalo Padilla kaj la generalo Montoya, kaj ni kontrolis ĉu ekzistis iu eblo ke trupoj niaj estis koliziintaj kontraŭ la taĉmento de la gerilo kiu retenadis la murdotaj deputitoj. Tamen ni baldaŭ formetis tiun hipotezon. Ne ekzistis tiame operacoj en la areo kaj, ni ne sciis precize tra kiu teritorio ili kunportis la ostaĝojn. Tion sciigis samtage la prezidento Uribe per komunikaĵo kun 18 punktoj:

“8. La deputitoj estis murditaj far la FARK, mizerkore. La publiksekuriga agentaro ne estis en operaco elliberiga ĉar ne ekzistis situo lokalizita”.

“9. (...) la 18-an de junio ne okazis bataloj en la departementoj Kaŭko nek Valo de la Kaŭko”.

“10. la murdoj de ĉiuj ostaĝoj, sen supervivantoj, escepte de unu kiu troviĝis ekster la grupo, montras antaŭpenson kriman kiun ili volas miskonfuzi kun pafado krucita kontraŭ la publiksekuriga agentaro, pafado krucita kiu ne ekzistis. La morto de la ostaĝoj, sen homperdoj gerilaj, sen soldatoj murditaj nek vunditaj, montras ke ne ekzistis pafado krucita, ke la teroristoj de la FARK volas kaŝi la krimon kontraŭ la homeco kiun ili plenumis”.

La ĝenerala komandanto de la Militfortoj, siaflanke, produktis mallongan komunikajon reasertante la fakton ke ne ekzistis armeaj agadoj en la areo:

“La arma informiĝfako havas neniun konon pri la preciza lokalizo de la kaptitejo de la sinjoroj deputitoj de la Valo ostaĝigitaj far la FARK; tial ne estis ordonite fari armeajn operacojn elliberigajn. Se la ĝenerala komandanto de la Militfortoj estus havinta konon pri operaco de tia graveco, tio estus komunikita je la antaŭtempo deca, laŭ la instrukcioj, al la sinjoro Ministro pri Defendado kaj al la sinjoro Prezidanto de la Respubliko”.

La generalo Padilla sciigis tie ĉi pri proceduro kiun ni havis difinita. Neniu operaco por elliberigo de la ostaĝoj nomitaj “interŝanĝeblaj” far la gerilo povus esti efektivigata sen antaŭa priscio kaj permeso de la prezidento Uribe kaj mia.

Por ni estis klare ke la FARK estis la ununura responsa pri la murdaro. Tamen, la gerilanoj atingis sian celon de misinformado kun kelkaj naivuloj en la lando kaj eksterlande. La franca Ministerio pri Eksteraj Rilatoj, ekzemple, anstataŭ kondamni ilin, asertis per voĉperanto ke la “uzo de la forto por elliberigi la ostaĝojn” en Kolombio devus esti “tute malpermesita”. Eĉ kelkaj el la familianoj de la deputitoj ĝisiris responsigi la registaron pro iu supozita malsukcesa ago elliberiga.

“Ni eltiriĝos nedamaĝitaj”

Manuel Marulanda kaj la membroj de la sekretariaro kunfrotis siajn manojn pro la relativa sukceso de sia strategio. Ili informis pri la morto de la dek unu deputitoj, tamen la kondamno kontraŭ ili ne estis absoluta pro la dubo kiun ili atingis semi. Poste ili devis alfronti plian problemon: kiel redoni la korpojn sen evidentigi, kiam oni ekzamenos ĉi tiujn, ke ili estis la murdintoj?

La ĉefo de la FARK sendis la 5-an de julio retmesaĝon al *Alfonso Cano*¹ kun sia analizo pri la situacio:

“Laŭ la nova komunikaĵo konfirmanta la ĉeeston de agadoj kunaj armeaj kaj paramilitistaj k.t.p. kontraŭ la FARK en la regiono kaj niaflanke konservante la sekreton originan kaj samtempe plutenante la tezon pri iu nekonita forto kiu sturmis la tendaron, kie ni montru la enirejon kaj la elirejon de la sturminta grupo, ni savos nin, ne gravas la speco de fakulo pri enketado. Tio signifas ke se vi, antaŭ ol permesi la eniron de humana komisiitaro por ricevi la restaĵojn de la deputitoj, organizas kaj planas bone ĉion cele al enketoj, ni eltiriĝos nedamaĝitaj spite al tia kampanjo”.

La sugesto far Marulanda kaŭzis ankoraŭ plian doloron kaj necertecon en la familianoj de la viktimoj, ĉar tial la FARK prokrastis maksimume la redonon de la korpoj, fidinte nevalidigi aŭ malfaciligi la proceduron de jurmedicina ekzamenado.

Ĝuste, la saman 5-an de julio en kiu la kapulo donis instrukciojn por manipuli la scenon de la krimo fronte al la eblaj enketadoj, centoj da miloj da kolombianoj, en la precipaj urboj de la lando, eliris al la stratoj por Nacia Marŝado kontraŭ la Ostaĝigo kaj esprimis sian abomenon koncerne tian kruelan krimon. Tio estis kiel montri la indignon pro la murdoj de la deputitoj kaj pro la centoj da ostaĝoj kiuj ankoraŭ restadis sub la povo de malleĝaj armitaj grupoj. En Kalio², la familianoj petegis la baldaŭan redonon de la mortaj restaĵoj de siaj karuloj nesciante ke la gerilo, tiun saman tagon, estis faranta planojn por prokrastigi tiun redonon.

Finfine, la 8-an de septembro de 2007, 80 tagojn post la murdaro, komisiitaro de la Internacia Ruĝa Kruco havis aliron al la loko kie estis enterigitaj la dek unu viktimoj.

Malgraŭ la intertempo pasinta, la jurmedicina informo —

¹ NT Alinomo de ano de la sekretario.

² NT Urbo “Cali”.

ellaborita far speciala teknika misio de la OAS¹ kaj far la Teknika Fakto de Enketado de la Prokurorejo— rivelis detalojn harstarigajn: la dek unu korpoj prezentis 95 vundojn pro fusilo, la plimulto el ili faritaj de post la dorso. Tiu, kiu malplej da kugloj ricevis, havis kvin pafvundojn, kaj tiu, kiu plej, havis dek kvar. La kadavroj estis kovritaj per vestoj malsamaj al tiuj kiujn ili portis la tagon de la murdoj, kaj kelkaj havis en siaj buŝoj restaĵojn el dentfadenoj kaj pecetojn el dentobrosoj, kio indikis ke ili estis tualetante ĉe la momento de ekmurdado.

La FARK estis malkaŝitaj, unu plian fojon, en makabra mensogo, *lavantaj siajn manojn* pri siaj propraj teroragoj. Spite ke la gerilanoj neniam konfesis tion esprime, la definitiva konfirmo pri la kielo en kiu ili intencis kaŝi sian agadon alvenis en marto de 2008 per la komputiloj trovitaj en la tendaro de Raúl Reyes. Tie estis la retmesaĝoj pri kiuj mi raportis, kiuj montras la serpentumantan vojon el trompoj kiujn ili mahinaciis por elturniĝi el sia responseco.

Oni devas, tamen, agnoski ke la gerilo estis iel sukcesa en sia strategio de misinformado, ĉar la novaĵo pri la mortoj de la deputitoj ne rezultigis la internacian kondamnon kian ĝi decidis esti, kaj ĝi finiĝis diluita en la tempo, inter la ambigueco de sia komunikaĵo kaj la longa atendado por la redono de la korpoj.

Neniam estos malfrue por ke la internacia komunumo kaj la organizaĵoj pri homaj rajtoj esprimu sian abomenon fronte al tiaj teroristoj kiuj kapablas murdi frostasange dek unu homojn sendefendajn meze de la ĝangalo, pro neniuj motivoj alia ol sia paranojo kaj la aroganteco kredi sin mastroj de aliulaj vivoj.

¹ NT Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj.

ĈAPITRO 7-a

“Ĉi tie ni vivas mortintaj”

Alia tipa okazintaĵo de trompo, en kiu la FARK fiekspluatas la sendefendan cirkonstancon de la ostaĝoj, estas la tiel nomataj pruvajoj pri supervivo. La familianoj, kun angoro justa, petegas iun foton, videaĵon aŭ leteron, kiu alportu novaĵojn pri siaj karuloj, kaj kelkfoje la gerilo konsentas doni tion, kvankam, obeanteante sian logikon perversan, intencas fari el tiuj pruvajoj ilojn por sia utilo.

La ostaĝoj kiuj atingis sian liberon rakontas ke la FARK, tagojn antaŭ la pruvoj pri supervivo, pretigas ilin por ŝajnigi statojn de bonfarto kaj sano tre malsamaj al tiaj kiajn ili reale travivas, izolitaj, malsanaj, kaj katenitaj meze de la ĝangalo. La instrukcio de la Mono Jojoy estas ke oni al ili tondu la hararojn, razu la barbojn, donu pli da manĝaĵo, kaj igu ilin porti novajn vestojn, por kredigi ke ili estas bone traktitaj eĉ meze de ilia kaptiteco.

La gerilanoj eĉ truddevigas ilin diri mensogojn. Tia estis la okazintaĵo de la soldato de la Armeo William Giovanni Domínguez, liberigita en februaro de 2009, kiu estis truddevigita paroli en videaĵo pri Emmanuel¹, la fileto de Clara Rojas, malgraŭ tio, ke la infano ne estis sub povo de la gerilo ekde pli ol du jaroj antaŭe. Laŭ vortoj de la soldato

¹ NT Elparolata “emanŭEl”, infano naskita far la sinjorino Clara Rojas dum ostaĝstato.

Domínguez:

“Iun fojon mi sendis pruvajon pri supervivo, kie mi diris ke Emmanuel estis kun mi kaj ke tie oni faris por li pupojn el lignopecoj k.t.p. Tio estis muntaĵo de la FARK”.

Meze de tia okazintaĵaro kruela de la ostaĝeco, en oktobro de 2007, kiam la prezidento Hugo Chávez havis la permeson de la prezidento Uribe por esti faciliganto de humana interkonsento kun la FARK, ĉi tiuj, laŭ peto de la venezuela reganto, decidis sendi pruvajojn pri la supervivo de Ingrid Betancourt, Luis Eladio Pérez, la tri usonaj kontraktintoj kaj dek unu armeanoj kaj policistoj kiuj estis sub reteno de la fronto unua.

La celo de Chávez estis doni la supervivan pruvajon pri Ingrid al la prezidento de Francio¹, Nicolas Sarkozy, dum vizito al Parizo kiun li havis planita por fintagoj de novembro.

Tiufoje la gerilanoj renkontis malhelpon kiun ili ne imagis. La ostaĝoj, teditaj pro pozado kaj parolado por tio kion ili nomis “la cirko de la FARK”, ĉi-foje rifuzis eldiri vorton aŭ ŝajniĝi ian sanon aŭ ian animstaton kian ili ne havis. Tial estis ke, fronte al la kamerao, restis stampita la protesto silenta far dek kvin viroj kaj unu virino kiuj rezistis partopreni novan trompon. Kelkaj tutsimpe rigardadis planken, sen elparoli vorton; Ingrid, en bedaŭrinda stato, sidanta en rustika ligna benko, kun senmanika ĉemizo, la hararo longega kaj la rigardado perdita foren, estis la esprimado mem de la doloro kaj la senespero.

Tamen la gerilanoj ne atingis sian celon alvenigi la pruvajojn al Chávez antaŭ lia renkontiĝo kun Sarkozy. La armeaj agadoj kaj la loĝistikaj malfacilaĵoj propraj de la gerilo malhelpis sendi ilin ĝustatempe, kio kaŭzis neetan ĉagrenon al la venezuela reganto.

Dume, la teknika informiĝfako de la Armeo estis daŭre kaŝaŭskultante la komunikojn de la unua fronto kaj konis tre

¹ NT La sinjorino Ingrid Betancourt, havas ankaŭ francian naciecon.

bone pri la portkomisio de la atestaĵoj pri supervivo, kaj pri la vojaro irota por alvenigi ilin. Videaĵoj, fotoj kaj leteroj estis senditaj el Gŭavjaro ĝis Bogoto per tri gerilanoj —unu viro kaj du virinoj— kiuj alvenis al la ĉefurbo probable kun la intenco transdoni la pruvaĵojn al aliulo kiu reviziu kaj cenzuru ilin antaŭ ol plusendi ilin al Venezuelo.

Tamen la gerilanoj ne atingis manipuli la pruvaĵojn. La 30-an de novembro de 2007 la tri gerilanoj estis arestitaj en Bogoto kun sia portaĵo, kaj tiel oni sukcesis koni la statojn verajn de la ostaĝoj. Celtrafa frapo de la armea informiĝpovo. Tiun tagon mi alvenis el Barato kaj ĵus elirante el la aviadilo, post 24 horoj da flugo, oni sciigis min pri la operaco ĵusfarita. Mi ektelefonis tuj la prezidenton Uribe, kiu kunvokis al kunsido tiunokta en la prezidenta palaco por rekonfirmi ĉu la pruvaĵoj estis veraj, kio fakte estis farita. La prezidento ordonis publikigi ĉion por ke poste neniu diru ke la registaro estis manipulante la pruvaĵojn.

Sendube, se ne estus pro tiu ĉi agado de la Armeo, la pruvaĵoj estus rivelotaj multe pli malfrue kaj tre probable nekompletaj, sekvante la kutimon de la FARK. La foto pri Ingrid, ŝrumpinta kaj konsternita, rondiris ĉirkaŭ la mondo kaj havis efikon katastrofan sur la planojn de tiuj kiuj volis meti la kolombian registaron kontraŭmure.

Krom la videaĵoj, ankaŭ la letero kiun Ingrid skribis al sia patrino elmontriĝis kiel atesto korŝira pri la krueleco de la ostaĝigo kaj la severaj cirkonstancoj en kiuj la ostaĝoj troviĝis. Unu sola frazo el tiu letermesaĝo spegulas pli bone ol io ajn tian situacion kian la FARK neniam deziras ke estu diskonita:

“Ĉi tie ni vivas mortintaj”.

ĈAPITRO 8-a

Emmanuel

Kelkajn tagojn post kiam estis konitaj la pruvajoj pri supervivo, kaj jam sen la perado de Hugo Chávez, kio estis nuligita far la prezidento Uribe, la FARK anoncis meze de decembro sian intencon liberigi siaflanke: la eksrepresentantinon ¹ Consuelo González de Perdomo, la eksĉefinon de la kampanjo² de Ingrid, Clara Rojas, kaj ŝian etan filon Emmanuel, kiu estis naskita en kaptiteco kaj aĝis tri jarojn kaj duonon. La kondiĉo starigita far la FARK estis ke ĝi redonus la tri ostaĝojn nur al la prezidento Chávez aŭ lia sendito kaj al la liberalisma senatanino Piedad Córdoba.

Ni ĉe la registaro ricevis la novaĵon kun prudenta optimismo kaj ekfaris ĉiujn agojn por faciligi la redonon de la ostaĝoj. Oni permesis la eniron de venezuelaj helikopteroj kun la insigno de la Internacia Ruĝa Kruco kaj de funkciuloj el tiu lando, samkiel de internaciaj garantiantoj el sep nacioj —Argentino, Bolivio, Brazilo, Kubo, Ekvadoro, Francio kaj Svislando—, inkluzive de la argentina eksprezidento, Néstor Kirchner.

Flanke de la prezidento Uribe, la ministro pri Defendado kaj la armeaj ordonantoj ne havis alian intencon ol faciligi la

¹ NT Membro de la Ĉambro de Reprezentantoj (malsupera ĉambro), kiu kune kun la Senato (supera ĉambro) konsistigas la leĝdonan povon en la kolombia ŝtato.

² NT Kampanjo por la prezidenteco en balotelektado de 2002.

redonon, eĉ se ĝi estis farota al delegitoj eksterlandaj kaj ne al kolombiaj. La reala gravaĵo estis ke oni atingu la liberon de tiuj homoj. Tiucele, estis decidita la halto de la militista agado en la areo kie supozeble la ostaĝoj estus liberigitaj por eviti iu ajn baron al tia humana procedo.

Tamen, la informiĝfako de la Armeo, tiu sama kiu sukcesis interkapti la pruvojn pri supervivo la 30-an de novembro, havis indikaĵojn kiuj pruvus ke la promeso de la FARK estis neplenumbla.

Laŭ tiuj indikaĵoj, unu infano kun la aĝo kaj karakterizaĵoj de Emmanuel, kun problemo ĉe unu brako, tia kia li estis priskribita far la forfuĝinta subintendantato Pinchao¹, estis donita en San José² de la Gŭavjaro al la sistemo de zorgado de la Instituto por Familia Bonstato³ ekde la mezo de 2005. Tiumomente la infano prezentis serozajn problemojn pro subnutrado kaj signojn el fizika mistraktado. La porsocia institucio de la Ŝtato estis sendinta lin al surogata hejmo en Bogoto, kie oni lin zorgadis kaj konis per la nomo Juan David.

La arma informiĝfako lokalizis la loĝejon kie estis la infano, kaj priraportis la situacion kaj la hipotezon ke temis pri la filo de Clara Rojas al la generalo Mario Montoya, komandanto de la Armeo, kiu ordonis almeti rigoran vigladon sur la domo. Por tion fari, du geagentoj de la informiĝfako, ŝajnigante esti geedzoj, luis domon fronte al la loko kie oni lin havis.

La generalo Montoya informis min pri la afero, kio komence ŝajnis al mi absurdaĵo. Se la FARK ne havis la infanon Emmanuel, kial ĝi oferis liberigi lin? Cetere, —kaj tio ĉi estis faktoro kiu konfuzis nin dum kelka tempo—, la soldato Domínguez, en proksimdata pruvo pri supervivo

¹ NT John Frank Pinchao, subintendantato de la Polico kiu elliberiĝis el ostaĝeco en aprilo de 2007.

² NT La ĉefurbo de la departemento.

³ NT "Instituto Colombiano de Bienestar Familiar" (ICBF).

estis rakontinta ke la infano estis en sia grupo, kaj ke li vidis lin amuziĝi per ludiloj kiujn por li faris la gerilanoj mem. Do, se Emmanuel estis vidita far la soldato en 2007, kial povus li esti la sama infano kiun havis la Familia Bonstato ekde 2005? La respondo estis tre simpla: La FARK truddevegis la soldaton Domínguez mensogi en la pruvo pri supervivo.

Perdo de komandpovo kaj kontrolo

La okazintaĵo pri Emmanuel estas unu el la plej evidentaj pruvoj pri la perdo de “komandpovo kaj kontrolo” en la anaro de la gerilo. Pri kio mi temas per tiu ĉi aserto? Pri la malfacileco ekzistanta por ke la ordonoj alvenu el la ĉefoj ĝis la pluraj frontoj, pro la konstanta persekutado far la Armitaj Fortoj, ne nur fizike sed ankaŭ per teknika informiĝpovo. Ĉiufoje la gerilanoj estas pli izolitaj, kiel konfesis *Alfonso Cano* mem en mesaĝo de novembro de 2007: “Niaj komunikoj estas tre malfacilaj pro la agadoj armeaj tiome obstinaj sur ni”.

Tia izoleco tradukiĝas en mankon de direkteblo kaj neblon kontroli, flanke de la sekretariaro, kion faras iliaj homoj en la pluraj areoj de la teritorio. En la okazintaĵo pri la infano de Clara Rojas, la manko de “komandpovo kaj kontrolo” speguliĝis en tio ke la komandantaro de la FARK promesis lin redoni, sen havi eĉ ideon pri ke li estis ekde pli ol du jaroj antaŭe en hejmo de la Familia Bonstato, alidire, en manoj de la Ŝtato.

Falas la spektaklo de la FARK

Kio estis okazinta pri Emmanuel? Komence de 2005, la alinomita *Gentil Duarte*, kapulo de la sepa fronto, vidinte la malfacilaĵojn pro havi lin kun la gerilanoj en la tendaroj kaj piediradoj, decidis transdoni lin al la zorgo de viro kiu loĝis kun sia familio ĉe la bordo de la rivero Gūavjaro, en la municipo El Retorno, dek kvin kilometrojn sude de San José

de la Gŭavjaro. Al li la gerilanoj ordonis zorgi lin kaj ne riveli lian originon, ili diris ke iun ajn tagon ili revenos por repreni la etulon.

La infano, laŭ rakonto de José Crisanto Gómez, la viro kiu lin ricevis, kiu loĝis en malriĉaj cirkonstancoj kun sia edzino, sia bopatro kaj siaj etaj filoj, havis simptomojn de lejšmaniozo kaj havis frakturon en la maldekstra brako. Post kelkaj monatoj, en junio de 2005, lia farto plimalboniĝis, kaj Gómez ne havis alian solvon ol porti lin al sanzorgejo, kie oni diagnozis subnutradon kaj lin trasendis al la hospitalo de San José de la Gŭavjaro, tie, la kuracistoj, rimarkinte la malbonan staton de Emmanuel, kiun Gómez registrigis per la nomo Juan David Gómez Tapiero, decidis plusendi lin al la Familia Bonstato, ŝtata institucio kiu ekde tiam vartis lin.

Gómez maltrankviliĝis vidinte ke la Ŝtato transprenis for de li tiun infanon kiun la gerilo konfidis al li kaj petis, nesukcese, ke oni lin redonu. Fine li cedis kaj revenis al sia vilaĝo timanta pro ia venĝo de la FARK, tamen fidanta ke, se necese, li povos trovi lin. Kiam la gerilanoj alvenis al lia domo, pli ol du jarojn poste, por repreni la infanon, cele al plenumo de la promesita liberigo, ili trovis la surprizon de ties foresto kaj minacis la sinjoron Gómez per mortigo se li ne reakirus kaj redonus la infanon Emmanuel dum la daŭro de kelkaj tagoj.

La informiĝfako de la Armeo, kiu tiam estis havinta scion pri la etulo kiu estis sub vartado de la Familia Bonstato, rilatigis indikaĵojn kiam ĝi aŭskultis, en la komunikoj de la gerilo, ke la gerilanoj ne havis la filon de Clara Rojas kaj ke ili estis serĉante lin. Sendube Juan David Gómez Tapiero estis Emmanuel.

Gómez, saflanke, vojaĝis de El Retorno al Bogoto kaj ekserĉis senbride la surogatan hejmon kie eble enestis la infano. Ankaŭ la gerilo ekfaris sian serĉadon. Eĉ iun nokton —laŭ komento de la generalo Montoya al mi— du aŭtomobiloj kun diplomataj licencplatoj parkumiĝis fronte al la surogata

hejmo kie enestis Emmanuel, kaj homoj vestitaj per kompletoj kaj kravatoj elveturiliĝis. Post kelka tempo ili foriris, verŝajne sen kunporti la infanon. Tia stranga vizito ekalarmis nin, ĉar la 28-an de decembro ni elprenis lin el la hejmo de la Familia Bonstato kaj metis lin sub la zorgado de fakuloj en sekreta loko.

La 29-an matene mi kunvenigis al mia oficejo la generalojn Padilla, Montoya kaj Naranjo, kaj la vicministron Sergio Jaramillo por analizi la situacion. Tie mi rakontis al ili ke antaŭ ol ekiri al Kartageno, kie mi estis pasigonta la jarfinon, mi sciigos pri la situacio la ĉefinon de la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco en Kolombio, Bárbara Hintermann, por ke poste oni ne diru ke pro kulpo de la registaro la redono ne estis farita. Tiel estis. Mi kunsidis kun Bárbara, kun kiu mi simpatiis dum nia kuna penado por plibonigi la staton de la homaj rajtoj ĉe la Armitaj Fortoj, en ŝia apartamento ĉe la 90-a strato en Bogoto, kaj ĉeestis la kunsidon amiko ŝia el Mezoriento, ankaŭ de la Internacia Ruĝa Kruco, kiu ŝin vizitis tiumomente. Mi diris al ŝi ke se la gerilo de liberigos Emmanuel, kiel ĝi promesis, la plej granda probablaĵo estis ke la infano kiun ni havis sub nia zorgado estas la filo de Clara, kaj ni redonos lin al ŝi.

Bárbara ricevis la informon kun vera surprizego, kaj ni akordis ke ĉio restos sub la plej rigora konfidenceco. Vere, ni ne estis plene certaj pri ke la infano kiun ni havis estis la filo de Clara.

Dume, alvenis la internaciaj delegitaroj, el Venezuelo, al la urbo Villavicencio, cefurbo de la departemento Metao, kiu estis elektita kiel loĝistika centro de la agado. Alvenis ankaŭ la fama filmreĝisoro Oliver Stone, invitita far la venezuela registarestro por filmi la revenon de la liberigotoj. Nur mankis ke la FARK sciigu prezidenton Chávez pri la koordinatoj kaj horo de la liberigoj por ke la proceduron oni ekfaru.

Tamen, la horoj pasadis kaj nenio okazis. En Villavicencio la etoso estis streĉanta kaj tiam ekaŭdĝis onidiroj ke kulpe de

la kolombia registaro la gerilanoj ne povos realigi la redonon. La nokton de la 30-a mi konvinkigis ke ili faros al ni veran firuzajon por ŝajnigi nin kvazaŭ la responsuloj pri la malsukceso. La tujpostan tagon, tre frue mi ricevis informon pri ke tiu onidiro jam estis en la argentina ĵurnalaro kaj en aliaj latinamerikaj amaskomunikiloj. Samtempe, la gerilanoj supozeble alvenigis al Chávez leteron en kiu ili pledis pri manko de sekurkondiĉoj por redoni la ostaĝojn, letero kiun la venezuela reganto diskonigis per televido:

“Sinjoro prezidento, la intensaj militistaj agadoj etenditaj en la areo malhelpas nin, nune, transdoni al vi la eksrepresentantinon Consuelo González de Perdomo, Clara Rojas kaj Emmanuel, kio estis nia deziro (...)”.

Evidente, ne estis vera tio pri “intensaj militistaj agadoj”. Tamen la kanajla plano funkciis por la gerilanoj kaj do tiumatene multegaj amaskomunikiloj internaciaj, bazitaj sur la trompema komunikaĵo, ekdisvastigis la novaĵon ke la liberigoj estis frustrataj kulpe de la kolombia Ŝtato.

Alarmita pro la situacio, mi telefonis la prezidenton Uribe, kun kiu mi estis planinta iri tiun lastan tagon de la jaro por viziti la soldatojn en bataliono de la kolombia karibo, al lia bieno en Kordobo¹ kie li troviĝis tiam. Mi sciigis lin pri la okazintaĵoj de la lastaj horoj kaj proponis ke ni iru al Villavicencio, kie la internaciaj delegitoj atendadis en etoso senpacienca, kaj ke ni rakontu tion kion ni sciis, antaŭ ol la kalumniado pluprogresos.

La prezidento ne hezitis kaj konsilis al mi esti preta, ĉar li prenos min en Kartageno, por flugi ĝis Villavicencio. La jaradiaŭon kun la soldatoj li delegis per la admiralo Barrera, komandanto de la Mararmeo.

Kia mi estis supreniranta la aviadilon de la prezidento, telefonis min Elvira Forero, la direktorino de la Instituto por Familia Bonstato, kun kiu ni estis kunordigintaj ĉion rilatan

¹ NT Departamento en la nordokcidento de Kolombio.

al la infano, por informi al mi ke iu homo tre angoranta alvenis depostulante lin, kaj ke tiu homo, per trema voĉo, diris ke se oni ne redonas al li la infanon li estos mortigata kune kun sia familio. Tiu telefonvoko donis al mi egan trankvilon ĉar ĝi konfirmis nian hipotezon. En la aviadilo estis la ministroj pri Agrikulturo, Andrés Felipe Arias, kaj pri Medio, Juan Lozano. Kiam mi rakontis al ili la tutan dramon, ili ekrestis mirfrapitaj, tamen ridetantaj.

Ni alvenis plimalpli je la unua posttagmeze al la bazo de Apiay kaj tuj ni kunvenis kun la grupo de internaciaj delegitoj kunordigita far la eksprezidento Kirchner mem. Tie estis ankaŭ la Ministro Maduro¹ de Venezuelo. Ĉiuj, preskaŭ unuvoĉe, ekresponsigis la Armeon pri la fiasko de la reliberigoj. La prezidento Uribe aŭskultis ilin pacience kaj petis al la generalo Montoya klarigi ke la Armeo ne faris ian ajn agadon en tiu areo. Kiam la generalo estis meze de sia deklaro kun mapo ĉemane, unu el la ataŝeoj de la prezidentejo donis al mi papernoton per kiu li informis min ke la prezidento Chávez, en viva elsendo per televido, estis disvastigante la onidiron pri la supozitaj armeaj operacoj. Mi sugestis al la prezidento Uribe ke tiam alvenis la momento por agi, kaj li ekparolis por eldiri la hipotezon ke la FARK ne havis la infanon Emmanuel kaj ke tio estis la vera kialo pro kio la gerilanoj ne faris la liberigojn. Mi memoras tre bone la komenton de la eksprezidento Kirchner ekkoninte la trompon de la gerilo: “Se tio estas tiel, do ni kondukis kiel idiotaĉoj!”

La prezidento Uribe eliris tuj por fari longan porĵurnalistan prezentadon en kiu li klarigis, detale, la kialojn kiuj kondukis nin al la penso ke Emmanuel estis ĉe povo nia kaj ne de la gerilo.

“Ni estas plenaj de motivoj por malfidi je la FARK kaj ĉi tio nin devigis esprimi tion al la humanismaj internaciaj delegitoj”, diris la prezidento.

¹ NT Nicolás Maduro, ministro pri Eksteraj Rilatoj de Venezuelo.

Kaj tuj pludiris:

“Ni devigis nin porti sur la tablon, en la kunveno kiu ĵus finiĝis, hipotezon por ke ĝi estu studita; hipotezon por ke oni ekzameni pruvajojn kaj forigu aŭ konfirmu tiun hipotezon, nura hipotezo, pri kiu ne ekzistas plenan pruvon. Ĝi estas afero nur hipotezan. Ĝi indikas ke la FARK ne riskis plenumi la sindevigon liberigi la ostaĝojn, ĉar la gerilanoj ne havas ĉe sia povo la infanon Emmanuel”.

La perplekso de la ĵurnalistoj kaj de la ĝenerala publiko estis totala. La prezidento Uribe senvualigis fronte al la mondo unu el la plej groteskaj mensogoj de la gerilo, kio pruvis, cetere, ĝiajn seriozajn problemojn de komunikado.

Kelkajn tagojn poste, la karakterizo pri DNA faritaj de la Instituto de Jura Medicino de Kolombio, kiuj estis poste konfirmitaj far la Instituto de Jura Medicino de la Universitato de Santiago de Compostela, en Hispanio, restigis klare, sen eblo por dubo, la fakton ke la etulo Juan David Gómez estis reale Emmanuel, la unua infano naskita en ostaĝstato en Kolombio.

Eĉ antaŭ ol esti konata la rezulto el la hispana instituto, la FARK, sentinte sin enanguligitaj, ne havis alian rimedon ol konfesi ke ĝi ne havis la infanon Emmanuel, kaj tion ĝi faris per unu el la plej cinikaj kaj absurdaj komunikaĵoj imageblaj:

“Sperta pri fumkurtenoj, la registaro narkota-paramilitista de Uribe Vélez, post konsulti sian mastron en Vaŝingtono, decidis ostaĝigi en Bogoto la infanon Emmanuel, kun la malfeliĉa celo saboti lian redonon, tiun de lia patrino Clara Rojas kaj tiun de Consuelo González de Perdomo, al la prezidento de la Respubliko Bolivara de Venezuelo, Hugo Chávez”.

La ekstremo! Jen la ostaĝigantoj akuzante la registaron pri la ostaĝigo de la filo de Clara Rojas! Kompreneble, neniu prenis serioze iliajn vortojn, fontintajn el la frustrigo esti kaptitaj alian fojon en mensogado.

Finfine, la 10-an de januaro de 2008, estis liberigitaj, kun ĉiaj garantioj donitaj far la kolombia registaro kaj ĝiaj Armitaj Fortoj, Clara Rojas kaj Consuelo González de Perdomo, en ĝangala areo de Gūavjaro. Ili estis prenitaj far venezuela delegitaro, akompanita far membroj de la Internacia Ruĝa Kruco, kaj portitaj al la najbara lando, kie Chávez estis atendanta ilin. Ĉi-foje ne estis spektaklo, nek delegitoj el sep landoj, nek filmreĝisoro el Holivudo. La spektaklon oni klopodis fari en la palaco de Miraflores, en Karakaso, tamen tio jam ne estis la samo.

ĈAPITRO 9-a

Lando unuiĝinta kontraŭ la FARK

La mensogo de la gerilo pri la okazintaĵo de Emmanuel estis la guto kiu superplenigis la pokalon de indigno de grupo de junuloj kiuj, teditaj pro la kontinua trompado kaj timigado gerila, kaj pro tio, ke violentuloj pretendadis arogi al si la reprezenton de popolo kiu ilin malakceptis, decidis kunvoki, per grupo de la Interreto tra la socireta servo de Facebook, protestan marŝadon kontraŭ la FARK kaj kontraŭ ĝiaj terorismaj metodoj.

La iniciato havis tujan eĥon kaj superis vaste la modestajn kalkulojn de siaj organizintoj. Proksimume duonmiliono da homoj aliĝis al la perinterreta grupo, kaj la kunvoko etendiĝis tutmonde, kie kolombianoj ekzilitaj pro la terorisma violento, aŭ eksterlandanoj solidaraj sumiĝis al la indignosento kontraŭ la gerila grupo, organizinte marŝojn ankaŭ en siaj loĝlandoj.

Sen grandaj monrimedoj, sen politikaj partioj malantaŭe nek oficiala partopreno far la registaro la projekto iĝis realaĵo emociiga. Milionoj da kolombianoj akiris la stratojn la lundon 4-an de februaro de 2008, kaj marŝadis, vestitaj per blanko, ondigante flagojn kaj kantante ĥore frapfrazojn, por esprimi kolektivian rifuzon pri la violento, kio ĉi-foje havis propran nomon.

La devizo de la mobilizo, ripetita en T-ĉemizoj kaj portebblaj

afiŝoj, diris ĉion: “*Ne pluaj ostaĝigoj. Ne pluaj mensogoj. Ne pluaj mortigoj. Ne plu FARK*”.

Neniam antaŭe dum la historio de la lando estis okazinta amasa manifestaĵo de tia granda, kiu kovris per blanko la avenuojn de la ĉefaj urboj de Kolombio, kaj placojn kaj parkojn en pluraj landoj de la mondo. Mi partoprenis en la marŝadon elde Tel-Avivo, Israelo, kie mi troviĝis en oficiala vizito. Same la ĉefministro Ehud Olmert kiel la prezidento Ŝimon Peres kaj la ministro pri Defendado Ehud Barak, kun kiuj mi kunsidis tiutage, donis al ni sian plenan kaj absolutan apogon. La gerilo rikoltis, per tiu historiiga marŝado, la indignon kaj la kondamnon kiujn ki porsemis per siaj trompoj, sia cinikismo, kaj sia insistado en metodoj kiel la ostaĝigo, la atencoj per bomboj kaj la kontraŭhomaj minoj.

Viroj, virinoj, junuloj, infanoj, maljunuloj, handikapitoj, sendepende de raso, kredo aŭ sociaj cirkonstancoj, sumiĝis al la homa hulo kaj sendis klaran mesaĝon de civileco kaj demokratio al la violentuloj, kaj ankaŭ de solidareco al la ostaĝoj. Ĉi-lastaj informiĝis per la radio, meze de la malfacila situacio kian ili travivadis en la ĝangalo, pri tio, ke la civila socio ilin rememoris kaj postulis ilian liberigon.

La travivaĵo de la marŝado repetiĝis kun simila sukceso — kaj kun partopreno de la plej famaj kolombiaj kantistoj kiel Shakira, Juanes kaj Carlos Vives— la 20-an de julio samjara, Tago de la Sendependiĝo¹, kiam denove ni kolombianoj eliris en ĉiuj anguloj de la teritorio por manifesti kontraŭ la ostaĝigo. Kun la prezidento ni decidis de antaŭe ke povus esti bone malcentrigi la patriotisman paradon², kaj, fakte, la antaŭan jaron ni estis farinta ĝin en la insulo Sankta Andreo. Tiun matenon ĝi estis en Leticia, en la amazonia trapezo. En spektaklo admirinda pro ĝia simboleco, kun ĉeesto de la prezidento Uribe kaj de la regantoj de Brazilo, Luiz Inácio Lula da Silva, kaj de Peruo, Alan García, Shakira prenis la

¹ NT Oficiala dato por celebri la sendependiĝon de Kolombio disde Hispanio.

² NT Tiu dato estas festita per paradoj el kiuj la ĉefa estis tradicie en Bogoto.

mikrofonon kaj sendis mesaĝon al la gerilanoj kiun penindas rememori:

“Ni volas peti al tiuj kiuj ribelas per armiloj, ke ili elliberigu sin mem el sia propra ostaĝeco, ĉar ankaŭ ili estas ostaĝoj en la tenebro de la ĝangalo. Malmobiliziĝu! ni tion petas al vi kun la mano sur la koro! (...) Por ke vi liberiĝu. Por ke ni ĉiuj reale povu esti unu Kolombio, kaj vivi unuigintaj kaj liberaj kiel ni meritas”.

REPACIGANTE LA PACIFIKON¹

*Bela haven' ĉe l' mar', mia Bŭenaventuro²,
kie enspireblas ĉiam venteta puro.*

Fragmento el *Mia Bŭenaventuro*,
Kurulao³ far PETRONIO ÁLVAREZ

¹ NT Iom licence mi uzas ĉi tie "la Pacifiko" por signifi ne la oceanon sed la regionon kiu situas apud la Pacifiko, kiel oni ofte faras en Kolombio per la hispanlingva ekvivalento "el Pacífico".

² NT Hispanlingve: "Buenaventura", urbo en la departemento Valo de la Kaŭko.

³ NT Hispanlingve: "Currulao", muzika subĝenro de Kolombio.

ĈAPITRO 10-a

La ostaĝiginto de la deputitoj

Mia enoficiĝo en la Ministerio pri Defendado, meze de la jaro 2006, samtempis kun la epoko de plej granda krizo ĉe la havenurbo Būenaventuro rilate violenton. Tie miksiĝis, en eksploda kombino, la interesiĝoj de la narkotaĵkomerco, tiame superregata far la organizaĵo de Wilber Varela, alinomita *Jabón*¹; unu el tiuj krimbandoj kiuj rekrutas malmobiliziĝintojn el la antaŭaj blokoj *Calima* kaj *AUC de la Pacifiko*, kaj el la FARK, per la 30-a fronto kaj la danĝera urba fronto Manuel Cepeda Vargas, ĉi-lastata direktita antaŭe far Milton Sierra, alinomita *Jota Jota (JJ)*.

Unu el la tujaj defioj kiujn mi devis surpreni tiel baldaŭe kiel mi enposteniĝis estis okupi min pri la ondo de krimoj en tiu ĉi urbo, la ĉefa de la lando en la pacifika marbordo, kun popolnombro proksima al 500.000 enloĝantoj, kaj situanta ĉe malpli ol 120 kilometroj for de Kalio, la vivoplana ĉefurbo de la Valo de la Kaŭko. Tio postulis ekfunkciigi tri grandajn procezojn kiujn ni komencis dum Konsilkunsido pri Sekureco en Tuluá, kun la tiama departamentestro de la Valo, Angelino Garzón: proceson de teritoria regado, preventa kaj eduka, por

¹ *Jabón* estis mortigita en januaro de 2008 en Venezuelo, verŝajne pro ŝuldĝustigo de la mafio. Post lia morto, lia grupo de sikarioj nomita “Los Rastrojos” daŭras agante en la sudokcidento de la lando, kaj estas kontraŭbatalita unuacele far la Militfortoj kaj la Polico.

kio ni pliigis la agentojn el la Polico kaj el la Mararmea Infanterio en la municipo; procezon de fortikigo de la kuniĝinta informiĝpovo, precipe de la Polico kaj la Mararmeo, pri la urbobandoj de la FARK, kaj procezon de konstanta stimulado al la malmobiliziĝo de la gerilanoj.

Buenaventuro estas la havenurbo plej granda kaj grava de Kolombio kaj, tamen, prezentas krizan socian staton, kun altaj indicoj pri malriĉeco, pliintensigita pro la violento kiun la narkotajkomerco kaj ĝiaj internaj venĝoj okazigas en sia areo. Ĉirkaŭita far labirinta rivera retaĵo, kiu enhavas riverojn kiel Anchicayá, Raposo, Dagua, Cajambre, Calima kaj San Juan, kaj multegajn riveretojn kiuj enfluas en la Pacifikon, la havena zono estas konsiderata kiel koridoro fundamenta por la narkotajkomercistoj, por la elirigo de malleĝaj drogoj kaj la enirigo de ingrediencoj por ilia produktado. Cetere ĝi estas ĉirkaŭita per vastaj ĝangalaj regionoj malfacile enireblaj.

Tia estis la granda de la defio kiun ni ektrovis. Egale kiel ni faris ĉe la Montoj de María, ni komencis alfronti ĝin per kuniĝinta informiĝpovo kaj teama laboro inter la Militfortoj kaj la Polico, kio baldaŭ ekdonis rezultojn.

Amasaj malmobiliziĝoj

Dum la lastaj monatoj de 2006, la FARK brutaladis kontraŭ la urbo Kalio, per serio da teroratencoj kiuj devigis nin plifortigi la sekurigajn rimedojn kaj kunvoki la kunlaboradon civilularan. La Polico estis speciale efika en sia persekuto al tiuj teroristoj kaj la 13-an de decembro arestis en Palmira kapulon de la fronto Manuel Cepeda Vargas, konitan per la alinomo la *Chino*.

Tiu aresto estis la komenco de la plej granda procezo de amasa malmobiliziĝo el la FARK en ĝia historio. La Chino, naskita en Buenaventuro, esprimis sian deziron malmobiliziĝi kaj, por pruvi sian volon fari tion, li atingis ke aliaj 45 anoj de sia grupo rezignu pri la armiloj kaj fordonu sin al la Polico. Cetere li liveris gravan informon kiu estis servonta poste por

aresti aliajn ŝlosilajn homojn de la organizaĵo. Li estis murdita, unu jaron poste en Kalio, far siaj ekskunuloj de la FARK, kiuj ne pardonis lian decidon.

La Chino komprenigis, dum renkontiĝo kun la prezidento Uribe en la ĉefurbo de la Valo, la manieron kiel funkciis la urbobandoj de la FARK en Kalio, direktitaj far li, kaj kion estis ilia rilato kun la narkotajkomerco:

“La bolivaraĵoj bandoj vivtenas sin en la urbo Kalio danke al la kontribuaĵoj faritaj surbaze de la kokaĵo. Kokaĵo kiu eliras eksterlanden. Iu ajn kiu movas kokaĵon en Būenaventuro, estas devigita doni kontribuaĵon al la FARK. Poste tiu mono alvenas al la urbo kaj per ĝi ni subtenas la strukturon”.

Oni faris tre gravan paŝon per tiuj malmobiliziĝoj, tamen la atencoj ne ĉesis. La 21-an de januaro de 2007 la gerilo eksplodigis bombon ĉe la traŭro de policpatrolo en Būenaventuro kio postlasis kvar civilulojn kaj du policistojn mortintajn, plus multajn vunditojn. La sekvintan tagon mi vojaĝis al tiu urbo por prezidi Konsilkunsidon pri Sekureco kaj mi anoncis eksterordinarajn rimedojn por la havenurbo. Oni kreis kuniĝintan centron de agado en Būenaventuro, kun membroj el la Grupo de Specialaj Urbaj Fortoj Kontraŭterorismaj de la Nacia Mararmeo, plus la apogo de la Mararmea Infanterio kaj la Nacia Polico, sub la inspektado de la komandanto de la Ŝipa Forto de la Pacifiko. Estis ordonite ankaŭ translokigi al tiu ĉi urbo la komandojn de la okcidenta regiona branĉo de la Polico.

Kelkajn tagoj post tiu konsilkunsido, la 2-an de februaro, la premado far la publiksekuriga agentaro okazigis la sinliveron de la urba kapulo de la fronto 30-a de la FARK, alinomita *Seguidilla*, kiu, same kiel la Chino, konvinkis 27 kunulojn rezigni pri la armita lukto kaj malmobiliziĝi. Imitinte tiun ekzemplon, la 7-an de februaro 130 bandanoj de la frontoj Manuel Cepeda Vargas kaj 30-a ankaŭ decidis forlasi la vojon de la violento kaj akceptiĝi en la agrogramon de la

nacia registaro por resocianigo. Cetere ili fordonis siajn pafilojn, eksplodaĵojn, municion kaj uniformojn.

Entute, malmobiliziĝis, danke al la laboro de premo kaj instigo far la Mararmeo kaj la Polico, pli ol 170 viroj kaj virinoj el la FARK en Kalio kaj Būenaventuro, dum malpli ol du monatoj! Mi havis la okazon akompani la oficialan akton de sinlivero de la bandanoj en la ĉefurbo de la Valo, akto de espero kaj repaciĝo. Sendube, temis pri senprecedenca frapo al la spirito de la gerilo kaj al ĝia teroragado en la kolombia pacifika zono.

La faligo de JJ

La fronto Manuel Cepeda Vargas, malgraŭ la dizertoj, kaj eble kiel venĝo al ili, daŭris atencante kontraŭ la popolo kaj precipe kontraŭ la Polico, kiu estis atinginta rezultojn tiel plenfrapaj kiel la malmobiliziĝoj en Kalio.

Tiel estis ke ĝi eksplodigis, dum la tagiĝo de la lundo 9-a de aprilo, aŭto-bombon fronte al la komandejo de la Metropola Polico de Kalio, kio detruis ties instalaĵojn, kaŭzis la morton de taksiisto trairinta apud la mortiga embuskaĵo, kaj rezultigis disrompitaĵojn ĉe pluraj domblokoj ĉirkaŭe.

La kalianoj eliris surstraten kaj marŝadis la 12-an de aprilo por rezisti la perfortadon de la teroristoj. “Kio koncernas Kalion, koncernas min” legeblis en la porteblaj afiŝoj de tiuj indignigitaj loĝantoj de la Valo de la Kaŭko, kiuj ne akceptis esti plu viktimoj de la maltolerantoj.

Tamen, la vivotagoj de la alinomita *JJ*, la ĉefo de la urba fronto Manuel Cepeda Vargas de la FARK, estis proksimaj al sia finiĝo.

Kiu estis tiu homo kiu brutaladis kontraŭ la Valo de la Kaŭko?

Milton Sierra, naskita en Būenaventuro, estis homo havinta kelke da universitata prepariĝo: verŝajne li studis en la universitato Patrice Lumumba de Moskvo; li havis pli ol

dek jarojn uzinte sian krimpovon, ĉe-kape de la bando de la FARK plej influhava en la areo de Būenaventuro, en Kalio kaj en la najbaraj vilaĝoj.

En lia longa krimdosiero, kiu inkluzivis dekojn da murdoj kaj ostaĝigoj, kaj multnombrajn teroragojn, estis rimarkindaj la perarmila preno de la akvorezervujo de Anchicayá la 31-an de aŭgusto de 1999, dum kio li retenis ses ĵurnalistojn plus 120 laboristojn de la akvorezervujo, kaj la atako al la armea posteno en la monteto Tokio¹ en marto de 2001, kie 16 infanterianojn de la Mararmeo estis mortigitaj kaj du ostaĝigitaj.

Pli proksimdate, JJ estis la planizinto kaj realiginto de la ostaĝigaro de la dek du deputitoj de la Valo de la Kaŭko. Tiukaze, la gerilanoj alvenis al la sidejo de la Asembleo, kaj ŝajniginte sin kvazaŭ membroj de la Armeo, per megafonoj, vakigis la konstruaĵon pretekstinte bombo-minacon, kaj enirigis la deputitojn en buson kiu portis ilin, nesciantajn, al plurjara ostaĝeco kaj al la morto. Post kelkaj monatoj, JJ transdonis siajn ostaĝojn al la responso de la fronto 60-a de la FARK, direktita far la alinomita la *Grillo*, la sama fronto kiu pafadis sur ilin, estintajn en plena neeblo memdefendi, la 18-an de junio de 2007.

Ankaŭ estis JJ la responsulo pri la teroratenco de la 9-a de aprilo kontraŭ la komandejo de la Metropola Polico de Kalio. Cetere, li estis la komisiito pri la narkotaĵkomerca negoco de la FARK en areo de la centra pacifika zono de la lando, kio igis sian fronton unu el la plej povaj kaj memsufiĉaj ekonomie ene de la terorisma organizaĵo. Entute ekzistis kontraŭ li 16 validaj arestodekretoj pro deliktoj kiel terorismo, deliktocela grupiĝo², ribelado, ĉantaĝa ostaĝigo, kaj

¹ NT En la municipo “Dagua”, departemento Valo de la Kaŭko.

² NT Per “deliktocela grupiĝo” mi tradukas la koncepton “concierto para delinquir” de la kolombia leĝo.

pliseriozigita hommortigo¹, inter aliaj.

Ne estas do strange ke lia aresto aŭ senvivigo estis unua celo de la Armitaj Fortoj en ĝiaj penoj por plibonigi la staton rilate sekurecon en la Valo de la Kaŭko kaj en la tuta regiono ĉe la Pacifiko.

Finfine, la 6-an de junio de 2007, operaco kuna de la Armeo kaj la Mararmeo, per la Ŝipa Forto de la Pacifiko, kun apogo de la Aera Forto, metis finon al la longa krimkariero de la kapulo de la fronto Manuel Cepeda Vargas

JJ, kun grupeto de gerilanoj, veturis per boato tra la rivero Cajambre, en kampara areo de Bŭenaventuro, fuĝinte el la armea premo kiu igis lin delokiĝi elde la zono de la rivero Raposo, kiam li estis eltrovita far membroj de la Militfortoj. En pafinterŝanĝo kun la trupoj, la gerila ĉefo estis trafita per ununura pafajo en la frunton, kio kaŭzis lian tujan morton, kaj aliaj tri gerilanoj, kiuj tiam eskortis lin, suferis saman sorton. La finofaran pafon faris kaŝpafisto de la Mararmeo. Poste estis detruitaj surtere liaj du lastaj tendaroj.

La loĝantoj de la Valo de la Kaŭko ricevis kun maledo la novaĵon pri la faligo de la teroristo signifinta por sia regiono tion kion Martín Caballero signifis en la Montoj de María.

La senvivigo de JJ konsistigis la ekfaligon de la plej povaj strategiaj kapuloj de la FARK en la nacia teritorio. Estis sekvontaj lin en kelkaj monatoj la alinomitaj Negro Acacio — kies historion mi rakontos poste— kaj Caballero mem, plus dekoj da meznivelaj gerilestroj.

1 NT Per “pliseriozigita hommortigo” mi tradukas la koncepton “homicidio agravado” de la kolombia leĝo.

ĈAPITRO 11-a

La kuracisto kaj la kapulo

La 7-an de junio de 2007, la Armeo ellasis pluan frapon al la koro de la FARK, ankaŭ en la Valo de la Kaŭko. Dum operaco far trupoj de la Tria Brigado, en kampara areo de la urbo Buga, meze de bataloj kontraŭ gerilanoj de la kolono Alirio Torres, oni metis finon al Luis Fernando Vanegas, alinomita *Cristian Pérez*.

Kuracisto laŭprofesie, Pérez estis antaŭe la personan kuraciston de Manuel Marulanda, kaj estis, kune kun la alinomita Alfonso Cano, unu el la ĉefaj ideologiaj kapuloj de la terorisma organizaĵo, rolinte kiel sekretario kaj dua ĉe la komandado de la tiel nomita Bolivara Movado, laŭ gvidinto ankaŭ de la Komunisma Partio Eksterleĝa Kolombia¹ (PC3), per kiu la FARK klopodas enŝteliĝi en universitatojn kaj popolajn organizaĵojn. Cetere li estis partopreninta en la sanga detrusieĝo de Toribio (Kaŭko), en aprilo de 2005.

Tiu laŭpretenda “ideologo” falis ĉe operaco en kiu estis renversita metia fabriko produktinta kontraŭhomajn minojn. Neniam ĉesas mia surprizo pri kiel estas eble ke homoj edukitaj por prizorgi la vivon, kiel tia estas kuracisto, povas meti sian talenton kaj scion je la servo de la morto kaj la perforto, unu el kies plej makabraj simboloj estas tiaj minoj

¹ NT Movado “kaŝita” kreita far la FARK mem en la jaro 2000 sub la kapo de la alinomita *Alfonso Cano*.

kiujn oni kaŝas en la grundo por amputi aŭ mortigi siajn viktimojn ajnajn. Cristian Pérez, la “kuracisto de Tirofijo¹”, fordonis pli ol dudek jarojn el sia vivo al la terorisma luktado, kaj mortis sialeĝe.

Kapulo en la veprejo

Dume, post la morto de JJ, la cirkonstancoj de la havenurbo ekpliboniĝis iom post iom, kaj la indicoj pri hommortigoj, kiuj estis atingintaj nekutimajn nivelojn, ekmalaltiĝis. La publiksekuriga agentaro koncentriĝis pri la disvolvo de integraj agadplanoj por plibonigi la sociajn cirkonstancojn de la popolo kaj gajnis tiel, per pacienco kaj penado, ties fidon kaj kunlaboron.

La 28-an de junio oni ekkonis la murdaron de la dek unu deputitoj, kaj en la unuaj onidiroj kelkaj uloj eĉ supozis ke tio estis venĝo de la FARK pro la mortigo de JJ. Tamen, la postaj rivelaĵoj —kiel ni jam pritemis antaŭe— malkonfirmis tiun hipotezon.

La vero estas ke la gerilo en la pacifika zono kolombia travisis tempojn tre malfacilajn. Ĉiufoje estis pliaj la malmobiliziĝoj, kaj kun ili, la konaĵoj kiuj nutris la informiĝpovon de la Militfortoj kaj la Polico por daŭrigi en la luktado kontraŭ la perversa ligo inter la terorismo kaj la narkotaĵkomerco en la regiono.

Ĝuste en la kampo de la pura narkotaĵkomerco ankaŭ estis atingitaj sukcesoj senprecedencaj, kiuj kontribuis por liberigi la areon el la premo de la plej danĝeraj karteloj. En aŭgusto de 2007, la brazilaj aŭtoritatoj kaptis en San-Paŭlo la alinomitan *Chupeta*, Juan Carlos Ramírez Abadía, kaj en septembro samjara la Nacia Armeo kaptis la alinomitan *Don Diego*, Diego León Montoya.

Aliflanke, sen interveno de la publiksekuriga agentaro, Wilber Varela, alinomita *Jabón*, estis murdita ĉe interna

¹ NT Vidu la duan piednoton de la 63-a paĝo.

venĝo de la mafio en Venezuelo, en januaro de 2008.

Tiamaniere falis la tri precipaj ĉefoj de la grupoj kiuj konsistigis la kartelon de la nordo de la Valo.

La kupto de Don Diego prezentis specialajn karakterizaĵojn kiuj indas rememoron, pro tio, ke temis tiam pri la “dika fiŝo” plej grava de la narkotajkomerco en la lando, responsulo pri proksimume la 70% el la kokaino sendita al Usono kaj Eŭropo. Ne senkiale la FBI havis lin inkluzivita en sia listo pri la dek krimuloj plej serĉataj de la mondo, apud Usama bin-Laden; kaj la usona registaro oferis rekompencan de kvin milionoj da dolaroj pro lia kupto.

Por la faligo de Don Diego plejgravis la laboro de armea informiĝado kaj la fakigo de la operaco, kiu estis sekreta ĝis la lasta momento. Dum la tiame ĵuspasintaj semajnoj ni devis formeti kelkajn membrojn el la publiksekuriga agentaro, en ago de elpurigo, pro iliaj suspektitaj rilatoj kun la organizaĵo de la narkotajkomercisto, al kiu ili transdonis privilegidonajn informojn ¹. Tio klarigis kial en la multaj operacoj faritaj kontraŭ li, kvankam oni havis konajojn fidindajn por trovi lin, li ĉiam sukcesis eskapi, kiel se li estus avertita anticipe.

Pensinte pri tio, oni decidis taski la komision al elita grupo de la Specialaj Fortoj de la Armeo, kiu ne apartenis al la regiono de la Valo de la Kaŭko, por eviti iun ajn eblon de tralikiĝo. Tiel estis ke, profitinte la konajojn kolektitajn far la informiĝfako, la trupoj alvenis en tri helikopteroj al la kampara domo mem kie troviĝis kaŝita Diego Montoya, kune kun lia patrino kaj aliaj kvar homoj, en la vilaĝo El Vergel de la municipo El Zarzal, en la nordo de la Valo. La gardistara ringo de la kapulo ekpafis kontraŭ la armeanoj, intancante gajni tempon por ke sia ĉefo forkuru, tamen la Specialaj Fortoj agis tiel plenfrappe ke la eskortanoj foriris por malaperi. Fine Don Diego estis trovista, kaŝita en veprejo kaj kun nuraj

¹ NT Informoj internaj kiujn nur certaj homoj rajtas scii pro ilia laboro, kaj kiu se estus konita far aliulo, tiu ĉi povus utiligi ĝin por akiri nedecan avantaĝon, privilegion aŭ utilon por si mem aŭ por alia partio.

subvestoj. Sekvante sian mafian kutimon, li provis subaĉeti la soldatojn, oferante milionojn da dolaroj se ili lasus lin eskapi, tute sensukcese. Lian kapton signifis la plej grandan frapon al la drokarteloj ekde la morto de Pablo Escobar kaj la arestoj de la fratoj Rodríguez Orejuela.

Plufoje funkciis la teorio pri la kastelo el ludkartoj. Pli antaŭe, en januaro de 2007 ni kaptis la alinomitan *Don Hugo*, Eugenio Montoya, frato de Don Diego kaj dua en ties organizaĵo. Post la kupto de la ĉefa kapulo, liaj anstataŭantoj ankaŭ faladis unu post alia: en majo de 2008, la polico kaptis la alinomitan *el Señor de la Camisa Roja*¹, Gildardo Rodríguez Herrera, en La Vega (Kundinamarko); en junio samjara, falis en Zarzal (Valo) la alinomitan *La Iguana*, Jorge Iván Urdinola, danke al laboro de informiĝado de la Armeo, kaj unu monaton poste la Polico kaptis en Palmira la alinomitan *Capachivo*, Óscar Varela García, la lasta ĉefo de la iame pova organizaĵo de Don Diego.

Diego Montoya spertis la sorton kia alfalas al ĉiuj kapuloj de la narkotajkomerco en nia lando, kiuj frue aŭ malfrue estas mortigitaj aŭ arestitaj, sed neniam finsukcesas laŭvole. Hodiaŭ li estas enprizonigita en Usono, respondante pri la multnombraj akuzoj kiujn li alfrontas tiulande, same kiel sia frato Eugenio kaj sia alia frato Juan Carlos, ekstradiciita en la jaro 2005, kaj kiu pagas kondamnon de dudek jaroj da enprizonigo.

¹ NT “la Sinjoro de la Ruĝa Ĉemizo”.

ĈAPITRO 12-a

Kapto kineska

La urba fronto Manuel Cepeda Vargas de la FARK daŭris en sia malfortikiĝo post la falo de sia supera ĉefo. Danke al la informoj el la malmobiliziĝintoj, speciale la informoj liveritaj far la Chino kiu gvidis la procezon de amasaj dizertoj, la 9-an de novembro de 2007 estis kaptitaj en strato de Būenaventuro la alinomitan *el Moño*, tria kapulo de la urbobandoj kaj liganto kun la kampara areo, kaj la alinomitan *Gotzila*, ankaŭ kapulo de la urbobandoj

La areston de tiu paro da deliktuloj faris la GAULA de la Mararmeo, kune kun la Juĝa Polico¹ post tri monatoj da sekvado. El Moño estis responsulo dum la tiamlastaj monatoj pri la atencoj kontraŭ la Polico en la havenurbo, pluraj el kiuj kaŭzis la mortojn de agentoj el tiu institucio, pro kio lia kapto estis, iel, afero de polica honoro.

Bedaŭrinde, en decembro estis murdita la Chino, kies informo kaj kunlaboro estis tiel gravaj por la Aŭtoritatoj. Gustavo Cardona Arbeláez, alinomita *Santiago*, anstataŭinta de JJ en la direktado de la fronto Manuel Cepeda Vargas komisiis tiun murdon. Tamen ĝi estis malfrua por la celoj de Santiago, ĉar la konajoj liveritaj far la Chino kondukis en kelkaj monatoj al ties kapto.

¹ NT Polica fako kiu servas la Justican Povon de la Ŝtato.

La engaĝiĝo de la FARK kun la narkotaĵkomercentoj estis ĉiujfoje pli evidenta. Ĝi ne nur pagigis la permeson transporti drogon aŭ ingrediencojn tra la ĝangalaj areoj kie ĝi situis, sed ĝi ankaŭ administris senpere la negocon komplence kun la krimbando Los Rastrojos, naskita el la sikariaro laborinta por la forpasinta kapulo Jabón.

La 7-an de aprilo de 2008 la Mararmeo donis duflankan frapon al la narkotaĵkomerca stukturo de la gerilo ĉe la pacifika zono. Ĝi metis finon al la alinomita *Indio*, la ĉefa komisiito pri la negoco en la zono, kapulo pri financoj de la fronto Manuel Cepeda Vargas, kaj aliflanke ĝi kaptis la alinomitan *Jorge Morfi*, Jorge Rentería, ĉefo de la klano “los Morfi”, mafiano kun ekstradicia dekreto, kiu estis la precipa samcelano de la FARK en aferoj de narkotaĵkomerco. Morfi estis pioniro pri la sendado de drogoj tra la Pacifiko utiligante duonmergeblajn ŝipojn. La du kunuloj —la Indio kaj Jorge Morfi— direktis la interŝanĝon de narkotaĵoj kontraŭ armiloj, adresitaj al al la frontoj 30-a kaj Manuel Cepeda Vargas de la FARK. Sume: tio estis plurfaligo de granda gravo kontraŭ la narkotaĵkomerco en la areo.

“Turistoj” en La Bocana

Tiam mankis celumi la penadon al la alinomita *Santiago*, la anstataŭinto de JJ, viro sangavida kaj senskrupula, koncentriĝinta en la narkotaĵkomercon kaj la teroratencojn ĉe Buenaventuro kaj Kalio, direktinto de unu el la plej riĉaj frontoj de la FARK. En la nura 2007, la fronto Manuel Cepeda Vargas sendis al la okcidenta komandejo de la terorisma organizaĵo, direktita far Alfonso Cano, pli ol 15.000 milionoj da pesoj, kio igis tiun fronton unu el ties plej grandaj provizantoj de monrimedoj kaj ankaŭ de armiloj.

La operaco por kapti la alinomitan Santiago estis vere kineska, kaj havis karakteron tre polican, ĉar ĝi baziĝis sur ĉirkaŭfermo de informiĝado, sur enŝteliĝo de kaŝagentoj, kaj sur la preparlaboro ĉe areo kie, laŭsciante, la teroristo estis

pasigonta kelkajn tagojn da ripozado kun sia edzino, Claudia, konita pro ŝia lerteco pri sorĉado, kaj kun ŝia filino.

La informiĝfako de la Polico eltrovis sufiĉe antaŭtempe ke Santiago promesis renkontiĝi kun la du virinoj —loĝintaj en Kalio— en ripozkabanoj fronte al la maro en la vilaĝaro La Bocana, dudek minutojn for de Būenaventuro, en areo de granda turisma allogo pro la beleco de ĝiaj strandoj. En la komunikaĵoj inter la sorĉistino kaj la teroristo estis fiksate ke li kuniĝos kun ambaŭ virinoj ĉe la unuaj tagoj de majo de 2008.

Koninte tiun informon, tri paroj da kaŝagentoj de la Polico instaligis ekde du tagoj antaŭe en la feriejo, ŝajnigantaj esti grupo de turistoj, kaj tie ili vidis la alvenon de Santiago kun kelkaj gerilanoj kiuj lin eskortis, kompreneble civilvestitaj. Kiel najbaroj de ripozado, en maniero normala, la policistoj komencis dufoje hazardajn interparolojn kun Santiago kaj liaj virinoj, atendinte la taŭgan momenton por agi.

La loko prezentis multajn malfacilojn por la operaco ĉar la servareo por poŝtelefonoj estis tre malgranda kaj la ebloj alveni surtere estis preskaŭ nula pro la informantoj kaj la gardistara ringo kiujn Santiago havis ĉirkaŭ la kabanon. Tial do, la ununura eblo alveni kun trupoj estis tra la maro kaj dumnokte, kaj tia ĉi estis la elekto prenita, por kio la Polico laboris kunordige kun la Mararmeo, kiu provizis la loĝistikon por la elŝipiĝo.

Antaŭ la sturmo, kio okazis dum la tagiĝo de la 8-a de majo, la kaŝagentoj certiĝis ke Santiago ne ĉesis diboĉi kaj drinki dum la lastaj tagoj. La nokton de la operaco la tri paroj kuniĝis al la grupo de Santiago, akompanis lin drinki ĝis malfure kaj lasis lin okupiĝintan pri malvirto kun siaj kunulinoj en sia plezurdomo, dum ili atendis la helpotrupojn. Fine, alvenis la sturmaj taĉmentoj tra la maro, en batalboatoj, elŝipiĝis en la strando de la hotelo kaj eniris en la kabanon, kie estis trovita Santiago kun la du virinoj, ebria kaj sub la influo de narkotaĵoj. La danĝera kapulo ne rezistis kaj sep

pliaj el siaj subalternuloj estis kaptitaj. Li havis kun si pli ol 150 milionojn da pesoj en monbiletoj kaj du USB-poŝmemorilojn kun datenoj kiuj poste pruviĝis ŝlosilaj por la aŭtoritatoj.

La informo el Santiago

La spektakla operaco kiu finiĝis per la kapto de Santiago alportis pli multajn rivelajojn ol esperite.

Dum la tagoj ĵusantaŭaj al la sturmo, estis kaŝaŭskultataj pluraj el liaj telefonvokoj kaj oni eltrovis ke Santiago, kunordige kun la orienta bloko, direktita far la Mono Jojoy, estis sendinta taĉmenton de gerilanoj al Bogoto kun la celo atenci kontraŭ la Ministro pri Defendado. Ili identigis min, prave, kiel unu al siaj plej grandaj kaj plej videblaj malamikoj.

Laŭ la informo atingita far la Polico, kaj kiun ĝiamomente rivelis la generalon Óscar Naranjo, la FARK estis destinintaj 600 milionoj da pesoj por pagi al la bandanoj kiuj realigos la atencon kaj por aĉeti armilaron. Ili jam estis longtempe pristudintaj la ĉirkaŭejojn de mia loĝejo kaj la vojaron de miaj translokadoj, plus la policajn postenojn pli proksimajn, ties ekipaĵojn kaj reagtempojn. Feliĉe, la plano estis malkaŝita ĝustatempe. Tamen, ĝi ne estis la unua nek la lasta. Dum la preskaŭ tri jaroj en kiuj mi estis ĉe la direktanteco de la Ministerio pri Defendado, oni malkovris almenaŭ dek unu planojn konkretajn kaj progresintajn por murdi min, kiujn la aŭtoritatoj eltrovis kaj renversis danke al sia senmanka laboro de informiĝado.

En la USB-poŝmemoriloj trovitaj ĉe Santiago ekzistis ankaŭ grava informo pri la manieroj kiel li administris la negocon de la narkotaĵkomerco en la zono de la Pacifiko kaj kiel li atingis armilaron por la gerilo. Oni eksciis per tiuj ĉi arkivoj ke la fronto Manuel Cepeda Vargas estis aĉetinta armilojn en Nikaragvo kaj aliaj landoj de Centra Ameriko, kiujn ĝi disdonis al siaj terorismaj grupoj en Kalio kaj Bŭenaventuro.

Ankaŭ aperis instrukcioj de Alfonso Cano por atenci kontraŭ la “uribismaj” kandidatoj en la regionaj balotelektoj de oktobro de 2007, kaj registraĵoj pri pagoj al sikarioj por murdi antaŭelektitojn. Eĉ, ekzistis memorandoj pri la laboro de la FARK por enŝteliĝi en instruadajn instituciojn kiel la Universitato de la Valo. Resume, ĝi estis la elektronika agendo de teroristo klopodanta damaĝi la landon. Nebubinde, lia kapto estis fundamenta atingajo de la Armitaj Fortoj.

ĈAPITRO 13-a

La havenurbo renaskiĝas

La panoramo ŝanĝiĝis fundamente ĉe la kolombia pacifika zono.

Per la morto de JJ, Crisitan Pérez kaj la Indio; per la kupto de Santiago, la Moño kaj Jorge Morfi; per la malmobiliziĝado sinsekva de bandanoj, senĉesa ekde la sinliveroj amasaj ĉe la finiĝo de 2006 kaj komenciĝo de 2007; per la renverso de la kartelo de la nordo de la Valo, inkluzive de la kuptoj de Chupeta, Don Hugo kaj Don Diego, la detrua povo de la FARK kaj la organizaĵoj de la narkotaĵkomerco malpliĝis. Tamen ili ne ĉesis plene kaj mankas multo da laboro farenda. Narino¹ iĝis vera laboratorio de la krimado, kie geriloj, krimbandoj kaj narkotaĵkomercantoj pridisputas la teritorion —aŭ foje unuiĝis kontraŭ la publiksekuriga agentaro— por utiligi tiun gravan pasejon de eliro al la Pacifiko.

Dum persistas la koruptanta influo de la negoco de la malleĝaj drogoj, ĉiam ekzistas iu inklina alfronti la leĝon por serĉi facilan monon, spite ke frue aŭ malfrue ĝi iĝos malbeno portanta tiun al la prizono aŭ al la morto. En la Valo, direktita far la alinomitaj *Comba* kaj *Diego Rastrojo*, daŭras agante la bando *Los Rastrojos*, kontraŭ kiu estas koncentritaj nun la penadoj de la Polico kaj la Militfortoj. La prezidento

¹ NT Hispanlinge “Nariño”, departemento en la sudokcidenta ekstremo de Kolombio.

Uribe rimarkigis la unuacelecon fini tiun bando kaj fiksas rekompencojn de ĝis 5.000 milionoj da pesoj por informo kiu kondukis al la kapto de la novaj kapuloj.

Pri la fronto Manuel Cepeda Vargas, post la kapto de Santiago, ĝi ekrestis sub la direktado de Weiner Cabrera, alinomita *Iván Cárdenas*, aŭ *Narices*, kiu koncentris siajn penadojn sur fari atencojn, kiel la aŭto-bomboj kontraŭ la Justica Palaco de Kalio la 31-an de aŭgusto de 2008 kaj kontraŭ la Regiona branĉo de la Informiĝfako Polica (RIPOL) en la sama urbo la 1-an de februaro de 2009. Iel, tiu ĉi fronto hodiaŭ, pli ol gerila ĉelo, estas terorbanda iĝanta krimbanda.

Pli proksimdate, la 1-an de marto de 2009, la Nacia Mararmeo, kun apogo de la Aera Forto, kaptis la alinomitajn *Negro Juancho*, dua kapulo de la fronto Manuel Cepeda Vargas, kaj du pliajn gerilanojn, en la kampara areo de Būenaventuro ĉe la ĉirkaŭejoj de la rivero Raposo. La Negro Juancho estas responsulo pri almenaŭ 28 teroratencaj, inter ili tiu farita kontraŭ la instalaĵoj de la RIPOL, kiu kaŭzis la mortojn al kvar homojn kaj vundojn al pli ol tridek, inkluzive al kvin neplenaĝuloj. Tiu ĉi krimulo anstataŭis la alinomitajn Indio, post ties faligo, kiel ĉefo pri financoj de la fronto, kaj sia kapto signifis pluan fortan frapon por la FARK. Ĉe li estis trovitaj —krom armiloj, municio, kaj dek du milionoj da pesoj en monbiletoj— ankaŭ 23 poŝtelefonoj kaj 22 USB-poŝmemoriloj kiuj, sendube, liveros novajn rivelaĵojn pri la agmaniero kaj la planoj de la gerila grupo.

La ŝanĝo senteblos

Hodiaŭ ni ne povas diri ke la cirkonstancoj en Kalio kaj Būenaventuro estas tute regata, tamen ni ja povas aserti ke ĝi pliboniĝis kaj ke la progresoj rilate sekurecon estas elstaraj.

En la jaro 2006, antaŭ ol okazi la frapoj prirakontitaj, Būenaventuro registris nombron rekordescan de 408 hommortigoj. Por la jaro 2008, dum nuraj du jaroj, la nombro

de hommortigoj estis malpliiginta al 206, proksimume la duono. Ankaŭ malpliigis la ofteco de tiu krimo en Kalio (per pli ol 10%) kaj en la Valo de la Kaŭko (per proksimume 13%).

La okazoj de ĉantaĝocelaj ostaĝigoj malkreskis en la departemento per 25% dum la lastaj du jaroj, sekvante la ĝeneralan tendencon en la lando, kaj la teroragoj malpliigis per 67%, pasantaj el 75 en 2006 (preskaŭ la duono el ili en Bŭenaventuro) al 25 en 2008.

Tamen, ekzistas io eĉ pli grava ol la malpliigo de la indicoj pri deliktado en la areo: la reakiro de la apartensento far la bŭenaventuranoj, kaj la pliiĝo de ilia fido pri la aŭtoritatoj.

Dum multaj jaroj, kiam regis la perfortado de la FARK kaj la drokarteloj, la loĝantoj de Bŭenaventuro perdis la fieron pri sia bela regiono. En multaj el ili ekzistis la sento ke ili enestis nur pase, kvazaŭ se ili timus enradikiĝi en nenieslando. Eĉ, la kompanioj kiuj laboradis en la havenurbo, ne havis sian ĉefdomon en la urbo sed en Kalio aŭ en aliaj najbaraj municipoj.

Hodiaŭ la aferoj ekŝanĝiĝas, en pozitiva procezo kiu eblis danke al malplifortigo de la gerilo kaj de la organizaĵoj de la narkotajkomerco kaj, precipe, danke al la ĉeesto amika kaj protektema de la publiksekuriga agentaro, kio signifas ne nur sekurecon sed ankaŭ socia laboro favora al la komunumo.

La repacigo de Bŭenaventuro kaj de la pacifika zono progresas. Tamen, kiel dirite, mankas multo ankoraŭ: la gerilo kaj la krimbandoj, kvankam malfortigitaj, daŭras funkciante, kaj ekzistas multaj bezonoj alprovizendaj kaj multaj vorkoj farendaj. La kolombia Ŝtato kaj la Armitaj Fortoj havas la plenan volon komplezi al tiu regiono kiu estas fundamenta por garantii la konkurencpovon de la lando en la tutmondaj merkatoj.

Ĉe la nivelo de nura infrastrukturo, oni parolas jam pri projektoj gravaj por la havenurbo, kiu ekallogas nun la investadon el eksterlando. Dum oni pluvalidigis la koncesion por la Regiona Havena Societo de Bŭenaventuro pri unu el la

havenstacioj, kio stimulis la investojn, oni aprobis la projekton de la Industria Haveno Aguadulce, same kiel la koncesion de alia haveno al hispanaj entreprenistoj. Iom post iom ni eliras el la prokrasto de tiom da jardekoj dum kiuj ni turnis nian dorson al la maro de la estonteco kiu estas la Pacifiko.

Sentebblas, cetere, renovigita spirito de solidareco en la tiea popolo kaj pli granda inklino kunlabori kun la aŭtoritatoj por ke tiaj mortigaj tempoj, de JJ kaj Santiago, de Don Diego kaj Jabón ne ripetiĝu.

Bŭenaŭenturo iĝas denove, por fiero de siaj enloĝantoj kaj ĝuo de la turistoj, la “*Bela haven’ ĉe l’ mar’*” de la kolombia Pacifiko “*kie enspireblas ĉiam venteta puro*”.

INFORMIGPOVO DE LA PLEJ ALTA NIVelo

*La personaro per kiu la moderna komandanto
sorbas informojn kaj ekzercas sian aŭtoritaton devas
esti bele interkroĉita, glate funkcianta mekanismo.
Ideale, la tutaj devus esti preskaŭ ununura menso.*

GENERALO DWIGHT D. EISENHOWER

ĈAPITRO 14-a

Internacia kunagado

Antaŭ ol ekofici kiel ministro pri Defendado, pro la sperto kiun mi havis kiel ministro pri aliaj fakoj en du antaŭaj regadoj —tiuj de César Gaviria kaj Andrés Pastrana— kaj pro mia propra travivado de junaĝo, kiam mi studis du jarojn kiel kadeto en la Ŝipa Lernejo de Kartageno, mi jam havis kelkaj konceptojn klarajn pri la maniero kiel funkciadis la Armitaj Fortoj, ĝiaj principoj kaj moralvaloroj, ĝia doktrino kaj ĝiaj komponantoj administra, loĝistika, operaca kaj de informigado.

Mi ĉiam estis inklina al laboro teama, kaj tian mi aplikadis en ĉiuj postenoj kiujn mi okupis. Multfoje mi vidis kiamaniere frustrigas la plej bonajn intencojn pro la superrego de la egooj kaj la individuecoj kiuj, serĉante laŭdojn aŭ kajolojn, malakceptas la kontribuadojn de la aliuloj, kaj mi vidis ankaŭ kiamaniere, kiam ĉiuj metas siajn penojn kaj talentojn serve al unu afero, sen egoismoj nek ĉefroletoj, la celoj, spite kiom ajn malfacilaj ili ŝajnas, estas atingataj.

La sukceso de iu ajn administranto —kaj ĉiu publika misio bezonas administranton— baziĝas sur sia scipovo ĉirkaŭi sin de bona teamo, kaj sia scipovo gvidi ĝin, funkciigante ĝin kvazaŭ bone reguligita horloĝo, kie ĉiu peco estas necesa por la bona disvolvo de la tasko.

Tial, ekde mia unua tago en la Ministerio, konscia pri la

centoj da miloj da viroj kaj virinoj kiuj konsistigas ne nur la Militfortojn kaj la Policon, sed ĉiujn instituciojn de la Defenda sektoro, mi havis la firman decidon ĉirkaŭi min de la plej kompetentaj homoj kaj apliki laborsistemon teaman kiu tradukiĝu en rezultojn.

Kelkajn tagojn antaŭ ol ekofici en la posteno, mi vojaĝis al Londono, kie mi interparolis kun Sir John Scarlett, ĝenerala direktoro de la brita Sekreta Informiĝa Servo, la fama MI6, de la filmoj pri James Bond. La direktoro esprimis al mi sian konvinkigon pri la graveco de la informiĝado por la batalo kontraŭ la terorismo kaj la negoco de la malleĝaj drogoj, kaj cetere li konfirmis la helpon de la Unuiĝinta Reĝlando por la trejnado kaj konsilado pri temoj de informiĝado kaj kontraŭinformiĝado, helpo kiu estas tre grava, precipe por la Nacia Polico kaj la luktado kontraŭ la narkotaĵkomerco.

Ankaŭ dum tiuj tagoj mi parolis kun bona amiko, eksministro pri Eksterlandaj Aferoj kaj eksministro pri interna sekureco de Israelo: Ŝlomo Ben-Ami, kiu estas, ankaŭ, vicprezidento de la Toledo Internacia Centro Porpaca, de kio mi estas membro. Ben-Ami, el sia spertado rekomendis al mi, pri informiĝado, la konsiladon far kompanio konsistigita far antaŭaj generaloj kaj membroj de Mosado —la renoma informiĝada servo israela—, konsilado kiu realiĝis dum la jaro 2007, kaj kiu estis fundamenta por la disvolvo de la koncepto pri operacoj kunfarataj ĉe la plej alta nivelo, kio donis la plej grandajn rezultojn en la historio de la luktado kontraŭ organizaĵoj renversemaj, hodiaŭe terorismaj kaj narkotaĵkomercaj.

Krom la kunagadoj brita kaj israela, ankaŭ ni ĉiam havis —kontinue kaj tre pozitive— la apogon de informiĝpovo, teknologio, instruado kaj trejnado far la fortoj de sekureco kaj defendado de Usono, apogo kiu helpis nin atingi kaj firmigi la progresojn rezultigitajn far niaj propraj fortoj, kaj kiu enkadriĝis en la programon de militista kunagado de la Plano Kolombio, komencita dum la jaro 2000 sub la regadoj de

Pastrana kaj Clinton, kaj daŭrigita far la sekvintaj registaroj.

Male al tio kion kelkuloj pensas, la kunagado de Usono, perita tra la Suda Komanditaro tiulanda, koncentriĝis sur la taskojn menciitajn —tio estas, en la aferoj de konsilado kaj instruado— kaj ne en la operaca parto. La agoj de batalado kontraŭ la gerilanoj kaj narkotajkomercistoj estas realigitaj, ĉiuj, far personaro kolombia, sen partopreno de eksterlandaj fortoj en la tereno.

La unuaj tagoj

La sukcesiga ŝlosilo de iu ajn informiĝlaboro havas sian radikon en la sekreto, pro tio, ke ĝi konsistas, fundamente, el enfiltri la malamikon por koni ties planojn, ties rimedojn, ties feblaĵoj kaj fortaĵoj, por determini ties situon kaj, en okazoj eksterordinaraj, kiel la Operaco Ŝakon, agigi la malamikon laŭ niaj celoj.

Samkiale, ĉiu informiĝmisio postulas altan gradon de disfakigo, tio estas, ke sciu pri ĝi nur la plej malmultaj homoj kiel eble, kaj ke eĉ pli limigita nombro havu aliron al la tuta informo. Tamen, la disfakigo —kio estas baza principo de informiĝado— povas roli kontraŭ la misio kiam, pro troa ĵaluzo, la konaĵoj atingitaj ne estas kunhavigitaj ĝustatempe kun tiuj kiuj bezonas ilin por agi.

Kiam mi enoficiĝis en la Ministerio, en julio de 2006, ekzistis ene de la Militfortoj organizaĵo nomita “Cerbero”¹ kiu celis, precipe, kolekti la informon je la plej alta nivelo kaj ĝin utiligi por plicertigi sukcesajn operacojn. Ĝia filozofio estis adekvata, tamen, praktike, ĝi ne produktis gravajn rezultojn.

Dum sia ekzistotempo —eble pro manko de sufiĉa apogo politika aŭ arma— ĝi ne sukcesis kolekti informon utilan pri altvaloraj celituloj, kaj la neesto de konkretaj rezultoj subfosis sian kredindecon ene de la fortoj. Fakte, kiam iu havis valoran informon, anstataŭ kunhavigi ĝin kun “Cerbero”,

¹ NT Hispanlingve: Cancerbero.

liveris ĝin individue al la supera komandanto aŭ la ministro, multfoje serĉante ian nenecesan ĉefrolecon.

Ne estis malofte, dum miaj unuaj monatoj en la Ministerio, ke min serĉis altaj oficiroj por komenti pri gravaj konaĵoj kiujn ili havis pri la malamiko, kaj kiujn, tamen, ili ne liveris senpere al la membroj de aliaj fortoj kiuj eble havis pli bonan ŝancon profiti el tiuj konaĵoj. Baldaŭ mi rimarkis ke tio estis eraro profunda kiun ni estis devontaj ripari. Kiel ni venkos la teroristojn kaj narkotaĵkomercantojn se inter ni mem ni ne konfidis la esencan informon? Estis urĝe apliki, vere, la koncepton de informiĝado kaj operacoj kunfarataj.

Israela konsilado

Dum la unuaj du monatoj de 2007, israelaj fakuloj pri informiĝado, kun sperto pri milito de specialaj operacoj, faris laboron sur la tereno, vizitinte multajn armeajn sekciojn por alveni al diagnozo pri nia stato koncerne informiĝpovon. La celo estis havatingi informiĝpovon realtempan kiu, post atingita tradukiĝu en konkretajn operacojn en tre mallonga tempo. Ĉar, por kio utilas informon pri unu gerila tendaro, se pro manko de kunordigado kaj rapido, kiam la trupoj fine alvenas, ĝi jam translokiĝis?

La israelaj spertuloj konkludis ke en nia lando ni havis bonan informiĝpovon, kun teknologio sendube plibonigenda kaj kun homgrupoj bone trejnita, tamen ke, malgraŭ la pozitivaj karakterizaĵoj, ni ne estis uzante ĝin bone ĉar la atingita informo ne estis kunhavigita ĝustatempe nek tradukita en sukcesajn operacojn. Ili proponis al ni krei organizaĵon, similan al unu kiu funkcias en sia lando, nomita Nacia Grupo de Planizado, por prilabori la informerojn venintajn el diversaj fortoj kaj por kunordigi la operacojn starigitajn el tiuj informeroj.

Kompreneble, ĝi devus esti organizaĵo fermita kaj kiu ne disiĝu sian energion en multajn celojn, sed kiu koncentriĝu sur tiajn kiajn ni nomas “strategiaj celituloj altvaloraĵ”, kiel la

anoj de la Sekretariaro de la FARK kaj aliaj strategiaj kapuloj kiel Martín Caballero, la Negro Acacio kaj la alinomita *Karina*, plus kelkaj kapuloj de la narkotajkomerco. Al ĉiu el tiuj celituloj estas asignata responsulo el tiu forto —Mararmeo, Aera Forto, Armeo aŭ Polico—, kiu havas plian kaj plibonan informon pri la celitulo, kaj ĉiuj ceteraj raportas al tiu responsa ordonanto

La menciita grupo —dependanta senpere de la ministro kaj de la komandanto de la Militfortoj, kun kelkaj altaj oficiroj komandantaj ĝin pri informigado kaj operacoj— estis kreita en majo de 2007, kaj baldaŭ strukturiĝis kiel ĉefinstanco ene de la Komanditaro de la Militfortoj, kaj tiam eknomiĝis Ĉefinstanco de Specialaj Kunfarataj Operacoj (JOEC)¹.

La israela konsilado tiutema finiĝis en decembro de 2007, tamen siaj instruoj signis la komenciĝon de tiu ĉefinstanco, kiu estis fundamenta, mallonge dirite, por doni la strategiajn frapojn donitajn al la FARK kaj al la organizita krimularo dum la lastaj jaroj.

Samtempe kiam la israelanoj alportis al ni la koncepton pri tia organizaĵo centralizanta la konaĵojn el informigado, la usonaj konsilantoj helpis nin apliki ĝin kaj traduki ĝin en atingajoj operacaj, ĉiam bazite sur la penado en la tereno far kolombiaj trupoj.

¹ NT Hispanlingve: *Jefatura de Operaciones Especiales Conjuntas* (JOEC).

ĈAPITRO 15-a

La Ĉefinstanco de Specialaj Kunfarataj Operacoj

La JOEC ne produktas per si mem konaĵojn de informiĝado; la JOEC estas kunordiganta centro kiu ricevas kaj prilaboras la informerojn pri altvaloraj celituloj, kaj kiu havas —ĉi tio estas esenca— la kapablon meti, iumomente, ĉiujn rimedojn homajn, logistikajn kaj teknikajn de la Armitaj Fortoj, la Polico kaj la DAS, serve al unu celitulo kiam la informaro kolektita tion konsilas.

Kio signifas la JOEC? La unuiĝo perfekta de kunfarita informiĝado, tuja agokapablo kaj politika decido, garantiita pro la partopreno kaj la gvidkapablo de la ministro pri Defendado.

Kiel imageblas facile, la kreo de ĉi tiu ĉefinstanco ne havis entuziasman apogon de multaj oficiroj, kiuj ĝin vidis kvazaŭ entrudiĝanto en siaj funkcioj kaj jurisdikcioj.

Mi rememoras la okazaĵon pri iu generalo de la Aera Forto, tiame ĉefo de la informiĝfako de sia institucio, kiun mi vokis al mia oficejo por engaĝi lin kiel ĉefo de informiĝado de la JOEC, pro la bonegaj rekomendoj kiajn mi havis pri li. Kiam mi komentis al li pri kio temis, la alta oficiro, tutsincere respondis:

— Ministro, mi multe dankas al vi ke vi pensis pri mi, tamen

- mi ne volas surpreni tiun postenon, mi ne ŝatus ...
- Kial? —mi lin demandis, surprizita.
 - Pro tio, ke vi metas min fari taskon kiun faris neniuj, labori en io kio ne ekzistas, kio estas tre malfacila ...
 - Rigardu, generalo mi diris. Tio ĉi estas tre grava, kaj vi rimarkos tion. Mi nur petas ke vi laboru, ĉar se tio ĉi funkcios bone por ni, ĝi funkcios bone por ĉiuj kaj, se ĝi funkcias malbone, almenaŭ ni provis ĝin.

La generalo akceptis la nomumon, kaj mi estas certa ke li ne ripentis. Lia laboro ĉe la fronto de la informiĝfako de la JOEC estis fundamenta por la atingo de tiom da sukcesoj, kiel ankaŭ estis tiaj la sindevontigo kaj gvidkapablo de la majoro-generalo Luis Alberto Ardila, de la majoro-generalo Carlos Arturo Suárez kaj de la majoro-generalo Alejandro Navas, por menciigi kelkajn el la altaj oficiroj kiuj estis aŭ estas ĉe la fronto de la taskoj de la JOEC.

La rezistemon kontraŭ la ŝanĝo, tiel natura ĉe la homa estaĵo, oni sentis dum la unuaj monatoj de laboro de la nova ĉefinstanco. Mi rememoras kunsidon kiun ni havis kun la komandantoj, duaj komandantoj, ĉefoj pri operacoj kaj pri informiĝado de ĉiu el la tri Militfortoj, en kiu pluraj prezentis dubdemandojn kaj heziton kunagi kun tiu ĉi projekto. Al kelkaj mi devis diri energie: “Se vi ne kunlaboras, vi foriru!”. Feliĉe, la rezultoj fine pruvis la bonaĵojn de la nova sistemo, kaj hodiaŭ neniuj dubas pri ĝia efikeco.

Eĉ antaŭ ol establiĝi oficiale, la ĉefinstanco partoprenis en operacoj tiel gravaj kiel la serĉado de la subintendantino John Frank Pinchao, en majo de 2007, post lia sentima fuĝo el tendaro de la FARK, kaj ĝi ankaŭ apogis la Marameon en la operaco kiu finiĝis kun la morto de JJ, en junio samjara. Tamen, la atingiĝo kiu estis elstarigonta plenfine la Ĉefinstancon JOEC, kaj la sistemon de informiĝado kaj operacoj kunfarataj kiun ĝi simbolas, ene de la Armitaj Fortoj mem, estis la operaco kiu metis finon al la alinomita *Negro Acacio*, en septembro de 2007, pri kio mi temos poste.

La malaktivigo de Acacio donis kredindecon al la procezo kiun ni estis komencintaj kaj pruvis al la skeptikuloj ke ja penindas centralizi la informerojn pri la strategiaj celituloj en organizaĵo kapabla enkanaligi ĝin kaj traduki ĝin, senprokraste, en operacoj realaj, kun ĉiuj rimedoj necesaj.

Sume, kun la JOEC ni atingis tion kion ni intencis ekde 2006: realtempa informiĝpovo kaj sukcesaj operacoj bazitaj sur la informo kolektita, plenumitaj en minimuma tempo.

Projekcio eksterlanden

Post la sukcesoj atingitaj far la JOEC, inter kiuj elstaras, pro siaj strategiaj gravecoj, la Operaco Fenikso, kiu kulminis kun la senvivigo de la alinomita *Raúl Reyes*, kaj la Operaco Ŝakon, kiu elprenis sen unu gratvundeto, kaj sen pafi eĉ unu kuglon, dek kvin ostaĝojn el manoj de la FARK, ĉi tiu ĉefinstanco pretiĝas por sia sekvanta paŝo, kiu estos realigata kun la konsilado de la Suda Komanditaro de Usono: sia transformiĝo en Komanditaron de Specialaj Kunfarataj Operacoj.

Tiu ĉi Komanditaro havos, krom la funkcioj pri kunordigado kaj centralizo de informiĝado, el la JOEC, ankaŭ propran operacan forton, konsistigota el la plej kompetentaj trupoj, en kiuj partoprenos la specialaj kaj elitaj grupoj de la diversaj Militfortoj kaj de la Polico. Kun uneco strategia kaj ordona, la trupoj de la nova Komanditaro povos mobiliziĝi en tre mallonga tempo al iu ajn loko de la nacia teritorio kie troviĝas iu altvalora celitulo.

Estus tiu Komanditaro la forto kapabla agi en solvofara formo —per fluga moveblo, amfibiaj taĉmentoj kaj grupoj de soldatoj altgrade trejnitaĵ— sur la strategian malantaŭon de la interna malamiko —gerilo aŭ narkotajkomerco—, same kiel por la defendo antaŭ iu ajn eventualaĵo el ekstero.

Pensante pri la Armitaj Fortoj de la estonteco, tiuj kiujn havos Kolombio en scenejo de paco, la nova Komanditaron de

Specialaj Kunfarataj Operacoj sin projekcios ankaŭ kiel plurnacia forto kapabla agadi en diversaj scenejoj de la mondo kie estos bezonata la kontribuajon de Kolombio en misioj de ordigo kaj de paco. Tiel faris niajn batalionoj Kolombio en la Korea Milito kaj en la Sueza Krizo, kaj nuntempe en la duoninsulo Sinajo. Venonte, pro invito far la NATO, ni apogos la taskon de tiu organizaĵo en Afganujo, kie jam estas reprezentitaj la armeoj de pli ol 40 demokratiaj nacioj de la mondo.

LA KARTELO DE LA SUDORIENTO

*Ili (la FARK-anoj) ne havas ideologion.
Ili estas tie cele la monon, ili iĝis kapitalismaj
kaj nur deziras la monon, la monon, la monon ...*

LUIS FERNANDO DA COSTA, *FERNANDINJO*
Brazila kapulo de la narkotaĵkomerco
kaptita en Kolombio en aprilo de 2001.

ĈAPITRO 16-a

En la koro de la FARK

Kiam la prezidento Pastrana permesis, por faciligi la dialogon kaj interkonsenton kun la FARK, la kreon de zono de malstreĉiĝo en kvin municipoj sudorientaj de Kolombio (unu de Kaketao —San Vicente de la Kagŭano— kaj kvar de Metao —Uribe, Vista Hermosa, La Macarena kaj Mesetas—), li faris nenion alian ol agnoski areon kiu tradicie havis ĉeeston kaj influon de la gerilo.

Malgraŭ la ekzisto de la Bataliono Ĉasistoj de la Kagŭano ĉe la urbigita areo de la unua municipo, la vero estas ke la FARK, antaŭe ol la determino de la zono de malstreĉiĝo, moviĝis tra tiu regiono kvazaŭ mastroj kaj sinjoroj, altrudinte kvazaŭimpostojn, aplikinte sian revolucionan juĝadon, kaj regante, en ĉiuj ĝiaj fazoj, la negocon de la narkotajkomerco.

Dum la pli ol tri jaroj kiujn daŭris la porpaca procezo, la gerilo sukcesis fortikiĝi eĉ plie en tiu vasta teritorio de 42.000 kvadrataj kilometroj, pordo por aliro al la baseno kolombia de la Orinoko kaj al gravaj geografiaj apartaĵoj kiel la Montoĉeno la Macarena.

Kiam la prezidento Pastran metis finon al la zono de malstreĉiĝo, la 20-an de februaro de 2002, la celo de la Armeo kaj la Polico, en operaco nomita Tánatos, estis repreni tiun ĉi areon kaj garantii la enestadon de la aŭtoritatoj.

Kompreneble, tio ne estis simpla tasko. La gerilanoj konis

la terenon detale, havis grandegan influon sur la civila loĝantaro, kaj sin kamuflis kvazaŭ vilaĝanoj. Iasence, ili faris nenion alian ol reveni al la stato antaŭa al la porpaca procezo, tamen fortikigitaj pro tiuj jaroj dum kiuj ili havis la okazon konstrui vojojn kaj infrastrukturon por sia moviĝo kaj kaŝado, plifirmiĝi loĝistike, kaj certigi al si la lojalecon aŭ timon de la loĝantoj.

Dum la unua regperiodo de la prezidento Uribe, la Ministerio pri Defendado kaj la Ĝenerala Komanditaro de la Militfortoj ekfaris militkampanjon, nomita Plano Patriota, por ataki la strategiaj centroj de la FARK en la tuta lando, kaj tre speciale en ĝangalaj regionoj de la sudoriento.

Por ĝin plenumi —kaj laŭ la koncepton de unueca kuniĝinta ordonpovo, kia estis tiel grava por atingi operacajn sukcesojn— estis kreita la Kuniĝinta Taskoforto Omega, kun agentaro komenca de 14.000 homoj (hodiaŭe pli ol 20.000), komisiita por batali kontraŭ la teroristoj en tiu vasta areo, de proksimume 82.000 kvadrataj kilometroj, kiu enhavas la departementoj Metao kaj Kaketao, kaj aliaj kiuj antaŭe estis parto el la Naciaj Teritorioj ¹, kiel Kasanaro, Gŭajnio, Gŭavjaro, Vaŭpeso kaj Viĉado.

La Taskoforto Omega estis la plej grava konsistiganto militista de la Plano Patriota, kaj hodiaŭ estas konsistiganto fundamenta de la Plano Firmiĝo kiu sekvis tiun. Danke al ĝi —kiu kunigas elementojn el la Armeo, la Mararmeo kaj la Aera Forto—, kaj al penado daŭra kaj masiva, la FARK devis forlasi sian ŝirmejon iaman, kaj ĉiufoje plu ĝi finrestas forpuŝita al zonoj landlimaj kun Brazilo kaj Venezuelo, aŭ sin kaŝinta en la pleja profundaĵo de la ĝangalo, malproksime de la popolejoj.

Kun ĉefa akso en la bazo de Larandia (Kaketao), kaj aliaj gravaj bazoj en Tres Esquinas (Kaketao) kaj Apiay (Metao), inter aliaj, la Kuniĝinta Taskoforto Omega rehavigis la

¹ NT "Naciaj Teritorioj" estis la nomo de regiono kiam la nacia registaro direktis ĝin pli centralize; ekde 1991 tiu rgiono estas naŭ departementoj.

teritorian regpovon sur vastaj pecoj de nia teritorio al la Ŝtato, kiu ekalvenis kun infrastrukturo, publikaj servoj¹ kaj justico, kaj kun la enesto ĉiama de la Polico.

Ankaŭ estis frapata speciale la agado narkotaĵkomerca de la FARK en tiu regiono.

La kartelo de la FARK

Dum la jardeko 1980-a, la FARK ekprenis decidon kiu estis signonta sian finan degeneron el movado kun ŝtatrenversema pretendo al krimorganizaĵo: engaĝiĝi en la narkotaĵa negoco, kio en kelkaj jaroj iĝis la ĉefa fonto de enspezoj por ĉiuj ĝiaj agadoj. La FARK finrestis transformita en grandan kartelon de fidrogoj, pro decido kiu kunportis la uzadon de la teroro kiel ilo por politika premo, per la timigo al la socio, kaj la perdon de siaj ideologiaj tendencoj kaj valoroj.

En marto de 2006, decido de la usona justico evidentigis la novan kriman procedon de la FARK, kiam la Tribunalo de Unua Instanco de la Distrikto de Kolumbio² liveris formalan kulpigon³ pri narkotaĵkomerco kontraŭ 50 membroj de tiu organizaĵo, inkluzivitaj ĉiuj sekretarioj.

“La FARK estas eksterlanda terorisma organizaĵo (...) kiu monsubtenas siajn agojn per amasa distribua reto. ĝi teruras lokajn terkultivistojn en Kolombio, kaj atakas ĉiujn kiuj minacas siajn operaciojn. La FARK starigis kokainan imperion kiu estas la plej granda provizanto por Usono”, diris la distrikta prokuroro, Michael J. García, de la Suda Distrikto de Novjorko.

Similaĵon pludiris la administrantino de la DEA⁴, Karen P. Tandy: “Elde sia kaŝejo en la ĝangalo, la FARK utiligas la

¹ NT La nomo “publikaj servoj” en Kolombio pli ofte signifas: akvo, kloakreto, elektro kaj telekomunikoj; tamen, ankaŭ povas inkluzivi sanzorgado k.t.p.

² NT Anglalingve: "District Court of the District of Columbia"

³ NT Dokumento konita anglalingve kiel "the FARC indictment"

⁴ NT Angla mallongigo de “Drug Enforcement Administration”, usona instanco por obeigo de la tieaj leĝoj kontraŭ fidrogoj.

narkotaĵkomercon por monsubteni la terorismon en Kolombio kaj atakojn al senkulpaj civiluloj, kaj veneni la usonanojn”.

La komunikaĵo de la usona Justica Departemento, tiame direktita far Alberto R. González, faris adekvatan raporton pri la maniero kiel la narkotaĵkomerco iĝis la ĉefa fonto de monsubteno de la gerilo:

“Laŭ la formala kulpigo, la FARK nun provizas pli ol 50% el la kokaino de la mondo, kaj pli ol 60% el la kokaino kiu eniras en Usonon. Unuatempe la FARK pagigis imposton al la ceteraj narkotaĵkomercantoj engaĝigintaj en la produktado kaj distribuado de kokaino en areoj kontrolitaj far la FARK (...). Rimarkinte la pliiĝon de la profitoj haveblaj ekde la jardeko de 1990 ĝis hodiaŭ, la FARK ekmoviĝis por engaĝi sin senpere en la produktado kaj distribuado de la kokaino per deliktaj agoj kiel la fiksado de la prezoj kiujn oni pagas al la terkultivistoj de la tuta Kolombio por baza pasto el kokao —la krudaĵo uzita por produkti kokaino— kaj la transporto de la baza pasto el kokao al laboratorioj situantaj en la ĝangalo kiuj estas regataj far la FARK, kie ĝi estas transformata en tunojn da finpreta kokaino kaj poste estas sendata elde Kolombio ĝis Usono kaj aliaj landoj. Rimarkinte ke la kokaino estas la “animo” de la FARK, la gvidantoj de FARK akuzitaj kolektis milionojn da dolaroj en profito el la kokaino kaj uzis la monon por akiri armilojn por la teoragoj de la FARK kontraŭ la registaro kaj la popolo de Kolombio (...)”.

En la ĵurnalistara intervjuo de la 22-a de marto de 2006, en kiu la Usona registaro anoncis tiun ĉi juĝista decido, la eksa ambasadestrino en Kolombio kaj tiama Helpa ¹ Sekretariino de Ŝtato, Anne Patterson, anoncis programon de rekompencoj por informoj kiuj konduku al la kaptoj de la ĉefaj gvidantoj de tiu grupo narkotaĵkomerca-terorisma:

“Nun estas en nia celilo la FARK, responsa pri granda parto de la kokaino ŝakrita en Usono, kaj mi goje anoncas tiujn ĉi

¹ NT Pri eksterlandaj aferoj en la fakoj de narkotaĵoj kaj obeigo de la usona leĝaro.

oferoj de rekompencoj kontraŭ ĝiaj ĉefaj gvidantoj”.

Ekestis anekdota la fakto ke en tiu ĵurnalistara intervjuo, okazinta en Vaŝingtono, ĉeestis, reprezentante la kolombian registaron, la eksprezidento Andrés Pastrana, kiu tiam estis ambasadestro en Vaŝingtono.

La prezidento Pastrana, kiu etendis la manon ofereman de la Ŝtato al la gerilo serĉante pactraktaton, estis, paradokse, tiu mem kiu, post la rompiĝo de la intertrakta procezo, atingis ke la FARK estu klasita far la Eŭropa Unio kiel terorisma, kaj kiu atestis en la usona ĉefurbo, por ĝia oficiala transformiĝo per nova priskribnomo kian ĝi, kompreneble, rifuzas akcepti: la kartelo de la FARK.

ĈAPITRO 17-a

Ofensivo en la ĝangaloj de la sudoriento

Mi jam menciis, komence de tiu ĉi libro¹, la kapton de la alinomita *Chepe* aŭ la *Boyaco* la 17-an de oktobro de 2006. Ĉi tiu estis la unua granda strategia frapo al la FARK ellasita far la Armitaj Fortoj ekde mia enposteniĝo kiel ministro, kaj tial mi rememoras ĝin speciale, kaj ankaŭ pro la konsekvencoj kiujn ĝi havis por la malmuntado de ties mafia reto en la sudoriento de la lando

La Boyaco, kiu estis unu el la gerilanoj petitaj far Usono por ekstradicio pro narkotajkomerco, estis kaptita en la ŝtato Táchira, en Venezuelo, en la jaro 2004 kaj estis fuĝinta ok monatojn poste, kiam jam estis leĝigita sian ekstradicion, utiligante la koruptopovon de la mono kiun alvenigis sia senpera ĉefo, alinomita la Negro Acacio, kapulo de la 16-a fronto.

Li revenis al la lando kaj interniĝis en la ĝangaloj de Gŭavjaro, elde kie li kunordigis la interŝanĝon de tunoj da kokaino kontraŭ armiloj kaj eksplodaĵoj por la FARK, por kio li uzis reton kun eksterlandaj rilatoj kiun li estis kreinta dum siaj pli ol dek jaroj de aneco en la gerilo.

En tiu tasko, la Boyaco agadis kunordigite kun la 16-a

¹ NT Paĝo 19-a.

fronto de la Negro Acacio, kaj kun la unua fronto kies kapo estis la alinomita *César*, kaj la kunulino de ĉi tiu, alinomita *Doris Adriana*, ĉiam sub la kaj gvido kaj kontrolo far la Mono Jojoy, ĉefo de la Orienta Bloko.

Liaj monvaloregaj transakcioj kaj lia kapablo kiel provizanto de armiloj igis el li gravegan celitulon por la Armitaj Fortoj, kiuj estis spurintaj lin ekde la momento mem kiam li fuĝis el Venezuelo. Ekde la komenciĝo de 2006, la Nacia Polico faris intensajn laborojn de informiĝado, kun helpo de kunagantoj¹ el la regiono, kio kondukis, fine, al la lokalizo de la ejo kie sin kaŝis la narkotaĵkomercisto-teroristo, en kokain-prilaborejo meze de la ĝangaloj de Gŭavjaro, en jurisdikcio de la municipo El Retorno, tiu laboratorio, kiu inkluzivis instalaĵojn kun loĝeblo por proksimume 300 homoj, estis kamuflita sub arboj eĉ 40 metrojn altaj, kies frondoriĉaj kronoj malhelpis ĝian malkovron elde la aero.

Subaze de la informo atingita far la Polico, la Militfortoj kunigis siajn kapablojn kaj, kun apogo de la prokurorejo, plenumis la kaptan de la Boyaco; de lia kunulino alinomita *La Negra* —kiu ankaŭ estis de antaŭe petita por ekstradikcio—, kaj de 19 pliaj gerilanoj.

La operaco estis spektinda pro sia planizado kaj aranĝado. La Nacia Mararmeo estis komisiita transporti rivere centojn da soldatoj el la Specialaj Fortoj de la Armeo, ĝis loko proksima al la laboratorio; ili ĉirkŭfermis la lokon kaj alfaldis surprize sur la gerilanojn, kiuj ne havis alian elekteblon ol sin fordoni, kaj, fine, la Aera Forto, kiu laboris pri la sekurigo de la areo, estis komisiita pri la aera evakuo de la trupoj kaj la kaptitoj, kiuj ekrestis sub ordonoj el la Prokurorejo.

¹ NT Nomiitaj en Kolombio: "cooperantes". Ili estas civiluloj kiuj, en plenumo de civita devo, libervole kaj pro patriota spirito, helpas, kunlaboras kaj kunagas kun la ŝtataj sekuragentejoj, liverante ĝustatempajn informojn. Sekureco kaj defendo estas publikaj bonoj, kiajn homoj povas, laŭrajte, aliri egalece. La *Reto de Kunagantoj* estas preventa sistemo kiu integras kolombiajn civilulojn kun la ŝtataj sekuragentejoj bonfare al publika sekureco, surbaze de la principo de solidareco de la kolombia konstitucio.

Kiel estas regulo en ĉiu mafiulo, la Boyaco provis utiligi la rimedojn je sia atingopovo por eviti sian kapton. Antaŭ ol esti senmanke identigita, li petis la soldatojn permesi al li paroli kun la komandanto de la operaco kaj, kiam li estis fronte al tiu oficiro, diris ke li ne havis monbiletojn kun si kaj ke tamen se oni permesus al li voki per satelita telefono, li povus atingi milionon da dolaroj interŝanĝe kontraŭ sia ellaso. Lia provo de subaĉeto certe malsukcesis.

Tiele, estis senigitaj la FARK je grava ligilo por sia logistiko de produktado kaj komercado de fidrogoj elde la oriento de la lando kaj, precipe, je provizado de armiloj kaj eksplodaĵoj.

Post la malaktivigo de la Boyaco, kiu kune kun La Negra, hodiaŭ estas en Usono alfrontante akuzojn pri terorismo kaj narkotaĵkomerco, la regado de la abunda fidroga negoco en Gŭavjaro, kaj de la interŝanĝo-reto de kokaino kontraŭ armiloj, eksplodaĵoj kaj telekomunikilaj sistemoj, alfalis en César kaj lia kunulino Doris Adriana, kiuj estis poste kaptotaj en 2008.

Faligita *La Kamparano*

Meze de 2007, la prezidento Uribe kunsidis en la bazo de Larandia kun la ĉefoj de la armeaj grupoj konsistigantaj la Kuniĝinta Taskoforto Omega, kaj faris imperativan alvokon por agado:

— Ni avancis. En tiu ĉi areo, la plej grava el la tuta lando por la FARK, tiu ĉi organizaĵo estas reduktita duone, tamen estas venkenda la restanta duono.

La 15-an de julio samjara, kiel respondantaj al tiu petego prezidenta, la trupoj de la 17-a Kontraŭgerila Bataliono, apartenanta al la 2-a Mova Brigado, trovis tendaron de la FARK en kampara areo de la municipo Mesetas (Metao) kaj ektroviĝis en batalo kontraŭ membroj de la 42-a fronto. Fine, tie restis korpo de homo kiu riveligiĝis esti la alinomita la

*Campesino*¹, dua kapulo de tiu taĉmento, gerilano fifamiĝinta pro sia agado de ostaĝiganto en la departementoj Metao kaj Kundinamarko.

En la poŝoj kaj la tornistro de la mortigito oni trovis tri diskaparatojn kaj plurajn USB-poŝmemorilojn, kiuj estis trandonitaj, por ilia analizado, al la Ĝenerala Komandejo de la Militfortoj, konsiderinte la ŝajnan gravecon de la datenoj kiujn ili konservis.

La enhavo de la objektoj trovitaj ĉe la Campesino riveligis esti la ŝlosilo kiu ebligis la realigon de novaj kaj sukcesaj operacoj kontraŭ la FARK: tie estis situoj de radiofunkciigistoj kaj frekvencoj; datenoj pri kolonoj kaj frontoj, kaj detaloj pri terorismaj planoj, inkluzive de atenco al la amastransporta sistemo Transmilenio² de Bogoto. Oni trovis ankaŭ ion tre zorgiga: klasifikitajn informojn³ de la Militfortoj, ne malpli, kio konkludigis ke la gerilo havis enfiltriĝintojn en armeaj dividoj, kaj estigis intensan agadon de kontraŭinformiĝo por preventi kaj rebati tian eblaĵon.

Atako al la tendaro de Carlos Arturo Lozada

Dume, la homoj de la Omega, sub komando de la generalo Alejandro Navas, kaj la Rapide Deplojeblaj Fortoj (FUDRA⁴) ne ĉesis siajn agojn en la ĝangalaj regionoj de Metao serĉante la gerilajn kapulojn kiuj estis en la areo.

Kelkajn tagojn post la agado kiu finiĝis kun la senvivigo de la Campesino, la trupoj alvenis ĝis la tendaro kie estis kaŝita Carlos Antonio Lozada, ano de la stabo de la Orienta Bloko, konfidulo de la Mono Jojoy, antaŭa intertraktanto kaj voĉperanto de la gerilo dum la pacprocezo ĉe la Kagŭano, kaj ĉi tiam unu el la tri voĉperantoj de la FARK por la temo de

¹ NT Tradukebla kiel “*La Kamparano*”, jam menciita en la 11-a paĝo.

² NT Aŭtobusa sistemo de publika transporto kiu servas Bogoto.

³ NT Konfidencaj informoj, ofte klasifikitaj laŭ hierarkia nivelsistemo, al kiuj aliro estas restriktita de leĝo aŭ reguligo por nur apartaj klasoj de personoj.

⁴ NT Mallongigo laŭ ĝiaj hispanlingvaj komencliteroj: *Fuerza de Despliegue Rápido*.

humana interŝanĝo, kaj cetere kapulo de la Urba Reto Antonio Nariño (RUAN¹), kiu havis kiel celo la nacian ĉefurbon, nenio malpli, per kombinitaj taskoj de terorismo, spionado kaj enfiltriĝo.

Lozada sukcesis eskapi, tamen oni eksciis, pro konaĵoj el informiĝado, ke li ekrestis serioze vundita, kun lezoj kiuj serioze damaĝis, kaj ankoraŭ nun afekcias, lian moviĝpovon. Dum sia forfuĝo, li forlasis sian tekokomputilon, kun informon tiome aŭ eĉ pli grava ol tiu kiun oni trovis en la USB-posmemoriloj de la Campesino.

Sendube, la teknikaj iloj kiujn uzas la gerilanoj por konservi dosierojn, instrukciojn kaj planojn, kaj por aliri al la Interreto kaj sendi kaj ricevi retmesaĝojn, iĝis ties *aĥila kalkano* ĉiufoje kiam tiuj falas sub povo de la autoritatoj. El la unuaj kiuj ekrestis en manoj de la publiksekuriga agentaro estas tiuj prenitaj en tiuj ĉi operacoj far la Kuniĝinta Taskoforto Omega, kaj ekde tiam la komputiloj de la gerilo ne ĉesis liveri datenojn determinajn pri ties agadoj kaj rilatoj.

Multaj homoj sin demandas, precipe rilate okazojn de bombadoj: —kiel eblas ke elsaviĝas la informo enarkivigita en portebraj komputiloj? Tamen la klarigo estas tre simpla: tiuj komputiloj havas dikon tre etan, kian la eksplodondo ĝenerale ne damaĝas. En tiuj malmultaj okazoj en kiuj ili ekrestis damaĝitaj la kaŭzo estis ke la obuso aŭ iu splito alfalis rekte al ili. Alie, ili konservas netuŝita sian enhavon, kaj tial ilia konfisko estas unu el la fontoj plej fruktodonaj por la armea kaj polica informiĝfakoj, ebligante grandaj damaĝoj al la gerilo.

Koni la malamikojn, scii kiel ili kondutas, kiel ili komunikiĝas, kion ili parolas inter si kaj kun siaj samcelanoj en eksterlando, tio estas unu el la ŝlosiloj por gajni iun ajn militon, kaj per la konfisko de komputiloj ni havis aliron al tiu privilegita informofonto.

¹ NT Hispanlingva mallongigo.

La komputilo de Lozada, ekzemple, kun du malmoldiskoj, enhavis preskaŭ 14.000 dosieroj kiuj havis informojn, fotojn kaj eĉ videaĵoj pri granda kvanto de agadoj kaj projektoj de la FARK, ekde la tempoj de la zono de malstreĉiĝo ĝis planoj kiuj aliris al la jaro 2012. Tie estis studaĵoj pri la sekursistemo de la Transmilenio, raportoj el spurado pri gravuloj, programoj por enfiltrigo far la Komunisma Partio Eksterleĝa Kolombia (PC3) en la universitatojn, listoj de kunlaborantoj kaj simpatiantoj, instruckioj por produkti kaj uzi eksplodaĵojn, informoj pri eblaj atenco-celaĵoj en Bogoto, kontoj pri la spezoj de la FARK kaj la enspezoj el ĉantaĝado kaj ostaĝigado, kaj multaj aliaj informeroj kiuj plentaŭge povus konsistigi la “manlibron” de ajna internacia teroristo.

Ene de la dosieroj estis trovitaj ankaŭ konkretaj planoj por murdi almenaŭ dek gravulojn de la nacia vivo, inkluzivitaj, inter aliaj, la prezidento Uribe, la ministro pri Defendado kaj la eksministro pri Internaj Aferoj, Fernando Londoño. Ankaŭ estis tie informo pri la bankestro Luis Carlos Sarmiento kaj la eksa vicprezidento Humberto de la Calle. Rilate al mi, tie estis informo pri miaj horaroj, irvojoj, agoj, la zono kie mi loĝas, veturiloj en kiuj mi transportiĝas, kaj strukturo de mia sekureco.

Lozada forfuĝis —vundita—, tamen du el siaj komplicoj falis dumbatale. Inter ili estis unu kun precipa graveco, konita per la alinomo *Diego Cristobal*, kiu estis komisiito pri la direktado en Bogoto de la PC3.

Diego Cristobal estis iam antaŭe profesoro en la Nacia Universitato kaj la Universitato Libera¹ kaj, elde sia agado universitata varbis studentojn por la gerila celo. Dum la porpacaj dialogoj li akompanis la laboron de Lozada en la temaj komitatoj, kaj estis ankaŭ estro de la urbobandoj en Bogoto, antaŭ ol preni sur sin, laŭ ordono de la Mono Jojoy, la kunordigadon de la eksterleĝa partio.

¹ NT “Universidad Libre de Colombia”.

Per tiuj ĉi homperdigoj, estis donita frapo determina kontraŭ la agado de politika enfiltriĝo de la FARK en la nacia ĉefurbo kaj, tre speciale, kontraŭ la Urba Reto Antonio Nariño kiu gvidis Lozada, reto kiu ekrestis senkapa per tiu ĉi operaco. La FARK provis reaktivigi tiun reton en 2009, tamen ĝi malsukcesis en la intenco, kiel oni legos poste.

Gerilanino en mia kuirejo

Inter la grandega kvanto da informo valora kiu estis en la komputilo de Carlos Lozada, la fakuloj pri informiĝado komisiitaj prilabori ĝin trovis la vivresumon de virino nomita Marilú Ramírez, kiu laŭ eltrovite, estis unu el la enfiltriĝintoj de la gerilo kiu plej internen alvenis en la armea organizaĵo.

Marilú, kiu en la komputilo aperis klare identigita kiel ano de la terorisma organizaĵo, amikiĝis kun pluraj militistoj ekde kelkaj jaroj antaŭe, ŝajnigante esti studentino pri ĵurnalismo kiu faris trejnpraktikojn pri la funkciado de la radiostacioj de la Armeo. Poste, profitante el la konfido de siaj uniformitaj konatoj ŝi eniris la rondon de altaj oficiroj, sub la fasado de tre simpatia kaj trudemikiĝema asekura makleristino, kiu konsiladis, cetere, pri aĉeto kaj vendo de aŭtomobiloj. Ŝi esprimis ĉiam sian interesiĝon kaj korinklinon por la Armitaj Fortoj, kaj fine aliĝis al la Integra Kurso pri Nacia Defendado (CIDENAL¹), trejnado faka pri temoj de doktrino kaj strategio de sekureco, instruata al kelkaj civiluloj kaj al oficiroj de la Polico kiuj studas kursaron por iĝi generaloj, en la Supera Militlernejo². La kurson ŝi prenis en la jaro 2005. Ĉio indikis ke estis Marilú tiu kiu donis la informon necesan por ke la FARK metu aŭto-bombon en la aŭtoparkumejo de la menciita armea instruejo, en oktobro de 2006, kio kaŭzis pli ol dudekon da vunditoj.

Kiam oni kombinis la informon kun la registraĵoj el la

¹ NT Hispanlingva mallongigo de la *“Curso Integral de Defensa Nacional”*.

² NT *“Escuela Superior de Guerra”*.

komputilo de Lozada, ni rimarkis, por nia ŝokiĝo, ke la ŝajne nedanĝera Marilú superruzis, kiel eble neniu gerilano antaŭe, la kontrolojn kaj filtrilojn sekurigajn —kiujn ni tuj ordonis revizii kaj plifortikigi— kaj havis aliron al iu klaso de informo privilegidona, potenciale danĝera en manoj de la gerilo. Cetere, ŝi gajnis al si, per sia konduto societema kaj gaja, la konfidon de pluraj altaj oficiroj de la Armitaj Fortoj.

Sia kapto en oktobro de 2007, videbligis la historion de tiu tiu ĉi “Mata Hari” de la FARK, tamen mi ne imagis tiam ke ŝia enfiltriĝo estis alveninta ĝis mia propra hejmo. Kelkajn tagojn post la diskonigo pri tia historio en la amaskomunikiloj, iu antaŭa dungitino de mia domo, kiu volis superi sin per la studado de Socia Komunikado —kaj kiu, post diplomiĝo, laboris en la Ministerio—, venis ĉe mi, skuita, por diri ke vidinte la foton publikigitan pri Marilú en la gazeto *Semana*, rekonis ŝin kiel kunulinon universitatan, kun kiu amikiĝis, ĉar ili havis komunan kurson ĉe la distanca instruado en la Universitato Los Libertadores.

Tio nura estis sufiĉe serioza, tamen la historio iris pretere. Iam, kiam ili ambaŭ devis fari kune taskon por siaj klasoj, Marilú proponis fari ĝin en mia domo, pretekstinte ke ŝi havis malfacilon por fari ĝin en la sia. Dum tiuj tagoj mi estis en vojaĝo kun mia familio, do mia apartamento vakis, kaj tial mia dungitino akceptis. Tiamaniere estis kiel Marilú, danĝera enfiltriĝintino de la FARK, sen mia suspekto, finatingis eniri en mian apartamenton kaj faris universitatan taskon en la kuirejo de mia hejmo. Ŝi eĉ sidis sur mia propra lito!

Kompreneble, la tasko de Marilú estis alia, kaj ne estas surprize ke en la komputilo de Lozada, al kiu ŝi raportis, kiel parto de la Urba Reto Antonio Nariño, oni trovis tiom da informo pri mia privata vivo, mia eskorto kaj miaj moviĝoj.

La nederlandanino de la FARK

Alia elemento trovita en la tendaro de Lozada altiris la atenton de la kolombianoj kaj ankaŭ, pro evidentaj kialoj, tiu

de la loĝantoj de Nederlando. Temis pri ensemblo de kajeroj, skribitaj en la nederlanda, kiu riveligis esti la taglibro de nederlanda junulino nomita Tanja Nimeijer, konita ene de la gerilo per la alinomo *Ellen*, kiu apartenis al la gerilo.

Neniu sciis, nek ĉi tie nek en Nederlando pri la ĉeesto de Tanja en la FARK, kaj ŝia skribita atesto rivelis, sen ŝia intenco, krudan radiografajon de grupo kiu iam estis insurekcia, kiu esprimis lukti kontraŭ la neegalecoj — justigemaj idealoj allogintaj la naivan eŭropaninon kiu kredis ke tie ŝi povus lukti por la plejaj bezonuloj—, grupo kiu tamen nun estis nenio alia ol terorisma kaj narkotaĵkomerca, sen popola apogo, vestita sub mistempa komunisma idearo kian eĉ ĝi mem ne praktikas.

En la kajeroj, la juna Tanja, apenaŭ 29-jara, faris rakonton seniluziigan pri sia vivo en la ĝangalo, kie ŝi iĝis, same kiel ĉiuj konsistigantoj de la gerilo, unu plia ostaĝo, nur ke sen katenoj, samtempe militanta kaj mallibera en totalisma ideologio kia ne konas nek respektas la homajn rajtojn. Ĝis tio kion oni scias, la alinomita *Ellen* daŭras kun la FARK, kiel senranga batalantino, kaj devis pagi kelkajn punojn pro la informo kiun ŝi skribis en siaj kajeroj kaj kiu iĝis konita far la tutmonda opiniantaro. Apartaĵo el ŝia taglibro, kun dato 24-a de novembro de 2006, donas al ni ideon pri la vivo de tiu nederlandanino kiu ankoraŭ daŭras en la kaŝeco:

“Mi estas tedita, tedita de la FARK, tedita de la homoj, tedita de la komunuma vivado. Tedida pro neniam havi ion nur por mi. Kaj tio penindus se oni scius por kio oni luktas. Tamen vere mi jam ne kredas pri tio. Kia organizaĵo estas tiu ĉi, kie kelkaj havas monon, cigaredojn, dolĉaĵojn kaj kie la ceteruloj devas almozi kaj estas pririfuzitaj aŭ algruntitaj far tiuj el la unua grupo. Tio estas ĉi tiele ekde kiam mi venis preskaŭ kvar jarojn antaŭe kaj nenio ŝanĝiĝis. Organizaĵo kie iu junulino kun granda mamoj kaj bela vizaĝo povas malstabiligi kadron kiu estis laborinte kune longtempe. Kie ni

devas labori la tutan tagon, tamen la komandantoj parolas fekaĵojn ... Pri mi, kiu scias ĉu mi neniam eliros el ĉi tiu ĝangalo”.

La ostaĝiginto de Alan Jara

La serio de sukcesaj agoj kontraŭ la gerilanoj en la sudoriento de la lando, precipe en Metao, ne ĉesis per la atako al la tendaro de Lozada.

La 23-an de julio, refoje en kampara areo de la municipo Mesetas, dum disvolvo de kunfaritaj operacoj, kun apogo de la Aera Forto, la trupoj de la Kvara Divizio de la Armeo metis finon al la alinomita *Hugo Sandoval*, kapulo de la 26-a fronto, kaj al alia ano de lia taĉmento, komisiita pri lia sekureco.

Sandoval, kun preskaŭ 30 jaroj de apartenado al la FARK, estis ano de la stabo de la Orienta Bloko, kaj estis komisiita far la Mono Jojoy reatingi la movpermesan koridoron elde la Orientaj Ebenajoj¹ al departemento Kundinamarko, kiun la ŝtataj trupoj forprenis disde la gerilo ekde kelkaj jaroj antaŭe, dum la disvolvado de la Plano Patriota.

Lia krimdosiero inkluzivis la ostaĝigon de Alan Jara, eksa departamentestro de Metao, la 15-an de julio de 2001, kiun li ekostaĝigis post devigi lin eliri el veturilo de Unuiĝintaj Nacioj identigita per emblemo de tiu internacia institucio, en ago rompinta humanajn normojn kaj meritinta la kontraŭstaron klaran de la tiama ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Kofi Annan².

Ene de sia terorisma agado, Sandoval estis responsa pri multaj atencoj per eksplodaĵoj, aŭto-bomboj, dissaltigo de pontoj kaj elektrodistribuaĵoj latismastoj, kaj eĉ pri domobombo en la municipo El Dorado (Metao). Li ankaŭ estas

¹ NT En Kolombio: “Llanos Orientales”, regiono de la baseno de la rivero Oriniko, enhavanta la departementojn Araŭko, Kasanaro, Metao kaj Viĉado.

² La FARK propravole liberigis sinjoron Alan Jara, la 3-an de februaro de 2009, post sep jaroj kaj duono da ostaĝstato.

responsigita pri esti la planinta kaŭzinto de la murdoj de la urbestro de Lejanías kaj de la kandidato al urbestreco de la municipo Granada, ankaŭ en Metao.

Sume, temis pri krimulo kun la plej granda danĝereco, kun alta rango ene de la FARK.

Dum nur unu monato falis la Campesino, Diego Cristobal kaj Hugo Sandoval; ekrestis serioze vundita Carlos Antonio Lozada, kaj estis konfiskitaj komputiloj kaj memoriloj kun valoraj informoj. Sendube, julio de 2007 estis monato fatala por la gerila organizaĵo, kiu vidis retroiri siajn intencojn alproksimiĝi refoje al Kundinamarko kaj pliigi sian ĉeeston en Bogoto, sen kalkuli la frustruojn de la gravulmurdoj kaj atencoj kiuj estis en ĝiaj planoj.

Nun mankis iri por la homo kiu reprezentis, pli ol iu alia, la negocon de la narkotajkomerco ene de la gerilo; la plej granda provizanto de monrimedoj por la terorismo, kaj kiu iĝis legendo neatingebla, kvankam li ne restos tia dum multo pli da tempo: La Negro Acacio.

ĈAPITRO 18-a

La Negro Acacio faligita

Estas malfacile trovi homon kiu simbolu pli bone la plenan engaĝiĝon de la FARK en la negocon de la narkotaĵkomerco, kio iĝis ĝia precipa fonto de enspezo, ol Tomás Medina Caracas, alinomita la *Negro Acacio*.

Tiu ĉi brunhaŭtulo korpulenta kaj sangavida, plenfidinda por la Mono Jojoy kaj la Sekretariaro, kun preskaŭ 25 jaroj en la gerilo, kapulo de la 16-a fronto, moviĝinta inter la ĝangaloj de la departementoj Viĉado, Gŭajnio kaj Gŭavjaro, ĉe landlimo kun Brazilo, iĝis pla plej granda provizanto de mono, eksplodaĵoj kaj armiloj por la terorisma agado de sia organizaĵo, kiujn li atingis interŝanĝe kontraŭ kokaino en intertraktoj kun narkotaĵkomercantoj internaciaj.

Ekde kiam li prenis sur sin la komandecon de la 16-a fronto, ĉirkaŭ 1997, anstataŭinte la alinomitan *Esteban González*, kiu komencis, konsilita far narkotaĵkomercantoj de Valo de la Kaŭko, la negocon de kultivado kaj prilaborado de fidoĝoj en la ĝangaloj de la orinoka baseno, la Negro Acacio starigis reton de kontaktoj kun narkotaĵkomercantoj meksikaj, paragvajaj kaj brazilaj kiuj alvenis al la regiono en aviadiloj ŝarĝitaj per armiloj kaj dolaroj, kaj transprenis preskaŭ ĉiutage, unue bazan paston el kokao kaj poste — kiam la gerilo lernis prilabori ĝin— kokainon por ĝia internacia distribuado.

Estis Acacio tiu kiu gvidis intertrakton kun krimulara reto perua, verŝajne kunordigita far Vladimiro Montesinos mem, ĉefo de la informiĝfako de la registaro de Alberto Fujimori, reto kiu provizis la gerilon FARK per kargo de 10.000 fusiloj AK-47 kiujn la perua registaro estis aĉetinta el Jordanio, taksita je 11,5 milionoj da dolaroj. La armiloj estis faligitaj per paraŝutoj elde aviadiloj sur la ĝangalan areon kie Acacio agadis, fine de la jaro 2000, kaj ili konsistigis la plej grandan kontrabandon de armilaro kiu eniris iam ajn en la landon.

La nomo de la Negro Acacio videbliĝis al la publika opiniantaro en la unuaj monatoj de la jaro 2001, kiam preskaŭ 4.000 homoj de la proksimdate kreita FUDRA disvolvis dum pluraj monatoj la Operacon Nigra Kato, kun centro en la vilaĝaro Barranco Minas, en Gŭajnio, kontraŭ la 16-a fronto kiun Acacio komandis. Inter februaro kaj aprilo tiujaraj estis detruataj dekoj da prilaborejoj de kokao, malmuntataj pluraj gerilaj tendaroj kaj konfiskiskataj almenaŭ 18 tonoj da baza pasto el kokao, kio senvualigis la kriman negocegon kian direktis tiu fronto en tiu fora regiono de la lando.

Acacio sukcesis eskapi, tamen la operaco finiĝis kun trofeo neatendita. Estis vundita kaj kaptita far la kolombiaj trupoj lian precipan kunsocietanon en la narkotaĵkomerca negoco, la brazilan kapulon Luis Fernando da Costa, alinomitan *Fernandinjo*¹, kiu ĝuis protekton fare de la FARK. Fernandinjo estis ellandigita al Brazilo, kie li nun plenumas kondamnon.

En sonregistraĵo de deklaroj far la narkotaĵkomercanto brazila, farita en la malliberejo de Braziljo, kaj diskonigita en Kolombio far la gazeto *Cambio*², la narkotaĵkomercanto pravigis ke li aĉetadis drogojn disde la FARK, kontraŭ mono kaj municio, kaj ke Acacio estis sia precipa interparolanto, kvankam ĉi tiu estis ĉiam raportinta al la ĉefoj el la

¹ NT Portugallingve skribita "*Fernandinho*".

² "La confesión de Fernandinho" (La konfeso de Fernandinjo). Gazeto *Cambio*, 6-an de mayo de 2002.

Sekretariaro. Li asertis ke la gerilo akiras, laŭ tio kion li aŭdis, 90% el ĝiaj enspezoj el la narkotajkomerca agado, kaj li faris priskribon pri la FARK kiu spegulas ĝian veran nunan staton: “Ili¹ ne havas ideologion. Ili estas tie cele la monon, ili iĝis kapitalismaj kaj nur deziras la monon, la monon, la monon ...”.

Kvankam la kupto de la Negro Acacio ne estis atingita, la Operaco Nigra Kato estis, sendube, sukcesa operaco, ne nur pro la kupto de Fernandinjo kaj la malaktivigo de la tendaroj kaj laboratorioj, sed ankaŭ ĉar ekrestis malkaŝitaj, kiel neniam antaŭe, la ligoj inter la FARK kaj la internacia negoco de la narkotajkomerco.

“Komandanto, ni aŭdis ie tie aviadilojn, ŝajne”

Kvankam la Negro Acacio ne apartenis al la Sekretariaro, li estis por la kolombia registaro kaj la Militfortoj celitulo same strategia kiel iu ajn el ĝiaj membroj, pro lia graveco en la provizado de armiloj kaj rimedoj por la gerilo. Tio estis tiome tiel, ke li estis parto el la strategiaj celituloj asigntitaj al la Ĉefinstanco de Specialaj Kunfarataj Operacoj (JOEC)².

La direktado de la persekuto kaj lokalizo de la gerila kapulo estis taskita al la Armeo, kiu estis en la areo kie li moviĝadis, tamen estis fine la Mararmeo tiu kiu akiris, per sia informiĝpovo, precizan konaĵon pri lia situo. Tiam estis pasintaj pli ol ses jaroj ekde la Operaco Nigra Kato, kaj Acacio moviĝadis ankoraŭ en sia teritorio ĉiama, en jurisdikcio de la vilaĝaro Barranco Minas, farante siajn kutimajn mafiajn transakciojn. Kontraŭ la gerilano ekzistis, ne nur 23 arestodekretojn el kolombiaj juĝistoj, sed ankaŭ ruĝa cirkulero el Interpol kaj plenumenda ekstradicia peto el Usono.

Tuj kiam la JOEC ekhavis la informon, en la unua semajno

¹ NT Ili = la FARK-anoj.

² NT Vidu paĝon 109-an.

de aŭgusto de 2007, oni planis tujan operacon, kiu uzis ĉiujn haveblajn rimedojn, tamen ĝi frustriĝis ĉar la moviĝo de la specialaj trupoj avertis iun informanton de Acacio, kaj ĉi-lastata formoviĝis el la loko kie li troviĝis.

Feliĉe, la informiĝado per homoj kaj per teknikiloj povis daŭrigi sian disvolviĝon, kaj ĝi ne perdis la spuron de la kapulo. Kelkajn semajnojn poste, dum la lastaj tagoj de aŭgusto, refoje estis konfirmita la situo de Acacio, kaj tiufoje oni planis la operacon kun nova ingredienco: la trupoj ne moviĝos el tie kie ili komence troviĝis —kio estis pli ol 400 kilometrojn for de la celo— sed ili eliros rekte el tie por ataki la tendaron de la 16-a fronto, por eviti ke Acacio reeskapu pro iu konventempa averto.

Tiel la aferoj, en la unuaj horoj de la dimanĉo dua de septembro —kaj post kontroli ĝisfunde ke ne ekzistis domoj kun civilaj loĝantoj nek ostaĝoj en la areo de la tendaro de Acacio— eliris aerfloteto de aviadiloj Super Tucano¹ el la aerbazo de Apiay, en Villavicencio, rekte al la areo de Barranco Minas kie troviĝis la kapulo kun la homoj kiuj konsistigis sian gardistaran ringon.

Iomete post la matena kvara horo kaj duono la aviadiloj faris precizan bombadon sur la areon, kaj raportis ke ili trafis la celitulon, kvankam la konfirmo pri la homperdigoj ne povis esti farata antaŭ ol la trupoj de la Armeo surteriĝis kaj firme sekurigis la terenon.

Antaŭtagmeze oni provis la surteriĝon de la trupo, tamen malbona vetero tion malhelpis, pro kio ĝi estis prokratigita ĝis la vesperfiniĝo, kiam la soldatoj fine alvenis al la tendaro, kie ili trovis la korpojn de dek kvar gerilanoj, fusilojn, pistolojn, telekomunikilojn kaj, eĉ kvar satelitajn lokalizilojn TPS², kaj nenian spuron de Acacio.

¹ NT Elparolita “sUper tukAno”, ĝi estas aviadilo fabrikita far la brazila kompanio Embraer.

² NT “Tergloba Pozicia Sistema”, ankaŭ nomata “Tutmonda Loktrova Sistema”. Anglalingva mallongigo: GPS.

Tamen, ĉi-foje li ne estis forfuĝinta. Kaŝaŭskulto al la komunikoj de la FARK permesis al ni scii ke la senvivaj korpoj de la Negro Acacio, lia radiofunkciigisto kaj la ĉefo pri lia sekureco estis forportitaj el la areo far la supervivintaj gerilanoj. Tio estis informo tiome fidinda ke mi povis raporti al la lando, je la lundo 3-a de septembro, en ĵurnalistara intervjuo, sen ombro da dubo kaj kun la kontento meti finon al imperio multjara de teruro kaj fidrogoj, ke Tomás Medina Caracas, alinomita la *Negro Acacio*, kaj 16 pliaj teroristoj estis senvivigitaj.

Poste ni sciis, laŭ supervivintoj kiuj poste malmobiliziĝis, ke Acacio estis avertita far unu el siaj viculoj pri la baldaŭa atako:

— Komandanto —li diris— ni aŭdis ie tie aviadilojn, ŝajne.

La kapulo, kiu estis amuziĝinta en sia tendo kun sia kunulino, ignoris la averton kaj forsendis la gardanton:

— Ne min ĝenu, ke mi estas okupita!

Minutojn poste li ricevis la mortigaj efikoj de la artilerio de la Kolombia Aera Forto.

La pruvajoj pri la morto de Acacio

En la ĵurnalistara intervjuo en kiu mi anoncis, kune kun la komandantoj de la Militfortoj kaj la direktoro de la polico, la faligon de la serĉita teroristo, la demando plej insista kaj ripetata far la ĵurnalistoj temis pri kiel ni povus certi pri la morto de Acacio se konsideri ke ni ne trovis lian korpon.

Mia respondo estis:

— Ni ne farintus ĉi tiun ĵurnalistaran intervjuon se ni ne havus tian certecon, kaj tial ni diris en la komunikaĵo ke fontoj de informo, inter ili el la FARK mem, konfirmis al ni tion kion ni diris tie ĉi (...) Ni havas informofontojn kiuj konfirmis al ni, klare kaj absolute, ke la alinomita Negro Acacio mortis.

Kaj tiele estis. Por la Armitaj Fortoj kaj la Ministerio,

donita la nivelo de informiĝo kaj enfiltriĝo kiujn ni faris, estis certeco pri la forperdo de Acacio, tamen ni ankaŭ sciis ke, dum ni ne trovas fizikan pruvon pri lia morto, la FARK, kiel estis sia kutimo, neas la konfirmon, konservante viva lian miton tiel longtempe kiel eblas.

Kelkajn tagojn poste, fonto de nia informiĝpovo donis al ni konajon makabran tamen utilan. La kadavron de la Negro Acacio la gerilanoj elpurigis je la visceroj por eviti ĝian putron dum ili ĝin translokiĝis, kaj lasis tiujn apud arbo kies preciza situo estis al ni sciigita. Fakuloj estis senditaj al la loko kaj, fakte ili trovis restaĵoj el visceroj en la indikita loko, kiujn ili prenis kaj oni submetis al DNA-ekzameno kies elprenaĵo estis komparita kun elprenaĵo atingita el frato de la teroristo, kiu loĝis en Valo de la Kaŭko. La rezulto estis pozitiva. La certeco pri la morto de Acacio estis absoluta.

Kelkajn monatojn poste, en la unuaj tagoj de de decembro de 2007, *Raúl Reyes*, dua homo de la FARK, kaj membro de la Sekretariaro, en intervjuo de la novaĵagentejo Anncol, per kiu la gerilo kutimas diskonigi siajn komunikaĵojn, iel koncedis pri la morto de sia homo forta je la narkotajkomerca negoco. Kiam li estis demandita pri la sorto de la Negro Acacio, Reyes ne respondis rekte, tamen diris ke tiuj mortoj okazas “multfoje pro eraroj propraj kaj aliajn fojojn pro agado de la malamiko”.

Poste, *Manuel Marulanda* mem, la plejsupera ĉefo de la FARK, agnoskis en kristnaskotempa mesaĝo, datita je la 24-a de decembro de 2007, la homperdojn de du el siaj precipaj viculoj per la jenaj vortoj:

“Ni ne povas pasigi tiun ĉi kristnaskotempon sen antaŭe rememori la kamaradojn mortintajn pro agado de la malamiko, Acacio, Martín Caballero, kune kun aliaj en la luktado kontraŭ la opresa sistemo de Uribe kaj samtempe

miaj¹ funebrojn kaj kondolecojn al familianoj kaj amikoj en omaĝo al tiuj kiuj oferis sian vivon honore al la revolucia celo de la popolo”

Ne sciis la legendeca Tirofijo², kiam li bedaŭris la forpasojn de siaj kunkrimuloj, ke tiu de 2007 estis iĝonta sia lasta kristnaskotempo kaj —kion neniu aŭguris prognozi— ankaŭ tiajn de du aliaj anoj de la Sekretariaro de la FARK kiuj estis falontaj, same kiel li, pro konsekvenco rekta aŭ nereakta de la ofensiva agado de la Armitaj Fortoj.

¹ NT Same kiel mi notis en la pago 63-a, la paragrafo ne estas bone redaktita, sed mi klopodis ne apartiĝi disde la esprimaj limoj de la kamparana gerilano alinomita *Manuel Marulanda*.

² NT Vidu la duan piednoton de la 63-a paĝo.

ĈAPITRO 19-a

Monrimedoj falantaj

Per la morto de la Negro Acacio ne finiĝis la narkotaĵkomerca negoco de la FARK en la sudoriento de la lando, kiu estis tiu plej profitdona por la organizaĵo, tamen fakte la 16-a fronto, kiu restis sub komando de la alinomita *Guillermo Gochornea*, narkotaĵkomercanto kun kamuflovesto, ekdisfaliĝis sub la arma premo kaj la kulturo de facila mono. Multaj anoj foriris el la grupo kunportante la rimedojn kiujn ili povis atingi, aliaj estis senvivigitaj aŭ kaptitaj, kaj pluraj aliaj, rimarkintaj la neblon trovi efektivegeblan estontecon en la gerilo, malmobiliziĝis ĉe la aŭtoritatoj.

Antaŭe, la FARK uzis sistemon de kuponoj, per kiuj ĝi pagis al la kultivantoj de kokao kaj flankenmetis siajn limojn de likvidpovo. Ĝi pagis la gramojn da kokabazo per kuponoj kiujn ĝi interŝanĝis semajnojn poste kontraŭ kontantaĵo. Nuntempe, pro la kontinua arma premo kaj la sieĝo ĉirkaŭ ĝiaj koridoroj de moviĝo, la intertempoj por pago devis longiĝi. Jam ne necesas semajnoj, sed pasas monatoj antaŭ ol ĝi pagas per kontantaĵo al tiuj kiuj ĝin provizas per ĝia precipa kruda materialo.

Cetere, en ĉi tiuj transakcioj ekzistas multo da nefidemo kaj korupto. Ĉiuj kapuloj kutimis friponi tiujn procedojn. Ili aĉetis pli da kokaĵo ol tiom kiom ili kapablis pagi aŭ ol tiom por kiom la superaj kapuloj antaŭdonis al ili likvidpovon.

Ekzemple, se iu kapulo ricevis ordonon aĉeti 600 kilogramojn da kokabazo, li aĉetis al la popolo 800 kilogramojn, per kuponoj, por havigi al si 200 kilogramojn proprajn. La rezulto, ĉe la fino de tia ago, estis ke la FARK ricevis 600 kilogramojn da kokabazo kaj la kapulo ekhavis la gajnon el kristaligo de 200 pliaj.

La rezulto estas ke la frontoj de la FARK kiuj administras intertraktojn kun kultivantoj de kokao akumulis ŝuldojn per biloj kaj kuponoj kun la popolo. La 16-a fronto nura, kiun direktis la Negro Acacio, ŝuldis al la kultivantaj kamparanoj, ĉe la fino de 2008, proksimume 18.000 milionojn da pesoj. Ĉi tiu ŝuldo estis pliiginta eĉ ekde antaŭ la faligo de Acacio, kaj ofte pasas monatoj sen ke la nuna kapulo de la fronto, Guillermo, agnoskas al la kamparanoj eĉ unu peson; pluraj kamparanoj klopodas senigi sin je la biloj interŝantante ilin kontraŭ varoj de prezoj multe pli malaltaj. Tia sceno ripetigas en ĉiu regiono kie la FARK klopodas alkroĉigi al la direktado de la neleĝaj kultivoj.

Ne malmultas la okazoj en kiuj kamparanoj estis mortigitaj ĉar ili plendis pro la nepago de ŝuldoj, aŭ trompitaĵ per la pago per falsaj dolaroj, aŭ al ili la gerilo interŝanĝis la ŝuldojn kontraŭ semoj kaj provizoj por rekomenci la kultivadon. Tiu ĉi perversa ciklo, sendube, portos ilin post mezlonga tempo ne nur al la bankroto sed ankaŭ al la perdo de iliaj terenoj, kaj finresti en prizono pro ilia daŭro en tiu malleĝa agado.

Estas kruela la kontrasto inter la riĉeco de la kapuloj de la FARK kaj la submetigo de la kamparano por devigi lin daŭri en la kultivado, sub puno de perdi la tri aŭ sep milionojn ŝulditajn al li, kvazaŭ se la gerilo vivus en epoko de feŭdismo. Fronte al tiu ĉi perdo de ordonpovo kaj la interna kanibalismo pri siaj monrimedoj, la FARK efektivigis plurajn rimedojn.

Ekzemple, la Mono Jojoy, kiu estas la mona muskolo de la FARK, starigis kelkajn “komisiitarojn por interna kontrolo” en ĉiu fronto, kun tri anoj meritantaj sian konfidon, por ke ili

reviziu la spezojn, kaj nur estas farataj la pagoj kaj aĉetoj aprobitaj far tiu komisiitaro. Tiuj nomitaj “revizoroj” estas eble la gerilanoj kun la plej malbona ofico kaj la plej granda risko, pro tio ke, krom elteni la konstantan armean premon, ankaŭ ili devas gardi sian dorson kontraŭ siaj propraj kunuloj kiuj ne preteratentas ŝancon por ilin mortigi kaj forfuĝi kun la predon.

La vero estas ke la FARK, kiu dum kelke da tempo estis la plej granda kartelo de kokaino en la planedo, kiel agnoskis la Departemento pri Justico de Usono en la akuzo publikigita en marto de 2006, iĝadis la ĉefa kartelo de kakabazo, kio estas ŝtupo pli malalta ol tiu kian ĝi estis atinginta en sia krima kariero. Tio kaŭzitas de la laboro de la publiksekuriga agentaro, kiu faris ke la narkotaĵkomerco estu agado ĉiufoje pli malfacile farebla en nia lando.

Tio estas, kiel evidentas, retroiro por la enspezoj de la gerilo, ĉar, el ĉiuj stadioj de la narkotaĵnegoco, estas la lastaj du —la produktado de kokaino kaj la komercado— la plej profitdonaj.

Ekde finiĝo de la 1990-aj jaroj, la FARK tenis monopolon de tiu ĉi trogajnica delikto en siaj influzonoj, tamen hodiaŭ ĝi jam perdis, en la plejparto de la nacia teritorio, sian kapablon kristaligi kaj produkti la hidrokloridon kokainon. La rekupero de la teritoria regado gvidata en la sudoriento far la Kuniĝinta Taskoforto Omega —unue en disvolvo de la Plano Patriota kaj, ekde 2006, de la Plano Firmigo— metis finon al ĝiaj ĉefaj centroj de produktado, rapidigis la kapton de ĝiaj ĉefaj krimaj kunsocietanoj kaj lasis la FARKanojn kun krucitaj brakoj.

La FARK, kiu antaŭe aĉetadis folion de kokao kaj vendadis kokainon al narkotaĵkomercantoj de naŭ landoj, estis mastro kaj sinjoro de la tuta procezo: ĝi fikzis la luprezojn de aviaj dromoj kaj salajrojn de la pilotoj, kaj ricevadis almenaŭ 3.000 dolaroj da gajno por ĉiu kilogramo da kokaino, kio kelkfoje altiĝis ĝis 7.000 dolaroj da profito por kilogramo. Hodiaŭ, pro nekapablo prilabori la kokainon, la negoca fundamento de la

FARK konsistas el aĉeti kokabazon por du milionoj da pesoj, repaki ĝin en sakojn po 40 kilogramoj kaj vendi ĝin al narkotaĵkomercantoj de la areo je tri milionoj da pesoj por kilogramo. La gajnmargeno de la agado reduktiĝis al 500 dolaroj por kilogramo, apenaŭ sesono el tiom kiom ili antaŭe ricevadis.

En la jaro 2002, la 16-a fronto, direktita far la Negro Acacio, regis 50 kristaligejojn, en kiuj produktiĝis pli ol 30 tunojn da kokaino ĉiumonate. Ĉe la finiĝo de 2008, lia sekvinto, alinomita *Guillermo Gochornea*, havis nur du kristaligejojn: unu propra kaj alia luita.

La morto de la Negro Acacio kaj la premo sur la 16-a fronto signifis por la FARK ke proksimume 300 milionoj da dolaroj ne plu eniris en ĝian kason, monsumon similan al tiu kiun ĝi malprudente klopodis atingi en eksterlando, laŭ tio kion oni determinis poste per la komputiloj de Raŭl Reyes.

Miliono da dolaroj sub la matraco

Post la faligo de Acacio, kiel dirite, Gochornea anstataŭis lin ĉe la komando de la 16-a fronto. Tamen, tiu kiu fakte prenis sian rolon kiel kunordiganto de la narkotaĵkomerca negoco en la sudoriento kaj precipe en Metao kaj Gŭavjaro, estis la kapulo de la 43-a fronto, alinomita *John 40*, kiu sin karakterizis per vivstilo pli proksima al la kliŝoj atribuitaj al la tipaj mafianoj aŭ "traquetos"¹ ol al la imago kian oni havas pri la konduto de gerilano.

John 40, kiu administris veran monriĉegon por la FARK, ĉirkaŭigis sin de virinoj "prepago"², luksaĵoj, kaj parademo, kaj faris festojn en kiuj abundis la marjaĉoj³ kaj la muziko

¹ NT "traqueto" estas populara nomo en Kolombio por narkotaĵkomercanto, viro plejofte, kiu vante elmontras novriĉulan, diboĉan kaj eĉ ekstravagancan vivon. La vorto estas sonimita de mitralpafado.

² NT "prepago" [antaŭpagitaj] estas populara nomo en Kolombio por prostituitino kiun la kliento pagas antaŭ ol ŝi efektivas la seksan servon.

³ NT Hispanlingve "mariachi", tipa meksika muzikbando.

nortenja¹, kaj fluis riveroj da viskio inter la partoprenintoj. Li estas viro obsedita de sia fizika aspekto kiu farigis al si plurajn plastiajn operaciojn —plus aliaj kiujn li pagis por siaj “fianĉinoj”—, Ekde 2005 oni konfiskis disde li proprajojn ĉiajn, bienojn, fajnajn ĉevalojn, luksajn kamionetojn, taksitaj je pli ol 20 milionoj da dolaroj. Mi rememoras ke dum mia unua vizito kiel ministro al la ejo de la Direkcio por Krimo-Enketo² (DIJÍN) kiun tiame komandis la generalo Óscar Naranjo, nune ĝenerala direktoro de la Nacia Polico, li komentis al mi pri la ago de spurado disvolvata pri John 40, kiun li persekutis unue kiel narkotajkomercento kaj poste kiel ŝlosila ĉenero en la narkotajkomerca negoco de la FARK.

La Polico faris gravan laboron de informiĝado pri li, per la plej alta teknologio kaj homaj informfontoj tre proksimaj al la kapulo, dum longa tempo, ĝis kiam ĝi sukcesis determini la precizan situon de lia tendaro.

Ni jam sciis ke John 40 havis seriozajn sanproblemojn, ĉar la Sekretariaro decidis lian translokigon al Venezuelo por ke li kuracigu ilin. La alinomita *Camilo Tabaco*, kiu renkontiĝis kun John 40 la 1-an de septembro de 2008, skribis, kun dato 28-a de julio tiujara, en dokumentoj poste konfiskitaj, ke por elirigi ‘40-an’ al Venezuelo ili jam estis farintaj kontakton “kun la viro de la Ch”. Laŭ la teksto de Tabaco, “tiu de la Ch” sin devigis elirigi lin, fari la kuracon kaj revenigi lin al la areo.

Do, laŭ la valora informo de la Polico, oni pretigis kunfarotan operacon por ataki la tendaron de John 40, instalitan ĉe la najbarejo de la rivero Guayabero, en la montoĉeno La Macarena. La 3-an de septembro aviadiloj de la Aera Forto bombis la lokon kun absoluta precizeco, tia ke la plej pova bombo falis nur ok metrojn disde la lito en kiu dormis la kapulo. Tamen, kiam la armeaj trupoj eniris la tendaron por fari la plifirmigan taskon ili trovis surprizon

¹ NT Hispanlingve, adj: “norteña”/ subst: “norteño”, genro de meksika muziko.

² NT Organizaĵo de juĝa polico.

neatenditan: en la tendaro mortis Camilo Tabaco kaj ne John 40.

Poste ni ekkonis la kialon. John 40 savis sin, afero de horoj, el morto certa ĉar ĝuste la ĵusantaŭan nokton li transdonis la komandon de la 43-a fronto al Tabaco, kiu estis sendita far la Mono Jojoy por anstataui lin, pro liaj sanproblemoj kaj konstantaj skandaloj. Inter la sepa kaj la dek dua horoj la nokton ĵusantaŭan al la bombado la gerilanoj diboĉis okaze de la “oficulspliso”. Antaŭ foriri, John 40, cetere, donis al Tabaco internan fonduson de unu miliono da dolaroj kaj proksimume 35 milionojn da pesoj monbilete.

La monon oni trovis apud la lito de Tabaco, kaj ankaŭ ion plian, kio riveligis esti de grandega strategia valoro: tri tekokomputilojn, USB-poŝmemorilojn kaj ciferecajn fotilojn kun informo kiun oni analizadas ekde tiam, kaj kiuj enhavas datenojn tre malkaŝigaj pri la spezoj de la FARK kaj ĝiaj agadoj de narkotajkomerco.

Necesas noti ke la fio de Camilo Tabaco estis grava perdo por la terorisma organizaĵo, ĉar li estis homo tre proksima al Mono Jojoy, tiome tia ke ĉi-lastata sendis lin kiel anstataŭanto de ‘40’ ĉe-kape de unu el siaj frontoj plej profitdonaj, eble la plej, kaj por ke li aranĝu la malordon kiun tiu restigis.

Hodiaŭ John 40 daŭras tre malbonfarta, estis forigita el la komandstrukturo de la FARK, kie li perdis tutan kredindecon, kaj li daŭre klopodas eliri el la lando por kuracigi siajn multajn sandifektojn. Malĝoja tamen komprenebla fino por iu kiu, kiel li, okupis sin pri fari monriĉegon koste de la doloro de la ceteruloj.

Faligo de Felipe Rincón

Alia kapulo de la FARK estis senvivigita far la trupoj de la Kuniĝinta Taskoforto Omega dum la tagiĝo de la 29-a de oktobro de 2008 en kampara areo de la municipo La Macarena (Metao), kune kun kvar anoj el sia persona

gardantaro. Temis pri la alinomita *Felipe Rincón*, kiu estis konsiderita kiel unu el la precipaj “ideologoj” de la gerilo.

Rincón, dum sia longa krimkariero, okupis diversajn postenojn, elde organizinto de kernoj de la urbobandoj bolivaraj en Bogoto, ĝis intertraktinto en la Tema Komitato dum la dialogoj en la Kagŭano. En ĉi-lastata rolo, li partoprenis, kune kun Raúl Reyes kaj aliaj kvin gerilanoj, en la delegitaro de la FARK kiu estis portita, en la jaro 2000, far la kolombia registaro al rondvojaĝo en Eŭropo, ene de procezo de etosigo en la internacia komunumo pri la pacprocezo.

Laste tiutempe li okupiĝis pri la kunordigado de la reto de eksterleĝaj radiostacioj “Rezistado”¹, elde kiu li elsendis la propagandon kaj proklamojn de sia organizaĵo. Cetere, li estis ano de la stabo de la Orienta Bloko, kaj anstataŭanto ĉe la centra stabo de la FARK. Tia estis lia graveco ene de la organizaĵo. Sendube, lia morto estis forta frapo far Omega al la konstantaj kampanjoj de endoktrinigo kaj misinformado gviditaj far tiu ĉi hardita teroristo.

La kavernoj de Jojoy

Meze de la ofensivo farita kontraŭ la diversaj frontoj kaj kapuloj kiuj konsistigas la Orientan Blokon, neniam ni preteratentis, kiel unua celitulo, ties gvidanton kaj ŝlosilan homon de la Sekretariaro, Jorge Briceño Suárez, alinomita *Mono Jojoy*.

Dum la jaroj de la kampanjo Omega, tiu spertoriĉa kapulo, respektita kaj timita far ĉiuj anoj de la FARK, vidadis malpliigi la membroj kaj la influo de la bloko sub sia responso pli ol kvindek elcente, kaj lia fizika aspekto tion malkaŝas. Laŭ fotoj konsistitaj en pluraj operacoj, el tiu dikfortika kaj sanŝajna gerilano de la epoko de la Kagŭano, kutimiĝinta ordoni kvazaŭ siahejme en la zono de malstreĉiĝo, restas nur la ombro. Hodiaŭ li estas homo malsana kaj ŝrumpinta, vipita

¹ NT Hispanlingve “Resistencia”.

far galopanta diabeto, kiu forkuras konstante el la sieĝo de la Armitaj Fortoj, sen ripozmomento.

Liaj planoj disfaladas unu post alia, kaj liaj konfiduloj kiel la Negro Acacio, Camilo Tabaco, Gaitán, Chucho kaj Bertil, inter aliaj, falis motintaj aŭ arestitaj far la ŝtataj fortoj. Lia radio-peristino mem, Andrea, estis trompe anstataŭita far la armea informiĝfako en la Operaco Ŝakon, kio ebligis la elliberigon de Ingrid Betancourt, la tri usonaj kontraktintoj kaj dek unu armeanoj kaj policistoj, plus la kaptan de César kaj Gafas, kapuloj de la unua fronto. Sendube, la Operaco Ŝakon devas esti paliso martelita en la koron de tiu hardita gerilano.

Meze de la ofensivo de FUDRA¹, kontraŭ ĉi tiu strategia kapulo de la FARK, kaj danke al informo liverita far gerilanoj malmobiliziĝintaj, la lasta tago de februaro de 2009, la armeaj trupoj trovis aron de dek unu naturaj kavernoj, perfekte kaŝmaskitaj, en jurisdikcio de La Macarena, kio ĵusantaŭe utilis kiel kaŝejo por Jojoy kaj lia gardistara ringo.

Tie mi estis kun la generalo Freddy Padilla de León, kun akompanantaro de amaskomunikiloj, konstatante kiajn estis la rifuĝtruoj en kiuj sin kaŝis dumlonge la fifama teroristo. La kontrasto estis egega. La viro, kiu vivis en komfortaj bienoj en la tempo de la zono de malstreĉiĝo, rifuĝis nun en kavernoj mallumaj, malsekaj kaj malsanigaj, persekutita far la premo de la publiksekuriga agentaro.

En la kavernoj urĝe forlasitaj far la gerilanoj oni trovis dokumentojn, videaĵojn, fotojn kaj kajerojn kun mesaĝoj, datoj kaj datenoj kiuj donas tre kompletan panoramon pri la ĉiutaga agado de la terorisma ĉefo kaj liaj konstantaj moviĝoj celantaj evadi la trupojn. Ili ankaŭ lasis ateston pri liaj malfaciloj por provizado, ĉar la mulinoj kun provizaĵoj estas ofte interkaptitaj far la armeanoj, kaj eĉ prokrastiĝas la medikamentoj kiuj Jojoy tiel urĝe bezonas.

¹ NT Vidu la 4-an piednoton, paĝo 123-a.

Al la ĵurnalistoj kiuj akompanis min koni la kavernojn kiuj utilis al li kiel rifuĝejo lian situacion mi resumis jene:

Antaŭe la Mono Jojoy estis dika; nun li estas maldika kaj malsana. Antaŭe ili vivis kvazaŭ princoj, nune kvazaŭ ratoj.

ĈAPITRO 20-a

La triumfo de la persisto

La rezultoj atingitaj en la sudoriento de la lando kontraŭ frontoj kiuj estas partoj el la Blokoj Orienta kaj Suda de la FARK, en areo kiu estis tradicie ĝia strategia malantaŭo kaj ĝia plej granda fonto de monrimedoj, estis ruinigaj por la terorisma organizaĵo, kiu vidis malkreskitaj siajn enspezojn kaj sian agokapablon, kaj tio kaŭzitas precipe de la adekvata kupliĝo atingita inter la Kuniĝinta Taskoforto Omega kaj la Ĉefinstanco de Specialaj Kunfarataj Operacoj, kun ĉi ties tujreaga mekanismo por bati altvalorajn celitulojn kiel la Negro Acacio kaj John 40. Ne estis hazarde ke la majoro-generalo Alejandro Navas, kiu estis komandanto de la FUDRA, sekcio kiu hodiaŭ dependas de Omega, poste pasis komandi la saman Kuniĝintan Taskoforton, kaj poste la Ĉefinstancon JOEC —anstataŭante la generalon Carlos Arturo Suárez kiu iĝis ĝenerala inspektisto de la Armeo— kiel monro de kontinueco kian ni decidis stampi al tiu majesta penado de la Armitaj Fortoj.

Kiam mi surprenis la Ministerion pri Defendado, mi trovis ke pluraj analizantoj kaj ĵurnalkolumnistoj kritikis la kampanjon Omega, kiun ili konsideris devus esti replanata. Laŭ ili, ne estis ĝuste ke la Armitaj Fortoj “enterigu” proksimume 20.000 el siaj plej bonaj homoj en la ĝangaloj de la sudoriento, anstataŭ kontribui al kovrado de aliaj frontoj

en la cetero el la lando. Malgraŭ la kritikoj, ni konsideris, kun la generalo Freddy Padilla de León, ĝenerala komandanto de la Militfortoj, ke necesis persisti en la penado kiu estis komencita per la Plano Patriota de la unua regperiodo de la prezidento Uribe. Kaj mi kredas ke la tempo pravigis nin.

La Mono Jojoy estis prognozinta ke niaj soldatoj ne estis daŭrontaj pli ol ses monatoj en la areo kiu konsistigas la operacejon de Omega, kaj jam pasis pli ol kvin jaroj sen ke lia prognozo faktu. Tute male: la fortoj de Omega kaŭzis neinvertigblajn damaĝojn al la terorisma grupo kaj apogis la socian plifirmigon ĉe la teritorio, kio implicas la definitivan restadon de la institucioj de la ŝtato en areoj kie ĉi-lastaj estis mankanta longtempe. Tio estas la granda diferenco: la Armitaj Fortoj jam ne plu frapas kaj foriras, kiel okazis antaŭe, sed ili restas en la rekuperitaj zonoj, garantiante la normalecon.

Eĉ la fervoro kaj engaĝigo de la soldatoj rolis favore al la strategio. Kvankam, pro la malfacilaĵoj de la tereno, oni pensis farigi sesmonatajn deĵorojn por anstataŭi la frontbatalantojn, tamen multaj el tiuj petas daŭri, stimolitaj far la graveco de la misio kaj la rezultoj atingitaj tagon post tago.

La kampanjo Omega permesis la malaktivigo de la strategia plano de la FARK kaj integris la kunfaratan laboron de la Militfortoj kaj la Polico, en kontinua penado, kio estis la ŝlosilo por la sukceso.

Je la finiĝo de 2008 jam estis okazintaj 4.100 propravolaj sinliveroj, proksimume 1.200 arestoj, kaj 1.100 senvivigoj de gerilanoj, en la regiono kie agadas la Kuniĝinta Taskoforto Omega, tamen la rezulto iras preter la operacaj raportoj: oni gajnis rilate al regeblo, ĉesto de la ŝtataj servoj kaj institucioj, anstataŭo de la ekonomio de fidrogoj per laŭleĝa ekonomio, flanke de la civiluloj sento de aparteno al la lando kaj konfido.

Pri tio temas la firmigo: ne nur pri gajni batalojn kaj

malaktivigi kapulojn kaj batalantojn, sed, antaŭ ĉio, pri garantii al la enloĝantoj de la rekuperitaj zonoj ke la Armitaj Fortoj kaj la servoj kaj favoroj el la Ŝtato alvenis por restadi.

Integra firmigo de la Macarena

Mi menciis komence¹, kiam mi rakontis pri la Montoj de María en la kariba regiono de la lando, la Centron de Integra Unuiĝo² de la Montoj de María, en kiu aŭtoritatoj civilaj, armeaj kaj policaĵ kombinas siajn penojn por liveri sociajn servojn kaj konstrui bazajn vorkojn de infrastrukturo en la areoj forprenitaj disde la manoj de la violentuloj. Tiel do, la gvida centro de tia penado por socia firmigo, tiu starigita unue, kie ni lernis lecionojn por apliki en la cetera nacia teritorio, estis la Centro de Integra Unuiĝo de la Macarena, per kiu disvolviĝas la Plano por la Integra Firmigo de la Macarena, komencita ekde la finmonatoj de 2007.

Ĉi-lastata plano estas strategio pro kunordigi la strebadojn de la publiksekuriga agentaro, la Justico kaj la ceteraj institucioj de la Ŝtato por starigi kondiĉojn instituciajn kaj sekurecajn kiaj ebligu la ekonomian kaj socian disvolviĝon de tiu regiono tiome damaĝita fare de la narkotaĵkomerco kaj la terorismo, en areo kiu inkluzivas la municipojn San Juan de Arama, la Macarena, Mesetas, Puerto Rico, Vista Hermosa kaj Uribe, en Metao, kvar el ili kiuj estis parto de la zono de malstreĉiĝo starigita dum la porpaca procezo kiun gvidis la registaro de Andrés Pastrana.

En tiu ĉi tasko la Armitaj Fortoj laboras en plena kunago kaj kunordigo kun la Centro por Kunordigo de Integra Agado (CCAI³) de la prezidenta institucio, la Alta Prezidenta Porpaca

¹ NT Paĝo 52-a.

² NT La plena nomo “Centro por Unuiĝo de Integra Agado” (hispanlingve: “Centro de Fusión de Acción Integral”), uzita far la aŭtoro en la 52-a paĝo, verŝajne plisimpliĝas en la praktiko al “Centro de Integra Unuiĝo” (hispanlingve: “Centro de Fusión Integral”).

³ NT Pago 51-a.

Konsilio, aliaj ŝtataj institucioj kaj donacantoj el la internacia komunumo, interesitaj apogi tiun ĉi laboron por socia plifirmigo.

Feliĉe, la rezultoj estas videblaj, kaj tiu ĉi areo, kiu antaŭe estis ŝirmejo nesturmebla de la FARK, preskaŭ sendependa respubliko, estas integriĝanta plene al la lando, ĉiuafere. Antaŭ forlasi la ministerion mi havis la komplezitecon ricevi la informon de la Integrita Kontrolsistemo pri Neleĝaj Kultivoj (SIMCI¹) de Unuiĝintaj Nacioj, kiu raportis 18% da malpliigo de la areo priokultivita per kokao en la tuta nacia teritorio. La plej okulfrapa afero en tiu ĉi informo estis tio kio koncernis la areon de la Macarena, kie estas efektivigata la plano por integra plifirmigo: laŭ la SIMCI, la neleĝaj kultivejoj en tiu areo malpliigis 75%! Tia estas kvanto eksterordinare valora, des pli se ni konsideras ke temas pri regiono de la lando kiun la FARK estis konvertinta en veran provizejon de la narkotajkomerco.

Tiu ĉi atingajo kaŭzitis ĉar produktiĝis preteco de la komunumo por ekagi en propravola elradikigo de neleĝaj kultivaĵoj kaj disvolvi licajn produktopovajn projektojn, kiuj havas la apogon de la registaro, de entreprenistoj kaj de la internacia komunumo.

La armeaj inĝenieroj faris diversajn vorkojn favorajn por la komunumo, kiel parkojn, pontojn kaj urbajn pavimojn, kaj pretiĝas por komenci la konstruon kaj plibonigon de la Transversa Ŝoseo de la Macarena, en la sekcio San Juan de Arama — Uribe — Colombia — Baraya², en longo de 122 kilometroj, vorko en kiu estos investataj pli ol 160.000 milionoj da pesoj.

Mi mem havis la okazon prezidi la ekaktivigo de policaj substacioj en la inspektejoj de Piñalito (Vista Hermosa) kaj la Julia (Uribe), lokoj kie kelkajn jarojn antaŭe estis nepensebla la ĉeesto de publiksekuriga agentaro, pro la konstanta timigo

¹ NT “Sistema Integrado de Monitoreo de Cultivos Ilícitos” (SIMCI).

² NT Municipoj de la departementoj Ujlao (San Juan de Arama, Uribe) kaj Metao (Colombia, Baraya).

fare de la gerilo.

Multas la projektoj de socia infrastrukturo, por edukado, sanzorgado, kulturo, sporto, kaj publikservaj instalaĵoj¹ jam faritaj kaj programitaj en la regiono, kaj ili ĉiuj direktiĝas al ununura celo: garantii al la loĝantaro ke la situacio de “normaleco” kian ili nun travivas estos ĉiama, kaj rehavigi al ili ilian kapablon havi vivon liberan kaj prosperan, fremdan al la minacoj de la gerilo kaj la korupto de la narkotajkomerco.

Ĉe la operacejo de la kampanjo Omega, en la historia koro de la FARK, kie ĝi dominis dum tiom da tempo, la registaro kaj la Armitaj Fortoj elmontras, per persisto kaj politika decido, ke eblas alia vivo preter la perforto.

Ne estis facile. Necesis egaj homaj kaj teknikaj rimedoj. Pli ol 200 armeanoj mortis kaj pli ol mil ekrestis vunditaj en tiu ĉi kolosa strebado, la plimulto kaŭze de la kontraŭhomaj minoj. Tiuj homoj estas la herooj, la veraj herooj de tiu ĉi rekupero.

¹ NT Precipe retoj por porvizo de akvo, energio, telefonservo.

DU VETERANAJ VULPOJ

*La vivo mia ...
Mi perdis la tutan tempon dum la gerila batalado ...
Kiel oni diras vulgare, mi perdis la jaron.¹*

Helí Mejía, alinomita *Martín Sombra*²

¹ NT “perdi la jaron” estas la kutima esprimo en Kolombio pri studanto kiu ne sukcesis sufiĉe en la jarfinaj ekzamenoj kaj tial devas ripeti la jarstudon.

² NT Laŭsignife: “*Ombro*”.

ĈAPITRO 21-a

“Oni nomas min *Ombro*”

Dum la eta daŭro de unu monato, inter la 25-a de februaro kaj la 26-a de marto de 2008, eliris el batalado du el la plej malnovaj kaj gravaj kapuloj de la FARK, du veteranaj vulpoj, kiuj entombigis siajn vivojn en la gerilan luktheadon: la alinomita *Martín Sombra*¹, kaptita far la Polico, kaj la alinomita *Manuel Marulanda*, fondinto kaj plejsupera ĉefo de la organizaĵo, kiu mortis, laŭ la unua dirversio de la gerilo, pro korhalto, meze de nepacigebla arma ofensivo. Poste, la versio pri korhalto estis ŝanĝita far Jojoy mem, kiu atribuis la morton al alia malsano. La veron, kiel ofte okazas kun la FARK, eble neniam oni scios.

Ili du estis tre proksimaj, kaj kunhavis tutan vivadon da lukto en la montoj kaj ĝangaloj de Kolombio, ekde 1966, kiam la FARK estis oficiale establita. Ili pasigis 42 jarojn da batalado sub tiu devizo, plus aliajn jarojn da banditismo kiel ribelantaj liberalaj² kamparanoj, kaj ilin ambaŭ surprizis la finoj de iliaj krimkarieroj sen alveni, nek eĉ alproksimiĝi, al ilia komenca celo devigi la landon entrepreni ampleksan programon de kultivkampa reformo nek al ilia fina celo, kio estis nenio malpli ol la ekprenado per armiloj de la ŝtatpovo.

Martín Sombra mem konfesis en intervjuo “Oni scias ke

¹ NT Hispanlingva vorto por “Ombro”.

² NT Temas pri radikalaj anoj de la t. n. “liberala” politika partio en Kolombio.

estas neeble por ni, la geriloj, ekpreni la povon tiel kiel estas la situacio nune”.

Sombra kaj Marulanda estis la gerilanoj plej malnovaj en aktivado de la FARK kaj, tre probable, la plej malnovaj de la mondo. Ili ambaŭ estis produktoj de la politika violento, la interna batalo kiu estiĝis —precipe en la kamparo kaj la malgrandaj vilaĝoj— inter liberaluloj kaj konservativuloj de post la murdo de Jorge Eliécer Gaitán¹, la 9-an de aprilo de 1948. Ilia historio estas la historio de venĝodeziro longtempe subtenata, de depostuloj kiuj ne trovis solvon, de kapabloj misaplikitaj, kiuj spegulas la efikojn daŭrajn kaj damaĝajn de tiu ruiniga epoko de la lando kiun ni konas kiel La Violento.

La du, kamparanoj laŭnaske, kun la personeco, la pacienco kaj la ruzeco de la kampara homo, determinis la destinton de organizaĵo kiu komenciĝis kiel grupo de memdefendo kaj laŭgrade konvertiĝis, kun la paso de la jaroj kaj la alveno de novaj integriĝantoj, en narkotajkomercan organizaĵon, enmemiĝinta kaj mistempa.

La ĵuro

Rakontis Helí Mejía, alinomita *Martín Sombra*, naskita en la municipo Guamo (Tolimo), ke iun tagon en kiu li revenis hejmen kun la patro el taskoj de la kampo, kiam li aĝis proksimume 10 jarojn, ili trovis hororegan scenon: banditoj de la konservatismo estis disrabintaj en lia hejmo, murdintaj lian patrinon —al kiu tiuj fendis la ventron kaj forprenis la feton kiun ŝi enportis—, kaj kastrintaj kaj murdintaj liajn onklojn. Tia estis la brutalegeco travivita tiutempe, komence de la 1950-aj jaroj, en multaj lokoj de la lando, farita de konservativuloj kontraŭ liberaluloj aŭ de liberaluloj kontraŭ konservativuloj, pro la nura fakto aparteni al malsama partio, porti ruĝan aŭ bluan² tolaĵon.

¹ NT Vidu la unuan piednoton de la kvara paĝo.

² NT La aŭtoro aludas la partiojn Liberalan kaj Konservativan per iliaj respektivaj karakterizaj koloroj.

Rakontis Sombra ke, je la distanco, li kaj lia patro vidis la atakintojn forfuĝantajn kun la bovoj kaj ĉevaloj kiujn ili posedis, inkluzive kun ĉevalo paŝoĉampiono kaj kun sia psitako Roberto. Li kaj la patro interniĝis en la sovaĝarbaron, unuiĝis al aliaj kamparanoj forpelitaj el iliaj terenoj, kaj komencis procezon de armita lukto kontraŭ siaj antagonismaj konservativuloj. Ili poste sentis sin perfidataj far la liberalaj gvidantoj de la naciĉefurbo, kaj koncentris sian venĝemon, jam ne plu kontraŭ la membroj de unu politika partio, sed kontraŭ la fortoj kaj reprezentantoj de la Ŝtato ĝenerale.

Aĝante nur proksimume 12 jarojn, la juna Helí implikiĝis en duelo, uzante krudajn pafilojn, kontraŭ nigrulo multe pli aĝa ol li, kiun li riproĉis pro ties sovaĝa kutimo fortranĉi al ties viktimoj la orelojn, rosti ilin, kaj poste manĝi ilin spicitajn per salo. La knabo mortigis la antropofagon kaj ekde tiam, pro lia lertaĵo por rapida pafado, pli rapida ol ombro, oni aplikis al li tiun alinomon.

Iomete poste la patro estis vundita mortige per kuglo kaj, mortante, petis al Helí ĵuri, antaŭ li kaj antaŭ Dio, neniam ĉesi esti gerilano. Laŭ Sombra, kiu hodiaŭ aĝas proksimume 62 jarojn —kiuj ŝajnas multe pliaj pro lia nefirma farto—, tiu ĵuro estis tiom grava por li ke neniam li proponis al si la eblon forlasi la gerilon, eĉ en la plej malbonaj cirkonstancoj. “Mi ekde ĉiam estas dikredanto”, li diras, kaj tia unika religia sento, plus la amo kian li havis al sia patro, estis la fuelo kiu konservis vivanta lian gerilanan alvokiĝon.

La ostaĝgardanto

Martin Sombra ne estis en 1964 kun la grupo de Marulanda kiam ĝi estis atakita far la Militfortoj per potenca operaco ordonita far la registaro de la prezidento Guillermo León Valencia, en Marketalio¹ (Tolimo), okazaĵo konsiderata kiel la fakto fondiga de la FARK (kvankam, kiel jam dirite, ĝia

¹ NT Hispanlingve “Marquetalia”.

oficiala fondiĝo okazis poste, en 1966). Tial li ne konsideras sin “marketaliano”, malgraŭ tio, ke li kuniĝis al Marulanda kaj liaj homoj ekde 1966, kaj li komencis rangaltiĝi ene de la organizaĵo, ĉiam proksime al la gerila ĉefo. Li estis fondinto kaj kapulo de pluraj frontoj, membro de la stabo de la Orienta Bloko, kaj, verŝajne, dum kelka tempo, membro de la centra stabo de la organizaĵo. Precipe, li iĝis konfidulo por Manuel Marulanda, al kiu ĉi-lastata komisiis la plej zorgopostulajn taskojn, kiel la enterigon kaj sekretotenadon pri la situoj de kaŝitajaroj de mono kaj armiloj, kaj la gardon de la plej gravaj ostaĝoj.

Martín Sombra, pro sia daŭrado kaj fortikeco, povus esti aspirinta esti parto el la Sekretariaro, tamen li ĉiam preferis la ĉeeksteran aktivadon kaj li ne ŝatis enmetiĝi en politikajn decidojn. Lia vivo estis la gerilo, kaj lia gvidanto kaj majstro estis Marulanda, kiun li nomis Sinjoro¹ Manuel. Inter 2001 kaj 2004, Marulanda komisiis lin pri unu el la taskoj de plej granda responso en la gerilo, kio estis la gardado kaj tenado de la armeanoj, policistoj, politikistoj kaj la tri usonaj kontraktintoj ostaĝigitaj far la FARK; tiuj kiujn la organizaĵo nomas “interŝanĝeblaj”.

Dum ekzistis la zono de malstreĉiĝo en la Kagŭano, Sombra direktis veran regnon malliberejan meze de la ĝangalo de Kaketao, kun impona loĝistiko por vivteni la gardantojn kaj la kaptitojn. Laŭ li, en la tendaro —nomita tendaro Karibo, pro la multaj fiŝoj kariboj² kiuj svarmas en apuda rivereto samnoma—, ekzistis flegejo kaj dentkuracejo, panfarejo kiu produktis po 3.000 panojn ĉiusemajne, proksimume 200 ovodemetaĵoj kokinoj kaj pli ol 200 sovaĝaj porkoj. En tiu loko, kie li havis provizaĵojn por ĝis du jaroj, li retenadis ene de du “kaĝoj” apudaj, ĉirkaŭitaj per pikdratoj, en malhumanaj kondiĉoj de kunamasigo, la ostaĝojn sub sia

¹ NT Hispanlingve “Don”.

² NT Ĉi tie, “karibo” estas populara nomo por kelkaj specioj de fiŝo el la subfamio *Serrasalmo* (*Serrasalminae*).

responso. Li eĉ devis helpigi, per flegistoj de la gerilo, en la kruda cezara operacio farita al la ostaĝo Clara Rojas, kiu ekrestis graveda dumkaptite, kiam ŝi naskis sian filon Emmanuel. Sombra mem fanfaronas pri sia kapablo kiel kuraculo, kaj diras ke li lernis utiligi la kuracherbojn el indiĝenoj, dum la unuaj jaroj de sia vivo en la sovaĝarbaro.

La zorgado pri la ostaĝoj estis lia lasta komisiono grava. Kiam la armea premo devigis ĉiujn forlasi la tendaron de la antaŭa zono de malstreĉiĝo, Sombra forportis la ostaĝojn el la regiono per longaj kaj malfacilaj trairadoj. Laŭ lia rakonto, sinjorinon Clara Rojas ili portis sur hamako, kaj sinjorinon Ingrid Betancourt, kiu suferis la malutilon el ĵuspasinta malario, ili portis sur la ŝultroj de iu gerilano, kio rememorigis lin pri la perfortaj delokadoj de familioj dum la tempo de la politika violento, kio estas ĉiam lia referenco. Fine, li transdonis sian “ŝarĝon” (kiel la gerilanoj nomas siajn ostaĝojn) al pluraj frontoj de la gerilo kiuj aktivas en la ĝangaloj de Ĝuavjaro kaj Kaketao, kaj ekde tiam li ne plu havis alian komision de alta responso. Liaj sanproblemoj, precipe en unu kruro, malhelpis lin moviĝi vigle, kaj li dediĉis sin al serĉo de kuractrakto en Venezuelo, por kio Jojoy kaj Reyes faris la koncernajn demarŝojn.

“Mi perdis la jaron”

Neniam komprenis Martín Sombra kial, anstataŭ asigni al li urbobandanon aŭ gerilanon spertan por akompano dum sia traŭro al eksterlando por sia saniga traktado, la ordonantoj de la FARK donis al li simplan civilulon kiel eskorto, kiu finfine lasis lin fordonita al sia sorto.

Vidinte sin sola, malsana kaj senmona, la veterana gerilano decidis serĉi rifuĝon ĉe amikoj kiujn li havis proksime de Ĉikinkirao¹, en la smeraldhava regiono de la departemento Bojakao. Kion Sombra ne sciis estis ke la

¹ NT Hispanlingve: “Chiquinquirá”.

Direkcio por Informiĝo de la Nacia Polico ¹ (DIPOL) estis spurinta liajn paŝojn ekde kelka tempo, kaj ke, eĉ, li estis preskaŭ kaptita dum lia paso tra Bogoto.

Per la konventempa informo el civitano, kiu gajnis riĉigan rekompencan, Martín Sombra estis lokalizita far la Polico en kampara areo de Ĉikinkirao, kaj kaptita senreziste. Li havis permesilon por trafiki tra la municipo Machiques, en la ŝtato Zulia, de Venezuelo. La veterana vulpo sciis ke ekvenis la horon respondi fronte al la Ŝtato pro tuta vivo batalanta kontraŭ ĝi je la nomo de ĵuro infanaĝa.

Sombra troviĝas nun en la prizono Modelo de Bogoto kaj enlasiĝis, dum la unua duonjaro de 2009, en la Agrogramon por Malmobiliziĝintoj kaj en la Leĝon de Justico kaj Paco, kiu postulas lian kunlaboron kaj la konfesion de ĉiuj liaj krimoj se li volas atingi ĝiajn favorojn. Nun li estas pli dika ol ĉiam, piediras malfacile helpe de bastono kaj havas longan grizan barbon kia donas al li aspekton de ermito aŭ saĝulo el antikvepoko. Lia rigardo estas rigardo de homo kiu ekceptis sian destinon, kaj kiu, kvankam li ne volas fornei la organizaĵon al kiu li fordonis sian vivon, li ne povas ne riproĉi ĝian neglekton.

— Mi estas forlasita en tiu ĉi prizono —li diris en intervjuoj—. Mi jam restis du jarojn tie ĉi, kaj neniu venis. Ili lasis min forĵetita!

Rilate al la FARK, per sia paŭzema parolado de ruza kamparano, li konsentas pri pluraj cirkonstancoj de ĝia nuna stato:

— La FARK havis retroiron politikan kaj militan. Ĝi ne havas kredindecon ĉe la publika opiniantaro.

— La eniro de la FARK en la narkotajkomercan negocon estis eraro. Ekzistas multo da korupto ekde kiam kreskis la afero de spezoj, de mono ...

Se Sombra povus doni mesaĝon al iu ajn junulo kiu

¹ NT: Dirección de Inteligencia de la Policía Nacional (DIPOL)

daŭras en la gerilo, li ne farus ion alian ol rakonti al tiu sian propran travivadon:

— La atesto mia estas atesto tre krudŝoka por tiuj kiuj laŭiras la revolucionan luktadon.

Ne ĉesas impresi onin aŭskulti el tiu viro, kiu dediĉis 42 jarojn al la FARK, kaj pli ol kvin jardekojn al la perarmila luktado —samkiel estas aŭdate el multaj malmobilizigintaj gerilanoj, tamen ĉe li, pro liaj rango kaj aĝo, tio estas des pli rivelsignifa—, la jenajn vortojn kiuj servas kiel konkludfiniĝo amara al lia vivo-periplo:

— La vivo mia ... Mi perdis la tutan tempon dum la gerila luktado ... Kiel oni diras vulgare, mi perdis la jaron.

ĈAPITRO 22-a

La morto de unu mito

La historio de Pedro Antonio Marín, konita per liaj alinomoj *Tirofijo*¹ aŭ *Manuel Marulanda*, fondinto kaj supera kapulo de la FARK ĝis lia mortotago, havas multajn similaĵojn kun tiu de Martín Sombra, speciale ĉar la origino de lia ribelemo kaj lia decido ekpreni la armilojn troviĝas ankaŭ en la partiisma violento kiu vipis Kolombion ekde la 9-a de aprilo de 1948. Marulanda, kiu devenis el kamparana familio de Génova, Kindio, prenis la decidon armi sin kaj krei liberalisman gerilon por ataki la konservativulojn de la regiono, kiam li estis apenaŭ adoleskanto. Kaj samkiel Sombra akiris sian alinomon pro sia rapido por pafi en mortodecida duelo, la junulo Marín ekestis diskonita kiel *Tirofijo* kiam unu el siaj kunuloj laŭdis lian traflerton, dirinte ke li estis “vera trafa pafisto”. Sian kroman alinomon, *Manuel Marulanda Vélez*, li alproprigis al si omaĝe al komunisma sindikatano murdita en Bogoto en 1951.

Tirofijo, post la amnestio por banditoj dekretita far la armeanara registaro de Gustavo Rojas Pinilla, decidis daŭri armilribelanta por defendi siajn terkultivistajn depostulojn kaj starigis kun alia grupo de ribelemuloj, zonon de rezistado kamparana en en Marketalio, departemento Tolimo, kiu estis atakita per plena artilerio de la Armeo en 1964, ofensivo el

¹ NT Vidu la 3-an piednoton de la 4-a paĝo.

kiu li eskapis kun apenaŭ duona cento da homoj, kaj okazaĵo kiu donis fundamentan turnon al lia vivo. Tie li ĉesis esti ribelanto por iĝi, almanaŭ laŭ siaj propraj okuloj, revoluciulo.

Poste venis lian ligon kun la Komunisma Partio kaj la marksisma idearo, lia akordiĝo kun Jacobo Arenas ¹, la militistara plivastiĝo de la FARK ekde ĝia sepa konferenco en 1982, la engaĝiĝo de la FARK en la narkotaĵkomerco —kio, laŭ Martín Sombra estis eraro kiu koruptis la organizaĵon—, ĝia amasa uzado de la kruela ago de ostaĝigo, kaj, fine, la lasta degenero, kiam tiu grupo de kamparanoj kun idealoj pri socia justeco, kiu petis terenon por prilabori, iĝis, kvar jardekojn poste, grupo sen ideologia orientiĝo, ne nur mafia sed ankaŭ terorisma, kiu ne dubas pri: ataki kaj detruai vilaĝetojn per bomboj el gasbotelegoj; prisemi la grundon per kontraŭhomaj minoj; rekrutigi infanojn; eksplodsaltigi naftoduktojn, pontojn kaj elektrodistribuaĵajn latismastojn; fari sangajn atencojn kontraŭ civilaj celoj, kiel estis la okazaĵo de la klubejo El Nogal ² en Bogoto, aŭ fari veran ekocidon ³ stimulantante la detruon de tropikaj arbaroj por semi kokaon.

Manuel Marulanda, kies ĉeesto fariĝis ofta fronte al la amaskomunikilaro —kaj do fronte al la kolombianoj— dum la pacocela procezo, kiam li estis senpera interparolanto kun la prezidento Andrés Pastrana —kiun li lasis atendanta vane apud neokupita seĝo en fama kunsido en San Vicente de la Kagŭano—, kun sia tuko ĉiam surŝultre, sia nepenetrebla mieno kaj sia ruza rigardo, estis la nepridiskutebla gvidanto de la gerilo dum ĉiuj ĝiaj etapoj, kaj li alvenis al maljunaĝo sen alproksimiĝi al eĉ ne unu el siaj celoj. Tute male: li malprofitis la ŝancon atingi la pacon kaj iĝi ĉefrolulo de demokratia ŝanĝoprocezo —samkiel tiaj estas nun antaŭaj anoj de geriloj malmobiliziĝintaj kiel la M-19⁴ kaj la PLA⁵—,

¹ NT Alinomo de la gerilano Luis Alberto Morantes Jaimes, kunfondinto de la FARK.

² NT Vidu la unan mencion en la 61-a paĝo.

³ NT Vidu la 2-an piednoton de la 58-a paĝo.

⁴ NT Vidu la 5-an paĝon.

⁵ NT Vidu la lastan linion de la 22-a paĝo.

kion la Ŝtato oferis grandanime al li, kaj li kondamnis sian organizaĵon al destino de perforto kaj kaŝiteco, al dependado ĉiufoje plia de la narkotaĵkomerco kaj al rifuzo pri iu ajn favoreco el la popola animo.

Kun pli ol 76 aĝojaroj, kaj post la parentezo reprezentita far la zono de malstreĉiĝo, dum kiu li havis vivon trankvilan kaj komfortan, ĉirkaŭita kaj servita far siaj kamaradoj gerilanoj, vivis siajn lastajn jarojn rifuĝinta en tendoj meze de la ĝangalo, konstante moviĝanta por fuĝi el la senĉesa arma sieĝo.

“La diablo senkorna kaj senvosta”

Kiel ĉefa komandanto kaj gvidsimbolo de la FARK, Marulanda estis ĉe kape de la listo de altvaloraj celituloj kiujn ni en la sino de la JOEC¹ determinis. Ĉiuj estis spurataj, sed precipe Marulanda, spite de la malfacilaĵoj kiujn signifis la multnombraj gardistaraj ringoj kiujn li havis ĉirkaŭe kaj la bandanoj civilvestitaj kiuj pretis averti la gerilon pri iu ajn moviĝo aŭ alproksimiĝo de la trupoj.

Ĉirkaŭ februaro de 2008, oni povis konkludi ke li kaj la Mono Jojoy moviĝadis, kun siaj sekurigantoj, en la areo inkluzivata inter la riveroj Duda kaj Papaneme, proksime de la municipo Uribe (Metao). Tie havis Marulanda sian bazan areon, kien alvenis al li provizaĵoj, kaj li fidis ke sia bonsorto —kia akirigis al li famon de nedetruenda, ĉar li supervivis 44 jarojn da persekutoj—, estis protektonta lin kontraŭ la ago de la Ŝtato. Tamen, lia koro, jam maljuna, havis pravajn kialojn por timi: unuflanke, la novaĵo pri la mortoj de Raúl Reyes kaj Iván Ríos dum la unuaj tagoj de marto, ili ambaŭ membroj de la Sekretariaro, pro ago aŭ pro premo de la Militfortoj, devis esti mortiga ĵetlanko por lia animstato. Unuafoje en la historio de la FARK, ke la Armitaj Fortoj batis rekte ĝiajn naciajn kapulojn. Cetere, Reyes estis lia konfidulo por internaciaj

¹ NT Pri la JOEC vidu la paĝon 109-an.

kontaktoj, kaj la konfisko de siaj komputiloj promesis riveli la sekretojn plej bone garditajn de tia organizaĵo kutimanta ludi per du vizaĝoj: ia por eksterlando kaj alia por la kolombianoj.

La dua kialo por timi estis eĉ pli tuŝebla: dum la monatoj februaro kaj marto, dank' al la bonaj konaĵoj el informigado kiujn ni havis pri lia situo kaj tiu de Jojoy, la aviadiloj de la Aera Forto faris almenaŭ 64 bombadojn sur la areon, per grandpovaj haŭbizoj. Senti la ĉeeston ĉiaman kaj minacan de la povaj militaj fugmaŝinoj kaj la faladon de bomboj en sian ĉirkaŭon, tio estas la plej malbona terursonĝo de iu ajn gerilano, kaj Marulanda tion travivis dum siaj lastaj du monatoj je ritmo kian li neniam antaŭe suferis. Tiutempe li skribis retmesaĝon al Alfonso Cano, en kiu li diris ke la armea persekuto estis tia ke li estis “vidanta la diablon senkornan kaj senvostan”

Laŭ posta raporto far la komandanto de la Armeo, generalo Mario Montoya, sur la areo kie oni konjektis ke Marulanda kaj Jojoy renkontiĝis, oni ĵetis entute 352 artileriajn grenadojn dum februaro, marto kaj la unuaj dek tagoj de aprilo, kaj la Aera Forto ĵetis entute 114 bombojn elde aviadiloj A-37 kaj Super Tucano¹.

La fakto estas ke la 26-an de marto, la maljuna kapulo de la FARK mortis. Kiel estis dirite tiam, se li ne mortis pro infarkto, li mortis pro ektimego. La novaĵo estis dissendita al la postvivantaj anoj de la Sekretariaro —Marulanda estis la tria el la terorisma kapularo falinta tiumonate—, kiuj decidis, kiel bonaj disĉiploj de la sekreteco kun kia la sovetanoj administris la informon pri la morto de unu el iliaj gvidintoj, teni lian morton sekreta, ĝis kiam la cirkonstancoj devigu ilin konfirmi ĝin. Cetere, ili devis administri la aferon pri la interna anstataŭigo, kio estis decidiĝonta inter la Mono Jojoy, milita ĉefo de la FARK, el kampara deveno, kaj Alfonso Cano, bogotano kun universitata instruo, forĝita en la komunisma junularo kaj konsiderita ideologo ene de la organizaĵo.

¹ NT Vidu la unuan piednoton de la 134-a paĝo.

Neatendita frunovaĵo

La armea informiĝfako, ĉiam atenta al iu ajn mesaĝo inter la gerilanoj, konis meze de majo retmesaĝon en kiu du el ili diskutis pri kiu povus esti plej bona gvidanto: ĉu Jojoy, ĉu Cano. Kompreneble, tio estis tre klara indikilo pri ke io okazis rilate al Marulanda, jen ke li malsanis, jen ke li mortis. Aliaj retmesaĝoj kaŝkaptitaj poste menciis, cifre, “la novaĵon” aŭ “la adiaŭon”, kio ŝajnis konfirmi la novaĵon. Fine, dum la vespero de la vendredo 23 de majo, oni atingis la ĉefan pruvajon: la tekston de komunikaĵo kiun la FARK estis pretaj elsendi per la alinomita *Timochenko* —ano de la Sekretariaro kiu moviĝas en la areo landlima kun Venezuelo—, anonconta la morton de sia fondinto kaj la nomumon, en ties anstataŭo, de la alinomita *Alfonso Cano*.

La generalo Freddy Padilla de León, kiu tiam estis jam komentinta al mi pri la unuaj indikaĵoj —kiujn mi petis konfirmi unuacele—, vokis min elde Peruo tiunokte por pliaserti tion kion ni supozis. Same faris la generalo Mario Montoya. La informokruciĝo estis tiome konvinka, ke mi decidis ke necesis informantaŭi la gerilon, malhelpante ke la temon ili manipulu laŭvole, kion mi faris en intervjuo kiu estis programita de antaŭe kun la ĵurnalistino María Isabel Rueda, por la gazeto *Semana*.

Ni jam estis farinta duonon de la intervjuo la tiusemajnan merkredon, kaj atendis fini ĝin tiun vendredon nokte. La ĉefa temo estis la morto de Raúl Reyes en ekvadora teritorio kaj la rivelajoj trovitaj en liaj komputiloj, plus la ĵuspasinta malmobiliziĝo de la gerilanino alinomita *Karina*. Tio kion ne imagis María Isabel estis ke mi havis kiel surprizo la frunovaĵon rekordan de ŝia vivo.

Post demandi pri la sorto de la Mono Jojoy, pri kiu ni sciis ke lin preskaŭ murdis sia propra sekuriga gardantaro, ŝi demandis min jene¹:

¹ Intervjuo “Tirofijo está muerto”, gazeto *Semana*, 26-an de majo de 2008.

- Kaj Tirofijo kion faras?
- Li devas esti en la infero —Mi respondis.
- En kiu infero?
- Tiu kien iras ĉiuj mortintaj krimuloj.
- Kien Tirofijo iros ... —pludiris María Isabel, tirinte la fadenon kiun mi lasis libera.
- La informo kiun ni havas estas ke li jam foriris.

La surprizo ne povus esti pli granda.

- Kio? Ĉu Tirofijo mortis?
- Tio estas kion diris al ni fonto kiu neniam malpravis.
- Ĉu Tirofijo estas mortinta? —demandis María Isabel, por rekonfirmi la novaĵon kiu tiom da fojoj rondiris la redaktejojn kaj tamen neniam ekrestis vera.
- Tio estas la lasta informaĵo kiun ni havas kaj kiun ni nun rekonfirmas.
- Ĉu mi povas titoli ĉi tiun intervjuon “Tirofijo estas mortinta” ?
- La risiko estas via.
- Kaj, kiel li mortis?
- Ni ne scias. Dum tiuj datoj okazis tri fortaj bombadoj tie kie ni pensis ke Tirofijo estis. La gerilo diras ke pro korhalto. Ni ne havas pruvaĵojn pri unu kaŭzo nek pri la alia.
- Kaj kion vi scias pri lia morto?
- Ĝis nun —mi respondis tutsincere— mi nur havas tiujn konaĵojn.
- Kaj ĉu vi scias kiu lin anstataŭos?
- Ĉio indikas al ni ke Alfonso Cano.

Tiel, María Isabel Rueda, pro hazardaj cirkosntancoj, ĉar tiutage ŝi estis en la loko kaj kun la persono oportunaj, atingis la frunovaĵon de la jaro, kio estigis neetan ĝenon ĉe la ceteraj amaskomunikiloj. Evidente, mi tenis informitan pri la venintaj konaĵoj la prezidenton Uribe, kaj sabate, per la kaŝkapto de konversacio inter la alinomita *Alberto*

Cancharina, kapulo de la Bloko Magdalena-mezo¹ de la FARK kaj alia gerilano, konversacio en kiu ili parolis nesekrete pri la morto de Marulanda kaj ĝiaj cirkonstancoj, mi povis rekonfirmi al la prezidento tion pri kio ni estis tiome certaj.

Oni teksis multajn fabelojn: ke la prezidento estis furioza ĉar mi ne permesis ke li konigu la frunovaĵon, ke la prezidento neniam estis sciigita, ke ĉio estis intence kalkulita kun mia nevo Alejandro, direktoro de *Semana*, por negoci kovrilpaĝon ... La fakto estas ke tio kion la prezidento ne ŝatis estis la plendo de la ceteraj ĵurnalistoj, kaj li estis tute prava. Mi estis antaŭdirinta al *Semana* ke tiu intervjuo devus esti sekretigita ĝis la dimanĉo, kiam trafikis la gazeto (ili ne povus aperigi ĝin en Interreto) ĉar mi estis faronta ĵurnalistaran intervjuon la tiujsekvonta tago sabato por ke la tuta popolo sciu la novaĵon. Tamen, tiumatene, frue, la Radiostacio *Caracol*, kiu havas bonajn kontaktojn en *Semana* —kaj verŝajne iu elfiltris la historion—, lanĉis la frunovaĵon. Jam post tia ĵurnalisma “bombo” trafikante en aliaj amaskomunikiloj, min vokis Alejandro Santos kaj mi ne havis alian eblon ol rajtigi lin aperigi la novaĵon en lia retpaĝo.

La saman sabaton 24-a de majo, la admiralo David René Moreno, ĉefo de la Kuniĝinta Stabo de la Militfortoj, laŭ miaj ordonoj, voĉlegis oficialan komunikaĵon raportantan ke, laŭ fontoj de la armea informiĝfako, Marulanda mortis la 26-an de marto je la 6:30 vespere. En la komuniko, li aldonis jenon:

“Ni scias ke ene de la FARK, la dirversio kiun ili traktas estas ke li mortis pro naturaj kaŭzoj, specife pro korhalto, kaj ke ili nomumis kiel lia anstataŭanto la alinomitano Alfonso Cano. Ni cetere scias ke, laŭirante ĝian kutiman misinforman agmetodon, la FARK ne informis pri tiu fakto ĉiujn siajn anojn. Ni esperas ke la FARK ne neos, kiel kutime faras, ĉi-okaze la morto de ‘Tirofijo’. Se ili diras ke la informo kiun ni havas ne estas vera, ke ili pruvu tion. Ĉu la morto de Marulanda estis

¹ NT Magdalena-mezo, hispanlingve: “Magdalena medio” estas regiono kiu apudas ambaŭflanke la riveron Magdalena proksimume ĉe la rivera longomezo.

pro bombado aŭ ĉu ĝi estis pro naturaj kaŭzoj, tio ĉi estas la plej forta frapo kiun suferis tiu ĉi terorisma grupo, ĉar ‘Tirofijo’ estis kiu tenis kungluiĝinta tiun deliktularon.

La postan tagon, dimanĉon 25-an de majo, kiam la gazeto *Semana*, kun la frunovaĵo, jam estis en ĉiuj gazetvendejoj, mi akceptis ĵurnalistaran intervjuon en kiu mi klarigis pliajn detalojn pri la konaĵoj kiujn ni havis, kaj mi esprimis ke mi neniam havis la intencon privilegii iun amaskomunikilon aŭ diskriminacii alian, kiam mi deklaris tion kio surprizis Kolombion kaj la mondon. Mi klopodis klarigi la okazintaĵon tamen ne facilis ke la ĵurnalistoj komprenu kaŭzojn kiam mi informantaŭis ilin per tia novaĵo. La vero estas ke mi pagis altan koston fronte al miaj antaŭaj kolegoj¹.

Tiudimanĉe la FARK, pluan fojon frustritaj far la armea informiĝfako rilate al sia intenco por misinformo —kiel jam estis okazinte ĉe la interkapto de la pruvaĵoj² kaj ĉe la afero pri Emmanuel³— diskonigis videaĵon en kiu Timochenko, portanta novan venezuelan kamufloveston, legis en kampara loko, situanta 22 kilometrojn de la landlimo ene de la najbara lando, laŭ tio kion ni povis konkludi per nia teknika informiĝado, komunikaĵon kiu anoncis, oficiale, la morton de sia plejsupera gvidanto kaj la nomumon de Cano por ties anstataŭo.

“Kun senlima bedaŭro ni informas ke nia ĉefkomandanto, ‘Manuel Marulanda Vélez’, mortis la pasintan 26-an de marto kiel konsekvenco de kora infarkto, surbrake de sia kunulino kaj ĉirkaŭita far sia persona gardistaro (...) post nelonga malsano”

Kadavro kiu pagpostulas vivojn

¹ NT Memoru ke ankaŭ la aŭtoro laboris en la ĵurnalismo.

² NT Vidu la paĝojn 70-an kaj 71-an.

³ NT Vidu la paĝojn 69-an kaj 70-an kaj la 8-an ĉapitron (paĝoj 72-a ĝis 79-a).

La korpo de Manuel Marulanda neniam aperis, tamen poste oni eksciis, pro deklaroj de malmobilizigintoj, kaj pro ĵurnalisma esploro gvidita far Jineth Bedoya, de *El Tiempo*¹, ke, eĉ mortinta, la maljuna gerilano daŭris pagpostulante vivojn por konservi la sekreton pri sia tombo.

Laŭ tiuj referencoj, la alinomita *Sandra*, kiu estis la fidela kunulino de Marulanda dum liaj lastaj jaroj, ordonis mortpafi la homojn kiuj entombigis lin matene la 29-an de marto de 2008, tri tagojn post lia morto. Entute, ŝajnas ke estis kvar la homoj mortigitaj, el tiuj plej proksimaj al la mortinta kapulo, nur pro la peko ke ili konis la lokon kie restas lia kadavro. Estas malfacile imagi pli grandan gradon de krueleco kaj de nesento pri la valoro de la homa vivo. Konduto tia kiu pruvas la degeneron kian atingis la anoj de la FARK.

¹ “Un año después la búsqueda de ‘Marulanda’ no termina” (“Unu jaron poste la serĉado pri ‘Marulanda’ ne finiĝas”), *El Tiempo*, 22-a de marto de 2009.

LA OPERACO FENIKSO

*Oni ne povas konfuzi la ofendon al la homaro,
kio estas la ago terorisma, kun la defendo de la homaro,
kio estas la agado kontraŭ la terorismo.*

ÁLVARO URIBE VÉLEZ
Prezidento de Kolombio

ĈAPITRO 23-a

La militon oni gajnas en la aero

Sendube la Plano Kolombio signifis turniĝon fundamentan kaj pozitivan en la luktado kontraŭ la narkotaĵkomerco kaj la terorismo, inter aliaj kialoj pro la plibonigo kaj la pliigo de la aerflotoj de la Militfortoj kaj la Polico. La aera povo de la Armitaj Fortoj iĝis la plej malbona terursonĝo de la gerilanoj, ĉar ili ne plu povas fidi, kiel okazis ĝis la lastaj jaroj de la 20-a jarcento, kiam ili atakis vilaĝon kaj la armeaj trupoj bezonis plurajn horojn, kelkfoje tagojn, por alveni, pro la malfacilaĵoj de la tereno kaj la kontraŭhomaj minoj kiujn ili semis. Nun, per la grava aerfloto de helikopteroj, transportaviadiloj kaj batalaviadiloj, kun la plej modernaj karakterizaĵoj, la Armeo alvenas en nur kelkaj minutoj.

Ni komprenis ke la militon oni gajnas en la aero, ĉar la aera povo estas la plej plenfrapa kaj trafa kiun oni povas uzi kontraŭ la gerilaj tendaroj, bazita, evidente, sur kompleta konaĵaro el informigado, kiu ofte bezonigas jarojn por ĝin kolekti kaj konfirmi, kaj sur la apogo far la surteraj fortoj kaj far la surriveraj batalionoj.

Dum la regado de Andrés Pastrana, disvolvante la Planon Kolombio, per la apogo de Usono, kaj ankaŭ per rimedoj el la nacia buĝetmono —atingitaj, kiam mi estis ministro pri Financoj, kun neetaj malfacilaĵoj por la seriozaj tiamaj fiskaj problemoj, kune kun la tiama ministro pri Defendado, Luis

Fernando Ramírez, kaj la generaloj Tapias kaj Mora—, oni komencis la procezon de plifortigo de la Armitaj Fortoj kaj, speciale oni plipotencigis ilia aera kapablo, pasinte el 4 al 16 artileriaj batalhelikopteroj kaj pliiginte per centon la nombro de transporthelikopteroj. Tamen, dum la komenco, la flugveturiloj venintaj el rimedoj de la Plano Kolombio, pro restriktaj de la usona registaro, ne povis estis utiligitaj por kontraŭgerilaj agadoj, sed ununure kontraŭ la narkotaĵa komerco. Tiam okazis foje la absurdaĵo ke la gerilo sieĝis vilaĝetojn ĉe iomete malpli ol horo da flugtempo elde la bazo de Larandia, en Kaketao, kie estis parkumitaj la helikopteroj asignitaj al la kontraŭnarkotaĵa misio, kaj oni ne povis sendi helpon en ili.

Post forta laboro de pledpremo de la kolombia registaro fronte al la Usona Kongreso, fine estis atingita la t. n. “ŝanĝo de permesoj” por ke la donacita milita ekipaĵo povu esti uzata en agadoj kontraŭ la narkotaĵkomerco kaj ankaŭ kontraŭ la terorismo. Tiu ĉi permeso efektiviĝis en julio de 2002, unu monaton antaŭ la posteniĝo de la prezidento Uribe.

La eksprezidento Pastrana, en sia libro *La vorto sub pafado*¹, tiun progreson elstarigas jene:

“Kiel tion resumis tiam la generalo Charles Wilhelm, ĉefkomandanto de la Suda Komanditaro de Usono, per la sukceso atingi tiun ĉi decidon, dekobliĝis la ofensivan kapablon de la Armeo. Danke al tio, la prezidento Uribe estis, ĝishodiaŭe, la ununura dum la historio de la lando kiu ricevis armeon modernigitan kaj fortigitan, kun reala kapablo por mobiliziĝo kaj transporto por fronti la violentulojn”

Poste, dum la regado de Uribe, kaj kun tiu permeso niafavore, la milito elde la aero kontraŭ la FARK kaj aliaj malleĝaj armitaj organizaĵoj signis diferencon determinan en la atingitaj rezultoj. Se ni reekzamenas kelkajn el la plej sukcesaj operacoj de la lastaj jaroj kontraŭ tiu ĉi grupo —kiel

¹ NT Hispanlingve: “*La palabra bajo fuego*”.

tiuj en kiuj falis la Negro Acacio, Martín Caballero, Raúl Reyes, Dago, Jurga Jurga, Camilo Tabaco, kaj multaj aliaj—, ni vidas ke ekzistas komunaj faktoroj: unua, la lokalizo de la celitulo per konaĵoj el informiĝado; dua, la preciza kaj efika bombado far la aviadiloj de la Aera Forto, kaj tria, la ekokupo de la tereno far la surteraj trupoj. Per tiu simpla formulo, ŝanĝiĝis la ekvacio de la milito.

La plej granda aerfloto

Dum la lastaj jaroj, la pliigo de nia kapablo por aeraj transporto kaj atako, atingita granda-parte per la monrimedoj eksterordinaraj aprobitaj por la Armitaj Fortoj, de 8,25 duilionoj da pesoj, venintaj el imposto pri la proprietaĵaro, estas rimarkindega.

La flugmaŝinaro de la armeo eknombri 50 helikopterojn Back Hawk, 23 MI-17 (kiel tiuj de la Operaco Ŝakon), 30 Huey II kaj 11 UH-1N, entotale 114 helikopterojn modernajn kaj bone ekipitajn por subteni la agadon de la soldatoj ĉe la tereno. Se ni sumigas la aerfloton de Black Hawk-oj de la Armeo plus tiuj de la Aera Forto pafilhavigitaj por batalo, ankaŭ nomitaj “Arpiás”¹, plus tiuj de la Polico, ni alvenas al totalo de 83 sub povo de la kolombiaj Armitaj Fortoj, kio faras ke Kolombio estas —post Usono— la lando kun la plej granda aerfloto de Black Hawk-oj de la duonterglobo, kaj la tria aŭ kvara en la mondo.

Pri la plimodernigo de la ekipaĵoj de la Aera Forto, dum la lastaj tri jaroj estis akiritaj 23 aviadiloj Super Tucano², 12 atakaj helikopteroj Huey II, kaj kvar transportaj aviadiloj Casa C-295. Kiam mi forlasis la Ministerion pri Defendado, en majo de 2009, restis menditaj kaj ricevotaj 4 aviadiloj Beechcraft 350 Super King Air, du por transporto kaj du kiel bazoj por informiĝado, plus 25 aviadiloj por baza trejnado.

¹ NT Vidu la 2-an piednoton de la 31-a paĝo.

² NT Vidu la 1-an piednoton de la 134-a paĝo.

Plie, restis aĉetitaj 13 aviadiloj K-fir el lastnova produktado, kiuj jam komencis alveni, kaj kontraktita la nuntempigo kaj plilongigo de la utildaŭro de aliaj 11 kiujn ni jam posedis, por kompletigi modernan aerfloton de 24 batalaj aviadiloj K-fir.

Fundamenta karakterizaĵo de tiu ĉi procezo por plifortigo de niaj aeraj kapabloj estis la atingo de dumnokta operaceblo, kio hodiaŭ kapabligas niajn flugmaŝinojn por serĉi kaj ataki siajn celaĵojn meze de la nokto, kun plena efektiveco. Dum la 1990-aj jaroj ne ekzistis tia rimedo kaj necesis uzi fajrlumoj, kio, evidente, avertis la gerilon pri la situo de niaj soldataroj. Nuntempe, per la pornoktaj vidigiloj, ne plu necesas la lumigo, kaj oni povas fari operacojn senrestrikte dum la 24 horoj de la tago. La vidigilojn oni funkciigis en la helikopteroj por dumnoktaj elveturigoj kaj por eltiri vunditojn, kaj ankaŭ en la atakaviadiloj. Eĉ, oni alvenis ĝis la eblo fari dumflugan reprovizadon de fuelo en meznokto. Ĉiuj fakspertuloj taksas la kolombian Aeran Forton kiel la plej bona de Latinameriko, kaj tia ĝi pruvigis.

Per ĉiuj ĉi akiraĵoj kaj progresigoj, per la nemezureblaj kompetenteco kaj talento de la kolombiaj pilotoj, per la inĝenio de la naciaj teknikistoj kiuj eltrovis kiel pafilhavigi aviadilojn kaj helikopterojn, ni sukcesis plenumi operacojn kiajn antaŭe estis neimageblaj. La plej elstara el ĉiuj, laŭ ĝia trafeco kaj laŭ la strategia graveco de la celitulo senvivigita, estis, sendube, la Operaco Fenikso.

ĈAPITRO 24-a

Unua homperdo de la Sekretariaro

La negranda figuro, kun grizhara barbo kaj okulvitroj, kiu similis pli al oficejulo ol al gerilano, kun kamufluniformo kaj apudŝultra fusilo, tro granda kompare al ĝia portanto, de Luis Édgar Devia, alinomita Raúl Reyes, populariĝis dum la tri jaroj de la porpaca procezo, ĉar tiu ĉi viro, aparteninta al la Sekretariaro de la FARK, estis la ĉefa intertraktanto kaj proparolanto de la gerilo dum tiu tempo, komisiita por legi la plimulton el la komunikaĵoj kaj por deklari fronte al la amaskomunikoloj.

Tiam evidentiĝis lia graveco ene de la terorisma organizaĵo. Li estis, ĉiutakse, homo tre proksima al Marulanda, kun alta influo en ties decidoj, kaj kiu, ekde tiam, karakteriziĝis kiel la dua homo de la FARK, post ĝia fondinto, eĉ super Jojoy kaj Cano.

Reyes, naskita en La Plata (Ujlao), pli antaŭe apartenis al la junularoj komunismaj, estis sindikata gvidanto en Kaketao, magistratano de la komunisma partio kaj, kiel aktivulo de tiu partio pasigis kelkan tempon en landoj de Orienta Eŭropo, dum tempoj de la “fera kurteno”. Li aliĝis al la anaro de la FARK ekde komenciĝo de la 1970-aj jaroj; li edziĝis kun la filino de Tirofijo, Olga Marín, kaj baladaŭ li gajnis la konfidon de ĝiaj gvidantoj, kiuj komisiis lin pri la internaciaj kontaktoj, kune kun lian edzinon kaj la kunulon

Marcos Calarcá. Li estis unu el la gerilanoj kiuj, dum la porpaca procezo, vojaĝis kun la delegitoj de la registaro al pluraj landoj de Eŭropo, kaj li iĝis, fakte, la ĉefa instiganto pri la celmotivo de la FARK en eksterlando. Mi ĉiam pensis ke la titolo “kanceliero de la FARK” donita al la alinomita *Rodrigo Granda*, estis multe pli taŭga pri Reyes, kiu sciis ĝisatingi per sia ruza stilo kaj marksista retoriko diversajn personojn de la internacia sceno.

Mi parolis kun li en du okazoj. La unua en Kostariko (ankaŭ ĉeestis Olga Marín), apogite de la kostarika registaro, serĉinta ke la FARK akceptu pacplanon kiun projektis ni kune kun grupo de gravuloj, inter kiuj troviĝis la eksprezidento de de la hispana registaro Felipe González, la Nobel-premiito Gabriel García Márquez, la eksprezidento Betancur¹, la eksprezidento López², monsinjoro Rubiano³, Angelino Garzón tiame sindikata gvidanto kaj estonta ministro pri Laboro kaj la entreprenisto Nicanor Restrepo, menciante nur kelkajn. Mi ankaŭ kunsidis samcele kun Carlos Castaño, tiutempe nedisputebla ĉefo de la paramilitistoj. Tiu pacplano estis kiun la prezidento Samper⁴ stulte denunciis kvazaŭ konspiro por renversi lian regadon.

La dua okazo estis en bieno en San Vicente de la Kagŭano, kiam la prezidento Pastrana petis ke mi aniĝu en intencata kontrolo komisiitaro (Juan Gabriel Uribe, Álvaro Leyva kaj la senatano Gustavo Carvajal, de la meksika PRI, estis la ceteraj anoj) por inspekti la regulplenumon pri la senmilitigo, komisiitaro kiu daŭris tre mallonge pro la neordo kun kiu komenciĝis la procezo kaj pro la ĵaluzo ĉe kelkaj funkciuloj.

Kontraŭ Reyes ekzistis nekalkuleblaj arestodekretoj pro terorismo, ostaĝigo, ribelado kaj multaj aliaj krimoj, kaj estis petita far la justico de Usono pro akuzoj de narkotajkomerco.

¹ NT Belisario Betancur Cuartas.

² NT Alfonso López Michelsen.

³ NT Kardinalo Pedro Rubiano Sáenz.

⁴ NT Ernesto Samper Pizano.

Tia esti la trajtaro de tiu ĉi homo preskaŭ sesdekjara kiu, kiel estas kompreneble, kapis, kune kun Marulanda kaj Jojoy, la strategiajn celitulojn altvalorajn.

Elglitema celitulo

Post la fino de la porpaca procezo, en februaro de 2002, Reyes ekrespondis pri la kunordigado de la agoj de la Suda Bloko de la FARK, kun agejo en Putumajo, Kaketao kaj Ujlao, kaj ankaŭ pri ĝia Internacia Komisiitaro. la konaĵoj el informiĝado donis al ni daŭrajn novaĵojn pri ke li konstante traŭriadis la landlimon kun Ekvadoro, kie li rifuĝis en diversaj tendaroj kiujn la gerilo tenis tiulande.

Multfoje, dum la lastaj jaroj, la kolombia registaro sciigis la ekvadoran registaron aŭ ĝiajn aŭtoritatojn armeajn aŭ policajn pri la enesto de tendaroj de la FARK ĉe ĝia norda landlimo. Malfeliĉe, aŭ ili ne trovis la tendarojn aŭ kiam la ekvadoraj trupoj alvenis, tiuj jam estis forlasitaj.

Laŭ atesto de la ekskolonelo Mario Pazmiño, kiu estis ĉefo de la informiĝfako de la ekvadora Armeo ĝis marto de 2008, kiam li estis elpostenigita far la prezidento Correa¹, “Ni havis konon pri neaktivaj tendaroj de la FARK kaj ili estis raportitaj. Inter 2000 kaj 2008 estis proksimume 130 aŭ 140 la tendaroj detruitaj”. Kaj poste li pluriris: “La ringoj el sekurigantoj kiuj havas la FARK en ekvadora teritorio permesas la tuja rimarko de iu ajn ago al la tendaroj. La sono de motorsegilo povas averti pri militista ĉeesto, koloraj vestoj etenditaj sur riveroj, iu muziko iom laŭta. Similaj aferoj povas instigi tuj la malfunkciigon de tendaro”. Pazmiño, dum sia longa milita spertado, ne rememoras iaman interpafado de la ekvadora Armeo kaj la gerilo.

La fakto estas ke la efektiveco de la ekvadoraj trupoj en la persekuto de la tendaroj de la FARK en ilia teritorio ne estadis

¹ “Al presidente Correa lo siguen engañando” (La prezidenton Correa oni daŭrankoraŭ trompas), gazeto *Semana*, 13-a de julio de 2009.

bona. Se ili alvenis al la tendaroj, ĉi tiuj estis malmuntitaj jam. Dume, kolombiaj soldatoj kaj policistoj, kiuj plenumadis agojn kontraŭ la narkotajkomerco, vidadis sin konstante atakitaj far gerilanoj kiuj pafadis elde ekvadora teritorio, aliflanke de la rivero kiu servas de natura limo inter la du landoj, kaj kiuj sentis sin sekursituaj ŝirmiginte en la suvereneco de la najbara lando.

Ni estis poste sciontaj, kun ŝokiĝo kaj indigno, ke altaj funkciuloj de la registaro de la prezidento Correa, kiel la tiam ministro kunordiganto pri Sekureco Interna kaj Eksterna, Gustavo Larrea; la eksa subsekretario de la Ministerio pri Regado, Ignacio Chauvín; la eksa generalo René Vargas, nuna ambasadestro de Ekvadoro en Venezuelo, kaj la eksa kolonelo Jorge Brito, kunsidis kaŝe kun Raúl Reyes, en elkoraj manieroj, sen la kono nek, des malpli, la konsento de la kolombia registaro.

Spite la malfacilaĵon signifata far la fakto ke Reyes kaŝis sin tiel ofte en eksterlanda teritorio, ni neniam perdis la esperon kapti aŭ senvivigi lin en iu momento en kiu li pasu al kolombia surfaco. La Polico estis la agentaro kiu havis la informiĝan taskon plej progresintan pri Reyes, tial oni determinis ke tiu institucio gvidu lian serĉadon ĝis la momento kiam li estu plene lokalizita, kaj tiam la agado pasos esti responso de la Ĉefinstanco de Specialaj Kunfarataj Operacoj¹.

Pluraj anoj de la polica informiĝfako enŝteliĝis en vilaĝojn kie Reyes aŭ lia fronto, la 48-a, havis ian ĉeeston aŭ kontaktojn por porvizado, kiel Puerto Asís, Teteyé kaj San Miguel, en la departemento Putumajo, proksime de la ekvadora landlimo. Tio estis pacienca laborado plurajn monatojn longa kiu fine kapablis nin —per la konaĵoj liveritaj far informinto havanta privilegion aliron al la tendaro, per informiĝo elde la aero kaj teknika, kaj per alta teknologio por interkapti komunikaĵojn kaj elektronikajn signalojn—, kolekti

¹ NT Vidu la 109-an paĝon.

tre precizan informon pri la moviĝoj kaj situo de la gerila kapulo.

Reyes ne estis facila celitulo. Inter 2007 kaj februaro de 2008 oni ekfaris almenaŭ kvar operacojn por kapti lin, kiuj frustriĝis kiam li eniris najbaran teritorion aŭ alikaŭze. Mi rememoras pri unu, tre doloriga, en novembro de 2007, kiam specialaj komanditaroj de la Polico kaj la Armeo instaliĝis en pafistaj postenoj ĉe la arboj de areo kien estis alvenonta Reyes, kun tiom malbona sorto ke plotono de gerilanoj devojiĝis kaj alvenis ĝuste sub arbo kie troviĝis kaŝpafisto de la Polico. Fine okazis interbatalo, du policistoj ekrestis vunditaj kaj Reyes, avertita, eskapis el la sieĝo farita al li.

Dum la lasta tagoj de februaro de 2008, la informiĝfako de la Polico, kiu tiom longtempe postiris la kapulon, atingis konajon kiu riveliĝis determinanta: Reyes estis en sia baztendaro en Ekvadoro, 1.800 metrojn disde la landlimo kun Kolombio, tamen oni esperis ke la nokton de la vendredo 29-a de februaro (tiu jaro estis superjaro) li trairos la riveron por renkonti kontaktulon de la narkotajkomerco, je proksimume 300 metroj ene de nia nacia teritorio.

Post ricevi la polican informon, la realigo de la operaco ekrestis —kiel okazas rilate tiajn celitulojn altvalorajn— en manojn de la Ĉefinstanco de Specialaj Kunfarataj Operacoj, kiu ordonis la tujan utiligon de la rimedoj konsideritaj necesaj: aeraj atakskipoj, transportaj helikopteroj kaj surteraj fortoj, same ĝangalaj policistoj¹, fakigitaj por lukto kontraŭ la narkotajafero en la ĝangalo, kiel specialaj komanditaroj de la Armeo. Mi restis informata pri la operaco ekde kelkaj antaŭaj tagoj, kaj same estis la prezidento Uribe, kiu vojaĝis tiunokte al Antjokio.

Hazarde, por tiu tago 29-a estis enagendigita vizito far la Komisiitaro pri Etiko kaj Malkaŝeco, konsistanta el gildaj gvidantoj kaj entreprenistoj —kiu akompanis la procezon de

¹ NT Nomitaj en Kolombio “policías jungla”.

kontraktado kaj akiro de ekipaĵoj per la eksterordinaraj monrimedoj—, al la bazo de Tres Esquinas, en Kaketao, elde kie estis elirontaj la aviadiloj Super Tucano farontaj la atakon kontraŭ Reyes. Tie ni montris al la komisiitoj (Luis Carlos Sarmiento, José Alejandro Cortés, Gustavo Adolfo Carvajal, Luis Carlos Villegas, Carlos Angulo, Juan Luis Mejía, la prokuratoro¹ Edgardo Maya, kaj la ŝtata kontrevizoro² Julio César Turbay) la modernajn kaj povajn flugmaŝinojn sen ke tiuj homoj havu eĉ ideon ke tiuj samaj aviadiloj estis kelkajn horojn poste kaŭzontaj la morton, unuafoje en la historio de la alfrontado kontraŭ la FARK, de unu el la sep anoj de ĝia sekretariaro.

Mian estadon en Tres Esquinas mi profitis por revizii la lastajn detalojn de la planita operaco, kaj mi ekrestis tre komplezita pro la infromo kiun donis la generaloj, kaj samtempe esperatendanta: ĉio indikis ke al Raúl Reyes, la homo kiu senhonte defendis kun rideto cinika la ostaĝigon kaj la kontraŭhomajn minojn, alvenas lia lasta horo. Al Luis Carlos Villegas, prezidanto de la Nacia Industriista Asocio, mi diris: “Preĝu multe, ke eble morgaŭ ni donos al vi grandan novaĵon”.

“Vivu Kolombio, vivu Kolombio!”

Ĉirkaŭ la deka horo nokte, kiam la aviadiloj kiuj elteriĝis elde la plej foraj bazoj jam estis flugantaj, en la informiĝfaka ĉefoficejo de la JOEC estis ricevita mesaĝo kiu igis ŝanĝi ĉiujn planojn:

— La ulo ne iris, ne trairis la landlimon. Tamen ni estas

¹ NT En Kolombio “Procurador General”, funkciulo kiu observigas la Konstitucion kaj la leĝon, prizorgas la protekton de fundamentaj civitanaj rajtoj kaj la respekton por la respondecoj de civitanoj, protektas publikajn posedaĵojn, kontrolas la agojn de ŝtatoficistoj kontraŭ malobservo de reguloj kaj misuzo de stataj rimedoj. Esploras disciplinajn ofendojn de ŝtatoficistoj kaj povas ilin juĝi. (Bonvole ne konfuzu ku **prokuroro**, vidu 2-an piednoton de la 26-a pago).

² NT En Kolombio, la revizoron de la ŝtataj kontoj oni nomas “contralor”.

tute certaj ke li estas en sia tendaro.

Oni faris, do, decidon kia pli ol persona ĝi estis ŝtata. Ni havis, post multajn jarojn serĉinte lin sensukcese, la situon precizan kaj konfirmitan de Raúl Reyes, de krima kapulo kiu maĥinaciis la plej abomenajn atencojn kontraŭ kolombianoj kaj kiu tiam sin okupis pri la kreo de internaciaj ligiloj por disvastigi la teroron, kaj ne restis alia vojo ol pludisvolvi la operacon.

Donite la permeso, la pilotoj de la flugmaŝinoj nur bezonis fari moveton en siaj regiloj por ŝanĝi la koordinatojn de sia celaĵo kaj, je la 12:02 horo de la ektagiĝo de la sabato unua de marto de 2008, ili ĵetis siajn bombojn de precizeco, sen neceso trairi la landlimon, elde la kolombia aerspaco, sur la ĝustan lokon kie estis ne nur la tendo sed la tabullito mem de Raúl Reyes, en loko kie ni antaŭsciis ke ne ekzistis civiluloj sed nur gerilanoj¹. Neniu fiksflugila aviadilo trairis aŭ superflugis ekvadoran teritorion.

La bombado —same kiel en la okazaĵoj pri la Negro Acacio kaj pri Martín Caballero— estis absolute precizaj, kaj ruinigis la terorisman tendaron situanta en la ĝangala areo de Angostura, en la ekvadora provinco Sucumbios, je 1.800 metroj disde la kolombia landlimo. Tuj poste necesis sendi la specialajn trupojn de la Armeo por ke ili firmigu la enlokiĝon, ĉar restis kelkaj gerilanoj postvivantaj kiuj probable klopodas kaŝi la kadavron de Reyes, kaj ni sendis ankaŭ homojn de la Polico —tiuj samaj kiuj estis pretaj por fari la agon kontraŭ narkotaĵoj— por ke ili plenumu la funkcion de juĝa polico kaj garantiu la gardantaran ĉenon² de iu ajn konfiskita varo, kaj ĉiujn laŭlegajn procedojn.

¹ Al la informinto kiu liveris la precizan situon de Reyes oni donis rekompencan de 5.000 milionoj da peso, la maksimuma determinita por la kupto aŭ senvivigo de iu ano de la Sekretario de la FARK.

² NT gardantara ĉeno (hispanlingve “cadena de custodia”): Zorgado farita de sinsekvaj responsaj gardantoj pri trovaĵoj rilataj al krimo aŭ deliko, elde la trovloko por eviti la falsigon, ŝanĝon, anstataŭigon, kontaminadon, aŭ detruon de tiuj pruvoj.

La unua helikoptero kiu alvenis estis tiu de la armeaj fortoj, kiu meze de la konfuzo pro nekonita ĝangala tereno, surterigis en malfermaĵon kaj lasis la soldatojn sub komando de kapitano, tamen oni ne rimarkis ke ili ekrestis je preskaŭ unu kilometro for de la tendaro de Reyes¹. Meze de la densa mallumo, eĉ kun la pornoktaj vidigiloj, sur tiu grundo kota kaj malfaciliga, kie kruciĝas multegaj riveretoj, kaj kun la certeco ke ili povus trovi postvivantajn gerilanojn iumomente, la armeanoj antaŭeniris tiel penege, ke ili bezonis preskaŭ kvar horojn por alveni al la tendaro. Kiam mankis nur 100 metrojn por ĝisveni, la kapitano kaj sia grupo aŭskultis krion de gerilano:

— He, he! Kiuj vi estas?

Ili ekrestis senmovaj, atendantaj, kaj baldaŭ aŭdis la kriojn de aliaj gerilanoj kiuj vokis kaj instrukiis unuj la aliajn. La kapitano petis helikopteron kiel apogo. Tiam la gerilanoj, kiuj estis en alta areo, ekpafis kaj la soldatoj reciprokis la pafadon. La kapitano sendis soldatojn kiel antaŭtaĉmento por ke ili esploru kio okazis. Kiam ili alvenis ĝis la altaĵo, la gerilanoj jam ne estis, tamen la soldatoj faris neatenditan trovon:

— Kapitano, tie ĉi estas du mortintoj.

La kadavroj estis ne malpli ol tiuj de Raúl Reyes kaj lia kunulino. Tiuj gerilanoj kiuj pafis kontraŭ la soldatojn estis trenintaj la korpojn proksimume 40 metrojn kaj intencintaj kaŝi ilin. Se la kapitano kaj siaj homoj estus daŭrintaj unu horon plian en sia malfacila traŭro, eble la homoj de Reyes estus finplenumintaj la taskon, kaj la historio, sen lia kadavro, estus tute alia.

Por korfaciliĝo de ĉiuj, la kapitano, post konstati ke Reyes

¹ Tiu ĉi parto de la raporto baziĝas sur la priskribo far la kapitano kiu komandis la unuan grupon komisiitan alveni al la tendaro, tiel kiel ĝi aperis en la artikolo “El héroe de la operación contra Raúl Reyes” (“La heroo de la operaco kontraŭ Raúl Reyes”), far la ĵurnalistino Marisol Gómez Giraldo, publikigita en *El Tiempo* la 18-an de decembro de 2008.

estis falinta, sendis mesagon per radio al sia supera oficiro:

— Vivu Kolombio, vivu Kolombio!

Tiuj ĉi kodvortoj, kiuj estis la signalo pri sukceso de la operaco, baldaŭ alvenis al la komisiitoj de la operaco en la JOEC, al la generalo Padilla, al mi kaj al la prezidento Uribe, kiun mi telefonis je la 3:10 frumatene por komuniki la novaĵon. Estis historiiga momento. Oni malpravigis la miton pri la nevundebleco de la anoj de la Sekretariaro de la FARK. Per nia informiĝpovo, niaj teamoj kaj niaj armiloj, ni povas ja alveni ĝis ili!

Nu, meze de la eksciteco produktita far tiu novaĵo, la Prezidento, kiel ĉiame prudenta en siaj reagoj, ne pretervidis ke ni estis fronte al apenaŭ unu ringo el la ĉeno, kaj fiksis al ni tuj novan celon:

— Kaj la Mono Jojoy? —min demandis—. Kiam li falos?

ĈAPITRO 25-a

Post la bombado

Kiam la soldatoj de la specialaj fortoj de la Armeo finfine alvenis al la tendaro, ili trovis prksimume dek kvin pliajn kadavrojn de gerilanoj lak tri vunditajn virinojn al kiuj ili donis humanan flegon: du kolombiaj gerilanoj, kaj meksika junulino, kun nomo Lucía Andrea Morett. Ĉi-lasta komplico, simpatianto, aŭ ano de la FARK, laŭ tio kion ni poste ekkonis estis vojaĝinta al Ekvadoro al kongreso de la “Kontinenta Kunordigantaro Bolivara” (CCB¹) kiu okazis kelkajn tagojn antaŭe en Kito. La t. n. “kunordigantaro” estas organizaĵo kreita far sociaj kaj politikaj organizaĵoj de Latinameriko, kun ideologio de ekstrema maldekstrismo, kiu apogas, senhezite kaj malkaŝeme, grupojn narkotaĵkomercajn kaj terorismajn kiel la FARK, sub la preteksto ke ĝi mem kunhavas iliajn revoluciismajn idealojn. En ĝia grupa prezidantaro estis, i. a., Manuel Marulanda kaj Alfonso Cano; tiom granda estas ĝia grado de implikiĝo kun la kolombia gerilo. La kialoj pro kiuj Lucía Morett troviĝis en la tendaro de Reyes amkoraŭ ne estas klaraj, sed la fakto estas ke ĉiufoje evidentiĝas plie ke ŝi ne estis iu naiva studentino farinta siajn lernotaskojn en terorisma tendaro; ĉio indikas ke temis pri kunakordantino ŝlosila de la gerilo, kiu estis tie por ricevi endoktrinigon kaj kunordigi kun Reyes la laboron de enfiltriĝo de la FARK en la

¹ NT hispanlingva mallongigo de “Coordinadora Continental Bolivariana”.

Meksikaj universitatoj, kun la celo gajni apogojn kaj pliigi la politikmiliton kontraŭ la kolombia Ŝtato. Morett, kiu poste estis prenita, kune kun la du kolombianoj, far ekvadoraj aŭtoritatoj kaj sendita al Nikaragvo —kie la tiea prezidento Daniel Ortega ŝin superŝutis per omaĝoj kaj laŭdoj—, kandidatiĝis kiel deputito en sia naskiĝlando, tamen ŝi ne atingis parlamentan seĝon. Dume, ŝi alfrontas ekstradician peton malfruan far la ekvadoraj juĝaj aŭtoritatoj pro atenco kontraŭ la interna sekureco de la Ŝtato.

Unu el la du kolombiaj gerilanoj trovitaj en la tendaro savis sian vivon ĉar la kungerilanoj lasis ŝin dum la nokto ŝnuritan al arbo, iom for de la tendaro, pune pro iu disciplina miskonduto, plia montraĵo de la terora reĝimo uzita far la FARK, eĉ sur siajn proprajn anojn.

Inter la mortintoj, la soldatoj rekonis viron kies fizikaj karakterizaĵoj —stature, lipharoj, vizaĝtraĵoj kaj aĝo— koincidis preskaŭ perfekte kun tiuj de la alinomita *Julián Conrado*, gerilano tre proksima al Reyes, kiu estis parto de la Tema Komitato en la diskutrondoj de la porpaca procezo, kaj kiu estis konita kiel “la kantisto de la FARK” pro liaj revoluciismaj komponaĵoj kiuj fariĝis simbolo de FARKana identeco.

Kiam alvenis la ĝangalaj policistoj per helikoptero proksimume je la kvina kaj tridek frumatene, sub la unua taglumo, por plenumi siajn funkciojn de juĝa polico, oni determinis elporti revene al Kolombio nur la kadavrojn de Raúl Reyes kaj de la supozita Julián Conrado, pro ilia strategia graveco, kaj lasi la ceterajn en la loko, kune kun la tri vunditaj virinoj, laŭdece flegitaj, obeante ĉiujn humanajn procedurojn, ĝis kiam ekvenis la ekvadorajn aŭtoritatoj. Unu kolombia soldato mortis dum la operaco, pereinta pro arbo kiu ekrestis en malbona stato kaj falis sur lian kapon; oni ankaŭ elportis lin kune kun duopo de aliaj soldatoj vunditaj. Ne facilis la eliro de la helikoptero ĉar ankoraŭ okazis pafoj, kaj eĉ ĵetoj el haŭbizoj, far la gerilanoj kiuj estis ĉirkaŭ la

tendaro kaj kiuj ne rezignaciis je la perdo de la korpo de sia kapulo.

Kelkajn tagoj poste ni konstatis ke la supozita Conrado ne estis la “la kantisto de la FARK” sed ekvadora civitano nomita Franklin Aisalla, kiu laboradis en Kito sub la ŝajnigo esti seruristo, tamen fakte servis kiel konfidulo kaj ligulo de la gerilo por ĝiaj agoj en tiu lando. Aisalla estis fianĉo de Nubia Calderón, alinomita *Esperanza*, ano de la internacia komisiitaro de la FARK, kaj li daŭre estis spurita far la ekvadora informiĝpovo. Laŭ la kolonelo Mario Pazmiño, eksa ĉefo de la informiĝfako de la ekvadora Armeo, en la antaŭe citita intervjuo, “Nubia Calderón estis la reprezentanto de la FARK en Sudameriko kaj havis sian agbazon en Ekvadoro. Ŝi estis spurita far la Polico, same kiel la sinjoro Aisalla, kiu eniris en la aferon pro amsenta rilato kun la sinjorino Calderón. Mi scias ke ekzistis disvolviĝanta polica operaco, tamen mi ne scias kial ne okazis la aresto”. Tamen, Pazmiño iras pluen en siaj rivelaĵoj. Laŭ li “(Nubia Calderón) estas la kvara postvivanto de la kolombia atako al la tendaro de la FARK en Angostura. Ekzistas raportoj pri ke tiu persono estis vundita. Ekzistas onidiroj ke ŝi estis en iu ambasadejo kaj eliris protektita far organizaĵoj de homaj rajtoj. La sinjorino aperas jam en Nikaragvo”.

Du tagoj en la ĝangalo

Nun restis la pleja malfacilaĵo: rakonti al la ekvadoraj aŭtoritatoj pri la bombado kiu estis farita en ilia teritorio por malaktivigi terorisman tendaron, dum disvolvo de operacio kia ankaŭ havis la karakterizaĵon de kontraŭnarkotaĵa operaco. La kolombia Polico komunikigis kun la ekvadora Polico kaj sciigis ĉi-lastan pri la operaco, klarigante ke en la tendaro estis mortintoj kaj vunditoj kaj ke la kolombiaj policistoj estis restontaj gardante la tendaron ĝis la alveno de la ekvadoranoj. Samtempe, frumatene, la prezidento Uribe telefonis la prezidenton Correa kaj informis lin pri la

trudeniĝo, klariginte ke la celo estis antaŭvidita unue en kolombia teritorio sed ke, dum la disvolvo de la operaco, oni devis frapi la gerilanojn en ekvadora tero, sen iu ajn civila viktimo tiulanda. Correa, komence, prenis kun sereneco la informon liveritan far la prezidento Uribe kaj petis la siaj armeanoj kaj policistoj konfirmi ĝin. Kelkajn horojn pli malfrue, post konsiliĝo kun la prezidento Chávez, ekis eksplodo de kolero kaj indigno, kun sekvo ruiniga por niaj diplomatiaj rilatoj kiuj eĉ hodiaŭ, kiam mi skribas tiu ĉi teksto, estas interrompitaj.

Correa diras ke la prezidento Uribe mensogis al li. Tio ne veras. La prezidento informis lin pri la atako kun la raporto de la faktoj tiel kiel ili okazis. Uribe faris tion kiam Correa ĉeestis radioprogramon, kaj lia reago estis tre komprenema kaj modera. Tia ĝi restis sonregistrita. Fakte la atako okazis kontraŭ tendaro de kolombiaj teroristoj kiu estis profananta la ekvadoran suverenecon. La prezidento ordonis ke ni ne anoncu ion ajn antaŭ ol sia interparolo kun Correa, kiel fakte okazis. Estas kuriozaĵo ke la komenca sinteno komprenema de la ekvadora reganto transformiĝis ju pli li interparoladis kun Chávez, kaj nokte li ekspedis komunikaĵon per kiu li lasis nin ĉiuj surprizgapaĵoj pro lia agresemo, agresemo kiun li tenadis tutan ĉi-tempon kun tre bonaj politikaj profitoj.

La region de Angostura, kie estis la tendaro de Reyes ne estas facile alirebla, tute ne. Tial estis ke la ekvadoraj trupoj bezonis multon da tempo por alveni, kaj ĉe la kvina vespere de la sabato 1-a de marto ili estis ankoraŭ proksimume 1.700 metrojn disde la loko. La kolombiaj policistoj daŭre gardadis la atakitan areon. Tiumomente ekestis akordiĝo inter la generalo Padilla kaj lia ekvadora samoficulo por ke la respektivaj grupoj restu en siaj lokoj tiunokte, kaj la postan tagon, matene, estu farota la oficiala transdono de la tendaro, la mortintoj kaj la vunditaj virinoj.

Tamen, la aferoj ne estis tiel simplaj. Konventempaj konajoj el informiĝado sciigis nin ke la ordono kiun havis la

ekvadoraj uniformitoj ne estis anstataŭi sed kapti la kolombianojn kvazaŭ invadintajn trupojn. Antaŭ ĉi tia alarma konaĵo, la generalo Óscar Naranjo, direktoro de la Nacia Polico, donis tujdevigan ordonon al siaj homoj por ke ili forlasu la tendaron kaj piediru ĝis la landlima rivero, kie oni elprenos ilin per boatoj. La trairo estis nur 1.800 metroj, tamen la malfacilo piediri nokte, la nekoniteco kaj sovaĝeco de la tereno, la timo pri embuskoj far postvivintaj gerilanoj, kaŭzis ke la penantaj policistoj bezonis la tutan nokton por trairi tiun distancon. Ili alvenis al la rivero, elĉerpitaj kaj vunditaj far la vepraro kaj baroj de la vojo, je la sesa matene de la dimanĉo 2-a de marto, finante operacon kiu komenciĝis iliaflanke du tagojn antaŭe, la 29-an de februaro. Kiel timinde, ankaŭ la ekvadoranoj ne restis senmovaj kaj alvenis pli frue ol antaŭpensite al la tendaro, ili trovis nur ĝiajn rubojn, la kadavrojn de la faligitaj gerilanoj —escepte de tiu de Reyes kaj tiu de Aisalla kiu poste oni revenigis al lia lando— kaj la tri vunditajn virinojn.

ĈAPITRO 26-a

La sekretoj de la komputilo

La tendaro kie sin lokis Raúl Reyes kun sia grupo ne estis tendaro provizora aŭ porpasa, kiel unue diris la ekvadoraj aŭtoritatoj, komencite far la prezidento Correa, kiu asertis ke ĝi estis “migra tendaro, farita el plastaĵoj, nur por tranokti”. Ĝi estis patrin-tendaro, de longdaŭra karaktero, kun lignaj kaj betonaj konstruaĵoj, vojoj, kunsidejoj kaj trejnejoj, elde kie estis maĥinaciitaj ostaĝigoj kaj atencoj kontraŭ la kolombia popolo kaj aranĝitaj internaciaj komplotoj por renversi nian registaron kaj nian demokratian sistemon. La sekretario mem de la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj, la ĉiliano José Migel Insulza, kiam li vizitis la bombitan tendaron kelkajn tagojn poste, en kontrolmisio, deklaris ke “tiu ĉi ne estis tendaro instalita proksimdate, probable ĝi restis plurajn monatojn”

Nu, la loko kaŝadis multon pli ol la gerilan ĉefon kaj lian skipon. Tie Reyes havis tri komputilojn kaj plurajn eksterajn memorilojn, kiuj estis rekuperitaj kaj metitaj sub gardado far la policistoj; tiuj aĵoj enhavis veran trezoron: ne malpli ol la registron pri ĉiuj agoj de la kapulo dum la lastaj jaroj, liajn komunikaĵojn kun la ceteraj anoj de la Sekretariaro kaj frontestroj, kun personoj de la politiko nacia kaj eksterlanda, fotojn kaj videaĵojn kiuj kompromitas multajn homojn kun lia krima agado.

Tiu ĉi estis la plej granda sukceso de la Operaco Fenikso, eĉ super la historiiga fakto meti finon, unuafoje, al iu ano el la Sekretariaro. Tio estas arsenalo de strategia informo el kiu oni eltiris grandegan kvanton da konaĵoj por batali kontraŭ la gerilo kaj ĝiaj rilatoj internaj kaj eksterlandaj, kaj kiu daŭre produktos valorajn rimedojn de informiĝado por la venontaj jaroj.

Kiel diris Marulanda mem en iu el liaj retmesaĝoj, avertinte pri la risko se la aparatoj falus en manojn de la Ŝtato: “Se ili forprenus el ni la komputilojn, ili konus eĉ niajn vojaĝojn al la Luno”. Kaj tiel estas. Preskaŭ tiom kiel la vojaĝojn al la Luno.

Ekzistas informoj pri krimaj ligoj aŭ akordiĝoj en almenaŭ 17 landoj, informoj kiujn ni kunhavigis kun ĉiu lando atinginte plurajn konkretajn rezultojn. Tia estis la apartaĵo pri Kostariko, kie oni trovis kaŝejon kun preskaŭ milionon da dolaroj danke al precizaj informeroj kiuj estis en komputilo, aŭ pri Hispanio, kie la tiulanda Polico arestis la alinomitan *Irene*, Rosario García, komisiita kolekti monon por la FARK en tiu lando, ankaŭ surbaze de retmesaĝoj el komputilo de Reyes. Tiuj ĉi dokumentoj estis kunhavigitaj per policaj kanaloj, inter la policaj aŭtoritatoj de Kolombio kaj de la koncerna lando, aŭ per kanalo de juĝista helpo: kontakto inter la Ĝenerala Nacia Prokurorejo¹ kaj la juĝaj institucioj de la koncerna lando.

Kompreneble, tuj kiam oni ekkonis la unuajn retmesaĝojn pri la rilato, serioze alarma, de la registaroj venezuela, ekvadora kaj nikaragva kun la FARK, trovitaj en komputilo de Reyes, la tieaj registarestroj ŝajnis tiujn mesaĝojn nekredindaj, kaj esprimis ke ili ne kredis ties enhavon, ke la enhavo estis manipulita far la kolombiaj sekurigaj agentoj. Kvazaŭ estus eble produkti tiomege da dosieroj kaj dokumentoj, kun tiom da detaloj, de unu tago al la sekvanta!. Feliĉe, danke al iniciato de la generalo Óscar Naranjo, ekde la

¹ NT Vidu la 2-an piednoton de la 26-a paĝo.

unua momento oni sekvis la t. n. gardantaran ĉenon kun la komputiloj kaj memoriloj, kaj estis invitita Interpol, la plej granda kaj plej respektata organizaĵo de polico internacia, kun la plej altnivelaj teknikaj rimedoj, por ke ĝi ekzameni la komputilojn kaj ilian enhavon por ke ĝi determinu ĉu ili estis aŭ ne estis manipulitaj.

Kelkajn tagojn post la bombado alvenis tri spertuloj de la internacia organizaĵo, unu aŭstralia, alia hispana kaj la cetera el Singapuro, kaj ili elportis la aĵojn necesajn por fari sian kontrolon. Post pli ol 5.000 horoj da laboro en kiuj partoprenis 64 funkciuloj el 15 diversaj landoj, la ĝenerala sekretario de Interpol, Ronald K. Noble, venis la 15-an de majo al Bogoto por prezenti sian oficialan kaj definitivan informaĵon. Laŭ ĝi:

“Uzinte altnivelaj iloj de komputada juresploro, la fakuloj determinis ke la ok trovitaj pruvajoj enhavis pli ol 600 gigabajtoj da datenoj: 37.872 skribitajn dokumentojn, 452 kalkultabelojn, 210.888 bildojn, 22.481 TTT-paĝojn, 7.989 individuajn retpoŝtajn adresojn, 10.537 dosierojn de sono kaj video, 983 ĉifritajn dosierojn (...). Per neteknikaj vortoj, tiu ĉi kvanto da datenoj samvaloras al 39 milionoj kaj duono da paĝoj en Microsoft Word. Okupus pli ol mil jaroj la legado de tiu datenoj se iu homo legus 100 paĝojn ĉiutage”.

Fine, Noble donis la atenditan verdikton el la respektinda internacia organizaĵo:

“La skipo de juresploraj fakuloj de Interpol ne malkovris spuron, mi ripetas, ne malkovris spuron pri modifo, ŝanĝo, aldono aŭ forigo de la dosieroj de uzanto en iu el la tri tekokomputiloj, en iu el la tri USB-poŝmemoriloj kaj en la du eksteraj diskaparatoj konfiskitaj dum kontraŭnarkotaĵa kontraŭterorisma operaco en tendaro de la FARK la 1-an de marto de 2008”.

Kaj li pludiris:

“Ni nun estas plene certaj ke la komputil-rilataj pruvajoj kiujn trovis niaj spertuloj alvenis el terorisma tendaro de la

FARK, do ili apartenas al anoj de tiu organizaĵo. La sinjoro Reyes jam estas mortinta, tamen fakte tiuj estis liaj komputiloj, liaj diskaparatoj, lia fizika ekipaĵo, kaj li estis la reprezentanto de la FARK, li estas responsa pri ties enhavo.”

Noble klarigis la gravecon de la validigo de tiuj dosieroj kiel uzeblaj pruvoj ĉe iu ajn jura instanco:

“Por povi pruvi ion ajn (...) ekzistas tri farendaĵoj. Necesas trovi indicon, necesas pruvi ke ĝi ne estis modifita kaj necesas pruvi ke ĉio kio estas en la indico, aŭ kion indikas la indico estas vera. La unuaj du partoj el tiu triparta ĉeno, jam estis klare plenumitaj, kaj neniu povas diskuti ĉu Kolombio manipulis tiun indicon”.

La informo donis trankvilon al la aŭtoritatoj kaj al la kolombia popolo, kiuj vidis en tiuj komputiloj gravan ŝancon por bati ne nur strategie, sed ankaŭ jure, la terorisman organizaĵon, tamen ĝi alarmis la eksterlandajn registarestrojn kompromititajn en la retmesaĝoj ĝis tiam konigitaj, registarestroj kiuj rapidis ignori la konkludon de la bonreputacia polica institucio.

La prezidento Hugo Chávez, en sia kutima stilo, riproĉis la informon kaj nomis ĝin “cirko” kaj “klaŭnaĵo”. Li eĉ atakis la ĝeneralan sekretario de Interpol, nominte lin “fiusona policisto, agresema kaj vaganta”.

—Kiom sentendenca la sinjoro ‘mal-Nobla’ ! Li komencas dirante la la FARK estas terorisma, ke ĝi mortigas, kaj li gratulas la Policon de Kolombio kaj la DAS pro tio kion ili faris— pludiris la venezuela registarestro, kiel se lin ŝokis ne la konduto ĉiutaga kaj ripetiganta de la FARK kontraŭ la kolombia popolo, sed ke iu nomu ĝin terorisma kaj diru ke ĝi mortigadas.

Rafael Correa, en Ekvadoro, eĥis sian kunaliancon kaj malkvalifikis la raporton de Interpol, foriginte el ĝi ĉian juran kredindecon.

Tamen, la internacia komunumo bone scias pri la

seriozeco de tiu institucio, kaj la informo de la komputiloj de Reyes havas ankoraŭ multon traktendan.

“Kun Chávez estis granda samsenteco”

Kial Chávez kaj Correa estis tiel koleraĵ kontraŭ Interpol? Ĉar la unuaj retmesaĝoj kiuj estis ekkonitaj el la komputiloj de la dua gravulo de la FARK kompromitis ilin aŭ kompromitis liajn registarojn preter iu ajn komprenebla interveno, kaj ne nur ilin sed ankaŭ kolombiajn politikistojn, kiel la senataninon Piedad Córdoba, kies afineco kun la gerilo —por nomi ĝin kiel eble plej milde— ankaŭ evidentiĝis per la komputilaj trovaĵoj. La tempo pasas kaj la memoro malfortiĝas. Tial estas bone rememori kelkajn alineojn el tiuj retmesaĝoj, kaj ne necesas fari plian komenton. La vortoj mem parolas, kaj la legantoj mem juĝos.

La gazeto *Semana* rivelis, en sia eldono de la 19-a de majo de 2008, memorandon subskribitan far Iván Márquez, el la Sekretariaro de la FARK, kaj kapulo de la Bloko Karibo —pri kiu oni scias ke multfoje li rifuĝas en Venezuelo— kaj Rodrigo Granda, la gerilano komisiita pri internaciaj aferoj far la FARK —kiun la prezidento Uribe estis liberiginta laŭ peto far la franca registarestro Nicolas Sarkozy—, adresitan al Manuel Marulanda kaj ceteraj anoj el la Sekretariaro, raportinte interparolon en la Palaco de Miraflores kun la prezidento Hugo Chávez kiam ĉi-lasto estis rajtigita far la prezidento Uribe por peri ĉe la liberigo de la ostaĝoj nomitaj interŝanĝeblaj. La retmesaĝo havas daton 12-an de novembro de 2007, kaj ĝi inkluzivas la jenajn rivelaĵojn surprizŝokajn:

Kamarado Manuel, kamaradoj Sekretariaro. Koran saluton.

Mi resumas la rezultojn de la du kunsidoj kun la prezidento Chávez en Miraflores:

1. Li aprobis tute kaj senpalpebrume la peton (300)¹. Li

¹ Oni komprenas, laŭ la kutima terminaro de la gerilo, kaj laŭ aliaj ĉi-rilataj retmesaĝoj, ke temas pri 300 milionoj da dolaroj.

komisiis tion ĉi-rilatan al Rodríguez Chacín, kiu jam faris interesajn proponojn. Tiun ĉi temon mi disvolvos poste.

2. (...) bezonas havi ĉe-mane la pruvajojn pri supervivo jam menditaj far la kamarado Manuel. Kun ili li asperas alveni al Sarkozy. Li estas certa ke li atingos infuigi Sarkozy sur Bush por ke ĉi-lastata ordonu al Uribe permesi la kunsidon (...) Chávez estas tre entuziasma. Li diras ke li deziras la foton kun Marulanda. Jam li havas foton kun Vo Nguyen Giap, kaj al Fidel li proponos vestiĝi denove per la uniformo por kapti tian foton. Chávez kaj Piedad atribuas al la pruvajoj pri supervivo sencon preskaŭ strategian: unuflanke la pruvajoj impresos pozitive en la ŝlosilan referendumon farotan la 2-an de decembro en Venezuelo. Ni bezonas unu la alian. La kunsido en Yarí donos pri Chávez kaj pri la FARK kontinentan kaj mondan diskonigon. Kaj precipe pri Chávez diskonigon kiel internacia gvidanto.

(...) Piedad estas ekster si pro ĝojo. Ŝi akordas plene pri la Bolivara Platformo por la Nova Kolombio kaj pri la Manifesto. Pli bone dirite, ŝi estas la kandidatino de Chávez, kaj, se ni tiel decidus, ankaŭ de ni.

3. Okaze ke atingi la interparolo kun la kamarado Manuel, Chávez proponas jenon: a) Ke ni faru unuflankan liberigon, ekzemple de la virinoj (sen Ingrid) kiuj, mi kredas, estas du, tiu de Ujlao kaj Clara kun sia filo. (...) Chávez diris ke li estas preta ricevi la elprizonigitajn gerilanojn, doni al ili laboron, teron, instruon, sanzorgon, kaj ke se ili volus foriri, ke foriru.
4. Chávez ricevis pozitive nian peton agnoski nin, kaj li faros pledpremon por ke Ekvadoro, Bolivio, Nikaragvo, Argentino agu same, landoj kiuj fakte nin rekonas kiel politikaj agantoj. Tion li same proponos al Sarkozy kaj al Hispanio, landoj kiuj havas nin en la listo de teroristoj. Rilate al Svislando ne ekzistas problemo. Li klopodos ke la Nealiancistaj Ŝtatoj deklaru samopinie. Atinginte tion, pordoj malfermiĝos por reprezentado de FARK en ĉiuj tiuj landoj.
5. (...) En la dua kunsido, petita far Chávez, en malsamaj momentoj ni kunvenis kun Gabino kaj Antonio¹, poste, en la

¹ Ĉefaj estroj de la NLA (paĝoj 4-a,5-a), ankaŭ ofte situantaj en Venezuelo.

oficejo de la prezidento ni kunsidis kun Chávez, Piedad kaj Iván. Kiel mi diris, ŝi estas ene de la balotelektaj kalkuloj por 2010.

6. Post prezenti nin fronte al ĵurnalistaro ĉe la perono de la Palaco de Miraflores, fakto taksita kiel eksterordinara trakto al ribelanta movado. Ni kunsidis la sekvintan tagon kun Piedad. Flanke de la FARK ĉeestis Ricardo, Santrich kaj Iván, kaj de tempo al tempo Lucía. Resume, Piedad apogas kion ki diras. Ŝi sendas tre specialan saluton al la kamarado Manuel, al Jorge kaj al la ceteraj el la Sekretariaro. Ŝi ne deziras resti ekster la pintkunveno en Yari. (...)
7. Petite far Chávez, ni kunvenis en nia bunkro de la Fortikaĵo Tiuna kun Gabino kaj Antonio en malstreĉita kaj frata etoso.
8. Dum nia eliro por ĉi tie, ni parolis iomete kun la generalo Rangel Silva, ĉefo de la DISIP, granda amiko de Timo¹, kiun li deziras viziti post la 2-a de decembro. Li partoprenis en la tagmanĝo en kiu kunsidis Chávez, elenos², kaj ni FARK. Li estas komisiita pri la sekureco de la elenos.
9. Rodrigo Chacín estas solidulo de Chávez, fakte li estras aŭ ordigas la sekurecon de la Ŝtato. Por efikigi la 1-an alineon, Chávez komisiis lin. Li jam proponis sistemon por ricevi la aŭstralianojn ĉe la Orinoko. Iom post iom ni alproksimigis lin al nia sinteno.
10. La rilatoj kun la armeo estas tre proksimaj al tiaj proponitaj en la Strategia Plano. Ni havas amikecon kaj multon da samsenteco kun almenaŭ kvin generaloj. Eĉ pli, fronte al mi Chávez donis instrukcion krei ĉe la landlimo ripozejojn kaj malsanul-flegejojn kaj nomumis specon de Stabo por ĉi tiuj rilatoj. Ili jam demandas nin pri kie ni sugestas instali ilin. Chávez subkomprenigis ke ili helpos eĉ se okazus batalado. Li diris ke se Uribe tuŝus iun delegiton de FARK, li gajnus malamikon por la tuta vivo.
11. Piedad diras ke Chávez frenezigas la prezidenton Uribe. Ĉi-lasto ne scias kion fari. (...)
12. Ni restas atendantaj la pruvojn pri supervivo. Tio urĝas. Mi restigis Ricardo-n QAP³ por ke ricevinte ilin, tuj li portu ilin

¹ La alinomita *Timochenko*, de la Sekretariaro de la FARK, kaŝiĝinta en Venezuelo.

² NT Vidu la 2-an piednoton de la 62-a paĝo.

³ NT Literaro el Q-kodo, pri pretenco por aŭskulti, populare uzita kiel “preta”.

persone al Karakaso. Ni povas preni ilin en Bogoto. La junulino estas preta. Kun Chávez estas granda samsenteco. Mi kredas ke ni atingis pli bonan takson pri la FARK. Li estas granda amiko de Fidel, tamen li havas dubojn pri aliaj gvidantoj. Mi diris al li ke ni multe estimas Kubon, ke ĝi estas granda ekzemplo, ke nia solidareco estas senkondiĉa, tamen ke nia nordo ĉi-momente estas Karakaso. Imágu vi. Li ekrestis tre interesata pri la Kunordigantaro. Li demandis pri kiuj estas ĉekape. Inter tiuj menciitaj estis la nomo de Manuel Marulanda. Chávez sentas proksima la reapero de la Granda Kolombio¹.

Tio estas ĉio ĝisnune. Kore, Iván (Márquez) kaj Ricardo (Rodrigo Granda).

La mesaĝisto de la prezidento Correa

Pri la ekvadora registaro —kies ministro pri Sekureco, Gustavo Larrea, poste konfesis esti kunsidinta kun Raúl Reyes— kaj ĝia bonvola siteno rilate al la FARK, la rivelajoj ne estas malpli grandaj.

En retmesaĝo datumita en januaro de 2008, Raúl Reyes faras la jenan raporton al siaj kolegoj de la Sekretariaro pri kunsido kun la menciita ministro Larrea:

Kamaradoj de la Sekretariaro. Fratan saluton.

(...)

2. Ni akceptis viziton de la ministro pri Sekureco de Ekvadoro, Gustavo Larrea, ĉi-nomota Juan, kiu nome de la prezidento Correa alportis saluton por la Sekretariaro kaj la kamarado Manuel. Li eldiris jenon:

1. Intereso de la prezidento oficialigi la rilatojn kun la estraro de la fark, pere de Juan.
2. Preteco kunordigi sociajn agojn helpe al la loĝantoj de la landlima linio. Interŝanĝo de informo kaj kontraŭstaro al la paramilitista deliktado en lia

¹ NT Ŝtato kiu ekzistis dum 1819-1831 etendiĝinta sur la hodiaŭaj teritorioj de Kolombio, Panamo, Venezuelo kaj Ekvadoro.

teritorio.

3. Ili estas pretaj ŝanĝi iujn ajn ordonantojn el la publiksekuriga agentaro kiuj havas malamikemajn kondutojn fronte al la civilaj komunumoj de la areo pri kiu ili petas nian informan alpotajon.
4. Ili konfirmas sian politikan decidon ne partopreni en la internan konflikton de Kolombio per apogo al la registaro de Uribe. Por ili la FARK estas ribelanta organizaĵo de la popolo kun sociaj kaj politikaj proponoj kiujn ĉi-lasta komprenas.
5. Ili demandas ĉu politike interesas nin la agnosko pri miltrajteco. Ili kunesprimas la dirojn de Chávez pri tiu ĉi temo.
6. Ili plendos kontraŭ la Ŝtato kaj Registaro de Kolombio ĉe la Internacia Puna Kortumo pro la efikoj damaĝaj de la fumizoj de la Plano Kolombio.
7. La venonta jaro oni ĉesigos la usonan rajton sur la bazo Manta.
8. Ili intencas pliigi siajn komercajn kaj politikajn rilatojn precipe kun Azio, Ĉinio, Vjetnamio kaj Nord-Koreio.
9. Ilia regada programo direktiĝas al la kreado de la socialismaj bazoj, por kio ili donas specialan gravecon al la Nacia Konstitucia Asembleo.
10. Ili ofertas sian helpon por la luktado de la FARK, por la humana interŝanĝo¹ kaj politikaj solvoj. Ili havas klare ke Uribe reprezentas la interesiĝojn de la Blanka Domo, la transnaciaj firmaoj kaj la oligarkoj, ili konsideras lin danĝera en la regiono.
11. Ili petas el nia ĉefo kaj el la Sekretariaro kontribuon kiu impulsu sian agadon favore al la interŝanĝo, kio povas esti transdoni al la prezidento Correa la filon² de la profesoro Moncayo aŭ io kiu ebligu pliaktivigi sian politikan laboron.
12. Ili donus legitimilon kaj protekton al unu el ni, por ke tiu faru en ilia lando laboro de rilatigoj, laboro kiu

¹ NT Vidu la 2-an piednoton de la 63-a paĝo.

² NT Pablo Emilio Moncayo, ostaĝigita en 1997, liberigita la 30-an de marto de 2010.

laŭ ilia opinio devas esti diskreta pro risko de kapto aŭ murdo far agentoj de Uribe.

13. Ni lasis starigitaj formoj de komunikado kaj eblo kunsidi pluan fojon post unu aŭ du monatoj por sekvi la temojn kaj pliprofondiĝi pri ili. Ĝis tie ĉi la interparolo kun Juan.

Ni klarigis nian politikon pri landlimoj, nian interesigon pri la politikaj rilatoj kun lia registaro, la grevecon de la agnosko pri nia militrajteco¹, nian devontigon pri la interŝanĝo kaj la politikaj solvoj al la kolombia krizo.

Ni dankis liajn oferojn kaj apogon en la misio organizita far Chávez. Pri lia peto ni diris ke apartenas al la Sekretariaro respondi poste.

Brakumon, Raúl.

Unu monaton poste, en februaro de 2008, Reyes refoje resumas al siaj kolegoj interparolon kun la ministro Larrea:

Kamaradoj de la Sekretariaro. Koran saluton.

(...)

2. Mi resumas proksimdatan interparolon kun mesaĝisto de la prezidento Correa:
 - a. Li petas paroli persone kun la Sekretariaro en Kito. Li ofertas garantiojn kaj transporton elde la landlimo ĝis la renkontiĝloko.
 - b. Li atendas nian respondon kel eble plej baldaŭan en kiu ni fiksu la daton.
 - c. Li demandas ĉu ni deziras fari tion apogitaj sur la armeanoj aŭ sur lia ministro pri Ŝtata Sekureco.
 - d. Li deziras paroli kun la FARK pri la humana interkonsento, la politiko pri landlimoj, la politika solvo, Ingrid kaj la rolo de Chávez. Li deziras starigi kunordigojn kun ni pri la dulanda landlimo.
 - e. Li deziras klarigi la celojn de la Plano Ekvadoro per kiu li intencas rezisti la damaĝajn efikojn de la Plano

¹ NT Per “Militrajteco” mi nomas la statuson agnoskebla far la jura leĝaro, kiu en angla lingvo korespondas al “Belligerency” kaj en la hispana: “Beligerancia”.

- Kolombio, kiun li aplikos en la landlima linio.
- f. Cele al la Plano Ekvadoro, li petas al ni kursojn pri organizado de homamasoj por idiĝenoj de la landlimo, kiuj poste estos komisiitaj far la registaro por kunordigi kun la FARK la landliman laboron. Kun la avantaĝo ke parto el tiu popolo apartenas al la Kaŝa Partio aŭ partoprenas en la Dunacia Komitato direktita far la 48-a Frronto.
 - g. Li insistas pri sia interesiĝo kontribui rilate la interŝanĝon de malliberigitaj, por kio li petas la liberigon de la filo de Moncayo aŭ alia malliberigito.
 - h. En la parto pri la invito, ni ĝin dankis kaj klarigis ke tiaj decidoj koncernas la Sekretariaron kaj necesas kelke da tempo por ĝia decido. Ni lasis komprenigis klare nian interesiĝon kontribui en la laboro plifratigi nin ĉe la landlimo, koherece kun nia politiko klarigita en la Bolivara Platformo, la Manifesto kaj ceteraj dokumentoj de la Sekretariaro.

(...)

Tio estas ĉio. Brakumon, Raúl.

Lastaj rivelajoj

Ĉe la finiĝo de februaro kaj komenciĝo de marto de 2009, la Armitaj Fortoj ellasis strategian frapon al la FARK, kiam ili malaktivigis la ordonantaran strukturon de la Urba Reto Antonio Nariño (RUAN), kiu intencis fari serion de atencoj en la respublika ĉefurbo. Tiam estis senvivigitaj la alinomitaj *Gaitán* kaj *Mariana Páez*, kaj estis kaptita la alinomita *Negro Antonio*, en operaco pri kiun mi pritraktos poste pli detale pro ĝia aparta graveco.

Kiam mankis malmultaj tagoj por la finiĝo de mia tempo kiel ministro pri Defendado, meze de majo tiujare, la generalo Óscar Naranjo, ĝenerala direktoro de la Polico, informis min ke estis tre progresigitaj la laboroj de informiĝo por trovi la situon de la virino kiu, en Bogoto, estis komisiita por reorganizi la grupetojn de tiu reto, kaj prepari atencojn kiuj frapu la spiritfortikecon de la bogotanoj. Fakte, la 30-a de

majo de 2009, unu semajno post mia elficiĝo, la Nacia Polico disdonis al la lando la pozitivan raporton pri ke la policistoj kaptis en la subdistrikto Suba, en Bogoto, la alinomitan *Camila* aŭ *Patricia*, kiu laŭ eltrovite estis pli grava ol kiom oni pensis, kiel oni sciis poste, kiam oni ekkonis la dosierojn kiujn ŝi konservis en tri komputiloj kaj pluraj poŝmemoriloj konfiskitaj en la loĝejo kie ŝi estis kaŝiĝinta.

Camila ne estis iu plia simpla bandanino ene de la FARK, sed konfidinda rilatantino de la Mono Jojoy kun la terorismaj grupetoj de lia organizaĵo en Bogoto, kiu eble engaĝiĝis en atencojn frustritajn kontraŭ la prezidento Uribe, kiam ĉi-lastata estis kandidato al prezidenteco; en la murdon de la komandanto de la Kvara Divizio de la Armeo, generalo Carlos Julio Gil Colorado; en atencojn kontraŭ la tiama senatano Germán Vargas Lleras kaj la tiama prezidanto de la Nacia Federaĵo de Brutobredistoj, Jorge Visbal Martelo, kaj en la valizo-bombon kiu eksplodis en Residencias Tequendama¹, en la internacia centro de la Urbo, inter multaj aliaj teroragoj. Kiam oni ŝin kaptis ŝi estis okupiĝanta pri informiĝo pri celojn en la ĉefurbo, kiel ministrejoj kaj aliaj ŝtataj institucioj. Ŝiaj komputiloj enhavis preskaŭ tiom da informoj kiom tiuj de Raúl Reyes, kaj la enketistoj el la Polico kaj la Prokurorejo eĉ nun nur komencas kompreni ties enhavon.

Neniu antaŭimadis ke la kapto de tiu virino estis alportonta novajn rivelaĵojn pri la dorna temo de la rilatoj inter la FARK kaj la registaro de Rafael Correa, tamen la informo aperas multfoje tie kie oni des malpli esperas. Videajo trovita en la komputilo de Camila, kaj diskonigita al la mondo far la novaĵagentejo AP al 17-an de julio de 2009, iĝis nova kaŭzo por skandalo. Post la trovo de la kompromita informo en la retmesaĝoj de Raúl Reyes, tiam aperis ene de ŝiaj dosieroj plia aĵo kiu ŝajnis konfirmi ĝin: ne malpli ol registraĵo en video de la Mono Jojoy, parolanta al centoj da siaj homoj en la ĝangalo, kie la terorisma ĉefo legas leteron de Manuel

¹ NT Hotelo en Bogoto.

Marulanda kaj sciigas la afliktitajn gerilanojn pri la morto de ilia supera gvidanto.

En la letero, skribita en marto de 2008, en dato posta ol la Operaco Fenikso, Marulanda bedaŭris ke, per la konfisko de la komputiloj de Raúl Reyes, “la sekretoj de la FARK estas tute perditaj”, kaj faras detalan liston —kiun Jojoy legas al siaj homoj en la vieaĵo— de pluraj el tiuj sekretoj, citante, inter ili, la “helpo per dolaroj al la kampanjo de Correa kaj postaj interparoladoj kun liaj mesaĝistoj, inkluzive de kelkaj interkonsentoj, laŭ dokumentoj kiujn ni ĉiuj posedas, interkonsentoj tre kompromitaj pri niaj rilatoj kun la amikoj”.

Tiu ĉi rivelaĵo, en voĉo de Jojoy mem venis por sumiĝi al retmesaĝoj kiuj estis jam konitaj monatojn antaŭe, trovitaj en la komputilo de Reyes, en kiuj oni menciis kolektadon faritan inter la pluraj blokoj de la FARK por “la helpo al la amikoj el Ekvadoro”, mesaĝoj kiuj bone resumiĝas per la jena mesaĝo sendita far Reyes al la anoj el la Sekretariaro la 14-an de oktobro de 2006:

“La 13-an ĉi-monate mi interparolis plian fojon kun la kolonelo Brito kaj la kuracisto Ayala¹. Mi transdonis la salutojn el la ĉefo kaj el la Sekretariaro, dezirante al ili sukceson por la tago de la elektado, kaj la decidon alporti al ili 100.000 dolarojn, plus la preteco kontribui per la instigo al la popolo de la landlimo voĉdoni por ili. Tuj mi faris transdonon de la menciita kvanto al la kolonelo, kiu emocie dankis en la nomo de la kandidato Rafel Correa kaj petis al mi transdoni siajn salutojn al la Kamarado kaj al la Sekretariaro. Édgar faris al mi la pruntedonon². Amikoj de la 48-a fronto fari kolektadon de pliaj 300.000 dolaroj por la sama kampanjo”.

Laŭ informo publikigita far la ĵurnalo *El País*, el Hispanio, “dum la sekvintaj tagoj, la ununura konto malfermita far

¹ Temas pri la (eksa) ekvadora kolonelo Jorge Brito, kaj laŭŝajne pri la dentisto Luis Eduardo Ayala, murdita en aprilo de 2008.

² Temas pri Édgar Tovar, kapulo de la 48-a fronto, kiu mastras la negocon de narkotaĵkomerco ĉe la landlima zono inter Kolombio kaj Ekvadoro.

Alianza País¹ en la Banko de Machala registris enkasigoj de kontantaĵo kun totalo da 487.848 dolaroj, laŭ informo de la elektadaj aŭtoritatoj. Cetere, la revizorado farita al la elspezoj de la kampanjo, publikigita far la ĵurnalo *El Comercio*, ne kapablis determini la originon de 412.000 dolaroj elspezitaj far Alianza País en la dua elektado, okazigita la 26-an de novembro kaj kiu donis al Correa la prezidentecon².

Du semajnojn post la publika dissendo de la videaĵo de Jojoy, kiun la kolombia registaro liveris por ĝia esploro al Interpol kaj al la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj, la 29-an de julio de 2009, la ministro pri Eksterlandaj Rilatoj de Ekvadoro, Fander Falconí, kaj la ministro pri Internaj Aferoj tiulanda, Gustavo Jalkh, anoncis en ĵurnalistara intervjuo ke alvenis “en manojn de la (ekvadora) registaro” 20-paĝa manskribita dokumento, kiu ŝajnis esti taglibro de la kapulo de la FARK Raúl Reyes, enhavanta registrojn pri liaj agoj kaj meditoj inter la 9-a de septembro kaj la 2-a de decembro de 2007, al kiu la registaro atribuis “nek verecon nek falsecon”, kaj kiu ankaŭ sendis al la OAS.

En la traglibro supozita de Reyes, li mecias kunsidojn kaj kontaktojn kun la tiama ministro pri Sekureco de Ekvadoro, Gustavo Larrea; kun la eksa subsekretario de la registaro Ignacio Chauvín, kun la kolonelo Brito kaj la kuracisto Ayala, inter aliaj mesaĝistoj kun kiuj li havis interparoleblon. Li eĉ diras “Fidi je Correa estis memmortigo. Ĉiuj alportajoj por la kampanjo de Correa ne utilis por fekaĵeto”, kio konfirmus la sendo de monrimedoj far la FARK al la kampanjo de la nuna ekvadora prezidento.³

¹ NT “Alianza País” estas politika movado de la ekvadora prezidento Rafael Correa.

² Maité Rico. “El dinero perdido de las FARC” (“La perdita mono de la FARK”). *El País*, 1-a de aŭgusto de 2009.

³ En oktobro de 2009, la ekvadoraj aŭtoritatoj kaptis tiulandan civitanon, 65-jara sociologo, Julio César Vizuete Larrea, kiu konfesis esti la aŭtoro de la taglibroj supozitaj de Reyes. Laŭ li, ĝi korespondis al fidindaj notoj pri vortoj esprimitaj far Reyes en sia tendaro, dum intervjuoj faritaj por skribi biografion pri la gerilano.

Rafael Correa, siaflanke, montris sian publikan indignon pro la revelo de la videaĵo, li ĵuris ke li ne konas nek iam ajn havis kontakton kun iu ano de la FARK, kaj li diris ke se tiu ĉi grupo liveris monon al liaj supozitaj mesaĝistoj, tiu mono neniam alvenis al lia kampanjo kaj ke eble tio estis pli ĝuste iu trompoŝtelo al la gerilo.

Post esti konitaj la retmesaĝoj el la komputilo de Reyes, kaj la videaĵo el la komputilo de Camila, same kiel la teksto de la taglibro supozita de Reyes, kiuj estis dissenditaj far la ĉefaj naciaj kaj internaciaj amaskomunikiloj, ĉu ekzistas iu kiu ankoraŭ sin demandas kial, meze de polica kaj arma operaco jam disvolviĝanta, estis aprobita direkta atako kontraŭ la tendaro de Reyes en Angostura? Mi multe timas ke se ni ne estus agintaj tiel kiel ni faris, eĉ hodiaŭ ni estus suferantaj la ofendojn, agresojn kaj atencojn far tiu kapulo, kiu estus fortikaspekta, tre vizitita kaj ĝuanta bonegan sanon.

ĈAPITRO 27-a

La laŭleĝa defendo

La 2-an de marto de 2008, la tagon post la operaco kiu metis finon al la alinomita Raul Reyes, kaj en kiu oni konfiskis la famajn komputilojn kiuj rivelis la internacian strategion de la FARK, la kolombia Ministerio pri Eksteraj Aferoj elsendis etan komunikaĵon dum ĝi pretigis definitivan respondon al la plendoj de Ekvadoro. Laŭ la Ministerio pri Eksteraj Aferoj “ni unue diras ke Kolombio ne enrompis suverenecon sed ĝi agis laŭ la principo de laŭleĝa defendo. La teroristoj, inter ili Raúl Reyes, kutimas murdi en Kolombio kaj invadi teritorion de la najbaraj landoj por rifuĝi. Multfoje Kolombio suferadas tiajn situaciojn kiajn ni estas devigitaj eviti por defendi niajn kunlandanojn”.

Poste, dum la rememorigita pintkunveno de ŝtatestroj de la Rio-grupo¹, en Sankta Domingo, kunvokita por pritrakti la kompleksan situacion ekzistintan inter Kolombio kaj Venezuelo, Ekvadoro kaj Nikaragvo, sekve de la bombado en Angostura, la prezidento Uribe mem deklaris, en sia interveno kiun multaj ni kolombianoj atentis emocie kaj fiere:

“Mi miras ke oni parolis dum ĉi tiuj tagoj pri la kolombia

¹ NT Interkonsulta grupiĝo de pluraj ŝtatoj de Latinameriko: Argentino, Belizo, Bolivio, Brazilo, Ĉilio, Dominika Respubliko, Ekvadoro, Gujano, Gvatemalo, Haitio, Honduro, Kolombio, Kostariko, Kubo, Meksiko, Nikaragvo, Panamo, Paragvajo, Peruo, Salvadoro, Urugvajo kaj Venezuelo.

trudeniro en teritorion de Ekvadoro sed tamen oni ne parolas pri la konstantaj atakoj far la FARK elde la ekvadora teritorio al la kolombia popolo”

“Mi miras ke oni parolas pri la enrompo de la suvereneco al la teritorio de Ekvadoro sed tamen ne pri la enrompo de la la suvereneco al la kolombia popolo kiu estas posedanto de la rajto de iu ajn popolo en la mondo, la rajto al sia sekureco. (...)”

“Kion vi opinias? Mi ne povas akcepti tion, ke la laŭleĝa rajto de la kolombia Ŝtato kontraŭbatali tiom grandan teroriston estu prezentata kvazaŭ amasmurdo kontraŭ kelkaj ĉefanĝeloj dormintaj en pijamo”.

Kiel ministro pri Defendado mi ne inventis la tezon de la laŭleĝa defendo, nek estis mi la unua kiu perargumentis ĝin koncerne la bombadon de la tendaro de Reyes, sed ja mi estas certa ke ĝi havas perfektan aplikon en tiu ĉi okazaĵo. Kaj necesas klarigi —ĉar foje kelkuloj pretendas egaligi ilin— ke ĝi ne estas la sama tezo de la preventiva milito de Bush. Ne temas pri milita ago anticipa manke de reala agreso, bazita sur nuraj suspektoj. Ĝi estas io tre malsama: ĝi estas la sindefendo de Laŭleĝa Ŝtato kontraŭ la konstantaj atakoj de terorisma organizaĵo kiu senĉese sturmas ĝian civilan popolon, kiu sen ia distingo perfortas la vivon, la homan dignon kaj la liberecon de viroj, virinoj kaj infanoj. Nei tiun fundamentan rajton al la kolombia Ŝtato signifus fordoni la kolombiajn civitanojn al la malhumanaj atakoj de iliaj agresantoj, kaj ellasi liberan rolon al eblaj komplikiĝoj trans la landlimoj.

Tial, kiam unu jaron poste oni faris demandon al mi dum intervjuo, okaze de la unua datreveno de la Operaco Fenikso, mi diris jenon:

“Bati teroristojn kiuj sisteme atencas kontraŭ la popolo de lando, kvankam tiuj ne troviĝas ene de ĝia teritorio, estas ago de laŭleĝa defendo, kaj doktrino ĉiufoje pli aprobata far la internaciaj komunumo kaj leĝaro”.

Tiu ĉi ne estis militdeklaro nek minaco, kiel volis pensigi la du najbaraj registarestroj jam menciitaj, kiuj eliris furiozaj por rifuzi miajn vortojn. Temis pri simpla konstato pri internacia jura doktrino kiu multe koncernas la agon de Kolombio kaj ĝia publiksekuriga agentaro la 1-an de marto de 2008.

La nuntempa internacia doktrino

La analizistoj pri la temo en la kampo de la internacia juro ekdiskutas pri la rajto de iu Ŝtato agi en laŭleĝa sindefendo, eĉ se tio kontraŭdiras la principon de teritorieco, kiam alia Ŝtato toleras la eneston de terorismaj fortoj en sia teritorio kiuj atakas la unuan Ŝtaton.

La fakulo pri internacia juro Matthias Herdegen, doktoro pri juro de la Universitato de Heidelberg, kaj direktoro de la Instituto por Internacia Juro kaj de la Instituto por Publika Leĝo de la Universitato de Bonn, aŭtoritatulo respektata tiom en Eŭropo kiom en Ameriko, pritraktas la aferon en sia prestiĝa libro —tradukita hispanen en 2005— *Derecho Internacional Público (Publika Internacia Juro)*¹:

“La Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj”, diras la profesoro Herdegen, “ligas la rajton sindefendi kun la ekzisto de armita atako.² (...)”

“Iu ‘armita atako’ povas eliri ankaŭ el terorisma organizaĵo ne-ŝtata, kiam iu Ŝtato, per sia nura toleremo, garantias en sia teritorio agadkampon al tiu organizaĵo. Tiam, ne temas necese pri ‘armita atako’ far la Ŝtato kiu toleras la enesto. Tamen, tiu Ŝtato devas allasi en sia teritorio la agojn ligitajn kun la rajto al memdefendo, laŭ la 51-a artikolo de la Ĉarto de la UN. Tio ĉi ankaŭ aplikeblas kiam la Ŝtato malaprobas la

¹ Herdegen. Matthias. *Derecho Internacional Público*, Universitato Nacia Aŭtonoma Meksika, Meksiko, 2005, paĝoj 255-a kaj 258-a.

² Artikolo 51-a de la Ĉarto de la UN: “Neniu normo de ĉi tiu Ĉarto malpliigas la naturdonitan rajton je justa defendo, individua aŭ kolektiva en okazo de armita atako kontraŭ iu membro de la Unuiĝintaj Nacioj (...)”.

eneston de iu terorisma organizaĵo en sia teritorio, sed tamen ne kontraŭbatalas ĝin efektive. Ĉi-okaze, la Ŝtatoj kiuj estis celoj de amasaj terorismaj atakoj povas atingi pravigon per apelacio al la endanĝerigita stato (..)”.

La profesoro Herdegen ankaŭ emfazas la kvalifikon de la terorismaj agoj de la 11-a de septembro de 2001 kiel “armita atako”, justigante la memdefendo, flanke de la Konsilio de Sekureco de la UN kaj same flanke de la NATO. Temas, do, pri agnoskita koncepto en la hodiaŭa internacia komunumo.

Alia fakulo pri la afero, Frank M. Walsh, doktoro pri Juro de la Centro pri Juro de la Universitato de Georgetown, publikigis proksimdate substancan pritraktaĵon temantan pri la okazaĵo de la kolombia atako al la tendaro de Raúl Reyes en Ekvadoro¹. Post analizi diversajn kialojn kaj proponi novan paradigmon por la efektivigo de la rajto al sindefendo de la nacioj, Walsh konkludas jene (la traduko² estas mia):

“Unu el la plej grandaj trompiĝoj en la pensajaro pri internaciaj rilatoj estas la ideo ke, se iu Ŝtato faras nenion, do nenio malbona okazos al tiu Ŝtato. La historio pruvadis ke ĝuste la kontraŭo estas la fakto. Se Kolombio estus decidinta ne ekfari la Operacon Fenikson, tiuokaze Raúl Reyes ankoraŭ estus kunordiganta la teroragojn de la FARC kaj ekvadoraj oficialuloj ankoraŭ estus kunlaborantaj kun la FARC. Kolombio, Ekvadoro, kaj la tuta Anda montoĉeno estus malpli sekura.”

“El pure leĝa perspektivo, Operacio Fenikso proponas al la internaciaj juristoj okazon por akordigi kelkajn internaciajn principojn kiuj estas ofte en streĉiteco. La ideoj de teritoria

¹ Walsh, Frank M., *Rethinking the legality of Colombia's Attack on the FARC in Ecuador: a new paradigm in balancing territorial integrity, self-defense and the duties of sovereignty*. (“Rekonsiderante la laŭleĝeco de kolombia atako kontraŭ la FARC en Ekvadoro: nova paradigmo por ekvilibrigi teritorian integrecon, sindefendon kaj la rajtoj de suvereneco”). *Pace International Law Review*. Vol. 21:137, 2009. Paĝoj 137-161.

² NT Tion diras la verkisto pri sia traduko el la angla en la hispanan. Tamen, mi preferis traduki en Esperanton el la originala angla teksto (trovita en Interreto).

integreco, sindefendo, kaj la responsoj de la suvereneco funkciadis dise dum tro longa tempo. (...) Landlimoj gravas, sed ankaŭ gravas forigi la terorisman minacon. Esperinde, historio registros ke la unua kritiko pri la Operacio Fenikso riveligiĝis esti neperfekta juĝo bazita sur nekompletaj faktoj. Ĉi tiel, aeratako en la profundo de la amazonia regiono povus montriĝi esti la katalizilo por la agnosko de pli nuancita rajton al sindefendo kia ekipu la naciojn de la mondo per la leĝaj iloj necesaj por kontraŭbatali terorismon kie ajn ĝi povas kaŝiĝi.”

“Kolombio faris defendon de la homaro”

Okaze de arestodekreto liverita kontraŭ mi far ekvadora juĝisto de la provinco Sucumbios, pro mia responso en la decido ataki la tendaron de Raúl Reyes en Angostura, la prezidento Álvaro Uribe esprimis al mi sian noblan kaj senkondiĉan apogon, kaj eldiris frazon, la 30-an de junio de 2009, kiu tre bone resumas la koncepton implicita far la Operaco Fenikso:

“Oni ne povas konfuzi la ofendon al la homaro, kio estas la ago terorisma, kun la defendo de la homaro, kio estas la agado kontraŭ la terorismo. Kolombio faris defendon de la homaro, kio estas ago kontraŭ la terorismo”.

La sekvintan tagon, 1-an de julio, la nacia registaro liveris komunikaĵon kiu finklarigis la sintenon de nialando tiurilate, en unu el kies paragrafoj estis emfazita jenon:

“La Operaco Fenikso estis fundamentita sur politika decido adoptita far la kolombia registaro, kadre de la monda lukto kontraŭ la terorismo. Dum ties disvolvo, efektiviĝis milita operaco kontraŭ taŭga celo, laŭ rigora observo pri la Internacia Humana Leĝaro”.

La historio eldiros sian verdikton. Dume, no povas aserti ke la malaktivigo de Raúl Reyes, dua homo en la ordonanta strukturo de la FARK post Marulanda —mortonta 25 tagojn

poste—, kaj la konfisko de liaj komputiloj, estis la plej forta frapo kiu iam estis ellasita al la kapo de tiu ĉi organizaĵo kaj al ĝia reto de eksterlandaj kunakordantoj.

PERFIDOJ KAJ DIZERTOJ

*Estis Antjokio de ministoj fortaj,
mulistoj nevenkeblaj,
de muskoloj levantaj la estontecon
kvazaŭ vergon el vimen',
Unu raso alfrontanta la montaron
per ia rifa firmec'.*

Jorge Robledo Ortiz¹

El lia poemo “Des pli bone ke jam mortis la geavoj”

¹ NT Kolombia poeto (1917-1990).

ĈAPITRO 28-a

Teroro en la teroj de la koloniado

Meze de la 19-a jarcento, ĉe la krutaj pintoj de la centra montoĉeno de Kolombio, oni travivis epopeindan procezon kiu ŝanĝis la trajtaron de la lando. Kompletaj familioj, serĉante pli bonajn horizontojn kaj novajn terenojn, ekvojaĝis el la teritorio de Antjokio suden, en longaj karavanoj de mulinoj ŝarĝitaj per kofroj, kaj iom post iom instaligis en vilaĝetoj situantaj en lokoj neeblaj, meze de majestaj pejzaĝoj, kie ili setlis kaj eksemis kultivaĵojn taŭgajn por monta areo, kiel kafon. Tio estas la historio de la antjokia koloniado¹ kiu portis progreson kaj viklecon al la departementoj kiuj iam kunformis la Antikvan Kaldason², kaj kiuj hodiaŭ estas parto el tiu kafprodukta akso, simbolo kaj fiero de Kolombio.

La koloniintoj travivis labortagojn da kuraĝo kiuj tradukiĝis en popolojn el mulistoj kaj kafkultivistoj kiuj ne senkuraĝiĝas antaŭ la malfacilaĵoj kaj kiuj igis el sia regiono unu el la plej prosperaj de la lando. Dum tiu procezo, unu urbo ĉe la sudo de Antjokio, Sonsón, atingis apartan gravecon kaj iam iĝis la dua municipo de tiu departemento post Medeĝino, pro tio, ke ĝi estis la centro disvastiganta kaj

¹ NT En Kolombio oni nomas tiun procezon la "antjokia koloniado" kvankam la koloniintoj ne estis eksterlanda gento sed eksterregiona gento samlanda.

² NT La "Antikva Kaldaso" ampleksis teritorion kiu, post 1966, fariĝis la nuntempaj departementoj: Kaldaso, Kindio kaj Risaraldo.

provizanta de la tuta procezo de koloniado. Sonsón ludis gravegan ekonomian rolon dum la 19-a jarcento kaj ankoraŭ ĝi konservas la ĉarmon de la pajsaj¹ kolonia arkitekturo, kiu disvastiĝis tra la tuta kafprodukta regiono.

Kune kun Sonsón, aliaj municipoj de la sudoriento de Antjokio kaj de la nordoriento de Kaldasoj, formas teksaĵon komunan el kutimoj kaj laboremo, heredantoj de la koloniada epepeindaĵo. Urboj kiel Nariño kaj Argelia en Antjokio, kaj Aguadas, Pácora, Salamina, Marulanda, Manzanares, Pensilvania, Marquetalia, Samaná, Vicoria kaj Norcasia en Kaldasoj, enfiksitaĵoj inter verdaj montetoj, apartigitaj per ravinoj kaj abismoj kiujn iam transiris bravaj prapatroj, devus esti historiaj kaj turismaj trezoroj, kie ni kolombianoj rekreus unu el la plej belegaj paĝoj de nia disvolviĝo kiel nacio.

Malfeliĉe, la FARK ne konas pri historio nek respektas tradiciojn, kaj transformis tiun regionon, ekde komencoj de la 1990-aj jaroj ĝis tre proksimdata tempo, en pulvejon prisemitan per kontraŭhomaj minoj, kun vilaĝoj detruitaj per bomboj el gasbotelegoj, kaj popolo markita per la timo, popolo kiu parte fine delokiĝis al ĉefaj urbaj centroj kiel Medeĝino aŭ Manizales por fuĝi el la terorisma violento.

La 47 fronto, kiu dum pluraj jaroj estis sub komando de sangavida kapulino, konita per la alinomo *Karina*, ano de la Nordokcidenta Bloko de la FARK, Bloko gvidita far la ano de la sekretariaro Iván Ríos, estis la ĉefa kaŭzanto de tia terursonĝo por tiuj partoj el Antjokio kaj Kaldasoj, el kia nur nun ekvekiĝas.

Cele krei kaj konservi movebligan irejon por la drogo inter la centra regiono de la lando kaj la Pacifika oceano, tiu fronto ruinigis vilaĝojn per nekredebla krueleco. Malgraŭ la tempopaso, daŭras vivecaj en la kolektiva memoro la sieĝoj de Pueblo Nuevo, en la municipo Pensilvania en 1995; de

¹ NT Hispanlingve “paisa” adjektivo kutime uzata en Kolombio por la gento precipe el Antjokio, sed ankaŭ el la departementoj Kaldasoj, Kindio kaj Risaraldo.

Florencia kaj de Nariño en 1996; de Argelia dufoje en 1997, unue far la NLA kaj poste far la FARK; de Florencia kaj Nariño alifojeto en 1999, kaj la preskaŭ plena detruo de la vilaĝaro Arboleda en la municipo Pensilvania en la jaro 2000. En aŭgusto tiujara, Karina mem lanĉis meze de la placo de la municipa kapo de Nariño la Bolivaran Movadon, politika partio kaŝa de la FARK, hisante la flagon de sia organizaĵo je ritmo de vallenato¹. En decembro de 2002, okazis unu lasta violenta sieĝo el la vilaĝaro San Diego en la municipo Samaná.

Per teroragoj kiel tiuj, kaj profitante el la malfacila kaj labirinta tereno de la regiono, la gerilo, per sia 47-a fronto, iom post iom atingis dominan situacion en la areo, kaj la bandoj kiuj tie agadis, kun militantoj kamuflitaj kvazaŭ civiluloj, iĝis preskaŭ nerenverseblaj. Pri Karina, akuzita pri direkti aŭ partopreni plurajn el la la menciitaj sieĝoj, plus pri aliaj krimaj agoj, kiel murdoj, ĉantaĝoj kaj ostaĝigoj en aliaj partoj de Antjokio kaj Ĉokoo, oni komencis teksti legendon, ĉar temis, sendube, pri la virino kun plej granda milita povo ene de la gerilo. Oni rakontadis terurajn agojn de krueleco kaj “ekzekutoj”, kiujn la gerilanino faris frostasange, kaj tio pliiĝis ŝian mitan haloon ene de la organizaĵo.

Ekde tre frue en sia regado, en septembro de 2002, la prezidento Uribe, kiu tre bone konis la krimprofilon de Karina ekde kiam li estis departementestro de Antjokio, fiksas kiel urĝa celo ŝian kapton: “Ni bezonas la civitana kunlaboron por elliberigi la ostaĝojn kaj kapti certan sinjorinon Karina kiu direktas la FARK kaj organizas ostaĝigojn. Ĉi tion ni gajnos al ŝi”.

La ĉefo de la bloko José María Córdova, el kiu estis parto la 47-a fronto, estis la alinomita *Iván Ríos*, gerilano havinta universitatan studon, protektita kaj trejnita far Alfonso Cano, kiu pli antaŭe estis ano de la komunismaj junularoj, kaj atingis iĝi grava ano de la Sekretariaro en 2003, post esti

¹ NT Kolombia popolmuziko kiu precipe venas de la Karibea regiono.

parto de la Tema Komitato kaj de la intertraktanta grupo dum la porpaca procezo en la Kagŭano. Li estis la plej juna ano en la grupa direktado de la FARK, kaj estis ĝia reprezentanto en tiu bloko kiu agadas en Antjokio, Ĉokoo, Kordobo kaj parto de la kafprodukta akso.

Rios estis taksita far la usonaj aŭtoritatoj unu el precipaj responsuloj pri la narkotaĵkomerca agado de la FARK, kaj por lia kapto estis oferita rekompenco de ĝis kvin milionoj da dolaroj. Li regadis plurajn frontojn en sia areo de agado, tamen tiu kiu utilis al li kiel sekuriganta ringo estis la sama 47-a fronto kiu estis gvidita far Karina dum pluraj jaroj.

Rios kaj Karina iĝis, ĉiu pro sia speciala karakterizaĵo kaj sia strategia graveco ene de la organizaĵo, unua celo en la ofensivo de la registaro kaj la Armitaj Fortoj kontraŭ la FARK. Tiel restigis klare la prezidento Uribe, la 30-an de novembro de 2006, dum li finfermis en la Militista Klubo kurson de Altaj Militaj Studoj:

“Ekzistas maltrankvilo pro Iván Ríos, estrarano de la FARK, krimulo kiu verŝajne estas en la oriento de Kaldasoj kune kun la bandanino konita per la alinomo Karina”

ĈAPITRO 29-a

Bataliono en la eĝo de la montoĉeno

Meze de 2006, la laboro de la publiksekuriga agentaro kontraŭ la FARK en la sudoriento de Antjokio kaj la nordoriento de Kaldas antaŭeniris meze de malfacilaĵoj, sen la okazo de rimarkindaj rezultoj pro la disdivido de la militista penado kaj la kapablo de la gerilo kamufligi en la densa vegetaĵaro de la montoĉeno aŭ ene de la civila loĝantaro.

Tiam estis kiam la Komnadantaro de la Armeo determinis krei la Operacan Komanditaron N-ro 3, sub ordonoj de la kolonelo Emiro José Barrios, kun: kvin batalionoj el trupoj kontraŭgerilaj, la Taskoforto Drako¹, organizita per trupoj el la batalionoj Ayacucho, San Mateo kaj Cisneros, kaj la apogo per la informiĝfako, artilerio kaj aviado de la Armeo; komanditaro kiu iam ĝisatingis proksimume 1.200 homojn.

La 47-a fronto, tiame, havis ok komisiitaroj establitaj kaj organizitaj kun kaŝaj bandanoj kaj ekonomio nutrita per monrimedoj el narkotajkomerco.

La ĉefa misio de la nova Operaca Komanditaro estis malaktivigi la agadon de la fronto kiu dum preskaŭ du jardekoj ruinigis la terojn pionirajn de la antjokia koloniado kaj, kompreneble, malaktivigi la du plej fifamajn kapojn de tiu fronto: Iván Ríos, ano de la Sekretariaro, kaj Karina, kiu,

¹ NT Hispanlingve “Fuerza de Tarea Dragón”.

kvankam tiam ne plu estis ĉe la kapo de la 47-a fronto ĉar la komandantoj estis degradinta ŝin pro sendisciplineco kaj pro la ŝarĝo kiun ŝi impicis kaŭze de la konstanta armea persekuto ekzistanta kontraŭ ŝi, tamen restadis simbolo kaj mito ene de la terorisma grupo.

La unua ago de la operaca komanditaro estis la instalado de bazo en la pinto de monto strategia por la agadoj de la FARK, en la Montokresto de La Ursino¹, je 3.200 metroj de alto, preskaŭ meze de la nenio, tamen elde kie oni havis alireblon al pluraj municipoj de la areo. Tien, per helikopteroj kiuj penege kapablis transporti ilin al tiu alteco, estis portitaj dekoj da soldatoj sub la komenca komando de la kolonelo Wilson Díaz, kiuj konstruis la bazon, kaj pacience komencis kontroli kaj regi tiun areon kiu estis plurljare la strategia malantaŭejo de la 47-a fronto.

En tiu nehomtaŭga loko, en konstanta alfronto kontraŭ la FARK, kiu kredis ke la armeanoj ne rezistus tiom da tempo, komenciĝis la armea ĉeesto en terenoj kiuj plurljare estis regitaj far la gerilo. En la bazo de la montokresto estis la rivereto La Ursino², en kiu, dum longa tempo, Karina kaj siaj homoj banis sin kaj ripozis, meze de rava pejzaĝo, neniam timante ke iam alvenos la Armeo ĝis ili.

La bazo en la supro de la monto restis dum unu jaro kaj rezultigis situaciŝanĝon en la areo. Tamen, tio ne estis facila. La provizaĵojn por la soldataro oni suprenportis ĉiumonate, kaj ili devis sufiĉi por tuta tiu periodo. La armeanoj toleradis en siaj simplaj konstruaĵoj malaltajn temperaturojn, malfacilajn veterajn kondiĉojn kaj la konstantan angoron pro konscii la proskimecon de la gerilo; eĉ iufoje falis provizanta helikoptero. La viktimoj pro kontraŭhomaj minoj estis oftaj. Tamen, tiu tempo estis fundamenta por signi la finon de la 47-a fronto.

¹ NT Hispanlingve “Cuchilla de la Osa”.

² NT Hispanlingve “La Osa”.

“Ĉi tie, en silenta kaj frosta loko ...”

La 3-an de aŭgusto de 2006, samtempe kiam oficiale kreiĝis la Operacan Komanditaron N-ro 3, komenciĝis la unua el kvar operacoj realigitaj kontraŭ Ivan Ríos, ekfarita elde la areo de Pensilavia, Kaldasó. Ĝi estis nomita Ventumilo kaj engaĝis tri kontraŭgerilajn batalionojn, inkluzive de tiu postenigita en la supro de la Montokresto de La Ursino. La rezultoj ekvidiĝis. Estis la unua fojo ke ili alvenis al tendaroj kie antaŭe restis Ríos, en kiuj li, ĝis tiam loĝis en komfortaj kondiĉoj, kun bonaj proviantoj, elektrogenerilo, kuirforno gasa kaj satelita televidilo. Komencis okazi mortoj de gerilanoj kaj akceptiĝi malmobiliziĝoj, cetere oni konfiskis grandaj kvandoj da eksplodaĵoj.

La dua operaco, en oktobro samjara, estis nomita Ruĝa Oktobro, oni sciis pro konaĵoj el informiĝado, ke Ríos estis moviĝinta al la areo de Salamina, tial do la trupoj moviĝis tra Manizales kaj oni atakis la gerilon en tiu nova loko. Kelkaj gerilanoj iom ordonpovaj, ekzemple la alinomitaj *Brian* kaj *Garraseca*, malmobiliziĝis, kaj ilia informo estis fundamenta por pluirigi la persekuton kontraŭ la kapulo.

La sindevontigo de la armeanoj kiuj tagon post tago, nerimarkite far la ceteraj samlandanoj, realigas operacojn kiajn ĉi tiaj, estas nekalkulebla. Kiom da ili perdas siajn krurojn, kiom da ili mortas aŭ suferas iun alian damaĝon en sia farto, sen ke la plimulto el ni eksciui!

Mi havis la okazon koni, danke al subalternulo lia al kiu li rivelis ĝin, tekston skribitan meze de tiaj rigoraj operacoj far la tiame subkolonelo Emiro José Barrios, komandanto de la Operaca Komanditaro N-ro 3, kion mi kopias sekve, ĉar ĝi estas bona ekzemplo de la penso, la valoro kaj la sindevontigo de tiom da miloj da uniformitoj kiuj, kiel li, bataladis en la plej nehomtaŭgaj lokoj por la sekureco de la kolombianoj:

“Ĉi tie, en silenta kaj frosta loko, mi volas skribi ĉi tiujn literojn kiuj estas tio kio bone povus esti ĵuro, estas devontigo kiun mi faras fronte al la altaro de Dio kaj de mia patrolando,

ĉi tie, vere tre malproksime, en certa Kolombio kian tre malmultaj homoj konas, mi deziras akcepti la defion fordoni mian tutan homkapitalon al la servo de la kamparaj komunumoj, de la vilaĝoj, de la socio kaj speciale de tiuj malpli fortunfavoritaj. Mi surprenas la responson plubatali senripoze, akcepti riskojn kaj fari konvenajn decidojn. Mi petas al Dio nia Sinjoro, al la Sankta Spirito ke ili donu al mi la necesan saĝon por ke miaj analizoj, taksoj kaj decidoj estu direktataj al la supera bono atingi la Pacon por mia kolombia popolo. Mi deziras, senarogante, atingi honorajn postenojn ene de la militista kariero kiuj ebligu al mi, iam, ŝanĝi tute kaj por la bono de la kolombianoj la disvolviĝon de tiu konflikto kiu estas la plej profunda malbono kiun estis devigitaj alfronti la kolombianoj dum la lastaj tempoj. La nova rigardo pri la problemo estos direktata al ĉesigi komplete tiun ĉi sangadon absurdan, neracia, senmezura, favorita far tiuj kiuj, verŝajne, forgesis ke la plej grava afero estas faciligi kaj rekuperi ajnakoste la trankvilon de la kolombianoj.”

“Skribita la 17-an de septembro de 2006, en la montokresto Miraflores, montaroj en la kampara areo de la municipo Aguadas, departemento Kaldas”.

Fermiĝas la ĉirkaŭbaro

Spite la klopodojn, ree perdiĝis la spuro de Ríos, dum proksimume unu jaro. Ĉirkaŭ septembro de 2007 oni ekhavis informon ke li estis moviĝanta tra teritorioj de la municipoj Aguadas kaj Salamina, kaj oni ekfaris trian operacon, nomita Tambura Sonato, kiu ree alproksimiĝis al li, atingis gravajn malmobiliziĝojn, kaptajn kaj viktimitigojn, tamen el kiu li eskapis novafoje.

Tiame, la koloneloj Barrios kaj Díaz, unua kaj dua komandantoj de la Operaca Komanditaro N-ro 3, estis komencinta efektivan stretegon por alproksimiĝo al la popolo de la areo, strategio kiu ĉiufoje donis pli grandajn rezultojn. Kun sidejo en Pensilvania, Kaldas, estis kreita radiostacio

elde kiu oni parolis ĉiutage kuraĝigante la trupojn, interagante kun la civila loĝantaro kaj dediĉante kantaĵojn al ĝi, kaj invitante la gerilanojn al malmobiliziĝo, per varmaj mesaĝoj en kiuj al ili oni montris ke ekzistas alia vojo por ili kaj donis certecon ke la Armeo respektos iliajn vivojn.

Ekzistis du ĉefaj radioprogramoj, unu nomita *Kaldasa Tagiĝo*, elsendita matene ekde la kvina ĝis la sesa, kaj alia nomita *Amiko Gerilano*, en kiu oni puŝis la mesaĝon pri malmobiliziĝo. Per tiu ĉi kampanjo de komunikado, kiu alvenis al ĉiuj vilaĝoj de la regiono kaj estis aŭskultata en la gerilaj tendaroj mem, la armeanoj gajnadis al si la korojn kaj kredemojn de siaj aŭkultantoj. Ĉiufoje kiam okazis malmobiliziĝoj —kiuj kreskis eksponente—, ili portis ĉe la mikrofonoj tiujn gerilanojn, kiuj atestis pri la bona traktado ricevita kaj invitis siajn kolegojn sekvi siajn ekzemplojn.

Per ĉiuj ĉi kampanjoj militaj kaj de alproksimiĝo al la popolo, ĉe la komenciĝo de la jaro 2008 la situacio de la 47-a fronto kaj de Iván Ríos estis tre malsama ol tia kian ili havis en 2006. El preskaŭ 300 armitaj homoj kiujn ili iam ĝishavis, apenaŭ restis ĉirkaŭ 50, kaj Ríos kaj Karino, ĉiu kun sia grupo, forkuris el la truparo, en stato de konstanta paranojo, avertitaj pro la malmobiliziĝoj kaj sen fido pri siaj propra gardistaro, ĉar ili timis ke la mesaĝo de la registaro kiu invitis la gerilanojn malmobiliziĝi kaj fordoni siajn ĉefojn interŝanĝe de abunda rekompenco, konvinku iun el siaj proksimuloj. Ríos kaj Karina, dum siaj jam longaj krimkarieroj, neniam dubis pri ordoni la mortigon de proksimuloj pro timo al enfiltriĝoj kaj nun ambaŭ ne konfidis eĉ pri siaj ombroj.

En novembro de 2007, en bombado de la Aera Forto sur gerilan tendaron en la kapara areo de Sonsón, estis mortigita la alinomitan *Limón*, la sekureca ĉefo kaj konfidulo de Karina, kio kaŭzis ke ŝi komencis kaŝi sin, ĉirkaŭita far nur kelkaj homoj. Ŝi, kiu iam komandis terorojn kun centoj da batalantoj, nun estis etigita al ŝia plej minimuma ago-povo, sen iu ajn kontakto kun aliaj gvidantoj de la Sekretariaro

escepte de Ríos. Siaflanke, Iván Ríos, amkaŭ persekutita far la truparo kaj timanta eĉ sian plej proksiman kunularon, petis al Karina sendi al li iun konfidindan homon por gvidi lian personan gardistaron, kaj je la finiĝo de 2007 ŝi sendis al li la alinomitan *Rojas*, gerilano al kiu ne tremis la mano por mortigi, kaj kiu ekde tiam fariĝis la ombro de la kapulo de la Nordokcidenta Bloko.

Ne sciis Ríos ke li venigis sian propran mortigonton

ĈAPITRO 30-a

“Jen Iván Ríos!”

En februaro de 2008 oni ekfaris kvaran militoperacon kontraŭ Iván Ríos, nomita Fuorteto, en la ĝenerala areo de la rivero Arma, ĉe la limoj inter Antjokio kaj Kaldas. Ekzistis bonaj konajoj el informigado kaj ni kredis ĝustespere ke tiufoje ni ja trafus la plej junan anon de la Sekretariaro. Okazis almenaŭ sep bataloj kontraŭ la 47-a fronto, kiu ĉiufoje restis pli reduktita.

La situacio de Ríos kaj liaj homoj iĝis neeltenebla; ili estis nesufiĉe provizitaj, kaj sentis la Armeon ĉiam pli proksima. Rojas, siaflanke, kiu jam estis maĥinaciinta eliron por si mem kaj sia amkunulino, Ángela, pleniĝis per kialoj por mortigi sian ĉefon kaj sin liveri al la aŭtoritatoj. La unua kialo estis la angoro. Rojas sciis ke pli frue ol malfrue ili estos senelirigitaj far la Militfortoj, kaj riskos morti aŭ finresti en prizono. La dua temis pri Ángela: ŝi havis kelkajn sanproblemojn, kaj Rojas petis al Ríos permeson por foresti dum iom da tempo por serĉi kuracistan flegadon, peto kiun Ríos rifuzis sen plia ekspliko, pro kio Rojas pleniĝis per kolero. Kaj la tria okazis iomete antaŭ la ekdecido: dum nokto malvarma oni disdonis kafon inter la homoj de Ríos, kaj kiam la sekva ricevonto estis la kapulo, la trinkaĵo elĉerpiĝis. Tiam Ríos vokis al Rojas kaj frapdiris al li kun minaca tono: “Ke ĉi tio ne okazu ĉe la matenmanĝo”. Rojas komprenis ke sia vivo estis en danĝero,

ne nur pro la Armeo sed ankaŭ pro sia propra ĉefo, kiu jam antaŭe donis montron havi nenian heziton pri mortigi subalternulojn. Tial Rojas decidis agi.

La 3-an de marto de 2008 —nur tri tagojn post la morto de Raúl Reyes en la Operaco Fenikso—, ĉe la nokta profundo, dum Iván Ríos kaj sia kunulino, alinomita *Andrea*, dormis, Rojas eniris en ilian tendon kaj pafis la paron. Jam Rojas havis tion priparolitan kun Ángela kaj alia amiko gerilano, kiuj akompanis lin en la plano. Post la murdoj, ili faris bruadon en la tendaro pensigante ke alvenis la Armeo, kaj Rojas kriis al la kelkaj kiuj restis en la grupo: “Kuru, kuru, ne lasu kapti vin!”, kaj ĉiuj dispeliĝis, kvazaŭ persekutitaj far la diablo. Li, siaflanke, por certigi ke oni lin kredis kiam li sinliveros al la aŭtoritatoj, detranĉis, kun viandista precizeco, la dekstran manon de Ríos kiu kuŝis apud sia virino, envolvis ĝin per koltuko kaj enmetis ĝin en sian tornistron. La tri komplotintoj ekkuris.

Ángela havis fraton en la Polico, kiu estis postenigita en la municipo Pácora, tamen Rojas ne volis sinliveri al la Polico sed al la sama viro kiun li aŭskultadis tiom da fojoj per la radiostacio de la Armeo invitinte ilin al malmobiliziĝo: la kolonelo Barrios. Do ili telefonis la fraton de Ángela kun determinanta mesaĝo: Rojas kaj du pliaj gerilanoj volas sinliveri persone al la komandanto kiu estis persekutinta la alinomitan Ríos dum la du pasintaj jaroj, kaj ili havas ion kio interesos la komandanton. Informita Barrios, kiu estis en Salamina, pri la afero, li sendis helikopteron al certa vilaĝo en Pácora por ilin preni. Ĝis tie alvenis, post tri tagoj da piedirado la tri dizertintaj gerilanoj kaj ili estis prenitaj far armeanoj kiuj portis ilin al la komandejo, kie la kolonelo ilin atendis.

Kiam Barrios havis la alinomitan Rojas fronte al si, demandis:

— Kie estas Iván Ríos?

Rojas eltiris la koltukon el sia tornistro, ĝin elvolvis kaj la

mano de la kapulo eksaltis.

— Jen Iván Ríos! —li respondis.

Per tia ĉi makabra faro oni ricevis la novaĵon, kiun mi mem konfirmis al la lando la 7-an de marto ke mortis, en malpli ol unu semajno, pro efiko de la militista premo kaj la kampanjoj por malmobiliziĝo, dua ano el la Sekretariaro. Kiel mi diris tiam, temis pri “unu pruvo plia de ke la FARK estis disfendiĝanta”.

“Dua ano el la Sekretariaro kiu falas, ministro!”

Tiutage mi estis en mia oficejo kun Roberto Pombo, direktoro de *El Tiempo*, kaj Alejandro Santos, direktoro de *Semana*, kiuj estis vizitantaj min unufoje en mia laborejo por ke mi rakontu al ili detalojn pri la operaco kiu unu semajnon antaŭe finis kun la senvivigo de Raúl Reyes. Ankaŭ ĉeestis la generalo Mario Montoya, kiun mi petis akompani min. Tiam mi ricevis telefonaĵon en kiu oni informis min ke ekzistis onidiro pri la morto de Iván Ríos. Mi demandis la generalon Montoya kaj li diris ke li sciis nenion tamen ke li tuj ekenketos. Li faris du telefonvokojn kaj post la dua li brakumis min:

—Dua ano el la Sekretariaro kiu falas, ministro! —li diris al mi kun vera emocio.

Alejandro kaj Roberto ne ĉesis stupori.

Tamen, Rojas ne nur alportis la manon de sia eksĉefo; ankaŭ lian identigan karton, lian pasporton kaj lian porteblan komputilon, kun dosieroj de kontotenado kaj listoj pri personoj ostaĝigitaj aŭ ĉantaĝitaj far la Bloko José María Córdova. Pro la dosieroj trovitaj en la komputilo evidentiĝis ke Ríos estis ĉiufoje pli senkomunikiĝa kun la cetero el la Sekretariaro kaj ke li nur havis ian korespondadon kun sia mentoro Alfonso Cano.

Kompreneble, oni faris la teknikajn konstatojn pri la fingrospuroj, kiuj donis certecon pri la identeco de Ríos, kaj

poste la trupoj alvenis ĝis la tendaro de la kapulo, kie ili trovis la du korpojn en la sama pozicio en kia lasis ilin Rojas.¹

Per la morto de Iván Ríos le ceteraj gvidantoj de la gerilo ricevis mesaĝon klaran kaj maltrankviligan: la malamiko venontatempe ne estos nur en la kolombiaj Armitaj Fortoj, ankaŭ povus esti ene, en liaj propraj vicoj, ene de liaj propraj sekurigistoj, en liaj gardostarantoj mem, apud lia lito.

¹ La alinomita *Rojas* gajnis abundan rekompencan (2.500 milionojn da pesoj), kiun oni pagis al la personoj kiujn li indikis, ne pro la murdo de Ríos, sed ja pro la grava informo havigita kaj la transdono de ties komputilo. Nuntempe li estas en prizono, respondante pro aliaj krimoj de murdo kaj ostaĝigo kiuj ne estas forpardonablaj nek elprizonig-permesaj.

ĈAPITRO 31-a

“La milito lacigas ... kaj oni laciĝas”

La morto de Ríos per la manoj de sia subalternulo, kaj la sinlivero de ĉi-lasto al la Armeo, plus la novaĵo pri la senvivigo de Raúl Reyes en la Operaco Fenikso, kaŭzis senliman nervozecon en la 47-a fronto. La militistara premo daŭris kaj la malmobiliziĝoj plimultiĝis.

Karina ekrestis en tre komplika situacio, kaj havis multajn kialojn por timi: unuflanke, ŝi sentis ke la Militfortoj alproksimiĝis ĉiufoje pli; aliflanke, ŝi timis venĝon far la gerilo mem, ĉar finfine sia fronto estis komisiita pri la sekureco de Ríos, kaj ŝi mem sendis la alinomitan Rojas por gardi lin; cetere, ŝi sentis sin izolita disde la cetero de la fronto kaj ŝi ne havis komunikon kun la komandantoj de la FARK dum pli ol du jaroj. Iu rekompenco pendis sur ŝia kapo, kaj ŝi ne volis riski travivi la saman sorton de sia ĉefo.

Tamen, ankaŭ influis la amo al sia familio kaj la laciĝo. Karina estis naskinta filinon 17 jarojn antaŭe, kiun ŝi lasis sub la zorgo de sia familio en Medegino kaj kiun ŝi ne plu vidis dum longa tempo. Post 24 jaroj en la gerila batalado, sen duonvidi proksiman finon, kaj vidinte ke foriĝas ĉiufoje pli la utopio ekpreni perarmile la ŝtatpovon, pri kio oni parolis al ŝi kiam ŝi estis rekrutigata, ŝi sentis la pezon de violenta vivo sensenca, sen sia filino.

Cetere, kun pli ol 40 jaroj da aĝo, Karina estis firmiginta

aman rilaton kun juna gerilano, apenaŭ iomete pli ol 20-jara, alinomita *Michín*, kiu instigis ŝin konsideri la eblon forlasi la FARK kaj rerenkontiĝi kun ŝia filino. Michín estis telefoninta la radiostacion de la Armeo, tenatan far la Operaca Komanditaro N-ro 3, kaj enketinta pri la garantioj por iu ebla malmobiliziĝo.

Tamen, Karina estis malema kaj dubadis multe pri sinliveri al la aŭtoritatoj kiuj ŝin persekutis dum tiom da tempo. Iumomente, ĉe la finiĝo de aprilo de 2008, agentoj de la informiĝagentejo DAS sukcesis ekkontakti ŝin telefone kaj la nacia direktorino mem de la agentejo, María del Pilar Hurtado, parolis kun ŝi dum kelkaj minutoj kaj urĝis ŝin malmobiliziĝi, meti finon al ŝia terorisma kariero, kaj pensi pri ŝia familio kaj pri ŝia filino kiuj nur revis rekuperi ŝin.

Sciinte pri la afero, la prezidento Uribe mem, kiu tiom da fojoj insistis fronte al la militistoj de la areo pri la neceso de ŝia kapto, dum oficiala akto en Manizales sendis senperan mesaĝon al Karina: “Se vi malmobiliziĝas oni donos ĉiujn garantiojn al vi”.

Tiel la faktoj, la nokton de la sabato 17-a de majo, Karina kaj Michín havis unu lastan diskuton, en kiu li, jam decidiĝinta foriri, metis ultimaton kiun ŝi ne atendis:

— Aŭ vi venas kun mi, aŭ mortigu min.

Karina fine decidis dizerti kune kun sia kunvivulo kaj alia gerilano kiu akompanis ilin kaj, ĉe la tagiĝo de la dimanĉo 18-a de majo ili telefonis la kontaktulon kiun ili havis en la DAS por anonci al li sian decidon. La DAS informis pri la decido la generalon Juan Pablo Rodríguez, komandanto de la Kvara Brigado, kun sidejo en Medellín, kiu kompletigis du monatojn kaj duonon celanta ŝin dum disvolvo de la Operaco Efemera¹. Oni aranĝis ĉion necesan por preni la tri gerilanojn dum tiu sama dimanĉo en vilaĝeto de la municipo Argelia, Antiokio, kie ili ekbruligos fumsignalon.

¹ NT Hispanlingve “Operación Fugaz”.

Armeaj trupoj kaj detektivoj de la DAS veturis en du helikopteroj de la Kolombia Aera Forto kaj prenis en la indikita loko la alinomitan Karina, kiu uzis ŝvitveston kaj marĉotaŭgajn botojn, la alinomitan Michín kaj alian gerilanon. Laŭ tio kion Karina estis akordinta kun la DAS, post preni ŝin, la helikopteroj ekflugis al loko 20 kilometrojn disde la municipo Sonsón, kie ŝin atendis ŝia filino, kiun ŝi povis brakumi, plormeze, post tiom da jaroj da disiĝo.

Karina, kiu estis viktimitiganto de tiom da armeanoj kaj policistoj, ricevis dignan trakton kaj povis konstati per si mem ke tio kion la Armeo oferis al la malmobiliziĝintoj estas ja plenumata, eĉ en ŝia okazaĵo.

Kiam la direktorino de la DAS kaj la generalo Mario Montoya, komandanto de la Armeo, prezentis ŝin al la amaskomunikiloj, elde la sidejo de la Kvara Brigado, la kolombianoj ne povis kredi siajn okulojn. La plej milithardita kaj timita el la gerilanoj estis forlasinta la armitan lukton kaj iĝanta ekde tiam simbolo de la malmobiliziĝado. Plian baton plenfrapan al la spiritfortikeco de la FARK.

La vortoj de Karina

Karina decidis akceptigi sin sub la Leĝo de Justico kaj Paco, laŭ kio tiuj anoj de nelaŭleĝaj armitaj grupoj kiuj forlasas la violenton kaj konfesas ĉiujn krimojn en kiuj ili partoprenis havas la eblon de malpliigita puno. Ekde tiam ŝi raportadas deklarojn ĉioampleksajn fronte al prokuroro de Justico kaj Paco, al kiu ŝi konfesis almenaŭ unu centon da deliktaj agoj en kiuj intervenis ŝi aŭ la homoj sub ŝia responso.

Sen neglekti la respondon al la justico, kaj sub la konstanta protektado far la DAS, institucio antaŭ kiu ŝi malmobiliziĝis, Karina estis nomumita far la registaro, en marto de 2009, kiel “porpaca agento”, por ke ŝi helpu stimuli la malmobiliziĝojn inter siaj armil-kunuloj, kaj hodiaŭ ŝi trairas la landon diskonigante tiun mesaĝon.

Unuafoje en sia vivo, ŝi povis akompani sian filinon kaj ŝin brakumi ĉe datreveno kiam la filino iĝis 18-jara, kaj ŝi prenas iom post iom la eblon integriĝi en tiun socion kontraŭ kiu ŝi batalis ekde kiam ŝi estis adoleskantino kaj unuiĝis al la gerila grupo.

La sekvantaj frazoj, eltiritaj el intervjuo donita al Marcela Durán, el la Agprogramo por Humana Zorgo al la Malmobiliziĝintoj, permesas vidi la absurdecon de la milito en kiu ankoraŭ persistas la anoj de la FARK, kaj la nuntempan situacion de la gerilo.

Jenon diras Karina:

- En la siglo de FARK aperas “Armeo de la Popolo”, ke ĝi estas la defendo far la Armeo de la Popolo, tamen, oni vidas ĉiutage ke ili atencas kontraŭ la popolo mem.
- La armiloj ne estas la eliro el la konflikto. Ĝi estas la reakordiĝo, la pento, la ebloj ... Por fini tiun militon oni devas forlasi la armitan lukton kaj oni devas pardoni.
- La registaro promesplenumas pri la malmobiliziĝado.
- Se la gerilo ne havas la apogon far la civila popolo, ĝi neniam, neniam povos ekpreni la ŝtatpovon.
- La decido ekpreni la armilojn, serĉi la gerilon, estas unu el la plej malbonaj decidoj kiujn povas fari ni la homoj, kaj speciale la junuloj.
- El ĉi tiuj 24 jaroj kiujn mi havis da esti gerilanino, la ununuraĵo bona estas mia filino. El la cetero mi havas nenion.
- Oni vidas ke la FARK estas ruinigita.
- Mi pentas ke mi eniris en la FARK. Pri tio mi pentas.
- La milito lacigas ... kaj oni laciĝas

Unu ekzemplo el multaj

Laŭlonge de tiu ĉi libro mi rakontis la manieron kiel pluraj frontoj de la FARK estis batitaj aŭ ili preskaŭ

malaperis. La 35-a kaj 37-a frontoj kiujn gvidis Martín Caballero en la Montoj de María estas reduktitaj al ilia minimuma mezuro. La 16-a fronto kiun komandis la Negro Acacio estas tute malfortigita.

En la lastpasintaj ĉapitroj mi informis pri kiel oli liberigis la sudorienton de Antjokio kaj la nordorienton de Kaldaso el la terura tiraneco de la 47-a fronto, danke al la aktivo de la Operaca Komanditaro N-ro 3, kiu kunigis la klopodojn de la grupoj el la Armeo kaj la Aera Forto en tiu areo, kun konstanta apogo far la Nacia Polico, la DAS kaj la Prokurorejo.

Post la morto de Ríos kaj la sinlivero de Karina, la subkolonelo Wilson Díaz, la sama oficiro kiu komencis la instaladon de tiu unua bazo en la supro de la Montokresto de La Ursino, kaj kiu tenis viva la kontakton kun la popolo per la radiostacio, gvidis la Operacon SONAR —nomita tiel kiel akronimo el Sonsón, Nariño kaj Argelia, la tri antjokiaj municipoj kie ĝi estis farita—, kun tri kontraŭgerilaj batalionoj sub sia komando, por fini la lastajn redutojn de la 47-a fronto. Dek du estis senvivigitaj, 18 malmobilizigis, kaj la malmultaj restintaj, kiujn eblas nombri per la fingroj de unu mano, forkuris por rifuĝi en aliaj frontoj. Tiel finiĝis tia plago kiu dum du jardekoj teruradis kaj ruinigis la krutan teron kiu estis atestanto pri la epopeindaĵo de la antjokia koloniado.

Tamen, tiu ĉi estas nur unu okazaĵo inter multaj. La renverso de la 47-a fronto —kiel la preskaŭa malapero de la 35-a kaj 37-a frontoj— estas tipa ekzemplo pri kiel la Armitaj Fortoj dum la lastpasintaj jaroj sukcesis malpliigi, kaj multfoje elradikigi, la ĉeeston kaj influon de la gerilo en pluraj areoj de la lando. Tion kio estas rakontata en tiu ĉi sekcio pri Antjokio kaj Kaldaso oni travivis ankaŭ en aliaj regionoj, kie la regado far la Ŝtato kaj la leĝo, man-en-mane kun la porsocia agado, estas ree sentata.

Aliaj frontoj de la FARK, kiel la 2-a kaj la 64-a en

Narino, la 3-a kaj la 14-a en Kaketao, la 11-a en Bojakao, la 12-a kaj la 46-a en Santandero, kaj la 61-a en Ujlao, malaperis. Aliaj, kiel la 4-a en la Magdalena-mezo¹, la 13-a en Ujlao, la 19-a en la departemento Magdalena, la 20-a en Santandero, la 38-a en Bojakao, la 56-a en Kasanaro, kaj la “Tulio Barón” en Tolimo, restas malfortigitaj. La 9-a fronto, konsiderita la plej grava de la Nordokcidenta Bloko, kiu deliktis en la antjokia nordoriento kaj konstante faris ostaĝigojn ĉe la vojo Bogoto-Medeĝino, estas ankaŭ profunde malpliigita, kun duono el ĝia gvidantaro malmobiliziĝinta.

Tio ne estas facila tasko. La teritorio estas egega kaj la tero tre malebena. Tamen, sendube per la daŭra penklopodo de la Armitaj Fortoj, la heroa kuraĝo de iliaj membroj, kaj la politika malhezitemo de la registaro, ni la kolombianoj ĉiutage pli iĝas mastroj kaj sinjoroj de nia tero kaj nia estonteco.

¹ NT Vidu la piednoton de la 166-a paĝo.

LA PERFEKTA OPERACO

*Alfrontante la torturantojn, la forto elektis la ruzon.
La militistoj preferis la informiĝon
kaj muntis operacon miregigan,
pli fortan ol ĉiuj de James Bond,
kaj kia inspiros, certe, kinverkistojn de la morgaŭo.
La elliberigo de Ingrid Betancourt
ne lasas la amaran guston
de sukceso tro multekoste pagita,
nek de intertraktado kiu plifortigus la ostaĝigintojn.*

JEAN D'ORMESSON

Le Figaro, Francio, 9-a de Julio de 2008,

el lia artikolo:

“La forto esis justa, ke la justico estu forta”.

ĈAPITRO 32-a

La plej feliĉiga tago

Ofte oni demandas min kiuj estis la plej afliktaj kaj la plej feliĉigaj momentoj kiujn mi travivis dum la preskaŭ tri jaroj kiujn mi estis ĉe-kape de la Ministerio pri Defendado. Mi ne bezonas pensi tre leonge. La plej malĝojigaj estis tiuj dum kiuj alvenis novaĵojn pri la morto aŭ amputo de soldatoj aŭ policistoj ie en Kolombio. Multaj estis la funebraĵoj kiujn mi ĉeestis por akompani la familiojn kaj omaĝi la rememoron pri tiuj bravaj junuloj kiuj falis en embuskojn aŭ piedaktivigis kontraŭhomajn minojn semitaj far la gerilo. Ne ekzistas vortoj konsolaj por patrino kiu perdis ŝian filon dum lia vivofloro pro sensenca milito. Mi rememora —kaj ankoraŭ hitiĝas miaj haŭtharoj— la vortojn de unu el tiuj kuraĝaj virinoj, kiu alproksimiĝis al mi kaj, kun larmaj okuloj, kaj diris:

— Dankon, ministro, pro esti doninta al mia filo la eblon oferi sin pro la patrolando.

Tian saman kuraĝon mi trovis multfoje en la soldatoj kiujn mi viziis en la pavilono de militista sanzorga servo, kiujn estis perdintaj membrojn aŭ suferintaj aliajn neresanigeblajn lezojn en la korpo, kaj kiuj, spite al ĉio, ridetis kaj diris al mi ke ili fieris pri sia aparteno al la Armitaj Fortoj, kaj ke se ili povus, ili revenus al la batalekampo por sekvi luktante por la paco de Kolombio.

Rilate la plej feliĉigan momenton dum mia tempo en la

Ministerio, la respondo pasas tra la renkontiĝo kun tiuj aŭdacaj ostaĝoj kiuj kapablis rompi la katenojn de la ostaĝeco kaj alveni al la libereco, kiel la eksministro Fernando Araŭjo, la subintendanto de la Polico John Frank Pinchao, kaj la eksrepresentanto Óscar Tulio Lizcano. Ĉiam la novaĵo pri la libereco estas la plej bona novaĵo.

Tamen, ekzistas unu speciala tago —el tiuj pli ol mil dum kiuj mi gvidis la Ministerio pri Defendado— kiu neniam forviŝos el mia memoro, pro tio kion ĝi signifis por dek kvin homoj kaj por la tuta lando. La 2-an de julio de 2008, kiam estis farita, kun brila sukceso, la Operaco Ŝakon.

Tiun merkredon neforgeseblan, ne nur por mi sed por ĉiuj kolombianoj, signis egaĵon en la historio de la Armitaj Fortoj kaj de Kolombio, kiam elita komanditaro, konsistanta el oficiroj kaj suboficiroj el la armea informiĝfako, civilaj agentoj de informiĝado, pilotoj kaj aviadteknikistoj de la Armeo, kaj eĉ unu malmobiliziĝinto el la gerilo, alvenis per helikoptero al perdita loko en la ĝangaloj de Gŭavjaro, apud la rivero Inírída, kaj, ŝajnigante esti internacia humanisma misio, eltiris el la manoj de la FARK, sen fari eĉ unu pafon, dek kvin ostaĝojn, inkluzive la ekskandidatinon je prezidenteco Íngrid Betancourt, tri usonajn kontraktintojn kaj dek unu armeanojn kaj policistojn kiuj pasigis jarojn dumvive mortadintaj en la ĝangalo.

Ĝi estis majstra frapo, perfekta operaco —kiel nomis ĝin Íngrid Betancourt mem kiam ŝi faris siajn unuajn esprimojn en la alteriĝa dromo de la armea flughaveno de CATAM¹ en Bogoto— kaj ĝi signifis nemezureblan blovon, pli ĝuste uraganon da espero kaj ĝojo por ĉiuj ni kolombianoj kiuj restis dum jaroj atentaj pri la sorto de ĉi tiuj kaj aliaj ostaĝoj.

Mi legis artikolon rilatan al la kvardeka datreveno de la unua vojaĝo de la homo al la luno, okazinta la 20-an de julio de 2009, artikolo en kiu iu analizanto diris ke tiu heroaĵo

¹ NT La nomo CATAM devenas el la hispanlingva nomo “Comando Aéreo de Transporte Militar” (Aera Komanditaro de Armea Transporto).

kaŭzis ŝanĝigon en la pensamiero, en la sinteno, de la usonanoj, kiuj ĝis tiu momento sentis ke Sovetunio estis gajnantaj al ili la kosmo-konkuron kaj, plie, kiuj travivis malfacilajn tempojn, post gravulmurdoj kiel tiuj de Robert Kennedy kaj Martin Luther King, kaj meze de milito kiel tiu en Vjetnamio. Iel, tiu figuro de la kosmonaŭto Neil Armstrong farante la unuajn paŝojn sur la luna surfaco, je centoj da miloj da kilometroj de distanco, faris ke tuta nacio reakiris sian fieron, sian memfidon, kaj sian rigardon pri la estonteco.

Ion similan okazis en Kolombio pro la Operaco Ŝakon. Post esti pasintaj tra epizodoj tiel dolorigaj kiel la murdaro de la dek unu deputitoj de la Valo de la Kaŭko en junio de 2007, post ni manifestiĝi amase kontraŭ la ostaĝeco la 4-an de februaro de 2008 kaj ne ricevi eĉ unu bonvolan agon flanke de la gerilo, la novaĵo ke la Armeo atingis la sensangan elliberigon de tiom da ostaĝoj, kaptinte, cetere, la du ĉefojn de la fronto kiu ilin retenis, alinomitajn *César* kaj *Gafas*¹, rehavigis la esperon al popolo troŝarĝita pro la terorismo kaj la ostaĝigado.

Hipotezoj kiuj vaniĝas

Multon estis skribita, dirita kaj vidita pri la Operaco Ŝakon, kio estis temo de pluraj dosierfilmoj naciaj kaj internaciaj; kaj kies detaloj estis rakontitaj, kun realesko kaj bona literatura formo, en libro kiu lasis ateston por la historio pri tia heroaĵo de libereco.² Tio sendevigas min fari raporton ĉioampleksan pri la diversaj faktoj kiuj konsistigis tiun ĉi operacon, konsiderita modelo far militinformiĝaj agentejoj de la tuta mondo. Tamen mi ja vola fari kelkajn nelongajn pripensojn pri kelkaj karakterizaĵoj kiuj miaopinie devas esti rimarkigataj aŭ klarigataj.

Tuj kiam la operaco estis ekkonita, kelkaj kuraĝis lanĉi

¹ NT "okulvitroj".

² *Operación Jaque, la verdadera historia ("Operaco ŝakon, la vera historio")*, far Juan Carlos Torres. Eldonejo Planeta, 2008.

hipotezojn pri ke ĝi estis gvidita kaj realigita far eksterlandaj informiĝagentejoj, ĉar kelkaj ne konsideris ebla la fakton ke tia rezulto estis atingita per homaj kaj teknikaj rimedoj naciaj.

Pri tiu ĉi temo necesas fari distingon. Ĝeneralnivele estas vere —kaj tiel ni agnoskas— ke la kolombia militinformiĝo multon ŝuldas, rilate trejnado kaj teknikajn kontribuojn, al la apogo kaj la konsilado liverita far amikaj landoj, kiel Israelo, Unuiĝinta Reĝlando, kaj speciale, Usono. Danke al ili, ni atingis nivelojn de precizeco kaj rafiniteco en la fako de informiĝado kiaj estis nepenseblaj kelkajn jarojn antaŭe. Ne estus troige diri ke, sen tiuj jaroj da trejnado kaj kunagado, estus neeble realigi operacon kian tia efektivigita.

Specife en la okazaĵo de la Operaco Ŝakon, ĝia planado kaj disvolvigo, la realigo de la elektronika trompo kiu ebligis enfiltri kaj falsi la komunikojn de la FARK, kaj la pretigo kaj realigo de la elliberigo en la tereno, estis faritaj de sole kolombia personaro.

Iumomente, kiam mankis proksimume du semajnoj por la elektita tago, la prezidento Uribe decidis ke ni devas paroli pri la operaco al la ambasadoro de Usono, William Brownfield, ĉar li sin devontigis teni informita la prezidenton George W. Bush pri iu ajn elliberiga provo kiu inkluzivas la tri usonanojn, kaj tiel mi tion faris, en kunsido en mia apartamento, kiun ankaŭ ĉeestis la generalo Freddy Padilla kaj du funkciuloj de la ambasadejo: unu komisiito de la CIA kaj unu oficiro fakulo pri operacoj.

La unua reago de la ambasadoro estis de nekredemo kaj skeptikemo. Tamen, li diris ke li faros la koncernajn konsultojn kaj ke post 24 horoj li havos respondon. Male, la reago de la agento de la CIA estis de granda optimismo.

- Se tio kion vi ĵus priskribis estas vera, mi levas mian ĉapelon antaŭ la kolombia informiĝpovo ... Uaŭ, nekredeble!

La ambasadoro Brownfield, post fari siajn konsultojn

senpere kun la Blanka Domo, oferis la helpon kiun ni konsideris necesa, kio fine materiigis en du konkretajn kontribuaĵojn: la instalo de rafinitaj aparatoj kiuj ebligis komunikadon inter la helikopteraĵoj kaj la homoj kiuj elveturiĝis en la terenon ŝajnigante sin kvazaŭ internaciaj kunhelpantoj, kaj bazo-aviadilo de informigado kiu, ekster la vidatingo de la gerilanoj, kontrolis la komunikojn kaj utilis kiel ponto inter la helikoptero kaj la komandantoj.

Alia hipotezo, kiu ankaŭ eliras el la nekredemo pri la kapablo de la kolombia Armeo por fari elliberigon tiel perfektan, misasertas ke la Operaco Ŝakon estis nur fasado kaj ke, reale, la gerilkapuloj César kaj Gafas estis pli antaŭe kontaktitaj —supozeble tra la alinomita *Doris Adriana*, kaptita en 2008, amkunulino de César— kaj ke estis atingita interkonsento kun ili interŝanĝe kontraŭ abunda rekompenco kaj la certigo de ilia baldaŭa liberigo.

La senbazeco de tiu ĉi teorio estas memevidenta. Unue, se tio verus, nek la Registaro nek la Armeo havus kialon por ne tion. Publike estas oferataj rekompencoj al gerilanoj kiuj, havantaj sub ilia reteno ostaĝojn, liveru ĉi tiujn al la aŭtoritatoj, kaj tial ekzistus neniu nekonvenaĵo pro agnoski tian situacion kaj pagi la rekompencon ĉe la meztaga lumo. Eĉ cetere, tio ne senmeritigus la militistan operacon, ĉar enfiltriĝi kaj konvinki gerilkapulon pri forlasi sian organizaĵon kaj liveri kelkajn ostaĝojn estus tiome aŭ pli valora, kaj tiome aŭ pli frapa por la spiritfortikeco de la gerilo ol la trompo mem.

La realo taskis al si kontraŭdiri tiun klaĉon. César, kiu rezistis kvazaŭ tigro kaj luktis kontraŭ la militistoj irantaj en la helikoptero tiele ke li devis esti batita kaj dormigita per injekto, ne agis iasence kiel kunlaboranto. Post kelkaj monatoj en altsekura prizono en Kolombio, li estis ekstradiciita al Usono, kie li estos juĝata pro narkotaĵa komerco —ĉar la unua fronto, kiun li direktis ankaŭ responsis pri tiu agado en la areo de Gŭavjaro— kaj pasigos,

tre eble, multajn jarojn en prizono. Lia subulo, Gafas, estas en alia prizono de nia lando kaj respondos al la kolombia justico pro siaj deliktoj, komencante per la ostaĝigo, kio estas traktata per la plej severa puno laŭ la nacia krimleĝaro.

La Plano B

La Operaco Ŝakon, en kiun kunfluis la kreopovo, la talento kaj la kuraĝo de oficiroj, suboficiroj kaj agentoj el la armea informiĝfako kun la gvidado de iliaj superaj komandantoj, plus la politika decido de la prezidento Álvaro Uribe —ene de faktararo, kiu inkluzivis bonsortaj koincidoj kaj favora momento de rompebleco kaj komunikmalfacileco de la gerilo—, estas operaco fiere kolombia kiu trovas nenion enviindan en la plej rafinitaj kaj aŭdacaj operacoj de ostaĝliberigo el la internacia sfero. Male, ĝi enhavas eron kiu preskaŭ neniu el tiuj povas montri: ke ekzistis neniu viktimo kaj ĝi estis farita sen armiloj, do, ĝi estis aŭtentika operaco de inteligenteco.

Ankaŭ ĝi ne estis iu izolita operaco, sed la logika disvolvo de kontinua laborado de multaj jaroj da spurado kaj aŭskultado al la komunkado de la FARK, kaj de pluraj agaj progresoj komenciĝintaj kun la fuĝo de la subintendanto Pinchao, en aprilo de 2007, kiu liveris informon fundamentan por lokalizi la gerilbandojn kaj la ostaĝojn sub ilia povo. Antaŭ la Operaco Ŝakon, estis faritaj aliaj operacoj kiuj estis ĝiaj antaŭagoj, kaj sen kiuj ĝi ne povus esti realigita. Unu el tiuj estis la Operaco Elipso, ekfarita en januaro de 2008 —tiu ĉi ja kun plena partopreno kaj kunlaboro de usonanoj—, dum kiu speciala armea komanditaro ekvidis kaj priantis dum preskaŭ kvin tagoj taĉmenton de gerilanoj kaj grupon de ostaĝoj, ĉe la bordo de la rivero Apaporis. La Operaco Fenikso mem, kiu metis finon al Raúl Reyes, pliigis la nekomunikivon inter la frontoj de la FARK, kiuj forlasis la uzon de satelitaj telefonoj, por eviti esti detektitaj kaj travivi la saman sorton de la mortinta ano de la Sekretariaro, kio ebligis la trompo far

la armea informiĝfako per iliaj radiaj komunikoj.

Oni ankaŭ ne devas malatenti ke, kvankam tiu ĉi estis operaco realigita tute far la Armeo kaj ĝia informiĝa fako, ĝi engaĝis ĉiujn ceterajn fortojn kiuj restis pretaj, per impona deplojo, por efektiviĝi la t. n. Planon B, en la okazo ke io misfunkcius en la originala trompo.

Por la eventuala realigo de tiu plano, oni disponis pri 30 helikopteroj, unu aviadilon, tri batalionoj da soldatoj kaj specialaj fortoj de mararmea infanterio, kiuj estis pretaj — kun la motoroj funkciantaj kaj la flugmaŝinoj en la aero— por tuja reago okaze de iu ajn eventualaĵo. Per tiu ĉi dua agvojo, oni intencus delasi milojn da flugfolioj sur la lokon de la renkontiĝo, informantaj al la gerilanoj ke ili estis ĉirkaŭitaj kaj oferante respekton al iliaj vivoj se ili sinliverus kune kun siaj ostaĝoj. Plie, oni delasus satelitan telefonon por estigi senperan komunikadon kun César kaj povi intertrakti kun li. Temis pri ekfunkciigi la koncepton de humana ĉirkaŭbaro, alidire, ĉirkaŭi la ostaĝojn kun la ideo interkonsenti kun iliaj kaptintoj ilia liberigo.

Ne necesis, feliĉe, efektiviĝi la Planon B, tamen estas grave rimarkigi ke tiu ĉi enhavis pli agadon preman kaj intertraktan ol militatako. Eĉ pli, kiam la ostaĝoj estis eligitaj el la loko per helikoptero, estus estinte tre facile por la Militfortoj bombi la areon kaj meti finon al preskaŭ la tuto de la anoj el la unua fronto. Ili ne faris tion pro du kialoj: ĉar oni ĉiam konsciis ke tio estis elliberiga operaco kaj ne ofensiva ago, kaj ĉar oni volis doni al la FARK, en kies manoj restis aliaj ostaĝoj, la klaran mesaĝon ke la vivo de ĝiaj homoj estis respektata kaj ke ankaŭ oni esperis ke ne okazos rebatoj kontraŭ la ostaĝoj kiuj daŭris en kaptiteco. La ideo ne ataki la restintajn gerilanojn estis de la armeanoj mem. Kiom pravaj ili estis!

ĈAPITRO 33-a

“Plena sukceso!”

Mi rakontis plurfoje kiamaniere mi travivis tiun tagon eksterordinaran, la merkredon 2-an de julio de 2008. Ekde tre frue, en mia hejmo, mi ricevis la raporton de la generalo Montoya, kiu informis min, ĉirkaŭ la sesa matene, ke ĉio estus sub regado kaj ke li estis ironta al San José de la Gŭavjro por resti informita pri la operaco. Mi petis al li ke sciigu min pri io ajn, kaj tion li faris dum la tuta mateno. La generalo Padilla kontrolis la operacon kaj ankaŭ la dispono de la Plano B, elde la centro de komando kaj kontrolo de la Militfortoj, dum mi restis en mia oficejo en la Ministrejo, ĉesigis ĉiujn rendevuojn, kaj absorbiĝis en ricevi la raportojn, minuton post minuto, pri la situacio.

Dum la tagiĝo mi estis parolinta kun mia edzino, María Clemencia, kiu estis en Parizo kun nia filino María Antonia. Ekde kelkaj tagoj antaŭe mi petis al ŝi preĝi por la sukceso de io granda pri kio ni estis laborantaj, sen doni al ŝi ian konkretan informon. Tiumatene —jam estis pasinta la tagmezo en Francio— mi insistis ke ŝi iru al la preĉejo de la Miraklulino¹, en la Rue du Bac, pri kiu mia edzino estas tre kredanta, kaj preĝu por ke la aferoj rezultu bone tiun tagon.

En mia oficejo, mi kunsidis kun la Kuniĝinta Stabo de la

¹ NT Temas pri la Kapelo de Nia Sinjorino de la Mirakla Medalo.

Militfortoj, la admiralo David René Moreno, kaj la ĝenerala direktoro de la Polico, la generalo Óscar Naranjo, al kiuj mi rakontis tiun saman matenon pri la operaco kiu estis disvolvota, ĉar la nivelo de disfakigo de la informo estis tiel rigora ke eĉ ili ne estis konigitaj pri tiu historio.

La generalo Padilla, elde la centro de komando kaj kontrolo, vokis min periode kaj, uzante koditajn frazojn, informis min pri la progresoj. Ni mendis sandviĉojn por tagmanĝi en la oficejo kaj, kiam Padilla informis min ke la helikoptero jam ekflugis el la loko kie ĝi estis en kampara areo de Puerto Rico (metao) direkte al la renkontiĝejo en Gŭavjaro, mi telefonis mian gazetaran ĉefinon, Adriana Vivas, kaj petis al ŝi kunvoki porĵurnalistan prezentadon. Mi sciis klare ke, ĉu ni sukcesis aŭ ĉu ni fiaskis, estu ia ajn la rezulto, mi devas fronti la sekvojn antaŭ la lando. La ĵurnalistoj, inter ili, komencis konjekti: Ĉu oni kaptis la alinomitan Cano? Ĉu la alinomitan Jojoy? Neniu suspektis ke ni estis tuj festontaj la plej nekutima elliberigo en nia historio. La sekreton oni gardis ĝis la lasta momento.

Ekde la momento kiam oni min informis ke la helikoptero surterigis en la interkonsentitan lokon kun la gerilanoj, la tempon mi sentis eterna. Ĉiu minuto estis kvazaŭ jarcento. Pasis kvin, dek minutoj, kaj tio ankoraŭ estis normala laŭ la normo de la du unuflankaj liveroj de ostaĝoj okazintaj ĉe la jarkomenciĝo. Tamen, post la 15-a minuto, la pleja malbonaĵo trairis mian menson. Ĉu oni malkovris ilin? Ĉu io misfunkciis? Mi ekpaŝis nerveze ĉirkaŭ mia skribotablo, akompanita far la silento streĉa de Moreno kaj Naranjo. Post 23 minutoj, la angoro estis preskaŭ netolerebla. Tiam la generalo Padilla vokis min kaj diris unu solan vorton, kiu malŝargis mian spiriton:

— Ĝi ekleviĝis!

Ni sciis ke la helikoptero kun la ostaĝoj kaj la du armitaj gerilanoj estis en la aero, tamen ni ankoraŭ ne povis krei plenan sukceson ĉar io povus okazi ene de la flugmaŝino, se

misfunkcius la malaktivigon de la ostaĝigintoj. Apenaŭ tri aŭ kvar minutojn post la lasta voko, Padilla vokis min refoje, emociita, kaj diris:

— Malaktivigitaj!

Tiu estis la plej feliĉiga momento en la Ministerio, kaj sendube unu el la plej feliĉigaj el mia vivo. Ni kunhavis la ĝojon kun Moreno kaj Naranjo, kun kelkaj konsilistoj de mia oficejo, kaj tuj mi petis komunikiĝon kun la prezidento Uribe. Mi estis parolinta kun li je la sepa matene, dirinta ke ĉio iris bone, kaj devontiĝinta sciigi lin tuj kiam mi ekhavos iun novaĵon. Tiumatene la prezidento estis vojaĝanta vizitonta inunditan areon en Santandero; kiam oni pasigis lin al la telefono li estis en helikoptero, kaj mi povis aldiri lin, sen reteni la ĝojon:

- Prezidento, plena sukceso! Ingrid, la tri usonanoj kaj dek unu armeanoj kaj policistoj estas sekuraj kaj senvundaj.
- Ho! ministro —li respondis—. Dank' al Dio! Kia mirindaĵo! Mi vin gratulas ...

Kaj tiam paneis la komunikilo, tamen mi restis kun la trankvileco doni tian pozitivan raporton al la registarestro kiu havis la konfidon kaj la kuraĝon por aprobi tian operacon elde la plej alta instanco.

La ĵuspasintan nokton, en Kartageno, mi estis promesinta al S-ino Lina de Uribe, edzino de la prezidento, ke mi raportos al ŝi la rezulton tuj kiam mi scios ĝin. Tiel la dua telefonado kiun mi faris estis al ŝi, kiu respondis tre emociita, preskaŭ larmante pro ĝojo.

Poste mi sendis tekstmesaĝon al la poŝtelefono de María Clemencia, kiu estis farinta las taskon iri preĝi al la kapelo de la Miraklulino, kun du frazoj kiuj surprizis ŝin tute: “Plena sukceso. Ostaĝoj elliberigitaj”. Kiam ŝi ricevis ĝin en Parizo, ŝi ekkomprenis kion estis la motivo pro kiu mi petis ke ŝi preĝu tiom multe.

Fine, mi telefonis al Yolanda Pulecio, la patrino de Ĝngrid, kiu estis vojaĝonta tiuvespere al Francio. Kelkajn horojn antaŭe mi estis sendinta al ŝi, per mia sekretariino, mesaĝon ke ŝi atendu mian telefonadon, kaj konsilante ke ŝi nuligu sian vojaĝon, kio, kompreneble, restigis ŝin hezitanta.

— Yolanda —mi diris—, ĉu vi rememoras ke mi promesis ne forgesi vian filinon? Nu mi telefonas por rakonti ke Ĝngird estas libera, ŝi fartas bone, kaj ke mi vojaĝas nun al Tolemaida¹ por alporti ŝin kaj aliajn ostaĝojn kiujn ni ĵus elliberigis.

La miro kaj ĝojo de S-ino Pulecio estis nemezureblaj. Ŝi preskaŭ ne povis kredi tion.

— Kio? Ĉu veras? Ĉu veras?

Yolanda insistis ke ŝi volis iri al Tolemaida, tamen mi klarigis ke tio ne eblis kaj ke mi estis alportonta ŝian filinon al Bogoto; cetere, mi certigis ŝin ke mi zorgos ke oni portu ŝin al la militista flughaveno kie estis alvenonta la aviadilo kun la elliberigitoj, Dum mi parolis kun ŝi, mia privata sekretario, Juan Carlos Mira, pasigis por mi al la poŝtelefono la fratinnon de Ĝngrid, Astrid Betancur, kiu estis en Parizo, kaj dum kelkaj minutoj mi havis patrinon kaj filinon, unu en ĉiu orelo, ekkonantajn la plej bonan novaĵon de siaj vivoj.

La porĵurnalista prezentado

Mi petis al la generalo Padilla veni tuj al la Ministrejo por akompani nin en la porĵurnalista prezentado, Kiam li alvenis, ni kunhavis fortan brakumon, kaj iris, kune kun la admiralo Moreno, la generalo Naranjo, la generalo Jorge Ballesteros, komandanto de la Aera Forto, kaj la admiralo Guillermo Barrera, komandanto de la Mararmeo, komuniki la novaĵon al la lando. Mankis la generalo Mario Montoya, nedisputebla

¹ NT Elparolita “TolemAĵda”, estas armea aerbazo en la municipo Nilo, departemento Kundinamarko, tiome apuda al municipo Melgar (departemento Tolimo), ke en multaj tekstoj aperas Tolemaida kvazaŭ apartenanta al Melgar.

ĉefrolulo de la operaco, kiu estis vojaĝanta tiumomente elde San José de la Gŭavjaro al la bazo de Tolemaida, kun la elliberigitaj.

Tiel mi anoncis al la kolombianoj la novaĵon kiun ili esperatendis dum tiom da jaroj:

“Plaĉas al mi komuniki al la publiko nacia kaj internacia la jenon: En speciala operaco de informiĝpovo, planita kaj realigita far nia armea informiĝfako, estis elliberigitaj sekuraj kaj senvundaj dek kvin el la ostaĝoj kiuj troviĝis en manoj de la FARK. Inter la elliberigitaj ostaĝoj troviĝas Ingrid Betancourt, la tri usonaj civitanoj kaj dek unu anoj de nia Publiksekuriga Agentaro.”

Kiel gesto nekutima, kian mi neniam antaŭe vidis en ĵurnalistara intervjuo, la ĵurnalistoj aplaŭdis kiam mi menciis tiujn, kiuj estis elliberigitaj, kaj mi rimarkis eĉ larmojn ĉe kelkaj ĵurnalistinoj.

Mi pluridiris:

“Ili estis elliberigitaj en operaco en kiu oni sukcesis enfiltri la unuan bandon de la FARK, komanditan far la alinomita *César*, la sama bando kiu retenadis dum la lastaj jaroj multnombrian grupon de ostaĝoj sub sia povo.”

“Per diversaj procedoj oni sukcesis enfiltri ankaŭ la Sekretariaron. Pro tio, ke la ostaĝoj estis en tri disaj grupoj, oni sukcesis kunveni ilin en unu saman lokon kaj poste permesigi ilian translokigon al la sudo de la lando, por ke ŝajnigite ili pasu al senperaj ordonoj de Alfonso Cano.”

“Oni kunordigis ke la ostaĝoj estu prenitaj en loko antaŭdecidita far helikoptero de fikcia organizaĵo. Oni ankaŭ kunordigis ke la alinomita *César* mem kaj alia ano de lia estraro persone vojaĝu kun la ostaĝoj por ĉi tiujn transdoni al Alfonso Cano.”

La helikoptero, kiu fakte estis de la Nacia Armeo kaj okupita far alte trejnita personaro el nia informiĝfako, prenis la ostaĝojn en la najbarejo de la departemento Gŭavjaro

kelkajn minutojn antaŭe kaj nun ili flugas liberaj, sekuraj kaj senvundaj al San José de la Gŭavjaro. Tie ili enveturiliĝos en aviadilon kiu portos ilin al Tolemaida.”

“La alinomita *César* kaj la alia ano de lia bando estis senaktivigitaj en la helikoptero, kaj estos transdonitaj al la juĝaj autoritatoj, por ke ili estu kontraŭprocesataj pro ĉiuj iliaj deliktoj.”

“La anojn de la bando kiuj akompanis la alinomitajn *César* en la transdona tasko (...), same kiel la ceterajn kiuj troviĝis je kelkaj kilometroj, ni decidis ne ataki, kaj ni respektis iliajn vivojn esperante ke la FARK, reciproke, forliberigu la ceterajn ostaĝojn.”

“Tiu ĉi operaco, nomita ‘Ŝakon’, estas senprecedenca operaco, kiu pasos al la historio pro sia aŭdaceco kaj kaj efikeco, kaj kiu restigas tre alte la kvaliton kaj kompetentecon de la kolombiaj Armitaj Fortoj.”

“Dek kvin ostaĝoj elliberigitaj sen fari eĉ unu pafon.”

“Mian gratulon tre sinceran al niaj homoj de la informiĝfako de la Armeo, al la generalo Mario Montoya, ĝia komandanto, kaj al la generalo Freddy Padilla, kiu estis ĉe-kape de la operaco elde la komenco ĝis la fino.”

“La lando, la mondo kaj la karuloj de tiuj ostaĝoj ne havos kielon danki tiujn generalojn kaj iliajn homojn pro tia operaco elliberiga.”

“Ni plulaboros tage kaj nokte por atingi la liberigon de la restantaj ostaĝoj.”

“Plian fojon ni vokas la novajn kapulojn de la FARK por ke ili forlasu la armitan lukton, por ke ili ne igu mortigotaj sin nek siajn homojn, por ke ili malmobiliziĝu (...).”

Renkontiĝo en Tolemaida

Post la finiĝo de la porĵurnalista prezentado, kiu estis ŝarĝita per emocio, ni eliris kun la komandantoj al la

flughaveno de CATAM por preni la aviadilon al Tolemaida.

Jam tie, ni trovis la aviadilon Fokker parkumitan en la dromo de la bazo, kun la liberigitoj ene. Mi supreniris la alruleblan ŝtuparon kaj la unua persono kiun mi vidis estis Ĝngrid, impresita kaj feliĉa pro sia ĵus atingita libereco. Ŝi estis mia amikino, ŝi laboris kiel konsilistino ĉe la komenciĝo de la milnaŭcentaj jaroj kiam mi estis ministro pri Ekstera Komerco, kaj mi sentis egan feliĉon vidante ŝin refoje, post tiom da jaroj da doloro kaj necerteco. Ni kunfandĝis en brakumo premita, neforgesebla, meze de interrompitaj vortoj, per kiuj Ĝngrid senĉese dankadis. Kun mi estis suprenirintaj la komandantoj kaj la ambasadoro William Brownfield, de Usono, kaj la sceno fariĝis sinsekvo de rapidaj brakumoj, ĝojkrioj kaj esprimoj de bonveno al tiuj revenintaj el la terura kalvaria vojo de jaroj da kaptiteco kaj senhaveco.

Mi prenis sinjorinon Ĝngrid ĉe la mano, kaj tiel ni malsupreniris la poraviadilan ŝtuparon. Malsupre, en memapera formacio, estis la armeanoj kiuj aplaŭdis kaj fotis per siaj poŝtelefonoj. Post kelkaj paŝoj niaj, eniris voko en la poŝtelefonon de mia adjutanto. Estis mia sekretariino, Yolima Jimenez, kiu elde Bogoto, havis apude sinjorinon Yolanda Pulecio. Tuj mi pasigis al la telefono ŝian filinon Ĝngrid, kaj estis tiam kiam tiu ĉi, per interrompita voĉo, diris al sia patrino, post tiom da jaroj da sufero kaj disigo, jenaj vortoj kiuj iĝis historiaj:

Panjo, mi vivas, mi liberas! Panjo, la Armeo min elliberigis! Ni ĉiuj devas fidi la Armeon. Tio kion ili faris, panjo, estis la plej miriga. Tio estas paĝo de historio, de grandiozo, de heroeco. Mi sentas min fiera pri mia Armeo, pri esti kolombia!

Post kiam ŝi finis la telefonadon, kun la emocio ankoraŭ viva en siaj okuloj, la unua aĝo kiun ŝi petis al mi estis cigaredo, kion mi tuj atingis. Mi demandis ĉu ion plian ŝi deziris, kaj ŝi diris ke jogurton. Tiam ni du pediris kaj foriris el ekstremaĝo de la dromo, kie estis kelkaj seĝoj, kaj tie ni eksidis kaj parolis preskaŭ dek minutojn, dum ŝi fumis kaj

ĝuis sian jogurton, kvazaŭ se ĝi estus la trinkaĵo plej kara de la planedo. Ingrid ne ĉesis laŭdi kaj miri pro la genia operaco elliberiga kaj pro la kuraĝo de siaj savintoj, kaj diris ke ŝi havis multajn aferojn por rakonti al mi. Ŝi ekparolis pri siaj kunuloj, pri la kuraĝo de ili ĉiuj, escepte de unu, pri kiu ŝi parolis tre malbonjuĝe, kies nomon mi preferas teni sekreta. Ŝi diris ke la kaporalo William Pérez, flegisto de la Armeo, savis al ŝi la vivon kiam ŝi estis tre malsana. Ŝi estis kortuŝita pro la mondo kian ŝi estis remalkovranta kaj pro la horizonto kiu refoje malfermiĝis antaŭ ŝi plenamplekse.

Mi interrompis ŝin, tre miabedaŭre, kaj diris ke ni devis ekpreni la aviadilon al Bogoto, kie oni atendis nin. Tial mi reprenis ŝin ĉe la mano kaj ni direktiĝis al la flugmaŝino, ĉirkaŭ kiu estis la ceteraj elliberigitaj parolantaj kun siaj komandantoj kaj rakontantaj partojn el siaj odiseadoj.

La prezidento Uribe estis sendinta mesaĝon al mi, per sia sekureca ĉefo, por ke mi taskiĝu pri telefoni la prezidenton de Francio, Nicolas Sarkozy, por rakonti la bonan novaĵon, do mi petis komunikiĝon kun li tra la prezidenteja telefoncentralo, kaj ni ĉiuj eniris la aviadilon alportontan nin al la ĉefurbo. Mi petis al la piloto ke li ne ekflugigu antaŭ ol mia parolado kun la franca registarestro, tamen, post preskaŭ dek minutoj da vana atendo, mi decidis ke ni ekiru kaj provi poste la telefonadon. La mallonga flugo estis refoje spicita per anekdotoj kaj esprimoj kaj vortoj de danko far la elliberigitoj. La tri usonanoj kaj la ambasadoro Brownfield estis veturintaj en usona aviadilo ankaŭ al Bogoto, elde kie la kontraktintoj, akompanitaj far la diplomato eliris revene al sia lando, post preskaŭ kvin jaroj da ostaĝeco.

Tuj post nia surteriĝo en la arma flughaveno de CATAM, la emocio de la aplaŭdoj kaj brakumoj multobliĝis. Ingrid fandiĝis en brakumo kun sia patrino, dum la franca ambasadoro, Jean-Michel Marlaud, alproksimiĝis al mi kaj diris ke li havis telefone la prezidenton Sarkozy kaj pasigis al mi sian telefonon. Mi lin salutis, klarigis ke mi estis

telefoninta lin, tamen ne povinta atendi plu la komunikon, kaj konfirmis al li la mirindan novaĵon. Sarkozy, kiu apenaŭ estis ekkoninta pri la elliberigo kalkajn minutojn antaŭe, estis jubilanta kaj esprimis sian dankemon al la kolombia registaro kaj sian ĝojon pro la sukceso de la elliberigo. Tiam, prifitante ke Ingrid estis apud mi, mi ŝin pasigis por ke li povu paroli kun ŝi.

Post la longa porĵurnalistara intervjuo en kiu parolis la elliberigitoj, la komandantoj de la Armeo kaj ceteraj Militfortoj, kaj mi mem, en la dromo de la flughaveno de CATAM, mi eliris al la Ministrejo, kie Yolima estis atendanta min kun urĝa telefonvoko por ke mi partoprenu vive en intervjuo de Larry King en la kanalo CNN de Usono. Jam estis King en dissendo, komunikanta kun la aviadilo en kiu la ambasadoro Brownfield kaj la tri liberigitaj usonanoj estis direktiĝantaj al San Antonio, Teksaso, kaj mi apenaŭ atingis alveni al mia oficejo por partopreni lian programon.

Tio estis afabla interparolo en kiu la fama intervjuisto demandis la ambasadoron kaj min pri la detaloj de la operaco, kies sukceso jam ekestis ĉirkaŭiranta la mondon. Li min demandis ĉu mi taksis tiun ĉi operacon samnivela al la fama elliberigo en Entebbe, Ugando, en 1976, al kio mi respondis ke la nia estis multe pli bona ĉar eĉ ne unu sangoguto estis elverŝita. Li hezitis kelkajn sekundojn kaj diris: “Vi tute pravas”. Fininte sian programon, King konkludis: “Estas granda tago por la usonanoj”. Kal tia estis. Tamen ne nur por ili. Estis glora tago por la kolombianoj kaj por ĉiuj defendantoj de la libero en la mondo.

ĈAPITRO 34-a

Disfalas la maĥinacio

La Operaco Ŝakon signifis senkuraĝigan frapon por la FARK, tiom aŭ pli granda ol la morto de Raúl Reyes. Iván Ríos kaj Manuel Marulanda —ĉiuj en marto de la sama jaro 2008— aŭ la malmobiliziĝo de Karina en majo. Unuflanke —kaj spite ke la gerilo klopodis igi siajn anojn kredi la onidiron ke tio ne estis trompo farita de la Armeo sed perfido flanke de César—, la FARK rimarkis ke siaj komuniksistemoj, siaj ĉifroŝlosiloj kaj frekvencoj, kiujn ili disvolvadis dum tiom da jaroj, estis venkeblaj kaj estis spuritaj far la agentaro de informiĝado. Kvankam post la bombado al la tendaro de Reyes ili ne plu uzis satelitaj telefonoj por interkomunikiĝi, nun ili ankaŭ ne povas fidi pri siaj propraj radiokomunikoj, kio retroirigis ilin al malnovaj sitemoj de mesaĝuloj, kiuj tre ofte ne alvenas aŭ alvenas tro malfrue. Tiu ĉi situacio estigas la pliserioziĝon de problemoj kiun ili jam suferis de antaŭe: perdo de komando kaj kontrolo sur siaj propraj homoj.

Meze de la vasta kolombia tero, ĉiufoje pli malproksimaj inter ili, la ordoj jam ne plu alvenas tiel facile kaj rapide kiel antaŭe elde la bloko-komandantoj ĝis la pluraj frontoj, kaj la Sekretariaro mem havas malfacilon por komunikiĝi interne. Ĉiufoje pliiĝas la risko ke la taĉmentoj agu propravole, perdintaj la unuecon de agado kaj de celo kiun devas havi iu ajn organizaĵo. Cetere, la diversaj strukturoj sentas sin

izolitaj, sen regado nek direktado, kaj la paranojo, sendube pravigebla, dubigas ilin pri la origino kaj realeco de iu ajn ordono aŭ informo kiun ili ricevas.

En la kampo de la politika ĉantaĝo kiun ili pretendis fari per la ostaĝoj nomataj far ili “interŝanĝeblaj”, la perdo estis nemezurebla por la FARK. El la proksimume sesdek ostaĝoj kiuj iam ricevis tian alnomon, ili jam estis perdintaj dek unu ĉar ili mem murdis tiujn (la deputitoj de la Valo de la Kaŭko) kaj estis liverintaj propravole aliajn por fortigi la rolon de la prezidento Chávez kaj la senatanino Piedad Córdoba kiel interparolantoj. Per la Operaco Ŝakon ili perdis dek kvin kiuj inluzivis ne malpli ol tiuj kvar kiujn la gerilo taksis pli valoraj pro ilia internaci agraveco: la franc-kolombia civitanino Ingrid Betancourt —sendube la “kronjuvelo” por la gerilo— kaj la tri usonanoj. Nun kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn restas ĉe ili 24 armeanoj kaj policistoj, kaj magistratano de Garzón (Ujlao) kiun ili ekostaĝigis la 29-an de majo de 2009, pro kies liberigo la lando daŭre petegas.

La frapo estis mortiga por la FARK. Ĝi, kiu fanfaronis pri havi kontaktojn aŭ ian nivelon da interparolo kun registoj kaj registaroj kiel tiuj de Francio, Venezuelo kaj Ekvadoro, pro agoj faritaj de ĉi tiuj por peradi ĉe la eventualaj liberigoj de la ostaĝoj, kaj kiu kredis ke per tio ĝi estos atingonta sian deziratan de militrajtecan¹ statuson, frapiĝis kontraŭ la realo ke tia internacia roleco kian ili ĝuis —negativa roleco, kompreneble— forfumiĝis per la elliberigo de la 2-a de julio de 2008.

Francio jam havis sian civitaninon libera, Usono havis liberaj la siajn, kaj Venezuelo kaj Ekvadoro —post esti diskonitaj la retmesaĝoj de la komputilo de Raúl Reyes, kies aŭtentikeco estis certigita far Interpol— ekdistanciĝis rilate la kolombian gerilon —almenaŭ dirŝajne, ĉar poste oni eksciis ke kun Venezuelo la kunlaborado restis sendamaĝa—. Per la Operaco Ŝakon disfalis la maĥinacio de ĉantaĝo de la FARK,

¹ NT Vidu la piednoton de la 197-a paĝo.

kaj ĝi devis ŝanĝi siajn postulojn kaj esparaĵojn.

La celo pri militrajteco —kio fakte estas nereligebla ĉar ili ne havas regadon sur teritorio nek respektas la normojn de la Internacia Humana Leĝaro, nepraj kondiĉoj por atingi tian statuson— ekrestis enarkivigita en la lasta loko de la tirkesto de iliaj revoj, kaj la absurda pretendo postuli la senarmeigo de Pradera kaj Florida, du municipoj proksimaj al Kalio, kun areo de preskaŭ 800 kvadrataj kilometroj, por intertrakti iun tiel nomatan humana interkonsento ankaŭ pasis al forgeso.

Perversa ulo kiel Raúl Reyes povis pozi kvazaŭ “diplomato” kaj kvazaŭ intertraktanto pri temoj “humanismaj” ĉar li estis komisiita pri kontaktoj kun registaroj aŭ organizaĵoj, kiuj serĉis, kun pli da volo ol realismo, kontribui al la libero de la ostaĝoj. Kion ne enkalkulis tiuj kiuj tiel agis estas ke ostaĝanto kiu diskutas la kondiĉojn por eventuala liberigo de siaj ostaĝoj, ne iĝas, dank’ al tio, interparolanto “humanisma”: tiu estas nur ostaĝiganto kiu negocas la pagon de elaĉeto.

Per la Operaco Ŝakon ekrestis pruvite —fronte al la objetado far kelkaj familianoj, kaj eĉ registaroj kaj organizaĵoj— ke ja eblas elliberigi sekuraj kaj senvundaj la ostaĝojn, per armeaj aŭ policaj agoj plenumitaj kun la maksimuma kompetenteco kaj zorgo, kiuj povas utiligi aŭ ne utiligi la forton.

Tion pruvas la 437 homoj kiuj estis elliberigitaj far la sekurecaj institucioj de la Ŝtato inter la jaroj 2006 kaj 2008, kaj kiuj hodiaŭ estas liberaj el la katenoj de la ostaĝeco.

Tion pruvas la dek kvin homaj estaĵoj kiuj eniris, iun tagon kiun ni neniam forgesos, la helikoperon de la libereco.

BATOJ AL LA TERORISMAJ ĈELOJ

*La FARK estas la plej grandaj murdcantaĝantoj
kaj ostaĝigantoj de la mondo, kaj siaj
militaj agoj estas tiel sensencaj ke ili detruis
vilaĝojn kaj amasmurdis iliajn enloĝantojn (...)
La karakterizo kiel “terorisma” ne estas ia usona
inventajo, sed io kion la kolombiaj geriloj gajnis
pro la murdado de miloj da senkulpaj civiluloj.*

JOAQUIN VILLALOBOS
Ekskomandanto de gerilo en Salvadoro
kaj internacia analizisto,
el lia artikolo “Ekde Robin Hood ĝis Pablo Escobar”

ĈAPITRO 35-a

La sikarioj de la FARK

La FARK, kiel estas bone sciata, estas malleĝa organizaĵo konsiderata terorisma ne nur far la registaro de Kolombio, sed ankaŭ far Usono, Kanado, Peruo kaj la landoj kiuj konsistigas la Eŭropan Union. Neklarigeble, kelkaj registaroj en Latinameriko rifuzas doni al ĝi tian epiteton, spite ke ili estis proksimaj vidantoj pri la teruraĵoj kiajn la gerilo faras kaj faradis, dum pli ol kvardek jardekoj, kontraŭ la popolo de Kolombio. Ostaĝigo de civiluloj; narkotaĵkomerco; ekocido; perforta rekrutado de neplenaĝuloj; semado de kontraŭhomaj minoj; atakado al vilaĝetojn per bomboj el gasbotelegoj; bombatencoj kontraŭ: vojoj, elektrodistribujaj latismastoj, naftoduktoj, akvoduktoj kaj aliaj infrastrukturaj vorkoj; bomboj en publikaj lokoj, murdoj de antaŭelektitoj kaj masakroj estas parto el la krimdosiero kiu igas la grupon FARK, ne nur terorisma sed ankaŭ unu el la plej malbonaj kaj plej damaĝaj en la mondo. La samon, iutempe, oni diris pri la malleĝaj grupoj por memdefendado kiuj grupiĝis en la AUC¹, kiujn ankaŭ inkluzivis la Eŭropa Unio kaj Usono en siaj listoj pri terorismaj organizaĵoj.

Temas, cetere, pri certa terorismo kun internaciaj ligoj, kiu nutras sin per la malleĝaj merkatoj de armiloj kaj narkotaĵoj, kaj kiu tenadas rilatojn, kiuj estis pruvitaj kaj dokumentitaj,

¹ NT Vidu la 2-an piednoton de la 6-a paĝo.

kun aliaj mondkonataj terorismaj bandoj kiel IRA de Nord-Irlando, kaj eta de la Eŭska Aŭtonoma Komunumo, en Hispanio.

Sendube, ĉiuj frontoj de la FARK, laŭlonge kaj laŭlarĝe de la nacia teritorio, realigas teroragojn en granda aŭ mapli granda kvanto. Tamen ekzistas speciale du strukturoj kiuj havas kiel ĉefa celo la plenumo de teroragoj, ĉantaĝado kaj ostaĝigoj por timigi la popolon: tiuj estas la elitaj bandoj de la terorismo de la FARK: la mova kolono Teófilo Forero kaj la Urba Reto Antonio Nariño (RUAN¹).

Ankaŭ ĉi tiuj suferis fortajn frapojn ekde la jaro 2007, ene de la kontinua periodo de katastrofoj de sia organizaĵo.

Dosiero de doloro

Kvankam, pro evidentaj kialoj, ili ne havas la saman publicon, la atencoj evititaj estas tiel gravaj kiel la sukcesaj ofensivaj agoj, en la lukto kontraŭ la terorismo. Ŝokas nin, dolorige, la hororegaj scenoj de ruboj, flamoj kaj dispecigitaj homkorpoj, tamen estas pli la okazaĵoj kiel tiuj, kiujn oni frustras tagon post tago pro la konventempa agado de la agentaro publiksekuriga.

La kolono Teófilo Forero, komandita, ĝis antaŭ nelonge, far la alinomita *El Paisa* kaj la alinomita *James Patamala*, kaj kiu agas precipe en Ujlao kaj Kaketao, estis responsa pri atencoj kaj ostaĝigoj kiuj konsistigas parton de la plej malĝoja memoro de la lando. En julio de 2001 ĝi faris amasan ostaĝigon en la konstruaĵo Miraflores de Neiva², forportinte dek kvin homojn, inter ili Gloria Polanco de Lozada, kiu estis liberigita nur je la komenciĝo de 2008; la 20-an de februaro de 2002 ĝi ostaĝigis en la aero komercan aviadilon por forporti la kongresanon Jorge Eduardo Géchem —kiu atingis la liberon samtempe kiel la sinjorino Polanco— ago kiu

¹ NT Jam menciita en la ĉapitroj 17-a (p. 124-a, k. a.) kaj 26-a (p. 198-a).

² NT Ĉefurbo de la departemento Ujlao.

plifruigis la finon de la porpaca procezo la la Kagŭano; en februaro de 2003 ĝi eksplodigis aŭto-bombon en la klubejo El Nogal de Bogoto, kio kaŭzis 36 mortintojn, kaj domo-bombo en kvartalo de Neiva kun 18 mortviktimoj; en majo de 2005 ili murdis kvar magistratanojn kaj la sekretarion de la magistrato de Puerto Rico (Kaketao), kaj en februaro de 2006 ĝi ripetis la masakron kontraŭ naŭ magistratanoj de Rivera (Ujlao), por menciigi nur kelkajn inter la multnombraj agoj de kruelego de tiu ĉi makabra sekcio el la FARK, kun kapablo moviĝi kaj agi en diversaj regionoj de la lando, inkluzive de Bogoto.

Ekde 2007 ĝis hodiaŭ ĝiaj fiagoj malpliigis, tamen ne ĉar ĝi ne klopodis ilin plenumi, sed ĉar la kontinua premo far la Militfortoj kaj la Polico, la laboro de kunfarita informiĝado kaj la sciaĵoj liveritaj far malmobiliziĝintoj kaj informantoj ebligis eviti grandan nombron el la atancoj kiujn ili planis.

Faligo de Hernán kaj Javier Calderón

Unu el la batoj pli plenfrapaj ellasitaj al la kolono Teófilo Forero estis la kupto de la alinomita *Hernán*, en la municipo de Kundinamarko, El Rosal, la 5-an de julio de 2007, far la Nacia Polico.

Hernán gvidis specialan komanditaron de la menciita kolono, kaj estis akuzita kiel senpera responsulo pri pluraj teroragoj en Ujlao, ekzemple: la murdo de magistratano kaj du policistoj en El Lobo, la murdo de la eksa senatano kaj eksa departamentestro Jaime Lozada Perdomo —kies edzino, Gloria, estis ostaĝo de la FARK—, la amasmurdo de la magistratanoj de Rivera, la mortigo per eksplodaĵo de kvar policisto, kaj pluraj atencoj direktitaj kontraŭ la tiama urbestro de Neiva, Cielo González.

Tri monatojn antaŭe, la 29-an de marto, la Armeo estis senviviginta, en Algeciras (Ujlao) la alinomitan *Chucho Maniobras*, kiu estis akompaninto de Hernán en pluraj el tiuj atencoj.

Pri Hernan, la Polico estadis faranta sekvadon elde Ujlao ĝis kiam li estis lokalizita en El Rosal, trankvila kaj negranda municipo kelkajn kilometrojn disde Bogoto, kie li estis kunordigante estontajn terorojn en la nacia ĉefurbo, kaj informigante pri ostaĝigeblaj celituloj.

La kupto de tiu ĉi homo, ŝlosila en la kolono Teófilo Forero, kondukis al aliaj pli en Kundinamarko kaj Ujlao, kaj al la eltrovo kaj malaranĝo de diversaj planoj kiuj estis pretaj por realigo.

En la unua duonjaro de 2008, la Polico atingis grandan kontraŭterorisman sukceson, rimarkante anticipe atencojn estontajn, kaj malaktivigis sep aŭto-bombojn, el kiuj kelkaj estis instalotaj en San Vicente de la Kagŭano (Kaketao), antaŭa kerno de la zono de malstreĉiĝo¹, dum la vilaĝaj festoj, dum aliaj estis aktivigotaj en Neiva, dum la festoj de Sankta Petro, en junio. Tri veturiloj estis eksplodigotaj en Bogoto, kun celaĵoj kiuj inkluzivis la televidkanalon RCN kaj la eksministron pri Internaj Aferoj, Fernando Londoño. Ankaŭ oni malkovris planon por ostaĝigi mian kuzon, Guillermo Santos, direktoro de la ĵurnalo *El Tiempo*.

La konstanta agado informiĝa de la Polico ebligis eviti la efektivigon de tiuj planoj kaj kapti kelkajn el la eksplodigistoj, kiuj situis en Soacha (Kundinamarko) kaj Bogoto, kie ili estis luintaj diversajn konstruaĵojn en kiuj ili fabrikis kaj stokis la eksplodaĵojn, kun la celo lanĉi terorisman ondon la 20-an de julio aŭ la 7-an de aŭgusto, koincidige kun la naciaj festoj de sendependeco.

Feliĉe, nenio el tio estis ebla, kaj la 6-an de aŭgusto estis kaptita la ĉefa preparinto de tiu plano, kiu estis la alinomita *Javier Calderón*, vera superpezulo ene de la FARK, kiu ne nur estis altaskita kunordigi tiajn agojn. sed ankaŭ estis, ekde jaroj antaŭe, parto de ties internacia komisiitaro, kaj faris dum longa tempo agojn kaŝitajn kaj de reprezentado en

¹ NT Pri tiu areo vidu piednoton en la 57-a paĝo.

Ekvadoro, Bolivio, Paragvajo, Ĉilio kaj Argentino. Kun li falis la alinomita *Alberto*, la alinomita *José*, la alinomita *Refrío*, kaj la alinomita *Nelly*, ekrestante tiel senspinigita tiu timinda terorisma ofensivo en la landa ĉefurbo.

La falsaj policistoj de Anapoima

En mia statuso de ministro pri Defendado, mi ĉiam konsciis ke mi estis en la celilo de la FARK, kaj ke ĝi volis, ajnakoste, atenci kontraŭ mia vivo aŭ kontraŭ mia familio. Tio estas, sendube, unu el la plej multepezaj riskoj de la publika servo, kaj la pleja malbonaĵo estas ke tio ne nur koncernas onin sed ankaŭ siajn karulojn.

En pluraj okazoj —dek unu, por esti preciza— la Armeo aŭ la Polico malkovris konventempe konkretajn planojn por murdi min. Danke al dokumentoj aŭ komputiloj trovitaj en gerilaj tendaroj, aŭ al informoj el enfiltrigintoj, tiuj agentoj sukcesis renversi ilin. Malantaŭ la plimulto el ili troviĝis la tenebra mano de la kolono Teófilo Forero, la ĉefa sikaria ĉelo de la FARK.

Ĉe la finiĝo de marto de 2009, malmultajn tagojn antaŭ la Sankta Semajno, tempo dum kiu mia familio kutimas iri al ripozbieno en la municipo Anapoima (Kundinamarko), la Polico disrompis planon tre rafinitan kaj tre antaŭenigitan por atenci kontraŭ mi, kontraŭ mia frato Enrique, eksdirektoro de *El Tiempo*, aŭ kontraŭ aliaj niaj familianoj.

Danke al konaĵoj ĉerpitaj far la polica informiĝpovo —atingitaj, inter aliaj fontoj el dokumentoj konfiskitaj disde la sekureca ĉefo de la alinomita *James Patamala*, kaptita en San Vicente de la Kagŭano en decembro de 2008, plus la kunlaboro de kelkaj informantoj—, oni kaptis dek gerilanojn el la kolono Teófilo Forero kiuj estis implikiĝintaj en la murda plano: ok en Anapoima, unu en Girardot kaj alia plia en Pitalito (Ujlao).

La grupo kiu troviĝis en Anapoima estis aĉetinta, per mono donita far Patamala, etan bienon proksiman al tiu de

mia familio, kaj tie ili havis armilaron, du uniformojn kaj policajn kaskojn, kaj motorciklon pentritan per la insignoj kaj koloroj de la Polico. Ĉio indikis ke la sikarioj, kamuflitaj kvazaŭ policistoj, havis planite alproksimiĝi en iu momento tien kie troviĝos mia frato, mi aŭ iu ajn el niaj familianoj, por plenumi la atenco.¹ Postaj informoj indikis ke la homoj de la kolono Teófilo Forero ankaŭ planis fari serion da ostaĝigoj, inkluzive de usonano, kaj kaŝi siajn ostaĝojn en la bieno kiun ili estis aĉetintaj.

Plian fojon, la konventempa kaj efika agado de la Polico frustris la terorismajn planojn de la FARK kaj de ĝia plej tenebra sikaria strukturo.

Pli proksimdate, la 25-an de oktobro de 2009, James Patamala, la dua kapulo de tiu kolono, estis senvivigita dumbatale far la Polico en vilaĝeto de la municipo Puerto Rico (Kaketao). La teroristo, kiu havis en sia polica dosiero krimojn kiel la planado de la bombo en la klubejo El Nogal, la masakro de la familio Turbay Cote², kaj la ostaĝigo kaj murdo de Liliana Gaviria, fratino de la eksprezidento César Gaviria, inter aliaj brutalaĵoj, estis lokalizita danke al konaĵoj donitaj far informantoj, kiuj ricevis rekompencan de 1.900 milionoj da pesoj. La aŭtoritatoj persekutas nun la alinomitan El Paisa, kiu restas ĉiufoje pli sola, sendube unu el la krimuloj plej serĉataj en la lando.

La kolono Teófilo Forero, kvankam damaĝita, daŭre estas mortigpova minaco, des pli ĉi-momente kiam la FARK, pro la malpliigo de sia militkapablo, klopodas montri ĉeeston kaj pruvi sian supozitan povon per teroragoj. La minaco daŭre vivas, kaj la sekurigaj institucioj de la Ŝtato daŭre strebas malhelpi ĝin.

¹ En aŭgusto de 2009, kvar el la dek kaptitaj gerilanoj, kiuj deklaris sin kulpaj kaj alvenis al interkonsento kun la prokuroro, estis kondamnitaj al ok jaroj da prizono.

² NT Krimo farita la 29-an de decembro de 2000, kiu ekrestigis sep murditojn kaj du vunditojn.

El kiom da bomboj, el kiom da ostaĝigoj, el kiom da mortigoj estis savita la lando pro la penado de informiĝo kaj la preventaj operacoj de nia publiksekuriga agentaro !

ĈAPITRO 36-a

La defendado de Kundinamarko

Ripeta celado de la fark, ene de ĝia “strategia plano”, estas serĉi la regadon de la orienta montoĉeno, kiel deploja koridoro inter ĝia “strategia malantaŭo”, kio troviĝas en la departementoj Metao, Gŭavjaro, Kaketao kaj Putumajo —kie ili estas kontraubatalitaj far la Kuniĝinta Taskoforto Omega¹—, kaj ĝia plej valora celo, kiu estas Bogoto, la ĉefurbo de la lando.

Ene de tiu plano —kiu ĉiufoje foriras pli el la eblaĵoj—, la gerilo koncentris grandan parton el siaj homoj kaj frontoj en la menciita deploja koridoro, kiu trairas la departementojn Ujlao, Tolimo, Metao, la sudo de Kundinamarko kaj parto de Santandero.

Tiuj estas la sonĝoj de militisma dominado de la FARK, tamen la realo ĉiufoje pli pravas al ĝi ĝian neebulon atingi ilin.

Dum pluraj jaroj la gerilo atingis privilegiajn poziciojn en municipoj proksimaj al Bogoto kaj eĉ ene de la periferio mem de la ĉefurba distrikto, en la kampara areo de Sumapaz, elde kie ĝi antaŭeniris en sia intenco sieĝi la plej grandan urbon de Kolombio, kie loĝas sesono el la enloĝantoj de la lando. La bogotanoj sin detenadis viziti municipojn kiuj distancas nur duonhoron da vojaĝo, ekzemple La Calera aŭ Choachí, pro

¹ NT Pri ĝi, vidu la 116-an paĝon.

timo fariĝi viktimoj de ostaĝigo, kaj ili sentis sin malliberaj en sia propra metropolo. Sinsekvego de familioj vojaĝis al Usme, ĉe la suda ekstremo de la urbo, kaj elde tie al la Altebenaĵo de Sumapáz¹, por negoci kaj pagi la elostaĝigon de siaj karuloj al kruelaj libereco-ŝakrantoj, inter kiuj elstaris la alinomita Romaña, kiu fifamiĝis kiel komisiito pri la ostaĝigoj en la areo de Bogoto kaj Kundinamarko.

La aferoj ekŝanĝiĝis ĉe la finiĝo de la regado de Andrés Pastrana, kiam estis kreitaj la altmontaj batalionoj, el kiuj la unua estis la bataliono en la Altebenaĵo de Sumapaz, situanta je 3.800 metroj super la marnivelo, kiun la prezidento mem inaŭguris la 8-an de januaro de 2002. Tie, en antaŭa rifuĝloko de la gerilo, instaligis taĉmento de la Armeo, kiu komencis apliki suverenecon tie kie iam havis siajn bienojn Manuel Marulanda² kaj Jacobo Arenas³, historiaj gvidintoj de la FARK. La instalo de tiu ĉi bataliono estis frukto de du jaroj da armea kampanjo en tiu areo, dum disvolvo de la Operaco Neniiganto⁴, kiu ekmovigis la gerilon elde strategia loko kia permesis la komunikiĝon inter la frontoj de la centro de la lando kaj tiuj de la oriento. Fakte, la areo kie instaligis la altmonta bataliono —je nur dek du kilometroj disde la municipo Uribe (Metao), parto de la zono de malstreĉigo— ne nur estis provizfonto por la frontoj situantaj en Metao, Ujlao kaj Tolimo, sed ankaŭ, pro ĝia proksimeco kun la ĉefurbo, ĝi estis bazloko de la ofensivo ke la fark planis kontraŭ Bogoto.

Kiam komenciĝis la regado de la prezidento Uribe, en aŭgusto de 2002, kaj li komencis la aplikadon de la Politiko de Demokratia Sekureco, la Militfortoj surprenis kiel unua celo la definitivan elpelon de la gerilo, kaj ĝia afero de atencoj, ostaĝigoj kaj ĉantaĝoj, el la proksimaĵoj de Bogoto kaj de tuta Kundinamarko. Kaj tion ili atingis. Per kontinua penado dum

¹ NT Hispanlingve “páramo de Sumapaz”.

² NT Vidu 4-an paĝon, 3-an piednoton.

³ NT Vidu 161-an paĝon, 1-an piednoton.

⁴ NT Hispanlingve: “Operación Aniquilador”.

du jaroj, en kiuj estis realigita la Operaco Libero I ¹. la FARK estis elradikigita el la departemento kiun ĝi konsideris sian ĉefan strategian celon.

Ekde tiam, en ĉiu agadplano kiun ĝi intencas, ĉiam estas inkluzivigita la reveno al Bogoto, tasko kiu estas sub la gvido de la Mono Jojoy kaj lia Orienta Bloko, kaj en kio, feliĉe, ili malsukcesis fojon post fojo, ĉiufoje pli frakase.

La enterigita komputilo

La atakpinto de la FARK en la ĉefurbo kaj ĝiaj ĉirkaŭejoj estis dum la lastaj jaroj la t. n. Urba Reto Antonio Nariño (RUAN), en kiu kombiniĝas la laboro fari terorismajn atencojn en la urbo kun la enfiltriĝo en universitatoj kaj komunumaj organizaĵoj por anigi trompeblulojn al siaj bolivaraj bandoj kaj al la Komunisma Partio Eksterleĝa Kolombia (PC3).

La origina komandanto de la RUAN estis Carlos Antonio Lozada, kiu devis forkuri el Kundinamarko pro la Operaco Libero I. Ekde tiam, lia ĉefa intenco estis organizi refoje la fortojn de la gerilo por reveni al Bogoto kaj rearanĝi ties terorisman reton. Li okupiĝis pri tio kiam, en julio de 2007, sia tendaro estis lokalizata kaj atakita far homoj de la Kuniĝinta Taskoforto Omega. Lozada ekrestis vundita, tamen sukcesis fuĝi. Nu, dum sia forkuro li lasis sian komputilon, kio iĝis fundamenta peco informa pri la planoj kaj strategioj de la FARK, kaj pri ties intencoj repreni poziciojn en Kundinamarko.

Kiel puno pro lasi sian komputilon, Lozada estis senigita je sia komandeco de la bolivaraj bandoj en Bogoto, kaj li estis anstataŭita per homo pli fidinda por la Mono Jojoy, kiu pli antaŭe estis mallibera en la prizono Picota ĝis julio de 2001, kiam li estis ekliberigata pro senjuĝa fortempigo², kaj kiu estis farinta ĉiajn teroragojn en la ĉefurbo planitajn en

¹ NT Hispanlingve "Operación Libertad I".

² NT Forpaso de la limtempo por definitiva juĝo aŭ kondamno.

Sumapaz, li estis Jesús Marbel Zamora, alinomita *Chucho* aŭ la *Profe*.

Chucho surpronis la taskon rekomponi la fortojn de la FARK en Kundinamarko kaj li servis ankaŭ kiel liganto inter sia ĉefo, la Mono Jojoy, kaj la nova komandanto de la FARK, Alfonso Cano. Ĝuste la 29-an de oktobro de 2008, kiam li iris kun sia kunulino kaj grupeto de bandanoj, tra loko inter la municipoj Purificación kaj Coyaima, en la departemento Tolimo, li estis interkaptita far armeaj trupoj kiuj estis spurantaj lin dum preskaŭ unu monato. Antaŭ ol esti kaptita, kio okazis kiam li intencis transiri la riveron Magdalena, Chucho enterigis la tekokomputilon kiun li portis, armilaron kaj dokumentojn, kun la espero ke ne ripetiĝu la historion de la komputilo de Lozada. Tamen, la aparato estis trovita far la soldatoj, kaj la informo kiun ĝi enhavis pruviĝis, kiel esperinde, speciale valora.

Dank' al tiu informo, ekmalkovriĝis la plano kiun la kolono Teófilo Forero estis mahinacianta en Anapoima kontraŭ mi kaj mia familio. Oni ankaŭ trovis informerojn pri aliaj terorismaj projektoj kaj pri pluraj anoj de la RUAN, kiuj poste falis unu post alia, en operacoj armeaj kaj policaj, dum 2009.

La *alter ego*¹ de Jojoy

Alia gerila kapulo, de egala aŭ simila graveco kiel Chucho, konita per la alinomo *Bertil*, ĉefo de la 25-a fronto kaj —same kiel Chucho— liganto inter la Orienta Bloko kaj Alfonso Cano, estis faligita far la trupoj de la Armeo en la kristnaskotempo de 2008, ankaŭ en Tolimo, pro kio la Mono Jojoy perdis dum malpli ol du monatoj duopon el siaj konfidinduloj. La menciita 25-a fronto, kiu iam ĝishavis pli ol cent anojn, kaj kiu agadis en la oriento de Tolimo, ekrestis preskaŭ neniigita. Pli ol 50 malmobiliziĝis, 25 estis arestitaj, kaj 15 —inkluzive de Bertil— estis senvivigitaj.

¹ NT Esprimo foje tradukita “alia ego” kaj “alia memo”, kiun mi decidis konservi en ĝia latina formo, kiel oni kutimas fari en alilingvaj tekstoj.

Meze de ĉi tiaj cirkonstancoj, kun Lozada en malbona farto, Chucho arestita kaj Bertil motinta, al la Mono Jojoy, en lia obstino por reveni al Kundinamarko kaj reaktivigi la reton RUAN, restis nur la rimedo forlasi la homon plej proksiman al li, la alinomita *Gaitán*, batalanto preskaŭ 60-jaraĝa, kun longa spertado en la gerilo, kiu estis preskaŭ lia *alter ego*. Inter la krimdosiero de Gaitán enkalkuliĝas agoj kiuj forprenis la vivojn kaj la liberojn de multaj anoj de la Armitaj Fortoj, kiaj estis la sieĝoj de Miraflores¹, Mitú² kaj Teteyé³.

Gaitán ekprenis la gvidadon de la Urba Reto Antonio Nariño kaj penetris en Kundinamarkon, kun grupo de gerilanoj kun spertado pri la regiono, el tiuj kiuj estis elpelitaj far la Operaco Libero I, inter kiuj estis la alinomita *Negro Antonio*, kiu estis fifama kiel kruela kaj senkompata ostaĝiganto, kiu kutimis agadi en la areo de Viotá (Kundinamarko), kaj la alinomita *Mariana Páez*, la ununura virino kiu estis ano de la centra stabo de la FARK.

Ene de la intencoj de Gaitán kaj liaj sekvantoj estis la efektivigo de du planoj, projektitaj kaj anoncitaj far Alfonso Cano mem: la Plano 2010, per kiu ili intencis refirmigi la ĉeston de la gerilo en Kundinamarko kaj la ĉirkaŭejoj de Bogoto por tiu jaro, kaj la plano Nigra Marto, per kiu ili intencis “memorfesti”, per teorismaj atencoj kiuj timigu la popolon, la datrevenon de la mortoj de Raúl Reyes, Iván Ríos kaj Manuel Marulanda, okazintaj ĉiuj en marto de 2008.

Gaitán kaj siaj uloj nur atingis fari unu atencon, kio estis la eksplodigo de bombo fronte al video-lubutiko Blockbuster, en la t. n. rozkolara zono⁴ de Bogoto, kio kaŭzis la morton de

¹ NT La 3-an de aŭgusto de 1998 kontraŭ polica bazo kaj arma bataliono, en la departemento Gŭavjaro.

² La 1-an de novembro de 1998 kontraŭ la urbo Mitú, ĉefurbo de la departemento Vaŭpeso.

³ NT La 25-an de junio de 2005 kontraŭ la Arma Bazo Teteyé, en la municipo Puerto Asís, departemento Putumajo.

⁴ NT Hispanlingve “zona rosa”, areo kun vigla socia vivo kiu enhavas trinkejojn, dancejojn kaj butikojn kiuj allogas junulojn kaj turistojn.

gardisto de aŭto-parkumejo kaj de inĝenierino, patrino, kiu tiam iris hejmen, la 27-an de januaro de 2009. Mi mem estis, kune kun la armeaj kaj policaj aŭtoritatoj kaj la urbestro, inspektante la efikojn de la bombo, post malmultaj minutoj de ĝia eksplodo, kaj mi konstatis la teruran detrupovon de la eksplodaĵoj kiuj frakasis murojn kaj vitrojn en pluraj ĉirkaŭaj domblokoj. Kvankam, pro la malfrua horo en kiu ĝi eksplodis, la nombro de mortviktimoj ne estis tro alta, tiu ĉi bombo rezultigis kompreneblan angoron en la bogotanoj kaj en la tuta lando, ĉar plurmonate antaŭ tiam ne okazis terorago tiaspeca en la urbo.

La Operaco Fortikaĵo

La tempo estis ŝanĝiĝinta kaj ĝi ne plu estis taŭga por la intencoj de la teroristoj. La tasko moviĝi tra Kundinamarko, kio aliepoke estis afero ĉiutaga por la gerilanoj, pruviĝas preskaŭ neebla en la nunaj cirkonstancoj, kiam ekzistas ĉiama kaj amasa ĉeesto de la Armitaj Fortoj en ta tuta teritorio kaj kompleta informantara reto kiu kunlaboras kun la aŭtoritatoj.

En siaj revoj, Jojoy kaj la ceteraj gvidantoj de la FARK imagis ke, sub la kunordigado de milithardita homo kiel Gaitán, kaj kun la apogo de spertaj sekvantoj kiel la Negro Antonio kaj Mariana Páez, eblus repreni kaj rearanĝi la restaĵojn de la pluraj frontoj kiuj iam pli antaŭe agadis en Kundinamarko kaj kiuj tiam estis disaj en la najbaraj departementoj, kaj —kiel ĉiam elde Sumapaz— lanĉi serion de teroratencoj kaj de agoj de enfiltriĝo, kiuj kondukus, en 2010, al la aspirita preno de Bogoto.

Tiu projekto ne povus havi alian finiĝon ol malsukceso, kaj la fakto estas ke Jojoy sendis siajn plej bonajn kadrulojn al fatala destino, kian iu ajn povus antaŭvidi.

La trupoj de la Kvina Divizio de la Armeo, kun sidejo en Bogoto kaj sub la direktado de la generalo Jairo Antonio Herazo, inkluzivita la Dek Tria Brigado, komandita far la

generalo Luis Pérez, kun jurisdikcio en Kundinamarko, disvolvis la Operacon Fortikaĵon per kiu ili lokalizis kaj atakis du grupojn de gerilanoj kiuj antaŭeniris proksime de Bogoto, unu en la altebenaĵo de Sumapaz, en areo de la municipo Nazareth, kaj alian en vilaĝo de la municipo Gutiérrez, ambaŭ en Kundinamarko.

La unua batalrenkonto okazis dum la tagiĝo de la vendredo 27-a de februaro de 2009, en la monto Las Ánimas, je pli ol 3.800 metroj super la marnivelo. Kiam la helikoptero kiu portis la trupojn malsupreniris sur la monton, ĝi estis ricevita per pafoj de haŭbizo, kiuj feliĉe ne trafis. En la batalo mortis pluraj gerilanoj kaj dek estis kaptitaj, inter kiuj troviĝis eĉ la Negro Antonio, kies nomo, kiel jam dirite, rilatas al pli ol cento da ostaĝigoj, inkluzive de tiu de la japana insdustriisto Ĉikao Marumacu¹, murdita post tri jaroj da ostaĝeco.

Inter la homperdoj estis virino, kiu poste estis identigita kiel la alinomita *Mariana Páez*, kiu pli antaŭe estis la ĉefino pri komunikado de la FARK en la zono de malstreĉiĝo de la Kagŭano, kaj poste direktis ĝiajn radiostaciojn kaj ĝian revuon *Resistencia*. Ŝia komisio estis varbi studentojn por la celmotivo de la gerilo, kaj estis la unusola virino, ene de la virprefera strukturo de la gerilo, kiu atingis estis parto de la stabo de la FARK.

Kiel kuriozaĵo, inter la kaptitoj tiutage oni identigis sindikatan gvidanton kiu eliris kurante kun la gerilanoj, fuĝinte el la armea agado, kaj kiu fine sin liveris kaj pretekstis ke li troviĝis tie kiel ostaĝo kaptita kelkajn tagojn antaŭe. La strangaĵoj de la afero estis ke lia familio prezentis neniun plendraporton pro lia malapero kaj ke la sindikatisto kunportis poŝtelefonon. Kiam la generalo Herazo havis lin fronte, diris al li kun natura nefidemo:

— Permesu al mi diri ke vi estas la unua ostaĝo kiun mi

¹ NT Skribita en romaji "Chikao Muramatsu".

trovas kun propra poŝtelefono.

Gaitán, siaflanke, premita far la trupoj, provis retreti kun siaj homoj al Metao, tamen la 1-an de marto ili estis batalbaritaj kaj la hardita gerilano ekrestis mortigita.

En nur tri tagoj la Armitaj Fortoj sukcesis malaktivigi la tri kapulojn kiuj estis komisiitaj pri la reaktivigo de la RUAN, kaj tiu ĉi terorisma strukturo ekrestis fakte senspinigita. La komputilo kiun oni trovis ĉe la Negro Antonio, same kiel jam estis okazinta pri tiu de Chucho, helpis kompletigi la puzlon por plue dispecigi la strukturon.

Tiun saman semajnon oni arestis la alinomitan *Negro Juancho*, la dua kapulo de la Urba Fronto Manuel Cepeda Vargas en Būenaventuro, kaj eltrovis la kavernojn kiujn uzis la Mono Jojoy kaj sia gardistara ringo kiel rifuĝejo en La Macarena (Metao). La “nigra marto”, feliĉe, ne okazis por Kolombio sed por la FARK.

Lastpasintaj frapoj al la RUAN

Je la finiĝo de marto de 2009, la Polico atingis la kapton, en suburbo de Bogoto, de la alinomita *Camila* aŭ *Patricia*, kiu estis restinta responsa pri la malfortigita Urba Reto Antonio Nariño. Estis en ŝiaj komputiloj kie oni trovis la videaĵon en kiu aperas la Mono Jojoy parolante kun grupo de gerilanoj kaj legante al ili leteron de Tirofijo¹, en kiu ĉi-lasto mencias la “helpo per dolaroj al la kampanjo de Correa kaj postaj interparoladoj kun liaj mesaĝistoj”². La informo enhavita en tri komputiloj kaj pluraj poŝmemoriloj konfiskitaj el Camila estas tiel vasta kiel tiu kiun havis en la siaj Raúl Reyes, pro kio ankoraŭ restas multo por esti konota el ilia enhavo.

Ankaŭ en majo, fakularo de DIJIN³ de la Polico alvenis al la tendaro de a lia kapulo de la FARK, kiu estis sukcesinta

¹ NT Vidu la 3-an piednoton de la 4-a paĝo.

² NT Kiel rakontite en la 26-a ĉapitro (200-a paĝo).

³ NT Menciita en la 142-a paĝo kaj la tiea 2-a piednoto.

eskapi el la ĉirkaŭbaro de la Operaco Fortikaĵo: la alinomita *Yerminson*, la ĉefo de la 51-a fronto, komisiita far Jojoy por plufari ostaĝigojn, ĉantaĝojn kaj atencojn en Bogoto. Danke al la konventempa polica agado, farita en sovaĝa areo de Tolimo, oni trovis pruvojn pri planoj por atenci kontraŭ la publika sistemo de amastransporto Transmilenio ¹ kaj kontraŭ bankaj institucioj, same kiel por ostaĝigi pli ol dudekon da komercistoj. Ĉi tiu informo ebligis frustri la terorismajn intencojn de la gerilo.

Yerminson estas hodiaŭ la homo komisiita por repreni la restaĵojn de la Plano 2010, tamen lia situacio estas ĉiufoje pli nefirma. La Kvina Divizio kaj specialaj fortoj de la Armeo, la Polico kaj la Aera Forto lin persekutas, kaj lia fronto perdis pli ol 60% de ĝia batalpovo.

Pli proksimdate, la 27-an de aŭgusto de 2009, la Polico kaptis en Bogoto alian gravan anon el tio kio restas de la RUAN: la alinomitan *David*, kaj lian patrinon. David estas kulpigita pri kunordigi almenaŭ 30 atencojn en la nacia ĉefurbo, kaj li estis panante plurajn pli kontraŭ diversaj gravuloj, samtempe kiam lia patrino okupiĝis pri varbi junilojn por la FARK per la PC3.

Samtage, la Teknika Fako ² de la Prokurorejo kaptis, ankaŭ en la nacia ĉefurbo, la alinomitan *Francisco*, profesoro de la Agronomia Fakultato de la Nacia Universitato, kiu estis pretiganta atencojn kontraŭ la prezidento Álvaro Uribe, por kio li studis ties veturojn al la armea flughaveno de CATAM kaj la manieron alproksimiĝi al la prezidenta aviadilo, por ĵeti kontraŭ ĝi metie faritan raketon, io kion li estis nominta Fina Plano. Oni ankaŭ trovis pruvojn ke li organizis atencojn kontraŭ la ministro pri Internaj Aferoj kaj Justico, Fabio Valencia, kaj la eksministro pri Agrikulturo, Andrés Felipe Arias. Lian kapton oni atingis danke al informo akirita el la komputilo de la Negro Antonio.

¹ NT Nomo de la amastransporta sistemo de Bogoto funkcia per busoj.

² NT Vidu la 1-an piednoton de la 47-a paĝo.

Nek la RUAN, nek la planoj de la FARK por reveni al Kundinamarko estas plene ekstermitaj, tamen la fakto estas ke ĉiufoje ĝi malproksimiĝas pli disde la eblo realigi tiujn planojn. La frapoj donitaj estis tre fortaj, kaj iliaj strukturoj estas ĉiutage pli malfortikaj. Dume, per ĉiu atenco kiu ne okazas, per ĉiu ostaĝigo malebligita, per ĉiu alproksimiĝprovo frustrita, oni savas la vivojn de multaj kolombianoj kaj kaj damaĝas la gerilon en la ununura rimedo kiu, bedaŭrinde, restas al ĝi por fariĝi rimarkebla: la terorismo.

LA PLEJ BONA DECIDO

La mesaĝo kiun mi donus al miaj kunuloj estas ke ili decidu malmobiliziĝi, ke ili enaziliĝu en la planon de resocianigo kaj en la favorojn kiujn donas la registaro, ke ili reenmetiĝu en la civilan vivadon, kia estas la plej bona vojo, kaj ke ekzistas unu lando kiu atendas kaj apogos ilin (...)

La eliro estas la malmobiliziĝo. Ne ekzistas pli bona eliro.

Daŭri en la gerilo estas atendi la morton.

Do, la plej bona konsilo, kiun mi al ili donas elkore, estas: Ekprenu la decidon kiel eble plej baldaŭ kaj venu, ĉar ni ĉiuj atendas vin.

LA ALINOMITA ISAZA

Plotonestro de la fronto "Aurelio Rodríguez" de la FARK, malmobiliziĝinta en Oktobro de 2008

ĈAPITRO 37-a

Ostaĝoj kun fusiloj

La voĉo de Shakira ¹, en la koncerto de la Tago de Sendependiĝo, la 20-an de julio de 2008 ², en Leticia (departemento Amazonio), kiu samtempis kun la marŝoj en ĉiuj urboj de la lando kontraŭ la ostaĝigo, resonis en la ĝangaloj de Kolombio kun la sama potenco al kia ŝi nin alikutimigis per siaj kantoj: “Ni volas peti al tiuj kiuj ribelas per armiloj, ke ili elliberigu sin mem el sia propra ostaĝeco, ĉar ankaŭ ili estas ostaĝoj en la tenebro de la ĝangalo.”

Tio estas malfeliĉiga realaĵo. En nia lando, krom la ostaĝoj pro kiuj oni postulas elaĉeton kaj krom la pli ol dudek armeanoj kaj policistoj kiujn la FARK nomas interŝanĝeblaj, ankaŭ ekzistas miloj da junuloj, kamparanoj plejmulte, kiuj, kvankam ili sin vestas per la uniformo de la gerilo, estas iel ostaĝigitaj far sia propra organizaĵo, al kiu ili aniĝis devigite aŭ trompate, kaj el kiu ili ne scias kiel eliri.

La plimulto el ili estis rekrutigitaj inter la 12-jara kaj la 16-jara aĝoj, promesinte al ili stabilajn enspezojn kaj la eblon partopreni en socia revolucio kia portus ilin al la ekpreno de la ŝtatpovo. Kelkajn semajnojn post enbandiĝi, la plimulto el ili ekrestas senrevigitaj, kaj etrovas ke tiuj promesoj estis nenio alia ol mensogoj, kaj ke sia destino, ekde tiam, estos

¹ NT Fama kolombia pop-muzika kantistino.

² NT Vidu la lastajn du paragrafojn de la 9-a ĉapitro (paĝoj 82-83).

nenio alia ol longa delokado tra la ĝangalo, sensenca, vivonte en kondiĉoj malfacilaj kaj ofte malriĉegaj, riskante la vivon kaj kaŭzonte doloron al siaj samlandanoj, sen iu difinita nordo. Se ili restas, tio estas ĉar oni minacas pafmortigi ilin aŭ damaĝi iliajn familiojn okaze ke ili provu dizerti. Cetere, oni diras al ili ke la oferoj de la aŭtoritatoj estas trompo, kaj ke ilin atendas nur la prizono kaj la torturo.

La alinomita *Isaza*, gerilano kiu aniĝis en la FARK kiam li estis 14-jara kaj malmobiliziĝis kiam 27-jara, post pli ol dek du jaroj en la organizaĵo kaj fariĝinta iam komandanto de la gerilo, estos ĉefrolulo de la venonta ĉapitro, ĉar li fariĝis la unua gerilano kiu fuĝis kun ostaĝo sub sia responso por akceptiĝi en la resocianigan agrogramon de la registaro.

Kiam la ĵurnalistino Marcela Durán, de la Agrogramo por Humana Zorgo al la Malmobiliziĝintoj (PAHD¹), demandis la gerilanon Isaza pri kion li faris dum sia tempo en la gerilo, lia respondo estas jena:

- Piediri, elteni bezonojn, fari tion kion la komandanto diras, kaj rezignacii pri la vivo en la sovaĝbarbaro.
- Kial rezignacii?
- Ĉar kun la tempopaso oni rimarkas ke ĉio estas malvera, tio kion ili diris al oni, kaj ke tio estas senfina lukto ĉar neniam oni alvenos al la celo al kiu oni volas alveni.

Poste, la intervjuistino petis lin priskribi tiujn pli ol dek du jarojn kiujn li travivis en la gerilo, kaj demandis lin pri tio kion li lernis dum tiu tempo, pri kio li respondis:

- Tiuj jaroj por mi estis perditaj ĉar ili nur portas onin al koni kaj fari malbonaĵojn por la socio, al damaĝi la socion, pli ĝuste dirite. Nenion bonan mi lernis tie. Ili utilis al mi por nenio ĉar ili estis perditaj. Ne penindas tiom da sinofero tie ...

Kiom da miloj, kiel Isaza, daŭras “ostaĝigitaj” kun sia

¹ NT Mallongigo de la hispanlingva nomo.

fusilo apudŝultre, misuzante la plej bonajn jarojn de sia vivoj, persekutante celon neeblan kaj farante damaĝon al sia lando!

Pli bone malmobiliziĝinto ol arestito aŭ mortinto

En majo de 2007 mi prezidis en Kartageno emociigan ceremonion en kiu la departamentestroj, komunumaj gvidantoj, popolaj organizaĵoj, sociaj kaj ekonomiaj gildoj, kaj la Polico, sukkskribis interkonsenton por la Homaj Rajtoj kaj la Respekto al la Vivo, devigontaj sin ekpreni serion da rimedoj por malpliigi la agresojn kaj antaŭmalhelpi la murdojn, en la kadro de la Jaro de la Respekto kaj Protekto al la Vivo, kiun la la prezidento Uribe estis proklaminta.

Mi tiam eldiris kelkajn vortojn kiuj, ekde tiu momento, mi ripetis en preskaŭ ĉiuj miaj paroladoj fronte al la publiksekuriga agentaro, kaj kiuj resumas ĝian sindevigon pri la vivo kaj pri doni duan ŝancon al anoj de malleĝaj armitaj grupoj kiuj serĉas havi tian.

“Pri la publiksekuriga agentaro —mi diris en Kartageno—, ni invitas niajn trupojn por ke, sen sidefkti la lukton kontraŭ la terorismo kaj la narkotajkomerco, ni privilegiu la vivon ĉiumomente kaj klopodu savi eĉ tiujn kiuj estas aliflanke de la leĝo.”

“Pli ol gerilanoj aŭ narkotajkomercistoj aŭ deliktuloj senvivigitaj, kiom bone se ni havas ĉiutage pli da kaptitoj kaj, dezirinde, pli da malmobiliziĝintoj kiuj decidu propravole respondi pri siaj agoj kaj akceptiĝi en la grandanimecon de la Ŝtato !”

“Ni volas ke tiuj kiuj konsistigas la eksterleĝajn grupojn konservu siajn vivojn, kaj tial la sinteno de la registaro estas grandanima, preta doni al la violentuloj la ŝancon malmobiliziĝi kaj komenci novan vivon kiel produktopova parto de la socio.”

Tiun mesaĝon mi igis *leitmotiv* en ĉiuj miaj paroladoj, kio resumeblas en la jena frazo:

- Valoras pli malmobiliziĝinto ol arestito, kaj valoras pli arestito ol senvivigito.

Ĉi tio signifas ŝanĝiĝon en la pensmaniero de la Militfortoj kie, pro la klasika pormilita trejnado, oni interpretis la morton de la malamiko kiel la maksimuma premio. Ekde ĉi tiam, la plej granda konkero estos ke la atingo ke la malamiko antaŭa konvertiĝu en personon bonintencan por la socio.

Tiu ĉi instrukcio, kiu kosistigis parton de la sindevigo de la Armitaj Fortoj pri la homaj rajtoj, estis poste stampita en operaca gvidilo por la trupoj, subskribita far la ĝenerala komandanto de la Militfortoj.

ĈAPITRO 38-a

La fuĝo de Lizcano

Óscar Tulio Lizcano estis ostaĝigita, kiam li estis reprezentanto en la ĉambro de deputitoj, la 5-an de aŭgusto de la jaro 2000, en Riosucio (Kaldas), kaj ekde tiam li restis sub reteno de la fronto Aurelio Rodríguez kiu agadis en la limoj inter la departementoj Ĉokoo kaj Risaraldo. Malsame ol la plimulto el la ostaĝoj nomitaj “intersanĝeblaj” —krom la eksministro Fernando Araújo, kiu travivis saman ziolitecon—, Lizcano ne estis akompanita kun aliaj ostaĝoj kaj li estis devigita elteni pli ol ok jarojn da ostaĝeco en pla plej profunda izoliteco, pasigante foje monatojn sen interparolo kun alia homo. Li mem rakontis ke por teni sin malfreneza kaj por ekzerci sian menson, li praktikadis siajn lertaĵojn profesorajn —ĉar li estis profesoro en pluraj universitatoj— instruinte lecionojn al grupo de liagnaj palisoj, kiuj por li estis siaj lernantoj. Li ankaŭ fuĝis en la poezion, kiun li verkis por sia edzino kaj siaj filoj kaj en la ripetada lego de libro far la hispana poeto Miguel Hernández alveninta al siaj manoj. Lia severa travivaĵo de ostaĝeco estas rakontita, vivece, en lia libro *Años en silencio*¹.

Krom la soleco kaj la severeco de la ostaĝstato, Lizcano, kiu fariĝis 60-jaraĝa dum sia ostaĝdaŭro, suferis malsanojn bedaŭrindajn kiuj timigis pri sia vivo. Multfoje ni kolombianoj

¹ NT “Jaroj en silento”.

petegis, al la surdaj oreloj de la FARK, por ke ĝi lin liberigu kiel humana faro, konsiderinte lian sanproblemojn.

En tia situacio, en marto de 2008, la prezidento Uribe malfermis plian pardonon por la libero de la ostaĝoj, per la anonco de la destino de abunda fonduso por pagi rekompencan al tiuj gerilanoj kiuj forfuĝu kune kun ostaĝoj sub sia reteno. Tiel li diris dum Registara-Komunuma Kunsido¹ en San José de la Gūavjaro:

“Mi volas ripeti ke ekzistas ofero de 100 milionoj da dolaroj, por pagi rekompencojn al tiuj gerilanoj kiuj forlasas la gerilon kaj elportas kun ili ostaĝojn”

“Tiuj gerilanoj estas tiom ostaĝigitaj kiom la ostaĝoj. Tiom ostaĝigita estas la kaptinta gerilano kiu gardas la ostaĝon kiom la ostaĝo. Kaj ili finrestas suferante egale”

“Tiu ĉi voko estas por ke tiu gerilano haltu survoje, pripensu, forlasu tiujn grupojn kaj alportu kun ili la ostaĝojn kaj ilin liberigu. Por tio ni havas fonduson de 100 milionoj da dolaroj por pagi tiun rekompencan”.

Tiu ĉi ofero komenci subfosi la spiritfortikecon de la gerilanoj kiuj, teditaj pro jaroj da sinoferoj kaj humiligoj, vidis la eblon komenci novan vivon. Tamen, tia ne estis decido facile farebla. La komandantoj de la FARK klopodis timigi ilin ĉiumomente, dirinte al ili ke la promesoj de la registaro neniam plenumiĝas kaj rememorigante ilin ke, iu ajn kiu provu dizerti estos tuj mortpafita.

Estis nur je la finiĝo de oktobro de 2008 kiam iu gerilano kuraĝis fari la aŭdacan paŝon, ne nur fuĝi, sed ankaŭ elporti kun si ostaĝon.

¹ NT La “Registara-Komunuma Kunsido” (hispanlingve “Consejo Comunal”) estis plurhora kunsido, iniciatita far la prezidento Uribe, okazigita preskaŭ ĉiusemajne (305 dum 8 jaroj), plejofte sabate, en kiu la prezidento mem kaj aliaj funkcianoj de la registaro kunvenis kun la popolo por pritrakti lokajn aŭ fakajn problemojn, projektojn, k.t.p. kaj la rilatan agadon de la registaro. Tiuj okazis en diversaj lokoj tra la tuta Kolombio. La lasta okazis la 24-an de Julio de 2010.

“Mi elprenos vin el tie ĉi”

Ekde la komenciĝo de 2008, la Polico kaj la Armeo estis farantaj rigoran spuradon pri la fronto Aurelio Rodríguez. La Polico, per agado informiĝa el homoj kaj el teknikiloj, kaŝkaptis la komunikojn telefonajn kaj radiajn de ĝiaj anoj, kontaktis iliajn familianojn por sendi al ili mesaĝojn kiuj invitis ilin malmobiliziĝi, kaj atingis precizajn informojn el tiuj kiuj estis forlasintaj la gerilon. Ĉiun monaton kiu pasis ili havis pli klaraj la agojn de la fronto kaj la eblan situon de la gerila komisiitaro kiu havis sub sia povo al Óscar Tulio Lizcano. Dume, la Armeo progresis en taskoj de spurado kaj ĉirkaŭado en la areoj de San José del Palmar, Bogadó kaj Condoto en la departemento Ĉokoo, ferminte moviĝebligajn koridorojn kaj vojojn de provizado, kio igis ĉiufoje pli nefirma la situacion de la FARK en la areo.

Ĉe aprilo okazis anstataŭo en la komando de la komisiitaro kiu retenis S-ron Lizcano. La alinomita *Sebastián* estis anstataŭita per la alinomita *Isaza*, gerilano kun pli ol dek du jaroj da spertado, konsiderita bona batalanto, kiu estis perdinta okulon kvar jarojn antaŭe dum bataloj kontraŭ la Armeo. La grupo kiun ricevis Isaza estis senkuraĝigita pro la senĉesa persekutado far la publiksekuriga agentaro kaj pro la malfaciloj por atingi manĝaĵon. Cetere, la malmobiliziĝoj el la fronto Aurelio Rodríguez estis ĉiufoje pli oftaj. Eĉ la amkunulino de Isaza, alinomita *Yurani*, dizertis, same kiel la alinomitaj *Kevin* kaj *Angy*, kiuj sin liveris al la 14-a moviĝa brigado en San José del Palmar. Poste, la 2-an de oktobro fuĝis la alinomita *Morroco* kaj prezentis sin ĉe polica posteno. Per lia kunlaboro, oni ekkonis pri la malbona farto kian suferis Lizcano kaj determinis precize la areon kie ili havis lin.

Danke al informo atingita far la Polico, la Armeo povis streĉi eĉ pli la ĉirkaŭbaron, en agado de premo kaj blokado kontrolita far sia komandanto mem, la generalo Mario Montoya. Oni estis sciinta ke la gerilanoj estis transironta la

riveron Timaná, ĉiam en jurisdikcio de San José del Palmar, kaj oni decidis postenigi trupojn en la rivero por bloki iun ajn eliron. La celo, pli ol atako, kio povus endanĝerigi la vivon de la ostaĝo, estis limigi la gerilanojn al areo kontrolebla, kaj premi ilian malmobiliziĝon kaj la liveron de la ostaĝo. Ankaŭ la Polico havis preta por agado grupon de ĝangalaj homoj¹.

Isaza, dume, cerbumis, voje al la decidiĝo plej grava de sia vivo. Li rimarkis ke sia komisiitaro estis en stato de plena neglektado far la cetero de la fronto, kun kreskanta manko de manĝaĵoj kaj aliaj provizaĵoj; li sentis la premon de la streĉigo de la militistara ringo ĉirkaŭ ili, kaj li sciis ke la ĵuslastaj malmobiliziĝintoj povus estis liverintaj al la Armeo informon ŝlosilan por lia lokalizo. Cetere, la mesaĝoj kiujn li aŭskultis en la radioaparato instigantaj al malmobiliziĝo kaj letero kiun li trovis en la ĝangalo —el la miloj da flugfolioj kiujn ofte oni delasis elde helikopteroj—, en kiu la Armitaj Fortoj invitis la gerilanojn forlasi la armilojn kaj garantiis ilian vivon, faris impreson en lia spirito. Li rigardadis S-ron Lizacano, kiun li nomis ‘el Cucho’², ĉiufoje pli ŝrumpinta kaj subnutrita, suferinta la damaĝojn el ĵuspasinta malario, kaj li timis pri lia superviveblo. Se la aferoj daŭrus tiel, li perdus la ostaĝon, kaj ne pro ago de la publiksekuriga agentaro.

Elkovis lian decidon la fuĝo de Morroco kaj, fine, dum momento kiam ili estis solaj, li ellasis jenan frazon al sia ostaĝo:

— Se vi sentas vin en taŭgaj kondiĉoj, mi elprenos vin el tie ĉi.

Lizcano, spite sian malbonana farton, konsentis la proponon kaj respondis ke pro la libero li estis preta fari ĉion ajn.

Tiele la aferoj, la nokton de la 24-a de oktobro, je ĉirkaŭ la oka horo nokte, dum la gardo-periodo kiun Isaza estis

¹ NT Vidu la piednoton de la paĝo 178-a.

² NT Elparolita “el kuĉo”, en Kolombio estas slango signifanta “La maljunulo” kaj foje “(mia maljuna) paĉjo”.

rezervinta por si, la gerila kapulo elŝteliĝis el la tendaro, elportante kun si S-ron Lizcano, kies ulceriĝintaj piedoj apenaŭ tenis lin stare, en ago kiu povus kosti al ili la vivon aŭ doni la liberon.

Post du noktoj kaj du tagoj da peniga trairado, en kiu, ĉe la fino, pro la malvigleco de Lizcano, Isaza devis porti lin sur sia dorso. Ili alvenis ĝis la rivero Tamaná la dimanĉon 26-an de oktobro matene, kaj ekvidis patrolon de la Armeo ĉe la transa bordo. Ili faris signalojn al la soldatoj tamen ĉi tiuj ignoris ilin, ĉar ili ŝajnis du ebruloj sin brakumantaj kiujn surprizis la tagiĝo vagantajn ĉe la riverbordo. Fine, Isaza montris al ili sian fusilon, kaj la soldatoj komprenis ke tiuj estis gerilano malmobiliziĝinta kaj Óscar Tulio Lizcano, la viro kiun ili serĉadis dum tiom da tempo, kaj transiris per boato por tiujn preni.

La ekskongresano, kun pantalono kaj T-ĉemizo kovritaj per koto, barbo densa kaj grizhara, kaj la vizaĝo plena de faltoj, spegulis per sia aspekto la kalvarian vojon de pli ol ok jaroj kiuj maljunigis kaj malfortikigis lin tro multe. Tamen li ne perdis sian mensklarecon nek ĉesis danki al Isaza, sia lasta viktimitiginto kiu, de unu tago al la sekvinta, fariĝis sia savinto.

Baldaŭ helikoptero, en kiu veturis la generalo Montoya mem, alvenis al la loko por ilin preni, kaj portis ilin al la aerbazo Marco Fidel Suarez en la urbo Kalio, kie Lizcano povis finfine brakumi sian edzinon, al kiu li estis dediĉinta la plej sicerajn amajn versaĵojn, kaj siajn filojn, unu el kiuj fariĝis kongresano dum lia ostaĝdaŭro.

Tie mi havis la eblon saluti S-ron Óscar Tulio Lizcano, doni al li brakumon de bonveno al la libero, kaj interparoli kelktempe kun li, kiu estis rimarkeble lacega pro lia odiseado. Ankaŭ mi certigis al Isaza ke la ofero de la registaro estos efektivigata, kaj ke li ricevos la favorojn promesitajn al tiuj kiuj liveris ostaĝojn.

Semajnojn poste, kaj plenumitaj la laŭleĝaj demarŝoj,

Isaza atingis monvaloregan rekompencan kaj vojaĝis al Francio, kune kun Yurani, sia amkunulino, invitita far la franca registaro pro peto de Ingrid Betancourt. Hodiaŭ li estas libera homo, kiu studas kaj preparas sin en Parizo por fari ion utilan por li kaj por la socio. Li ne plu vivos perditajn jarojn, kiel tiuj kiujn li pasigis en la gerilo, sed jarojn da kreskado, en kiuj li povos reatingi la vojon de la scio, la servo kaj la amo.

ĈAPITRO 39-a

La ekzemplo imitiĝas

La fuĝo de Isaza kun Óscar Tulio Lizcano havis multajn pozitivajn konsekvencojn. La unua estis ke ĝi rezultigis disbandiĝon el la fronto Aurelio Rodríguez, kie multaj aliaj gerilanoj decidis forlasi la armitan lukton. Nur en la jaro 2008, 79 anoj el tiu fronto malmobiliziĝis antaŭ la aŭtoritatoj. El tiuj kiuj restis, du el la plej gravaj. la alinomita *Federico* kaj la alinomita *Paludismo*, falis en decembro, la unua faligita dumbatale, kaj la dua arestita.

Ankaŭ imitiĝis la ekzemplo. Post la kuraĝa ago de Isaza kaj vidi ke la registaro plenumis la promeson lin rekompenci, aliaj gardistoj de la FARK aŭdacis eskapi kun siaj ostaĝoj.

La sekvinta similaĵo okazis dum la unuaj tagoj de januaro de 2009, kiam gerilano apartenanta al la 51-a fronto, komandita far Yerminson, konita per la alinomo *Myriam*, proponis al tri ostaĝoj kiuj estis sub sia gardado ke ili fuĝu kun ŝi. Du ne konsentis —unu ĉar sia multjara aĝo malhelpis aventuron tian kaj alia ĉar li ne volis riski sin— kaj nur unu, Juan Ferdando Samudio, komercisto kiu tiam kompletigis preskaŭ du jarojn en manoj de la FARK, kuraĝis akompani ŝin. La familianoj de Samudio estis pagintaj en tri fojoj elaçeton pro lia liberigo, kaj malgraŭ tio, ili daŭris submetitaj al la arbitro de la ostaĝigantoj kiuj ĉiufoje malobservis sian parton de la interkonsento.

Myriam, 35-jaraĝa —el kiuj 18 jarojn ŝi estis en la vicoj de la gerilo— estis seniluziigita pri la vivo en la sovaĝbarbaro kaj volis reatروي ajnakoste siajn filojn, kiujn ŝi estis formetinta disde si obeante la regulojn de la FARK: unu estis 17-jara kaj la alia 5-jara. Fakte, ŝi estis planinta fuĝi ekde kiam ŝi estis translokita al la 51-a fronto, kiu agadia en la limoj inter Uribe (Metao) kaj Cabrera (Kundinamarko), tamen ŝi havis kuraĝon por fari tion nur post kiam ŝi informiĝis pri la bona sukceso de la eskapo de Isaza kaj pri la bona trakto far la aŭtoritatoj. Per tiu ĉi aldona instigmotivo, ŝi ekpretigis la fuĝo kun Juan Fernando. Ili pensis, komence, fuĝi dum la nokto de la 31-a de decembro de 2008, tamen ili abortigis la planon ĉar ili timis ke se kelkaj gerilanoj alproksimiĝus al la kabanaĉo de la ostaĝo por deziri feliĉan jaron, ili malkovrus lian foreston.

Fine, la 2-an de januaro nokte, post lasi en la tabullito de Juan Fernando specon de pupo kiu ŝajnis lian ĉeeston, kun malnovaj kaŭĉukaj botoj en la planko, Ili eliris el la tendaro dum la tempo kiam ŝi deĵoris gardante kaj komencis plurhoran trairadon kio portis ilin al najbarejo de armea grupo antaŭ kiu ili sin prezentis. Myriam, ĝis la lasta momento, hezitis malmobiliziĝi antaŭ la Armeo, pro la antaŭtimo kiun siaj komandantoj semis en ŝi. Eĉ, ŝi pensis lasi S-ron Juan Fernando apud iu bazo kaj pluriri sola sian vojon. Laste, ŝi fine sin liveris kun li, kaj ŝi surpriziĝis, ekde la unua momento, pro la bona trakto kaj la bonvenon kiujn donis al ŝi la soldatoj.

— Ili estis tre afablaj al mi kaj al Juan Fernando —ŝi deklaris poste en ĵurnalistara intervjuo—. Tio impresis min multe ĉar tio kion ili inspiras al oni estas alia afero kaj mi havis bildon malsaman pri la Armeo, tamen ĉi momente mi ekrimarkas ke ĝi ne estas tia. Mi havis timon liveri min al la Armeo ĉar oni diris al mi ke ili perfortos min kaj poste min mortigos. Tamen (la leŭtenanto kiu min akceptis) klarigis al mi ke la politiko estas ke pli bonas malmobiliziĝinto ol mortinto kaj tial ili respektas la vivon al la personoj kiuj sin liveras.

Nuntempe, Myriam jam rerenkontiĝis kun siaj du filoj, ricevis rekompencan pro ŝia kuraĝa ago, kaj estas prezurige vidi ŝin, kiel alia ajn kolombiano, ludantan kun sia eta infano, kiu estas vulkano da energio, donantan al li kison kaj haltigantan liajn petolaĵojn, kun ĝoja brilo en siaj okuloj. Nun ŝi povas esti patrino, finfine patrino, io tiel natura kiel tio, kion la gerilo malpermesis al ŝi esti.

Sed la rerenkontiĝoj ne ĉesis per tiu. Kiel plia pruvo pri la paradoksoj de la milito en Kolombio, Myriam, la eksa gerilano, kunsidis, kelkajn tagojn post sia malmobiliziĝo, kun sia frato Roberto, profesia soldato kiu estis amputita la antaŭan jaron pro kontraŭhoma mino semita far la FARK. La du gefratoj, kiuj batalis en kontraŭaj flankoj, kaj kiuj havis en siaj animoj kaj siaj korpoj la cikatrojn el sensenca interbatalado, kunfandiĝis en brakumo kaj, kune, ili sendis mesaĝon al la gerilanoj por ke ĉi tiuj malmobiliziĝu kaj renkontiĝu kun siaj familianoj¹.

“Ĉi tie mi estas vivanta kaj antaŭ multaj homoj”

Apenaŭ dek tagojn post la fuĝo de Myriam kun Juan Fernando, pliaj du gerilanoj, en la limoj inter Metao kaj Kundinamarko, en la areo de la Altebenajo de Sumapáz, la alinomita *Ernesto* kaj la alinomita *David*, ĉiu el ili kun pli ol ses jarojn en la FARK, ankaŭ decidis eskapi, portante kun ili du ostaĝojn kiuj estis forkaptitaj kelkajn tagojn antaŭe: Leonardo Almaciga, komercisto 31-jara, kiun ili ostaĝigis la 24-an de decembro, kaj Álvaro Martínez, junulo 14-jara, ostaĝigita tri tagojn poste, pri kiu ili petis elaĉet-monon al lia familio, samtempe ke ili estis komencinte endoktrinigi lin por rekrutado.

La unuajn tagoj de ilia ostaĝstato, Leonardo kaj Alvaro

¹ Myriam ĵus publikigis per sia vera nomo, Zenaida Rueda, la libron *Confesiones de una guerrillera* (“Konfesoj de gerilano”), [eldonejo Planeta, 2009], kie ŝi rakontas sian travivaĵon dum sia longa kaj malfacila militado en la FARK, kaj faras radiografajn pri tiu terorisma grupo.

devis elteni subnulajn temperaturojn, ŝirmitaj dumnokte nur per pecoj el plastajo, ĉar la gerilanoj donis nenion por ke ili kovru sin. La alinomita *Ernesto*, kiu alvenis la 3-an de januaro al ilia tendaro, kompatis ilin kaj havigis litkovrilojn al ili por dormado, kaj li estis tiu kiu, fine, proponis al ili fuĝon, plano kiun ili efektivigis la 12-an de januaro.

Per poŝtelefono kiun portis Ernesto, Leonardo sukcesis komunikiĝi kun sia familio kaj informi pri sia fuĝo, kaj sia familio raportis al la GAULA¹ de la Polico, kiu estis okupiĝanta pri la afero de tiu ostaĝigo. Danke al tio, per sporadaj telefonvokoj por ne elĉerpi la baterion de la poŝtelefono, fine ili povis esti lokalizitaj far la komisiita esploristo, finiĝinte tiel por la du ostaĝoj la tri semajnoj plej malfacilaj el siaj vivoj, kaj komenciĝinte, por Ernesto kaj David, novaj vivoj en la laŭleĝeco.

Laŭ tio dirita far Ernesto, tio kion ili aŭdis pri la fuĝoj de Isaza kaj de Myriam kun la ostaĝoj sub ilia responso, instigmativis ilin por fari tiun ĉi elliberigan agon. Eĉ, en la porjurnalista intervjuo kiun li havis kun la ceteraj roluloj de la eskapo, li faris deklaron kontraŭ la ostaĝigo:

— Mi tenas min kontraŭ la ostaĝigo. Neniam ŝatis mi tion. Mi ne rigardas grupon kiu deklaras sin luktanta por revolucio kaj ostaĝigas neplenaĝulojn, retenas homojn kaj havas ilin en la ĝangalo. Neniam ŝatis mi tion.

Kaj li findiris:

— Mi invitas miajn ekskunulojn kiuj restis en la ĝangalo rigardi min ĉi tie, mi vivas; ne okazas kiel estas dirite al oni tie, ke oni sinliveras kaj ili onin mortigas kaj malaperigas. Ĉi tie mi estas vivanta kaj antaŭ multaj homoj.

¹ NT Vidu piednoton de la 48-a paĝo.

ĈAPITRO 40-a

La sekreta armilo

La malmobiliziĝo de la anoj el la malleĝaj armitaj grupoj, kia la FARK, estas procezo kiu iras preter la forlaso de la violento; temas pri retrovi la vivon malantaŭe lasitan, la familion, la liberon kaj lokon en la socio. Tio estas ankaŭ simptomo pri la dekadenco de la gerilo. Per ĉiu batalanto aŭ urbobandano kiu entiriĝas en la Agprogramon por Malmobiliziĝintoj —kaj la meznombro estas po inter ok kaj dek ĉiutage— ekestas mortfrapo por tiuj kiuj restas, demandantaj sin ĉiufoje pli insiste pri la senco de sia vivo en la ĝangalo, formetiĝintaj disde ĉio, fuĝantaj ĉiam, kaŭzantaj damaĝon kaj doloron al siaj samnacionoj, sen atingebla horizonto.

La nombro de gerilanoj kiuj forlasis propravole la armitan lukton ekde aŭgusto de 2002, kiam komencis la regado de la prezidento Uribe, ĝis julio de 2009, alproksimiĝas al 16.000, el kiuj proksimume 13.000 —pli ol 80%— apartenis al la fark.

Inter 2006 kaj 2008, dum la tri jaroj kiam tiu organizaĵo ricevis la plej fortajn batojn de sia historio, pli ol 7.000 forlasis ĝiajn vicojn. Tio estas senprecedenca atingjo kiu kompreniĝas per pluraj kialoj: elde la ekstera vidpunkto, ekzistas kontinua persekutado far la publiksekuriga agentaro, kio timigas la gerilanojn pro la certa eblo morti aŭ esti enprizonigitaj; ekzistas klareprimita instrukcio por ke la soldatoj, infanterianoj kaj policistoj faciligu la malmobiliziĝon

de la malamikaj batalantoj, antaŭ ilia aresto aŭ viktimitigo, kaj oni disvolvas kontinuajn kampanjojn, per mesaĝoj en radiostacioj, per laŭtparoliloj elde la aero, per flugfolioj kaj per televidaj anoncoj, invitante al la malmobiliziĝo, kaj rakontante pri la profitoj ricevataj far tiuj kiuj aliĝas al ĝi. Eĉ oni lanĉis vallenaton¹, kantita far tri diskonitaj artistoj —Pipe Peláez, Peter Manjarrés kaj Checo Acosta—, titolita *En la distancia* (“Ĉe la distanco”), kiu rakontas la historion pri gerilano decidinta reveni al sia hejmo, malproksime de la violento, al sia patrino kaj la virino kiun li amas, kantaĵo kiu estas sukceso laŭ aŭskultantaro ĉe la popularaj radiostacioj. Jen kion diras apartaĵo el ĝia inspirita versaro:

*“Kaj finiĝos jam
ĉiuj bataloj
de kruela stulta ĉi milit’
l’ animon tordanta”*

Nu, ekzistas ankaŭ internaj kialoj kiuj kondukas al la sama decido: la penigeco de la vivado en la gerilaj tendaroj, kia kontraŭas la promesojn faritajn al la junuloj kiam ĉi tiuj estis rekrutigataj; la manko de projekto efektivebla, kun estonteco, kia instigu ilin: la nostalgio pri la familio kaj, precipe, pri la gefiloj disde kiuj ili estas devigitaj apartiĝi, kaj —io ripetiĝinta en multaj raportoj de malmobiliziĝintoj— la elreviĝo kaj la kolero kiujn estigas ĉe la gerilanoj rimarki la manieron kiel ene de ilia organizaĵo pluvidas la neegalrajteco kontraŭ kio, supozeble, ili luktas, kaj la manieron kiel iliaj komandantoj vivas kun komfortoj kaj esceptaj reguloj kiuj ne aplikiĝas por la cetero el la trupo.

Gerilo sen kapitanoj

La grado de senkuraĝiĝo de la FARK dum la lastpasintaj tri jaroj speguliĝas, cetere, per fakto kiu ne povas pasi nerimarkite: ĉiutage pli la malmobiliziĝintoj estas gerilanoj

¹ NT Vidu la piednoton de la 212-a paĝo.

kun pli granda ordonpovo kaj servodaŭro, kio signifas egan katastrofon por la anaro de la gerilo.

Same kiel en iu ajn institucio, la sperto akumulita far ĉiu ano el la teamo riveligās neanstataŭebla, kaj tial okazas ke kadruloj kun kvin, dek aŭ dek kvin servojaroj en la gerilo, post ilia malmobiliziĝo, ekestis anstataŭitaj per gerilanoj junaj kaj nespertaj, sen la sama grado da engaĝiĝo kaj endoktrinigo, kiuj cedas antaŭ la tento de la narkotajnegocariĉaĵo kiun ili vidas pasantan tra siaj manoj, aŭ faras gravajn militajn erarojn.

En la jaro 2002 79% de la malmobiliziĝintaj gerilanoj el la FARK havis eĉ ne unu servojaron en la organizaĵo, tamen en 2008 la elcento de “novuloj” estis tre malalta, apenaŭ 5%. Male, en 2002 la malmobiliziĝintaj gerilanoj kiuj havis kvin aŭ pli da jaroj da aparteno al sia organizaĵo reprezentis 4% de la tuto, tamen en 2008 la dizertintoj kun pli ol kvin servojaroj en la FARK sumis 53%. Alivorte, en 2008 pli ol duono de tiuj kiuj forlasis siajn vicojn —1.509 nombre— estis gerilanoj kiuj pasigis pli ol jarkvinon en la sovaĝarbaro. El ili, 418 havis servodaŭron de inter 10 kaj 15 jaroj, kaj 106 servodaŭron de 16 aŭ pli da jaroj, kiel estis la okazaĵoj de Karina kaj Myriam.

Se ni transvortigus tiujn datenojn per armeaj terminoj, ni dirus ke la FARK hodiaŭ ne perdas tiom da senrangaj soldatoj pro la malmobiliziĝado sed ĉiufoje pli ĝi perdas spertoriĉan personaron ekvivalentan al siajn kapitanojn —inter 10 kaj 15 jaroj da formiĝado— aŭ eĉ majorojn kaj kolonelojn. Ankaŭ “generalojn” kiel Martín Sombra, kiu malmobiliziĝis en la prizono post 42 jarojn en la gerilo, kaj pli ol kvindek da armita luktado.

Tiu ĉi tendenco daŭras dum la jaro 2009, en kies unuaj ses monatoj malmobiliziĝis 1.084 anoj de la FARK, el kiuj 6% havis malpli ol unu servojaron en la gerilo, 38% havis inter unu kaj kvin servojarojn, 37% havis inter kvin kaj dek servojarojn, kaj 19% havis pli ol dek jarojn en ĝiaj vicoj.

Estas neeltenebla la situacio de iu ajn militistaro, ĉu

laŭregula, ĉu neregula, kiam ĝiaj trupoj dizertas kaj akceptiĝas sub la bonkoreco de la malamiko. Kion oni povas diri se ne estas timemaj knaboj tiuj kiuj ekprenas tiun decidon sed oficiroj, aŭ ties ekvivalentuloj, en ordonpovaj postenoj, formitaj post jarkvinoj aŭ jardekoj da endoktrinigo kaj batalado. Kiam la kapitanoj foriras, kiam la majoroj kaj la koloneloj foriras, io tre serioza estas okazanta.

Strategia avantaĝo

Ekzistas sekreto malantaŭ operacoj kiaj Ŝakon, Feniko kaj multaj aliaj kiuj kondukis al la senaktivigo de strategiaj kapuloj de la FARK aŭ al la elliberigo de ostaĝoj: la informo el la malmobiliziĝintoj.

En la Operaco Ŝakon, ekzemple, estus nepensebla la milita sukceso enfiltri kaj anstataŭi la komunikojn de la gerilo, inkluzive ĝiajn komunik-kodojn, se ne estintus pro la konaĵoj liveritaj far antaŭaj radiofunkciigistoj. Eĉ, je la momento elekti la ŝajnigaj membroj de internacia humanisma misio kiuj vojaĝis helikoptere al la ĝangaloj de Gŭavjaro, krom spertaj oficiroj, suboficiroj kaj informiĝfakaj agentoj, oni portis en la grupo malmobiliziĝintan gerilanon kiu plenumis la rolon de reprezentanto de Alfonso Cano, por estigi konfidon ĉe siaj kolegoj de la unua fronto.

La malmobiliziĝintoj gajnas specialan donacaĵon pro la informo kiun ili liveru pri siaj frontoj kaj komandintoj, kaj ili iĝis fundamenta akso de la batalado kontraŭ la terorismo de la FARK.

Inter 2003 kaj la unua duonjaro de 2009, 3.700 malmobiliziĝintoj kunlaboris per liveroj kaj lokalizoj de armiloj —164 maŝinpafiloj kaj mitraloj, 3.175 fusiloj, 433 ĉaspafiloj kaj karabenoj, 1.578 pistoloj kaj revolveroj, 324 haŭbizoj kaj grenadjetiloj, 1.406 gasbotelegoj, 10.386 grenadoj, kaj nenombrebla kvanto da municio—, pli ol 116 tunoj da eksplodaĵoj kaj 9.615 minoj kontraŭhomaj kaj metie faritaj. Cetere, ili helpis lokalizi 615 tendarojn kaj detekti 162

minitaj terenoj, kaj ili donis ŝlosilajn atestojn por la subjusticigo de 522 kapuloj kaj aliaj 4.110 kaptitaj gerilanoj.¹

Se la Ŝtato nun kalkulas kun iu “sekreta armilo” kontraŭ la FARK, tiu ĉi armilo forĝiĝis en la vicoj de la gerilo mem.

¹ La nombroj de ĉi tiu ĉapitro estis liveritaj far la Agprogramo por Humana Zorgo al la Malmobiliziĝintoj (PAHD) de la Ministerio pri Defendado.

LA KAMPANJO POR LA LAŬLEĜECO

*Tiu kiu batalas kontraŭ monstroj
devas singardi, por ne iĝi monstro.*

FRIEDRICH NIETZSCHE
Preter bono kaj malbono

ĈAPITRO 41-a

Unu politiko modelo en la mondo

Mi havas tre vivan la rememoron pri renkontiĝo en Israelo, dum la 1980-aj jaroj, en kiu kunvenis la kremo de la tutmonda ĵurnalistaro por analizi kial tiu lando gajnadis la batalojn ĉe la milita sfero tamen perdadis ilin ĉe la politika tereno. Tio estis invito farita de la israela registaro mem, maltrankvila pro la maniero kiel la amaskomunikiloj estis pritraktintaj tion kion ili nomis la masakron de Sabra kaj Ŝatila, kiu kontrastis kun la bildigo de ‘honesto milito’ farita pri la triumfo de la S-ino Thatcher en la milito de la Insuloj Falklando.

Inter la kolombiaj kunuloj estis Guillermo Cano, direktoro de *El Espectador*¹, kiu estis poste fie murdota pro ordono de Pablo Escobar, kaj la pastro jezuito Joaquín Sánchez, tiama dekano de Socia Komunikado, kaj nun rektoro, de la Universitato Pontifika Javierana. La lernaĵon el tiu interesa kunsido resumis Walter Cronkite, fama usona ĵurnalisto kaj novajprezentisto, per respondo kiun li donis al israela generalo:

- Vi neniam gajnos la batalon antaŭ la internacia publika opinio se nur la malamiko estas tiu kiu donas aliron al la gazetaro kaj profitas tiun situacion por

¹ NT Grava nacia Ĵurnalo de Kolombio, eldonata en Bogoto.

prezenti vin kiel la plej grandaj malrespektantoj de la homaj rajtoj.

Gajni la batalon antaŭ la publika opinio estas tiel grave kiel gajni la batalojn militajn, tio estis la granda konkludo el tiuj tri interesaj tagoj da diskutado.

En Kolombio, la terorismaj organizaĵoj, kaj kelkaj utilaj naivuloj kiuj servas al ili kiel resonancujo, utiligas la opinion diskuton por ŝajnigi neleĝaj la kolombiajn instituciojn, la registaron kaj, evidente, sian plej grandan malamikon, kiu estas la Armitaj Fortoj de la lando, akuzante ilin —Ho paradokso, kiaj estas tiuj montrantaj sian akuzan fingron!— pri konstante malrespekti la homajn rajtojn.

Ekde kiam mi enoficiĝis en la Ministerion mi okupiĝis por restigi senargumentajn tiujn *fiŝkaptistojn en agitata akvo*, kiuj profitas iuj ajn eraron aŭ mankon kiun povas fari la publiksekuriga agentaro —kaj sendube, okazis iuj gravaj— por ataki politike la registaron kaj precipe la armitajn instituciojn.

La penon kiun ni faris dum ĉi tiuj lastaj jaroj por plibonigi, ĉiusece, la respekton kaj protekton de la homaj rajtoj flanke de la Militfortoj kaj la Polico, estas trafanta la diritan celon. Tamen ni ne faris tion pro tiuj, ankaŭ nek pro internaciaj premoj, sed ĉar ni havas la firman konvinkigon ke la laŭleĝeco en la agoj de la Ŝtato estas fundamenta por la atingo de ĝiaj celoj.

La celo ne pravigas la rimedojn. Eĉ kiam la dirita celo estas tiel laŭdinda kaj necesa kiel la venki la terorismon kaj la narkotaĵkomercon, kaj la reakiri la sekurecon kaj la trankvilecon de unu nacio. Samkiel tekstas la frazo de la germana filozofo Nietzsche ĉekape de ĉi tiu sekcio —kaj kion mi ripetis plurfoje dum miaj paroladoj—, la unua zorgo de tiu kiu alfrontas monstrojn devas esti ne iĝi monstro. Ĉar tiel, kion ni estus gajnintaj? Estus gajninta la malamiko kiu devigis nin fali en sian propran abismon kaj helpi nin per rimedoj kiajn ni kontraŭbatalas.

Ne eblas defendi la institucioj agante ekster la institucia kadro. La antaŭkondiĉo fundamenta de triumfa armeo estas ĝia laŭleĝeco, ĉar tiu kiu triumfas tretinte la leĝojn kaj la rajtojn, faras tion je la kosto de si mem kaj de tio kion tiu asertas defendi.

Konscia pri tio, mi dekomence koncentris miajn penadojn sur fari el la laŭleĝeco de la Armitaj Fortoj la akson ĉirkaŭ kiu turniĝu ilia tuta operaca aktivado. Mi ne ekiris de nulo, kompreneble. Miaj antaŭuloj estis preparintaj bone la terenon, tamen mankis integra politiko por meti ĉi tiun temon en la liston de faktaj prioritataĵoj. Kaj tio kio estis des pli grava: necesis agi konsekvence.

Do mi taskis al la vicministro Sergio Jaramillo, filozofo kaj filologiisto, eksdirektoro de la Fondaĵo Ideoj por la Paco, kiu antaŭe okupiĝis pri la strukturigo kaj redaktado de la Politiko de Defendado kaj Demokratia Sekureco komence de la regado, la gvidon de teamo el civilaj spertuloj, armeanoj kaj policistoj, por produkti tiun politikon de homaj rajtoj, kiu estas ekde tiam la nordo de la Armitaj Fortoj rilate tian fundamentan temon. Mi devas deklari ke la vicministro Jaramillo estis ŝlosila en ĝia formulado kaj efektivigo.

Ene de la procezo de plimodernigo kaj reorganizado de la Ministerio, ni kreis la Direkcion de Homaj Rajtoj cele certigi la strategian kondukadon de la tuta aparato por protektado de la homaj rajtoj en la publiksekuriga agentaro.

Poste ni okupiĝis pri la tasko projekti la politikon pri homaj rajtoj, klopodante kunligi pli bone la strebojn kiuj tiam estis disvolviĝantaj kaj trovi la mankojn kaj la malfortikaĵojn de la sistemo. Ĉar la afero de homaj rajtoj ne elĉerpiĝas per parolado aŭ leciono; ĝi devas ampleksi la tutan aparaton el kontroloj kiuj certigas ke la operacoj disvolviĝas en la kadro de la leĝo.

La politiko ne estis ellaborita en la vakuo, Pluraj internaciaj misioj kiuj iris al la tereno, unu el la Oficejo de la Alta Komisarino pri Homaj Rajtoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj

alia el la Ministerio pri Defendado de la Unuiginta Reĝlando, donis al ni elementojn por fari la necesajn korektojn kaj rafini la sistemon. Tiuj ambaŭ samopinias, ekzemple, pri ke en Kolombio estis donata pli da instruado pri homaj rajtoj ol en iu ajn lando, tamen ke tiu instruado ne ĉiam estis la plej praktika kaj plej adekvata al la necesoj de la soldato.

Sur tiu bazo ni konstruis tutan kolonon el instruado, kun emfazo en la trejnado diferenca laŭ la nivelo kaj responso de niaj viroj kaj virinoj. La ideo estis ke la soldatoj komprenu sur la tereno, ĉe konkretaj okazaĵoj, kiel apliki la postulatojn de la homaj rajtoj kaj la Internacia Humana Leĝaro (IHL) dum batalaj situacioj. Por tio ni ampleksigis la sistemon de ekzercejoj kaj enkondukis novan koncepton, tiun de trejncentroj (nomitaj GEPER¹) kiuj kombinas la taktikan trejnadon kun la apliko de la IHL kaj la Homaj Rajtoj.

Same ni disvolvis kolonon el disciplino, fortigante ĉiujn kontrolmekanismojn kiuj sendube restis nesufiĉaj kompare kun la rapida kresko de la militfortoj dum la lastpasintaj jaroj. Ni komencis procezon de sistemigo de la inspektado, plipovigis la inspektistojn kiuj estis dronintaj en paperaj formalajoj anstataŭ eliri en la kampon por inspekti.

Ni ankaŭ entreprenis amplekseman reformon de la Militkrima Justico, kiu pro manko de rimedoj estis tre malforta en kelkaj el siaj ŝlosilaj bezonoj: arkivoj, konekteblo, malliberejoj. Sub la gvidado de Luz Marina Gil, direktorino de la Militkrima Justico, disvolviĝis, kiel parto de la reformo, forta komponanto el instruado pri homaj rajtoj al la militkrimaj juĝistoj, kio kontribuis al pli flua rilato kun la Ĝenerala Nacia Prokurorejo.

La politiko ankaŭ inkluzivis kolonon el defendo, pri kiu mi temos pli poste, alian el protektado de vundeblaj popoloj (indiĝenoj, afriko-kolombianoj, sindikatanaj, defendantoj de

¹ NT El la hispanlingva "Grupo de Entrenamiento por Escenarios Regionales" = Grupo de Trajnado per Regionaj Scenejoj: sistemaj simulmetodoj por operaca trejnado per la kreo de trejnado-scenejoj bazitaj sur realaj situacioj.

homaj rajtoj) kaj alian el kooperado. En la fazo de plifirmigo, kiam la minaco ekvaniĝas kaj kamufligas kun la popolo, la kooperado kun la justico estas la plej bona ilo por malpliigi la riskon fari erarojn; kaj por plenumi, kompreneble, la celon de la plifirmigo.

Tial ni tiom insistas labori man-en-mane kun la Prokurorejo kaj la Prokuratorejo. Same, ni ricevas ŝlosilan apogon far la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco, kaj far la Oficejo de la Alta Komisarino pri Homaj Rajtoj de la Unuiĝintaj Nacioj. La Ruĝa Kruco helpis nin per fidinda informo pri okazaĵoj de eblaj gravaj malobservoj kaj per spertuloj kiuj apogis nin en ĉiuspecaj taskoj, el praktikoj de lernitaj lecionoj ĝis la disvolvo de la leĝaro pri operacoj kadre de la IHL.

La Oficejo, siaflanke, akompanis dekomence la efektivigon de la politiko, kaj nutris nin konstante per informo elde la tereno kiu kontribuis validigi la progresojn kaj trovi la difektojn. Kiel parto de la politiko de plena travideblo, ni invitis la Oficejon viziti ĉiujn diviziojn kaj diskuti la problemojn detale kun la staboj de ĉiu sekcio. Ili faris tri vizitajn rondirojn al ĉiu divizio kaj donis al ni ideon multe pli klaran pri la malfacilaĵoj kiujn ni estis devontaj alfronti.

Kiam, post pli ol unu jaro da intensa laboro, pripensado kaj debatado, fine ni publikigis la *Integran Politikon pri Homaj Rajtoj kaj Internacia Humana Leĝaro*¹, la 22-an de januaro de 2008, ni invitis la Oficejon komenti ĝin fronte al publiko kiu inkluzivis la diplomataron kaj la NRO-jn². Ili noble priskribis ĝin kiel “mejloŝtono en tiu ĉi kontinento” kaj ekde tiam ili ne ĉesis esti fundamenta apogo por la Ministerio pri Defendado en la plifirmigo de la normoj pri homaj rajtoj de la Militfortoj.

Nuntempe, laŭ multaj internaciaj observantoj, estas malfacile trovi alian publiksekurigan agentaron en la mondo

¹ NT Hispanlingve: *Política Integral de Derechos Humanos y Derecho Internacional Humanitario*.

² NT Ne-registaraj Organizaĵoj.

kiu, samkiel la kolombia havas tiajn nivelojn da trejnado kaj konsciigo pri la homaj rajtoj.

Pri tio ni diferencas

En publiksekuriga agentaro kiu enhavas pli ol 420.000 armeanojn kaj policistojn, alfrontantajn ĉiutage la plej riskajn situaciojn, kun proksimume po 20.000 taktikaj misioj ĉiutage, estas treege malfacile eviti ke okazu iu misfaro aŭ perforto al la homaj rajtoj aŭ malobservo de la Internacia Humana Leĝaro. La celo kiun ni alstrebis estis eviti ke iu malobservo aŭ perforto el tiaj okazu kaj garantii ke, se ĝi okazus, oni korektus la aferon tuj kaj punus ekzemplige la responsulon. Kun tio en la menso, ni praktikigis politikon de Nula Tolerero fronte al eventualaj malobservoj pri la homaj rajtoj ene de la Armitaj Fortoj. Se ĉi tiuj okazis, oni agis draste fronte al la apartaj okazaĵoj, sen ke iu ajn povas iam diri ke tiu malobservo estis politiko sistema nek oficiala de la armita klaso de la lando, kiel multaj homoj deziras ŝajnigi.

Ĉi-lastata temo estas multe pli grava ol kiom multaj homoj kredas. Estas bone konata la strategio utiligi “la diversajn formojn de lukto” kiun la ekstrema maldekstrularo aplikis en Kolombio por provi alveni en la ŝtatpovon. Ene de tiuj luktoformoj estas, kiel mi jam diris, tiu de ŝajnigi neleĝa la demokration kaj malprestiĝigi —ajnakoste— la Militfortojn. Tiucele ili uzas ĉiajn ruzaĵojn, kalumniojn, duonverojn, kaj intencas prezenti iun ajn malrespekton de la homaj rajtoj kvazaŭ parto de sistema politiko flanke de la kolombia Ŝtato. Helpis multe al tiuj la malfeliĉa kaj abomeninda kunvivado de kelkaj sekuragentoj kun la paramilitismo. En tiu tasko malprestiĝiga, la FARK kaj siaj samcelanoj estis atingintaj grandan antaŭeniron kaj tial estis urĝe agi por ĝin rebati.

La prezidento Uribe estis aparte klara pri tiu temo kiam li diferencigas la Politikon de Demokratia Sekureco kian li efektivigis dum sia regado disde la Doktrino de Nacia Sekureco kia, kun dolorigaj kaj hontindaj rezultoj, estis

aplikata ĉe la militistaj diktatorecoj de la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj en pluraj landoj de Latinameriko, je la preteksto de kontraŭbatali la komunismon. La vorto “demokratia” en lia politiko de sekureco ne nur signifas ke la sekureco devas esti por ĉiuj sendiference: por la politika opozicio, por la ĵurnalistoj, por la defendantoj de homaj rajtoj, por la indiĝenoj, por la afriko-kolombiaj komunumoj, por la virinoj, por la infanoj, por la eksterlandanoj, por la sindikatanoj, por ĉiuj kaj ĉiu el la enloĝantoj de la kolombia lando, sed ankaŭ ke la sekureco devas esti klopodata ene de la Konstitucio kaj la leĝaro. La prezidento ankaŭ insistis dekomence pri ke la efikeco kian devas havi niaj Armitaj Fortoj kontraŭ la violentuloj devas esti akompanata far absoluta travideblo.

Ne facilas kontraŭfronti milite, ene de Laŭleĝa Ŝtato tiel garantidona kiel la nia, la senĉesajn kruelaĵojn de la FARK, Cetere, la publiksekuriga agentaro devas alfronti tion kion ni povas nomi “la paradokson de la plifirmigo”: ju pli ni progresas pri sekureco, des pli grandaj estas la malfacilaĵoj por agadi, ĉar la malamiko disiĝas kaj kamufligaĵas ene de la civila loĝantaro, uzante ĉi-lastan kvazaŭ ŝildo. Ni eĉ konas la ordonojn de Jojoy malpermesantajn al ili agi per multhomaj grupoj.

Tial, krom disvolvi politikon pri homaj rajtoj por la plifirmigo mi fojon post fojo ripetis la mesaĝon:

“Se ni ne observus la homajn rajtojn, se ni egaligus nin al la agentoj de la narkotaĵkomerco kaj la terorismo, kiuj ne havas respekton al la vivo de la aliuloj, ni perdus nian plej grandan poragadan havaĵon, kio ne estas la ekipaĵoj, nek la trupanoj, nek la strategio, sed la apogo kaj la kondifo de la popolo.”

“Armeo kiu ne gajnas, per sia sinteno honesta kaj respekta al la komunumo, la apogon kaj konfidon de la popolo, estas armeo venkita anticipe, kiu perdis sian ekzisto-kialon.”

“Male, armeo kiu obeas la leĝon kaj observas la homajn rajtojn, havas kun si la plej grandan eblan strategian

avantaĝon: la laŭleĝecon.”¹

Kaj mi emfazis:

“Nur kun la morala laŭleĝeco kaj la senriproĉa agado ni povos venki la violentulojn, la narkotaĵkomercantojn kaj la teroristojn kiuj mokas la humanajn principojn kaj tretas senkompate la plej bazajn rajtojn de siaj samnacionoj.”

“Pri tio ni diferencas! Tie radikas la laŭleĝeco de nia forto kaj de niaj agoj!”

“Dum la teroristoj montras plenan malestimon por la vivo de siaj samnacionoj kaj por la humanaj konsideroj, ni la trupoj de la Ŝtato volas konservi eĉ la vivon de la teroristoj kiuj nin atakas kaj invitas ilin al malmobiliziĝo kaj enlasiĝi en la agrogramojn kiujn la registaro ofertas al ili.”²

Kiel parto de tiu integra politiko pri homaj rajtoj, oni donis la instrukcion, kiun mi jam menciis, ke ni devas privilegii la malmobiliziĝojn antaŭ la arestoj kaj la arestojn antaŭ la senvivigoj, ĉar la rajto je la vivo devas esti en la unua loko de la engaĝiĝoj de niaj soldatoj.

La decida testo pri la konduto de Armeo estas la maniero kiel ĝi agas fronte al la malamiko, kiam ĉi-lastas estas kaptita aŭ sin liveras. La membroj de la publiksekuriga agentaro elstaris, lastatempe, pro la deca trakto kiun ili donas al la anoj de la malleĝaj armitaj organizaĵoj kiam ĉi tiuj falas sub sia povo. La agentoj sukuras tiujn se ili estas vunditaj, kaj respektas ĉiumomente ilian integrecon kaj dignon. La agentoj ne forgesas ke tiuj estas aliaj kolombianoj kiel ili mem, kiuj prenis eraran vojon, ofte senkomprene aŭ kontraŭvole.

Kia diferenco disde la malhumana maniero per kiu la FARK traktas la policistojn kaj armeanojn falintajn sub sia povo ! Tion ni scias pro la dolorigaj raportoj de tiuj kiuj supervivis

¹ Parolado instala de la Kongreso por la Plifortigo de la Homaj Rajtoj en la Armeo, Bogoto, 3-a de februaro de 2009.

² Parolado en ceremonio de plirangigo de suboficioj de la Militfortoj, Bogoto, 23-a de marto de 2007.

tian inferon. Eĉ, en la videaĵoj konitaj pri la armeanoj kaj policistoj kiuj restas sub povo de la gerilo, ĉi tiuj aperas, ne nur maldikegaj kaj malsanaj pro kaptiteco de pli ol dek unu jaroj, sed ankaŭ portantaj katenojn en la kolo, kiuj eĉ ne estas demetitaj por dormado.

Cetere ankaŭ en la sfero de la homaj rajtoj la FARK, feliĉe, estas daŭre venkata. Dum la kolombia publiksekuriga agentaro intensigas siajn penojn por ilin respekti kaj obei, ĉiufoje riveligas pli evidenta antaŭ la lando kaj antaŭ la mondo la maniero kiel la FARK mokas la minimumajn rajtojn de la homo kaj turnas surdan orelon al la postuloj por sinteno pli humana. Tiu ĉi estis alia batalo kiun ni intencis gajni, kaj la rezultojn oni povas rimarki en la lastpasintaj komentoj far multaj internaciaj organizaĵoj pri la progreso de la Armitaj Fortoj kaj ilia devontigo al tiu ĉi temo.

ĈAPITRO 42-a

La “falsaj pozitivajoj”

“La Homaj Rajtoj ne estas, nun nek iam, malhelpo al la armea agado, sed la plej bona garantio ke ni kondukas bone en la plenumo de la misio, ene de la principoj kiuj diferencas nin disde la teroristoj. Ĉar nur agante laŭleĝece povas oni gajni militon. Nur observante la leĝon konstruos ni daŭrontan pacon. Nur respektante la vivon de ĉiuj kolombianoj ni havos armeon adminirtan kaj respektitan far la popolo. Por nenio servas gajni batalon se ni semas malamon kaj malaprobon en la popolo.”

Per ĉi-supraj vortoj mi resumis, la 3-an de februaro de 2009, en unu el la multaj serioj de prelegoj pri homaj rajtoj organizitaj far la Armeo, fundamentan principon: respekti la homajn rajtojn estas ne nur morala imperativo, sed ankaŭ ĝi estas, por la trupoj, “asekuro” pri ke ili agas bone kaj plenumante sian strategian celon.

La homajn rajtojn oni ne devas konsideri minaco kiu ŝvebas sur la agado de la soldatoj kvazaŭ malbonaŭgura gilotina klingo, sed, tute male, kiel la plej bonaj amikoj de la soldato, kiuj lin gvidas por lia konduto kaj garantias ke ĝi estu deca.

Unuaj rimediniatoj

La mortigoj dum batalo estas laŭleĝaj kaj havas la plenan institucian apogon; pro tio mem —ke ili agas ene de la institucieco— la Armitaj Fortoj devas konscii pri la responso implicata far la uzo de la forto kaj far la monopolo de la armiloj. Ĉiu eksterbatala mortigo, male, iras kontraŭdirekte al militista honoro; estas kondamnenda el puna kaj disciplina vidpunkto, kaj finrestas damaĝante la publiksekurigan agentaron ĉar makulas ĝian nomon kaj difektas ĝiajn kredindecon kaj laŭleĝecon.

Ekde kiam mi enoficiĝis en la Ministerio mi trovis ke ekzistis kelkaj denuncoj pri suspektitaj murdoj en protektitaj¹ homoj far la Militfortoj, kion la Ordinara Justico kaj la organizaĵoj defendantaj de homaj rajtoj nomas “eksterleĝaj ekzekutoj”. Alivorte, denuncoj pri eblaj situacioj en kiuj armeanoj eksterlimiĝis en siaj funkcioj kaj mortigis civilulojn eksterbatalo. En kelkaj okazoj tiuj mortigoj estis nomitaj “falsaj pozitivajoj”, ĉar la farintoj prezentis poste siajn viktimojn kvazaŭ operacaj pozitivajoj, tio estas, kvazaŭ laŭleĝaj senvivigoj de anoj de narkotajkomercaj terorismaj grupoj.

Tia situacio estis netolerenda kaj, kaj se ĝi estis riveligonta vera, ĝi estis tute kontraŭa al la politikoj pri homaj rajtoj. Tial dekomence ni ne hezitis preni decidojn kiam ni havis sufiĉan informon (io kio en ĉi tiuj okazaĵoj prezentis multajn malfacilaĵojn). Tiel okazis ke en januaro de 2007, kiam ni ekkonis gravajn denuncojn pri la konduto de oficiro, ni tiujn metis al kono de la koncernaj aŭtoritatoj kaj ripetis en ĵurnalistara intervjuo niajn politikojn:

“La Ministerio pri defendado reasertas sian politikon de nula tolero pri la malrespektoj al la homaj rajtoj kaj pri iu ajn ligo de membroj de la publiksekuriga agentaro kun eksterleĝaj organizaĵoj”

¹ NT “protektita” far naciaj leĝoj kaj la Internacia Humana Leĝaro, kiel ajna civilulo.

“Ni ripetas ke tiuj viktimitoj kiuj ne estas rezultoj de operacoj de la publiksekuriga agentaro estas absolute malaprobendaj: la politiko de la Ministerio, de la Militfortoj kaj de la Polico estas politiko de strikta laŭigo al la leĝo kaj de plifirmigo de la teritoria regado.”

“La Ministerio ne permesos ke la krima konduto de kelkuloj makulu la nomon de la miloj da viroj kaj virinoj de la publiksekuriga agentaro kiuj tagon post tago riskas sian vivon por garantii la vivon de ĉiuj kolombianoj. La punenda responso apartenas al la individuoj, ne al la institucioj.”

“La Ministerio agos laŭjure en tiu ĉi kaj en iu ajn okazintaĵo por ke tiuj kiuj faris deliktajn agojn estu prienketitaj far la justico, kun respekto al la deca proceso”¹

La denuncoj venis el diversaj fontoj, kaj siaj ampleksoj kaj intensoj variis rimarkeble. Ĉi tiujn denuncojn konis la Prezidenta Agprogramo por Homaj Rajtoj, gvidita far Carlos Franco, unu el la plej kompetentaj funkciuloj por konduki tiom zorgopostulan aferon. Kun li —apogita vigle far la vicprezidento Francisco Santos, kiu estis granda kunaganto por tiu ĉi celmotivo— kaj kun la vicministro Jaramillo, ni devontigis nin esplori ĝisfunde kion estis tio okazanta kaj kian estis ĝia vera grandado.

Tio kion ni unue faris estis paroli kun la organizaĵoj kaj institucioj kiuj havis iun konaĵon pri la problemo por klopodi klarigi kion estis la realaĵo pri tio denunciata. La Prokurorejo, la Prokuratorejo, la Oficejo pri Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj, la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco, la oficejo de la Vicprezidenta institucio mem kiu, iel, klopodis centralizi la informon, ĉiuj havis partajn kanaĵojn kaj fragmentigitan informon. Al ĉi tiuj institucioj mi diris ke niaj celoj estis la samaj kaj necesis ke ni laboru kunordige, ĉiu ene de siaj propraj funkcioj kaj devoj, Kun la komandanto de la Militfortoj, la komandantoj de la respektivaj Fortoj kaj la

¹ Komunikado de la Nacia Ministerio pri Defendado, 26-a de januaro de 2007.

direktoro de la Polico ni faris same kaj ĉiuj —senescepte— engaĝiĝis tiutaske.

La 6-an de junio de 2007 mi elsendis la 10-an Direktivon kun la celo ripeti la devojn de la aŭtoritatoj komisiitaj obeigi la leĝon kaj preventi murdojn en protektitaj homoj, kaj formaligi la laboron kiun ni estis disvolvanta. Per la menciita Direktivo estis kreita la Komitato por Spurado al Denuncoj pri Suspektitaj Murdoj en Protektitaj Homoj, por progresigi la punajn kaj disciplinajn enketojn, fortikigi la kontrolojn kaj preventi la okazigon de pluaj fifaktoj.

Ni intencis ke tiu Komitato havu konsiston tian ke ĝi garantiu ĝian efikecon. Tiucele ĝi estis konsistigita el la ministro pri Defendado; la vicministro pri Internaciaj Aferoj kaj Politikoj¹; la ĝenerala komandanto de la Militfortoj; la komandantoj de la Armeo kaj la Mararmeo; la ĝenerala direktoro de la Polico; la inspektistoj de la Ĝenerala Komanditaro de la Militfortoj, la Armeo, la Mararmeo, la Aera Forto kaj la Polico; la direktorino de la Militkrima Justico, kaj la kunordigantoj pri homaj rajtoj de la Ministario pri Defendado, de la Komanditaro kaj de la Militfortoj. Plie —kaj tio ĉi estas tre grava—, estis konstantaj invitatoj la Prokurorejo, la Prokuratorejo, la direktoro de la Oficejo en Kolombio de la Alta Komisaro pri Homaj Rajtoj de la Unuiĝintaj Nacioj, la reprezentanto de la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco kaj, evidente, la direktoro de la Prezidenta Agprogramo por Homaj Rajtoj.

Kun polemikoj en sia interno —kiuj estas tre bonefikaj kaj kompreneblaj—, per kontribuajoj kaj diskutoj pri la irenda vojo kaj la instalendaj kontroloj, la Komitato por Spurado, kiu kunsidis ĉiumonate, servis multege por fortikigi la kunagadon interinstitucian kaj identigi la barojn por la progreso de la enketoj.

Krome, en la 19-a Direktivo, de la 2-a de novembro de

¹ NT Tiu estas unu el la tri vicministroj de la ministro pri Defendado en Kolombio.

2007, mi ordonis elĉerpi ĉiujn haveblajn rimedojn por ke, okaze de dumbatalaj mortigoj, la procedurojn de kadavro-levo kaj ĉiujn preparajn enketojn estu plenumitaj far la Juĝa Polico kaj ne far la trupo. Mi ankaŭ instrukiis al la komandantoj por ke ili faciligu la ĝustatempan plenumon de la proceduroj ordonitaj far la juĝaj aŭtoritatoj, kaj al la Plenuma Direktantaro de la Militkrima Justico por ke ĝi stimulu la obeigon de la jurisprudenco de la Konstitucia Kortumo, kaj de la interkonsento subskribita far mia antaŭulo kun la Prokuroro, tiel ke la procesoj rilataj al suspektitaj miskondutoj kontraŭ la homaj rajtoj faritaj ekster la militservo —kiel estas okaze de ‘eksterleĝaj ekzekutoj’— pasu el la Militkrima Justico al la Ordinara Jurisdikcio.

Por pli bone kompreni tion kio fakte eble estis okazinta, ni elektis okazintaĵojn kiuj, taksite far la reprezentanto de la Oficejo de Unuiĝintaj Nacioj, povis esti ilustripovaj, kaj ni reproduktis, kun ĉeesto de la armeanoj partoprenintaj en la suspektinda operaco, tion kio estis okazinta. Ni demandadis paŝon post paŝo pri kio okazis kaj kial ili agis en iu aŭ alia maniero. Ĉi tio helpis kompreni nin —altajn komandantojn, Unuiĝintajn Naciojn kaj min— ĉu la denuncoj havis faktan apogon kaj kion ni povas fari el vidpunkto de la kontroloj kaj la milita procedo por malhelpi iun ajn fikonduton.

Sendube, ĉiuj ĉi rimediniatoj estis havintaj pozitivan efikon. Fakte, ili jam estis funkciantaj kiam, en septembro de 2008, la okazaĵo de la malaperintoj de Soacha, municipo de Kundinamarko kiu konsistigas parton de la najbara zono de Bogoto, devigis nin preni rimediniatojn multe pli severajn ĉar estis la unua fojo en kiu klare karakteriziĝis tio kion multaj el ni estis simple kaj sincere malemaj kredi ke estis okazantaj: veraj “falsaj pozitivajoj”.

La malaperigitoj de Soacha

La 22-an de septembro de 2008 diversaj amaskomunikiloj publikigis novaĵon kiu donis multon por pripensi: almenaŭ 11

junuloj el la municipo Soacha, najbaroj kaj amikoj inter si estis malaperintaj ekde pluraj monatoj antaŭe, kaj siaj kadavroj estis prezentitaj malmultajn tagojn post tiam en la departemento Norda Santandero, pli ol 600 kilometrojn nordokcidente disde Bogoto, kvazaŭ viktimitoj en batalo, laŭsupoze apartenintoj al la delikta bando *Águilas Negras*¹, kaj poste enterigitaj en komunan tombofoson.

La junuloj —kiuj fine laŭtrovite nombris 19—, el kiuj la plimulto havis juĝitajn antecedentojn aŭ problemojn pro drog-uzado, estis varbitaj en Soacha por supozita laboro rapida kaj profitdona, kaj poste transportitaj ĝis tiu regiono, landlima kun Venezuelo, kie ili estis mortigitaj kaj prezentitaj far la Armeo kvazaŭ “pozitivajoj”. Estus tipa okazaĵo de “falsa pozitivajo”.

Kiel mi diris antaŭe, ekde pluraj monatoj antaŭe ni estis laborantaj por esplori, kontroli kaj pripuni eblajn okazaĵojn kiel ĉi tiuj, tamen mi devas agnoski ke la informo pri la malaperigoj de Soacha surprizis min, kaj kaŭzis en mi ne nur doloron kaj maltratrankvilon, sed ankaŭ profundan indignon kiam mi povis konstati ke la publikigitaj informoj havis seriozan apogon. Kiel ministro pri Defendado, kaj kiel konstanta atestanto pri la sinofero kaj kuraĝo de la grandega plimulto el la konsistigantoj de la publiksekuriga agentaro, estis por mi malfacile kredi ke homoj kiujn vestis la uniformo de la Armeo, kiuj estis ĵurintaj protekti siajn samnacionojn, povis fali en kondutojn tiom abomenindajn kiel murdi civilulojn por montri operacajn rezultojn, kaj gajni kelkajn tagojn da forpermeso aŭ gratulon por sia kariertabelo. Ĉar neniu agento ricevas monan rekompencan pro la viktimitaj teroristoj; la politiko de la registaro pri rekompencoj estas aplikata nur al la civiluloj kiuj kunlaboras kun la aŭtoritatoj per informo.

Tiun tagon mem, ni verkis kun la generalo Freddy Padilla komunikajon, petinte tujdevige la Ĝeneralan Nacian

¹ NT Laŭvorte: “Nigraj Agloj”.

Prokurorejon ke ĝi donu prioritaton al la enketado pri la malaperigo kaj mortigo de tiuj homoj. La samon mi ordonis al la Inspektejo de la Armeo. Samtempe mi oferis ĉian kunlaboron far la Ministerio por ke la enketoj disvolviĝu per la maksimuma rapido, klarigonte la agadon de la publiksekuriga agentaro. “La unuaj interesitoj pri ke estu enketata kaj pripunata ajnan eksterleĝan konduton” —finiĝis la komunikaĵo— “estas la Ministerio pri Defendado kaj la supera armea ordonantaro”.

Jam, antaŭ ol esti konitaj la okazaĵoj de Soacha, la Inspektejo de la Armea estis disvolvanta internajn enketojn pro similaj denuncoj pri armeaj trupoj en Antjokio, Kordobo kaj Metao, el kiuj la plimulto estis subjuĝigitaj, kun procesoj kiuj montris kompromitiĝon de agentoj eksaj kaj servantaj. Eĉ pluraj koloneloj estis arestitaj.

Tamen, la alarmo de Soacha montris al ni ke estis urĝa elpurigo je la plej alta nivelo. La 29-an de septembro mi kunvokis en mia oficejo kunsidon, kiun ĉeestis la vicprezidento de la Respubliko, la superaj ordonantoj de la publiksekuriga agentaro, la ĝenerala prokuroro de la Nacio, la Popoldefendisto kaj la vicprokuratoro, inter aliaj altaj funkciuloj. Oni starigis rapidajn kanalojn por kunlaboro kun la enketado de la Prokurorejo, kiu sin devontigis formi specialan laborgrupon, kunordigota far sia Fako por Homaj Rajtoj, por prienketi la seriozajn okazaĵojn.

La 24-an de oktobro, subaze de atesta informo tuj pasigita al la Prokurorejo, kolektita far la generalo Mario Montoya mem, komandanto de la Armeo, oni forigis el liaj postenoj tri kolonelojn kiuj komandis en la regiono de Ocaña (Norda Santandero), kie estis aperintaj la kadavroj de la junuloj. Tamen, la plej malfacila rimedinciato estis ankoraŭ venonta.

Ni konsideris ke la situacio meritis la kreon de enketa organo ene de la Militfortoj, kiu agu kun plena fifindeco kaj rapideco, kaj mi ordonis la establilon de Speciala Komisiitaro, gvidata far la majoro-generalo Carlos Arturo Suárez, kiu estis

ĉe la komando de la JOEC¹, kaj konsistigita per oficiroj fakaj pri informiĝado, infanterio kaj logistiko, kaj per la direktoro de la Prezidenta Agprogramo por Homaj Rajtoj, Carlos Franco.

Surbaze de la specifa raporto de tiu komisiitaro, kiu ne limiĝis nur pri la okazaĵoj de Soacha, sed kiu ampleksis ankaŭ la denuncojn el aliaj departementoj, la 29-an de oktobro la prezidento Uribe anoncis, post ekzameni zorge la situacion kun la generalo Padilla kaj kun mi, la decidon eksigi el la servo 27 armeanojn, inkluzive de: tri generaloj — komandantoj de la dua kaj sepa divizioj de la Armeo kaj de la 23-a brigado—, kvar koloneloj, sep subkoloneloj, kvar majoroj, unu kapitano, unu leŭtenanto kaj sep suboficiroj.

Tio estis decido doloriga, tamen necesa. Eksiginte tiujn 27 armeanojn ni ne estis antaŭjuĝantaj nek akuzantaj ilin kiel aktivaj agentoj de la malaperigoj kaj mortigoj —tion nur povas determini la prikrima justico—. Ni agis laŭ nia bontrovo, ĉar ni taksis ke, same kiel ĉe kelkaj okazaĵoj povus esti ekzistinta senpera kompromitiĝo kun la falsaj pozitivajoj, ĉe aliaj misfunkciis la kontroloj, aŭ ekzistis neglekto aŭ manko de zorgo en la plenumo de la militaj operacoj, kaj tio jam estis sufiĉa kialo por formeti la responsulojn. En la arma kario, estas bone sciata, oni ne nur responsas pri la agado propra sed ankaŭ pri la agado de la homoj sub onia responso.

La prezidento Uribe faris la jenajn precizigojn en la ĵurnalistara intervjuo:

“La prestiĝo de la Armitaj Fortoj de Kolombio, en la koro de la popolo kaj en la internacia komunumo, ne povas makuliĝi per la deliktoj, per la administraj eraroj kiujn kelkaj el siaj membroj faras.”

“La Armitaj Fortoj de Kolombio havas bone gajnitan prestiĝon. Kiam okazas atencoj kontraŭ la homaj rajtoj tiu prestiĝo malklariĝas. Nia politiko de Demokratia Sekureco

¹ NT Vidu la paĝon 109-an kaj ĝian piednoton.

estas politiko daŭripova, kia ĝin bezonas Kolombio, laŭ la mezuro en kia ĝi estu efika kaj travidebla. La travideblo estas la rigora aliĝo de tiu politiko al la homaj rajtoj. Ne povas ekzisti eĉ unu perforto kontraŭ la homaj rajtoj.”

Kaj pludiris:

“Tial ni ne povas permesi ke oni konfuzu la efikecon en la lukto kontraŭ la deliktuloj kun la malkuraĝo por alfronti la deliktulojn kaj la deformato de la efikeco, murdinte senkulpajn viktimojn.”

“La registaro devas esti tute rigora en sia insistado, en sia postulo ke tiu ĉi sekureca politiko redonu al la kolombianoj plene la trankvilon, ke ĝi estu efika kaj, samtempe, la registaro devas esti tute postulanta por ke tiu ĉi politiko estu travidebla, ke ne ekzistu ajna dubo pri ĝia travideblo.”

Unu doloriga homperdo

Mi komprenas ke tiu ĉi plena situacio devis esti speciale malfacila kaj angoriga por la generalo Mario Montoya, kiu vidis elpostenigi 27 el siaj homoj, inkluzive de tri el siaj generaloj, kaj do li decidigis, en akto de armeana honoro, prezenti sian demision antaŭ la prezidento la 4-an de novembro de 2008.

Plencerte tio ne estis facila decido. Estis pasintaj 39 ekde lia akceptiĝo en la Militlernejon kaj li estis dediĉinta tiujn kvar jardekojn de sia vivo al la servo de sia patrolando kaj al la defendado de ĝia flago. Li estis avancinta en la plej altan hierarkian pozicion ene de sia Armeo, kaj meritis fini sian karieron en malsaman cirkonstanco. Tamen la publika vivo ne ĉiam estas justa.

La generalo petis aŭdiencon al la prezidento Uribe kaj donis al li sian demisian leteron. La registarestro mem rakontis poste ke li petis la generalon ne rezigni, ke li laŭdis lian servan laboron kaj insistis al li atendi ke oni preterpasos la malfacilojn. Tamen la generalo Montoya, homo de honoro

kaj sinjoro de sia vorto, sin tenis en sia decidiĝo.

En sia publika demisia letero, kiun li legis antaŭ la amaskomunikiloj, la generalo esprimis:

“La Politiko de Demokratia Sekureco, definitive, ŝanĝis la vivadon de la kolombianoj, ĝi fariĝis la gvidilo kaj misio por la Armeo kiun ĝis hodiaŭ mi komandis. Ni plenumis ĝin senhezite, per la plej granda fortikeco, lojaleco kaj sinofero.”

“Pri la proksimdataj faktoj en kiuj membroj de la institucio aperis kompromititaj kaj kiuj apenaŭ estas en prienketa fazo, mi petas al la kolombianoj ne kondamni ilin antaŭ ol doni al ili la rajton al sindefendo; ĉi tio estas apenaŭ baza principo de la justico kiu devas kovri egale armeanojn kiel civilulojn.”

La prezidento Uribe, siaflanke, donis emocian deklaron en kiu li laŭdis la karieron de Montoya kaj lin prezentis kiel “ekvilibra kombino el efikeco kaj travideblo”. Samtempe li anoncis la nomumon, en lia anstataŭo, de la generalo Óscar González.

Tio estis homperdo sentebla kaj doloriga por la Armeo, kiu tiel estis perdinta pasian direktanton, neniun malpli ol la gvidinton de la Operaco Ŝakon, inter tiom da aliaj venkoj kiujn li atingis kontraŭ la terorismo kaj la narkotaĵkomerco dum sia longa armeana kariero. La prezidento nomumis lin poste ambasadoro en Dominika Respubliko.

La fruktoj de la firmeco kaj la travideblo

La generalo Suárez gvidis efike la enketadon kiu kondukis al la plej grava elpurigo en la armea ordonantaro dum la lastaj tempoj, kaj ni decidis nomumi lin nova inspektisto de la Armeo, komisiita pri atenti kaj kontroli ke faktoj tiel hontindaj kiel tiuj okazintaj ne plu okazu en la servo de la armita institucio. Doninte kontinuecon al la strukturo de la komisiitaro kiu produktis la raporton, ni kreis la Komisiitaron por Tuja Inspekto, por garantii la enketadon rapidan kaj efikan pri faktoj suspektinde malobservaj al la homaj rajtoj;

komisiitaro kiu aktiviĝis por kvin okazoj en malsamaj armedividajoj de la lando, inkluzive de la denuncoj de Soacha.

En januaro de 2009, ni ordonis la eliron de dek armeanoj pliaj kiuj apartenis al la bataliono de La Popa, en la urbo Valledupar, kie prezentiĝis ankaŭ seriozaj denuncoj pri falsaj pozitivajoj.

Tamen, ne temis simple pri eksigi el la servo kelkajn oficirojn. La saman novembron, ni anoncis tutan serion de rimediniatoj —konitaj kel “la dek kvin rimediniatoj”— kun du celoj: eltiri la lecionojn kiuj liveris al ni la komision de la generalo Suárez, por apliki tuj la necesajn solvojn, kaj plirapidigi la efektivigon de la rimediniatoj anoncitaj en la *Integra Politiko pri Homaj Rajtoj*.

La dek kvin rimediniatoj konsistigas ampleksan gamon, ekde profundaj revizioj de la instruado —kiel povis okazi tio malgraŭ tiom da instruado?, ni demandis nin— kaj de la doktrino pri informiĝado, pasintaj tra fortikigo de la kontroloj —ni kreis en la regionoj reton de inspektistoj altaskitaj nur pri spuranti la homajn rajtojn kaj ni transformis la komisiitaron de la generalo Suárez en “Komisiitaro por Tuja Inspekto” por iri al la tereno en la momento kiam estas ricevata iu denunco—, ĝis la kreo de novaj mekanismoj de jura akompano al la operacoj: ni trejnigis jurajn konsilantojn operacajn por ke ĉiu komandanto de bataliono havu la apogon de sperta opinio ĉe la momento plani siajn operacojn; ni enkondukis novecan sistemon de renkonto-reguloj “diferencaj”, laŭ la speco de celo kaj de operaco, kaj ni pliampleksigis la rimediniatojn kiujn mi jam menciis por certigi ke la kadavro-levon de ĉiu dumbatala morto faru la Teknika Fakto de Enketado de la Prokurorejo¹. Nuntempe tiel estas, tio signifas grandan koston je materialo kaj je konventempo por la armeaj fortoj —centoj da horoj da

¹ NT Vidu la piednoton de la 47-a paĝo.

helikoptero ĉiumontate— tamen ankaŭ garantion de travedblo fronte al la opinantaro. En kiu alia lando oni faras militoperacojn kun tiaj normoj?

Mi ne dubas pri taksu tiun situacion kiel la plej serioza kiun mi devis surprizi, internakadre, dum mia tempo kiel ministro pri Defendado. La pruvitaj faktoj, kiujn hodiaŭ oni laŭdece prienketas kaj pripunas, kun la kunlaboro de la armitaj institucioj —pro la nuraj okazaĵoj de Soacha nun estas en proceso 44 armeanoj—, estas hondindaĵo, ia ulcero en la haŭto de tiu Armeo kiu havas multajn kialojn por esti fiera kaj kiu ne povas toleri ke la agado de kelkuloj, kiuj agis kontraŭinte la oficialajn instrukciojn kaj operacajn doktrinojn, makulu sian bone gajnitan renomon.

La prezidanto de la Respubliko, la ministerio sub mia responso kaj la altaj armeaj ordonantoj respondis kun ĝusteco kaj firmeco, kaj sen kaŝi ion. Tute male, nia obstino estis malkovri la veron, korekti la situacion kaj fari ĝin neripetigebla. Mi kredas ke pri tio ni sukcesis.

Nuntempe ĉiuj fontoj informas pri drasta malpliigo de tiaj okazaĵoj. Laŭ statistikoj de la Prezidenta Agprogramo por Homaj Rajtoj, kompare kun la jaro 2006 kiam estis 143 plendoj pro okazaĵoj pri suspektitaj murdoj en protektitaj homoj, en 2008 la nombro de plendoj malpliigis al 47, kaj dum la unua duonjaro de 2009 ne raportigis plendoj, almenaŭ en la Agprogramo.

En junio de 2009 vizitis la landon la raportanto de Unuiĝintaj Nacioj pri arbitraj ekzekutoj, Philip Alston, kiu agnoskis la plibonigon de la ĝenerala sekurklimato: “La kvanto de murdoj malpliigis multe, kaj transformiĝis la sekurniveletoj en multaj partoj de la lando”. Rilate la specifan temon de la “falsaj pozitivaĵoj”, li, kompreneble, montriĝis konsternita, precipe ĉar ilia teritoria distribuiĝo indikis ke la agoj estis “faritaj en maniero plimalpli sistema pro signifa kvanto da homoj ene de la Armeo”. Tamen, li agnoskis ke oni ne povas karakterizi ĉi tiujn faktojn kiel politiko de la

registro “aŭ ke ili estis direktitaj aŭ plenumitaj kun scio de la prezidento aŭ de la sinsekvaj ministroj pri Defendado”.

Alston esprimis ke li estis “tre fidĝoja pro la rimediniatoj prenitaĵ” kaj klarigis ke “estus eraro malbonfamigi la kategorion de la kolombia Armeo, kiu estas disciplinema kaj efika” kaj kiu, cetere, “iras tra la ĝusta vojo”. Samtempe kiam li esprimis ke “okazis signifa malpliigo en la kvanto de pledoj pri eksterleĝaj ekzekutoj registritaj dum la lastaj ses al naŭ monatoj”, li laŭdis la penojn faritajn ekde la jaro 2007, asertante ke “la registro prenis gravajn rimedinicatojn por haltigi tiujn murdojn kaj respondi pri ili”. Laŭ la raportanto “ĉi tiuj rimediniatoj pruvas la bonfidan klopodon kiun disvolvas la registro por alfronti la okazintajn murdojn kaj por preventi ke ili okazu estontece”.

Eĉ niaj plej fervoraj riproĉantoj agnoskas la ŝanĝon. La CINEP, kiu estas NRO¹ historie severa pri la Ministerio kaj pri la registro, tamen serioza en sia laboro, antaŭ ne longe raportis du eblajn okazaĵojn en 2009, kontraste kun 104 en 2008 kaj 181 en 2007, kaj kun ekzemplodona matureco, elstarigis la efikojn de la dek kvin rimediniatoj de la Ministerio, kaj rekomendis al la internacia komunumo “agnoski la progreson pri la temo de ‘falsaj pozitivajoj’”.

Ĉi tiuj agnoskoj pri la laboro de la Ministerio plaĉas al mi. Tamen frustrigo restas ĉe mi: ke ni ne povis progresi pli en la defendo de niaj soldatoj kaj policitoj. Jene ni diris en la *Integra Politiko pri Homaj Rajtoj*: ĉiu soldato kaj policisto havas la saman rajton al la deca proceso kiel iu ajn civitano kaj li meritas adekvatan defendon, kiam ĉiutage li riskas sian vivon pro siaj kunnacianoj. La defendado estas la tria kolono de la *Politiko*, kaj por sukcesigi ĝin ni pasigis leĝoj tra la Parlamento kaj kunvenigis la plej bonajn advokatarojn por ke ĉi tiuj konsilu nin pri la kreo de moderna defenda oficejo por la Militfortoj kaj la Polico. La elementoj estas tie; mi estas certa ke mia anstataŭonto ekprenos ilin kaj faros reala la

¹ NT Vidu la 2-an piednoton de la paĝo 293-a.

tiom prisopiritan defendon de la publiksekuriga agentaro.

Per firmeco kaj travideblo la registaro kaj la Militfortoj surprenis la problemon de la “falsaj pozitivajoj”. Tamen ĝi neniam ĉesos esti dorno pikanta la koron de la kolombianoj kaj de ilia Armeo.

ĈAPITRO 43-a

La imperiado de la vivo

La protekto de la homaj rajtoj estas, fundamente, la defendo de la vivo kun ĉiuj ĝiaj atributoj, inkluzive speciale la fizikan integrecon kaj la liberon. Tial, efektivigi politikon de demokratia sekureco, kiu alfrontas la terorismon, la ostaĝigon, kaj ĉian alian atencan kontraŭ la vivo kaj la libero, kondiĉe ke tion oni faras kun obo de la leĝon kaj respekto al la homaj rajtoj, estas garanti la imperiadon de la vivo.

Dum multaj jaroj, tro multaj, ni kolombianoj toleremiĝis al kunvivado kun altaj nombroj de murdoj kaj ostaĝigoj, preter ajna proporcio, kiajn rememori nuntempe ŝokas nin.

En la jaro 2002, okazis 28.837 murdoj en Kolombio, kio signifis indicon de pli ol 70 dumjaraj murdoj por ĉiu 100.000 loĝantoj. En 2008, nur ses jarojn poste, —la samajn jaroj de aplikado de la Politiko de Demokratia Sekureco—, la nombro de murdoj malpliigis per 44%, estinte raportataj 16.140, alivorte, malpli ol 40 dumjaraj murdoj por ĉiu 100.000 loĝantoj. Tamen tiuj ne nur estas ciferoj: ili estas personoj! Ni temas pri ke en 2008 mortis, kaŭze de aliulo, 12.697 personoj malpli ol en 2002, 12.697 homestajoj kiuj konservas siajn vivojn. Fakta atingajo.

La afero pri la ostaĝigado estas ja des pli signifa. Kompare kun la jaro 2002 kiam estis 1.708 okazaĵoj de monpostulaj ostaĝigoj —preskaŭ po kvin ĉiutage—, en 2008 la viktimoj de

tiu ĉi delikto falis al 197, kio implicas malpliigon pli grandan ol 88%. Kaj bonaĵo estas ke la indicoj pri ostaĝigado, same kiel tiuj pri murdado, daŭre malpliĝas dum 2009.

Ni kolombianoj sentis dum multaj jaroj timon eliri al la kamparaj ŝoseoj kun nuaj familioj, pro la risko fali en neleĝan trafikhaltigejon de la gerilo, kio ĉiam finiĝis kiel monpostula ostaĝigo. Tiajn trafikhaltigejojn ni nomis, en rikana similaĵo: “miraklaj fiŝkaptoj”, ĉar neniu sciis kiu estis trafota nek kiam. Ni sentadis nin malliberuloj en niaj domoj kaj en niaj urboj. Kaj la afero ne indis malpli: en la jaro 2002 estis 177 okazaĵoj de ostaĝigado en neleĝaj trafikhaltigejoj, kun preskaŭ 700 viktimoj. Post la apliko de la Politiko de Demokratia Sekureco, kiu rehavigis la ĉeeston de la aŭtoritatoj en la tuta teritorio, la nombro de okazaĵoj de “miraklaj fiŝkaptoj” malpliĝis preskaŭ al nulo. Dum la semajnfinoj, dum la feriaj tag-pontoj, kaj dum la feria sezono, la kamparajn ŝoseojn oni vidas plenplenaj de veturiloj kun familioj kiuj reakiris la elementan rajton translokiĝi sentime ene de sia propra teritorio.

Rimarkindas ankaŭ, ene de la atingajoj de la Demokratia Sekureco en la kampo de la homaj rajtoj, kiamaniere pliboniĝis la situacio de vundeblaj popolgrupoj, al kiaj oni donas ĉiutage pli da protektado por eviti fiagojn kontraŭ ili far malleĝaj armitaj grupoj. Inter la jaroj 2002 kaj 2008 la murdoj de sindikatoj kaj de instruistoj ensindikatiĝintaj malpliĝis per 81%. Oni devas konsideri, cetere, ke multaj el tiuj murdoj ne nepre dependis de ties statuso de aneco al sidikata asocio. Kompare kun la jaro 2002 kiam estis murditaj dek unu ĵurnalistoj en la lando, en 2008 estis eĉ ne unu okazaĵo tia. Malgraŭ la masakroj faritaj de la FARK kontraŭ kelkaj indiĝenaj grupoj, la murdoj de indiĝenoj malpliĝis per 66% inter la jaroj 2002 kaj 2008.

Tiaj estas rezultoj kiajn Kolombio, kaj ne nur la registaro kaj la publiksekuriga agentaro, montras kun fiero. Ni estas rekuperantaj la imperiadon de la vivo en nia teritorio, kio

samas al diri la imperiadon de la homaj rajtoj. Ĉar la Politiko de Demokratia Sekureco estas politiko por garantii la rajtojn de la kolombianoj.

Pliaj trupoj, malpliaj plendoj

Krom la jam menciitaj, la rimediniatoj prenitaj por garantii la respekton al la homaj rajtoj flanke de la Armitaj Fortoj estis multaj kaj ĉiaspecaj. Unu el miaj lastak aktoj kiel ministro estis la inaŭguro de lernejo de homaj rajtoj de la Armeo en la bazo de Tolemaida¹ (Kundinamarko), kiu emas fariĝi centro diskoniga pri tiu temo en la tuta kontinento. Por garantii la laŭleĝeco de la armeaj operacoj, ni ampleksigis la kadron de juraj prioperacaj konsilantoj kiuj estas advokatoj armeanoj donantaj konsiladon tiuteman— per 70%, atinginte preskaŭ la centon en la tutaj Militfortoj. Estis nomumitaj, krome, dek delegitaj inspektistoj de la Militfortoj kun ekskluziva okupiĝo pri temoj de homaj rajtoj kaj Internacia Humana Leĝaro.

Eĉ, laŭ nia emo al travidebligo, la prezidento Uribe mem kreis sistemon de publikaj aŭdiencoj televide elsenditaj por ke iu ajn kolombiano, telefone aŭ retpoŝte, povu prezenti siajn plendojn senpere kaj ricevi tujan respondon de la komandantoj armeaj aŭ policaj en la respektiva areo, konektite per telekonferenco. La prezidento, la ministro pri Defendado kaj la respektivaj komandantoj de la armitaj institucioj estis ĉe la fronto de ĉi tiuj programoj de amasa atingopovo, el kiuj ni ĝisfaris sep dum mia administrado.

Per ĉiuj ĉi elementoj, la konduto pri homaj rajtoj far la membroj de la publiksekuriga agentaro pliboniĝis rimarkinde, kio speguliĝas en tio, ke la disciplinaj plendoj kontraŭ ili ricevitaj en la Prokuratorejo falis per pli ol 80% inter la jaroj 2004 kaj 2008, pasinte el 1.254 al 241, malpliiga tendenco kia pludaŭris dum 2009. Tiaj ciferoj estas des pli plenfrapaj

¹ NT Vidu la piednoton de la 241-a paĝo.

se oni konsideras ke la nombro de membroj de la publiksekuriga agentaro kaj la nombro de taktikaj misioj pliigiĝis en la lastaj jaroj, dum la plendoj malpliigiĝis.

Eble la plej signifanta indikilo pri la deca konduto de la armeanoj kaj policistoj estas la favoreco kiun ili trovas en la kolombia popolo. Armitaj fortoj kiuj malrespektas la homajn rajtojn estas timataj, tamen tiaj ne estas popularaj. Tial la laŭleĝeco trairas sian plej grandan provon per la percepto de la ordinara popolo, kaj tiu ĉi estas nerebatebla: en ĉiuj enketoj la Militfortoj kaj la Polico registrigas indicojn de aprobo superaj al 80% kaj 70% respektive, eĉ super institucioj historie respektataj kiel la katolika Eklezio kaj la amaskomunikiloj. Kia kontrasto kun terorismaj organizaĵoj, kiel la FARK, kiu atingas eĉ ne 2% da favora opinio ene de tiu popolo pro kiu ili ŝajnigas lukti ! La kolombianoj ne estas stultaj kaj scias kiuj reprezentas ilin kaj estas ĉe sia flanko.

Ni povas aserti fiere ke okaze de la “falsaj pozitivajoj” ni agis per tia firmeco kaj travideblo ke ni ĉesigis tranĉe tian kanajlan kaj bedaŭrindan faradon, kiu neniam estis politiko de la Militfortoj kaj kiu ne okazis ekskluzive dum tiu ĉi regado: ekzistas okazintaĵoj kiuj datiĝas eĉ de la 1980-aj jaroj. Per la malapero de tiu ĉi problemo —ĉar tio kio restas estas ke la enketoj estu farataj tutrigore, kaj produkti la koncernajn kondamnojn kaj konkludojn—, la temo pri la malrespekto al la homaj rajtoj far la publiksekuriga agentaro ĉesis esti kerna en la riproĉoj kiujn oni faras al ĝi. Tio estis la celo kaj ni atingis ĝin. Samtempe ni forigis el la FARK kaj ĝiaj kunakordantoj plian batalĉevalon.

LA PLEJ MALBONA TEMPO DE ĜIA HISTORIO

*(La gerilo en Kolombio) koruptiĝis transformiĝinte en
armeon de banditoj, narkotajkomercistoj kaj ostaĝigistoj.*

*Ili praktikas agadon tian kia el ĉiuj
vidpunktojo estas abomeninda*

JOSÉ SARAMAGO

Nobel-premiito pri Literaturo.

Intervjuo publikigita en *El Tiempo*¹, 15-a de Julio de 2007

¹ NT Kolombia ĵurnalo.

ĈAPITRO 44-a

La fino de la violentuloj

La “jaroj hororaj” por la FARK, la longa *annus horribilis*, pri kiu mi raportis en ĉi tiuj paĝoj komenciĝis ĉe la fintempo de la jaro 2006, kaj estas espereble ke ĝi ne finiĝos antaŭ ol ĉi tiu organizaĵo prudentiĝu —pro ĝia malfortigita militpovo kaj pro la premado far la nacia kaj internacia komunumoj— kaj konsentu komenci sinceran procezon, sen “falsitaj ludkartoj”, por forlasi definitive la armilojn, la ostaĝigon, la teroragojn kaj la violenton kontraŭ siaj kunnacianoj kaj kontraŭ la nacia infrastrukturo. La kolombia demokratio jam delonge akiris la maturecon por enkorpiĝi en sian sinon, tiujn, kiuj, elpagintaj sian ŝuldon al la socio, estas inklinaj al partopreni en la politikan debaton kaj en la konstruon de lando en paco. Konstituciintoj, ministroj, departamentestroj, urbestroj, parlamentanoj, direktoroj de publikaj institucioj, diplomatoj, kandidatoj al prezidenteco, kiuj iam prenis armilojn kontraŭ la Ŝtato kaj kiuj decidiĝis reveni al la civila vivo, estas la plej bona ekzemplo pri ke ĉi tio eblas.

Mi klopodis ĝis nun fari raporton, kiel eble plej ampleksan, pri la maniero kiel la aplikado de la Politiko de Plifirmigo de la Demokratia Sekureco, la nerevokebla decido de la nacia registaro rehavi la ĉeeston de la Ŝtato en ĉiu centimetro de la teritorio, kaj la agado heroa —ne ekzistas alia vorto kia ĝin priskribas pli trafe— de la viroj kaj virinoj de la Militfortoj kaj

la Polico, rezultigis profundan kaj pozitivan ŝanĝon en la jam longa kolombia perarmila konflikto, kaj portis la grupon FARK —ankaŭ la grupon NLA¹ kaj la kartelojn de narkotajkomerco, tamen tio estus temo por alia libro— al ĝia plej malbona tempo en ĝia historio, kaj al rompopunkto el kia ĝi ne povos restariĝi, kondiĉe ke oni pludaŭrigu la penadon kaj ne neglektu la gardon.

La prezidento Uribe, kies gvidado estis fundamenta faktoro por tiu ĉi progreso, kutimas diri, aludante la terorismajn grupojn, ke “la serpento ankoraŭ vivas”, kaj tion ne povas ni forgesi. La bestio de la terorismo en Kolombio estas morte vundita, tamen ne ekzistas io pli danĝera ol bestio vundita kaj agonianta. Ĝiaj mordoj povas ankoraŭ kaŭzi multajn mortojn kaj multon da doloro. Tial estas urĝanepre ke, malgraŭ la grandaj sukcesoj atingitaj far nia publiksekuriga agentaro, oni ne cedu al la tento de triumfismo, kaj daŭrigu la progreson tra la elprovita vojo de la demokratia sekureco.

Tri pliaj frapoj

Mi rakontis, laŭ ordo kiu miksas kronologion kun regiona situo, la plej grandajn frapojn al la FARK dum ĉi tiuj jaroj, kaj mankas al mi ankoraŭ pluraj ĉapitroj por elĉerpi tiun ĉi raporton. Tamen, pli ol esti ĉioampleksa pri la temo, mi preferis rakonti kaj klarigi la agojn plej influhavajn kaj modelajn, konsciante ke kelkaj, similaj laŭ iliaj procedoj kaj efikoj, restas nemenciitaj.

Mi ne povas, tamen, ne rakonti tri modelajn okazaĵojn — ĉiuj okazintaj post la Operaco Ŝakon— kiuj havis komunan komponanton pri kiu ni insistis dekomence, kiu fariĝas ekzemplodona por estontaj operacoj: en ili ĉiuj estis plenaj kunlaboro kaj kunordigo inter la Nacia Polico, kiu faris informiĝajn taskojn per la DIJIN² kaj operacajn per siaj

¹ NT Vidu la alineon inter paĝoj kvar kaj kvin.

² NT Vidu la duan piednoton de la paĝo 142-a.

ĝangalaj¹ komanditaroj, kaj la Militfortoj, pli specife la Aera Forto, kiu apogis per la transporto kaj la bombado en la definitiva momento.

Cetere, ili estas okazaĵoj en kiuj la informiĝado plenumis elstaran rolon, ne nur en la taskoj de kaŝaŭskultado kaj informatingo el malmobiliziĝintoj, sed ankaŭ en la tasko de enfiltriĝo en la gerilon mem. Por atingi la rezultojn pri kiuj mi rakontos, homoj de la Polico ŝargis sin per misioj altdanĝeraj kiuj implicis monatojn aŭ eĉ jarojn da alproksimiĝo al la gerilo, adoptinte fikciajn identecojn, gajninte tagon post tago ĝian konfidon, kaj elmetinte sin al la minacanta risko esti malkovrataj kaj mortigataj en ajna momento. Ĉio por lokalizi la strategiajn kapulojn de la FARK kaj atingi ilian finan malaktivigon.

Post kiam oni atingis la informon, la generalo Óscar Naranjo, ĝenerala direktoro de la Polico, kunordigis kun la generalo Freddy Padilla de León, ĝenerala komandanto de la Militfortoj, kaj la generalo Jorge Ballesteros, komandanto de la Aera Forto, por ke estu farataj la bombadoj sur la areon, plene identigita far la enfiltriĝintaj homoj. Io tre grava estas ke oni konfirmis ke ne estis ostaĝoj nek civiluloj en la ĉirkaŭo de la tendaro. Multaj operacoj restis nefaritaj pro ĉeesto de civiluloj en la areo. La fina ago estis responso de la Aera Forto kaj de la ĝangalaj komanditaroj de la Polico, ofte apogitaj far la Armeo, altaskitaj sekurigi la lokon post la bombado.

Sukcesa rezulto el ĉi tia aranĝo estis atingita la 21-an de julio de 2008 kiam oni bombadis la tendaron de ka 6-a fronto de la FARK, kiu agas en la departemento Kaŭko, en la sudokcidento de la lando, kontrolanta strategian trairejon de la drogo al la Pacifiko. Tie mortis la alinomita *Dago*, kapulo de tiu fronto, kune kun pluraj el siaj subalternuloj kaj akompanantoj.

Malpli ol unu semajnon poste, en alia ekstremo de la

¹ NT Jam menciitaj en la paĝo 178-a kaj ĝia piednoto.

lando, ĉe la nordoriento, en la departemento Araŭko, landlima kun Venezuelo, simila operaco finiĝis per la senvivigo de unu el la plej serĉitaj kapuloj de la 10-a fronto, konita per la alinomo *Jurga Jurga*¹, ŝlosila homo en la regado de la narkotajkomerco kaj la urbobandoj de la regiono.

Entute, en tiuj du operacoj, kiujn naskis la enfiltriĝo kaj la konajoj el informiĝado atingita far la Polico, mortis almenaŭ 50 gerilanoj, inkluzive de siaj respektivaj ĉefoj. Estis tia la efekto, ke la gazeto *Semana* titolis sian kovrilpaĝan artikolon en la eldono de la 4-a de aŭgusto, teminta pri tiuj ĉi du sukcesoj de la Armitaj Fortoj, per la sugesta nomo *Operaco Ŝakon II*.

Apenaŭ du monatojn post tiuj ĉi du novaj katastrofoj por la gerilo, refoje la Polico kaj la Aera Forto, utiliginte la saman aranĝon, trafis timitan kaj tre presekutitan kapulon, kiu mortis en bombado en la municipo Vigía del Fuerte (Antjiokio), la 22-an de septembro de 2008: Aicardo de Jesús Agudelo, alinomita *El Paisa*.²

La senaktivigo de El Paisa estis celita afero de honoro por la Armitaj Fortoj kaj por la registaro, ĉar tiu homo, kiu dum sia teroriga kariero en la okcidento de Antjokio estis farinto de nekalkuleblaj ostaĝigoj, murdoj kaj ĉantaĝoj, plenumitaj far sia fronto 34-a, havis en sia krimdosiero, du apartajn krimojn, kiuj estigis specialan rememoron en la kolombianoj: li partoprenis en la ostaĝigo kaj posta murdo de la sinjorino Gabriela White, patrino de mia koleginino en la ministraro Cecilia María Vélez, ministrino pri Edukado, kaj li ordonis la ostaĝigojn de la departamentestro de Antjokio, Guillermo Gaviria, kaj la eksministro pri Defendado, Gilberto Echeverri, dum ili piediris en porpaca marŝo. Kiam, la 5-an de mayo de 2003, kuniĝinta trupo de la Militfortoj faris operacon por klopodi la elliberigon de la du eminentuloj kaj de grupo de

¹ NT Elparolata: ĥurga ĥurga.

² Oni devas ne konfuzi tiun ĉi kun Óscar Montero, kiu uzas la saman alinomon *El Paisa*, ĉi lasta estas kapulo de la kolono Teófilo Forero kaj ankoraŭ deliktas.

armeanoj ostaĝigitaj kun ili, El Paisa, antaŭ ol forkuri el la tendaro kie ili estis retenitaj, ordonis al siaj homoj murdi ilin. Gaviria, Echeverri kaj ok armeanoj mortis pro lia decido. Laŭ la perversa rezonado de la FARK, estas preferinde vidi mortintajn ol liberajn siajn ostaĝojn.

Kun tiaj antecedentoj, ne estas strange ke El Paisa estis konsiderata strategia celo far la Armitaj Fortoj, kiuj estis post lia spuro ekde pluraj antaŭaj monatoj. Mi mem estis informita, tagojn atcipe, pri ke oni lokalizis lian tendaron en Vigía del Fuerte, kaj mi restis atenta, kune kun la alta ordonantaro arma kaj polica, pri la rezultoj de la operaco kiu metis finon al la vivo de homo kiu neniam respektis la vivon de la ceteruloj.

Jene mi anoncia al la lando, en ĵurnalistara intervjuo, la senvivigon de El Paisa kaj de aliaj sep membroj de lia fronto:

— Tiu ĉi estas grava frapo. Ni iriadis post li dum multe da tempo. Li estis homo kiu ne apartenis al la Sekretariaro nek al la stabo de la FARK, tamen ni ja konsideris lin kiel altvalora celitulo, pro lia krueleco kaj pro la damaĝo kiun li faris al la civila popolo kaj al la Armeo.

ĈAPITRO 45-a

La hororaj jaroj

“Ĉe la komenciĝo de 2008, la malfortiĝo de la FARK estas fakto nekontestebla. Tio manifestiĝas per multaj simptomoj: malpliigo de la batalantaro, detruo de pluraj frontoj, teritoria retreto, malmultiĝo de agoj, perdo de pluraj altaj kadruloj, inter kiuj unuafoje estis membroj de la Sekretariaro, kaj problemoj de interna komunikiĝo. Al tio oni devas aldoni la reduktiĝon de ĝiaj enspezoj pro la malmultiĝo de la ostaĝigoj kaj ĉantaĝoj, kaj ankaŭ pro ĝia pli eta regado sur la kultivaĵoj de kokao kaj la laboratorioj. Entute, oni kalkulas ke en 2007 ĝiaj monrimedoj apenaŭ atingis 40% de la tuto kiun ĝi havis en 2002.”

“La multiĝo de la dizertoj, eĉ de harditaj batalintoj —inter kiuj elstaras Karina, en majo de 2008—, daŭras, konfirmita la demoralizon kiu enradikiĝas en kelkajn anarojn. La fakto ke la FARK ne plu reagis ĉe cirkonstancoj ĉe kiuj antaŭe ĝi multigis siajn agojn, tio estas plia signo pri ĝia pelmelo. Ĝi preskaŭ ne perturbis la disvolvon de la balotelekto en 2006, kiu rezultigis la tro voĉdonitan reelekton de la prezidento Uribe. Eĉ pli eksterordinare, ĝi ne respondis al la mortoj de Raúl Reyes kaj Iván Ríos, doninte tiel impreson pri la nedecidemo de ĝia plej alta komandantaro”.¹

¹ Daniel Pécaut, *Las FARC: ¿Una guerrilla sin fin o sin fines? (La FARK: Gerilo sen fino aŭ sen celo?)*, Eldonejo Norma, Bogoto, 2008. paĝo 159-a.

La preciza diagnozo enhavata en la du antaŭaj alineoj estis skribita en mayo de 2008 far la franca profesoro Daniel Pécaut, sociologo kaj doktoro pri Historio, kiu specialiĝis pri la analizado de la kolombia konflikto. Tamen, eĉ la profesoro Pécaut mem ne povis imagi ke, post tio ĝistiam okazinta, alvenos novaj eventoj kiuj faros eĉ pli serioza la situacion de la FARK: oni elliberigis sinjorinon Ingrid Betancourt kaj aliajn dek kvar ostaĝojn per la senmanka Operaco Ŝakon; estis senvivigitaj Dago, Jurga Jurga, kaj El Paisa, same kiel Bertil, Gaitán kaj Mariana Páez, kaj estis kaptitaj Chucho, ĉefo de la urbobandoj de la Orienta Bloko; la Negro Juancho, dua de la fronto Manuel Cepeda Vargas en Buenaventuro, kaj la Negro Antonio, dua de la Urba Reto Antonio Nariño. Cetere, dizertis Isaza kun Óscar Tulio Lizacano¹, kaj aliaj tri gerilanoj kun tri pliaj ostaĝoj.

En septembro de 2009, mi informiĝis pri ke la Polico kaptis en Bogoto la alinomitan *Alberto Chaparro*, ĉefa kapulo de la 23-a fronto de la FARK kiu agas en Santandero, kaj kvara ĉe la komandantaro de la Bloko Magdalena-mezo². Mi legas en la ĵurnaloj ke oni daŭre ruinigas terorismajn planojn de la kolono Teófilo Forero. En oktobro, bombado far la Aera Forto, plian fojon surbaze de informo atingita far la Polico, senvivigis la alinomitan *Jerónimo*, ĉefo de la Centra Kuniĝinta Komandantaro kaj “dekstra mano” de Alfonso Cano. Ne pasas unu tago dum kiu la FARK ne bedaŭras iun areston, iun morton, plurajn malmobiliziĝojn kaj iun frustritan atencon. Ankaŭ ĝi daŭras farante damaĝon, kaj semante minojn kaj atakante la publiksekurigan agentaron, tamen ĝi nun estas ne eĉ la ombro de tio kio ĝi estis ok jarojn antaŭe, kiam ĝi havis preskaŭ 20.000 armitajn homojn, kiam ĝi ankoraŭ aŭdacis revii pri ekpreni la ŝtatpovon kaj havis sian terorisman diplomataron je maksimuma nivelo.

¹ NT Temo de la 38-a ĉapitro, paĝoj 273-278.

² NT Vidu la piednoton de la 166-a paĝo.

Hodiaŭ la FARK arigas, maksimume, 8.000 membrojn, preskaŭ ĉiuj junuloj rekrutigitaj perforte aŭ pertrompe, kaj, precipe senspertaj, kiuj serĉas, angorplenaj, la manieron eliri el la kaptilo kien ili falis.

Tiel, kiel mi asertis en dokumento pri la dekadenco de tiu organizaĵo, publikigita en la Ministerio pri Defendado, “La hodiaŭa FARK estas en la sama punkto kie ĝi komenciĝis pli ol kvardek jarojn antaŭe, kun granda diferenco: la hodiaŭa organizaĵo ne havas estontecon”.¹

Ĝi havas nenian amasan popolan apogon kaj, male, kiel tion pruvas ĉiuj enketoj kaj indikas la amasa partopreno de la popolo en marŝadoj por protesti kontraŭ ĝi, estas ĝi la organizaĵo kiu plej grandan malaprobom produktas en la opinio de la landanoj.

Ĝi perdis gvidantaron (Marulanda, Reyes, Ríos) kaj historiajn batalintojn (Martín Sombra); ĝi perdis regionan ĉeeston en strategiaj areoj kiel la Montoj de María (Martín Caballero), la Pacifika zono (JJ, Santiago, la Negro Juancho), Kundinamarko (la Campesino, Diego Cristobal, Chucho, la Negro Antonio, Gaitán, Mariana Páez) kaj Antjokio (Ríos, Karina, *El Paisa*); ĝi perdis la komisiitojn pri narkotajkomerco ĉe la ĝangaloj de la sudoriento (la Boyaco, la Negro Acacio, Camili Tabaco, César); ĝi perdis siajn plej valorajn ostaĝojn per fuĝoj aŭ elliberigoj (Pinchao, Araŭjo, Ingrid, la tri usonanoj, Lizacano); multegajn teroratencojn ĝi vidis frustritaj (Hernán, Javier Calderón, James Patamala); siajn strategiajn internaciajn kunakordantojn ĝi vidis malkovritaj (komputiloj de Reyes kaj Camila), kaj ĝi perdis tiom da komanda kaj kontrola kapablo, da efika komunikeblo inter la komandantoj kaj iliaj frontoj ke ĝi falis en la plej rafinitan trompon per informiĝado kiu iam ajn estis farita en la lando, kaj eble eĉ en la mondo (la Operaco Ŝakon).

¹ *Las FARC en el peor momento de su historia (La FARK en la plej malbona tempo de sia historio)*. Nacia Ministerio pri Defendado, 2008.

La kolombia Ŝtato, ni la kolombia popolo, ankoraŭ ne gajnis la plenfrapan militon kontraŭ la narkotaĵkomerca terorismo de la FARK. Estas nepre daŭrigi la penadon, estas urĝe ne neglekti la gardon, tamen neniu povas nei ke tio plenumita dum la lastpasintaj jaroj, dum tiuj “jaroj hororaj” por la FARK, estis la plej grava progreso en pli ol kvar jardekoj da luktado.

Tio atingita estas la rezulto el kombino de pluraj faktoroj: la gvidanteco de la prezidento Uribe, la decido impulsi la informiĝado kaj la laboro kuna kaj kunordigita inter la Militfortoj kaj la Polico, la kreskanta apogo far la kolombia popolo al sia publiksekuriga agentaro, la kompetenteco kaj sindevigo de la komandantoj kaj, precipe, la heroeco, la sinofero kaj la kuraĝo de la membroj de la Armitaj Fortoj, kiuj tagon post tago riskas sian vivon kaj sian sanon por protekti siajn kunnacianojn kaj doni al ili la eblon vivi, labori kaj prosperi en medio de normaleco.

José Saramago, la mensklara portugala verkisto kiu, elde sia komunisma idearo, ne timas kondamni la gerilan frenezon, finis intervjuon kiun li donis en 2007¹ per frazo kiu povas taŭge esti kvazaŭ kolofono de tiu ĉi libro, de tiu ĉi fidinda atesto pri kiamaniere unu lando kaj siaj Armitaj Fortoj rekuperas la rajton vivi pace:

— Se ĝi sukcesas liberiĝi el la hororo de la gerilo, Kolombio havas ĉion por fariĝi granda nacio.

¹ “*La guerrilla colombiana es un ejército de bandidos y narcotraficantes*” (“*La kolombia gerilo estas armeo el banditoj kaj narkotaĵkomercistoj*”). Raportaĵo far Yamid Amat, tagĵurnalo *El Tiempo*, 15-a de julio de 2007.

Fotaro



La eksministro Fernando Araújo parolas kun grupo de militistoj, post kvin tagoj da fuĝado kaj pli ol ses jaroj da ostaĝeco per la manoj de la FARK.



Kun la generalo Padilla ricevante esprimojn de dankeco far la popolo de Cármen de Bolívar post la mortigo de la alinomita *Martín Caballero*.



La admiralito Guillermo Barrera kaj la generalo Mario Montoya inspektas la sakojn kun la korpoj de la faligitoj en la operaco kontraŭ la alinomita *Martín Caballero*.



La prezidento Álvaro Uribe senmaskigas en Villavicencio la mensogojn de la FARK, kaj lanĉas la hipotezon ke Emmanuel, la fileto de Clara Rojas, jam ne estis havata far la gerilo.



Marŝo kontraŭ la FARK la 4an de marto de 2008.



Motorboatoj de la Nacia Mararmeo por rivera patrolado.



La alinomita *Don Diego*, estro de la drog-kartelo de la nordo de la departemento Valle, je sia alveno al Bogoto post sia kaptado, estas kondukata far la generalo Montoya.



Kun la generaloj Montoya, Suárez, Ballesteros kaj Naranjo, inter aliaj oficiroj, inspektante la rezultojn de la bombado al la tendo de la alinomita *John 40* en la monto-ĉeno de La Macarena.




Revizianta kun la generaloj konfiskitajn armilojn en la regiono de La Macarena.



Kun la generalo Freddy Padilla fronte de unu el la kavernoj kie sin kaŝis la alinomita *La Mono Jojoy* kaj sia gardistara ringo en La Macarena.



La alinomita *Manuel Marulanda* aŭ *Tirofijo*, en la tempo de la zono de malstreĉiĝo.



La alinomita *Martín Sombra*, veterano estro de la FARC, kaptita far la Polico, nun enlasita en la agprogramon de la registaro por malmobiliziĝintoj.



Porĵurnalista prezentado kie estis anoncita la mortigo de la alinomita *Raul Reyes* en la Operaco Fenikso. Akompanas min la admiralo Guillermo Barrera, la generalo Freddy Padilla kaj la generalo Jorge Ballesteros.



Alveno de la kadavro de *Raul Reyes* al la arma flughaveno de CATAM.



Porĵurnalista prezentado de la generala sekretario de Interpol, Ronald K. Noble, kie estis atestita la nefalso de la arkivoj de la komputiloj trovitaj en la tendaro de *Raúl Reyes*.



Porĵurnalista prezentado kie estis anoncita la mortigo de la alinomita *Iván Ríos*, ano de la sekretario de la FARK. Akompanas min María del Pilar Hurtado, direktorino de la DAS; la generalo Óscar Naranjo; la generalo Freddy Padilla; la admiralo Guillermo Barrera, la generalo Mario Montoya kaj la generalo Jorge Ballesteros.



La alinomita *Rojas*, gerilano kiu mortigis la alinomitan *Iván Ríos* kaj ties kunulinon.



Kadavro de *Iván Ríos*, dua membro de la sekretariaro de la FARK mortigita en la unua semajno de marto de 2008.



Malmobiliziĝo de la alinomita *Karina* antaŭ funkciuloj de la DAS.



Kun la generalo Freddy Padilla tuj post scio pri la sukceso de la Operaco Ŝakon.



Porjurnalista prezentado anoncanta la elliberigon de Íngrid Betancourt, tri usonanoj kaj dek unu militistoj kaj policistoj per la Operaco Ŝakon.



Íngrid Betancourt brakumas sian patrinon ĉe sia alveno al Bogoto.



La generaloj Montoya kaj Padilla antaŭiras la revenon de la elliberigitoj en la Operaco Ŝakon.



Ago de danko-preĝo far la elliberigitoj en la Operaco Ŝakon, en la armea flughaveno de CATAM.



La prezidento Álvaro Uribe kunvenis kun la elliberigitoj en la Domo de Nariño¹ la nokton de la merkredo 2-a de julio, tago mem de la elliberigo.




Rerenkonto de Clara Rojas kun sia filo Emmanuel.

¹ NT Loĝejo kaj ĉefoficejo de la kolombiaj prezidentoj.



La alinomitaj César kaj Enrique Gafas, unua kaj dua estroj de la unua fronto de la FARK, responsuloj pri la ostaĝoj, kaptitaj en la Operaco Ŝakon.



La alinomita Isaza, gerilano kiu helpis la eksrepresentanton Óscar Tulio Lizacano fuĝi, kaj enlasita en la agrogramon por malmobiliziĝo. Nun li loĝas en Parizo.



La eksrepresentanto Óscar Tulio Lizacano faras siajn unuajn deklarojn en Kalio, post pluraj tagoj da fuĝado.



La alinomita *Myriam*, gerilano kiu malmobiliziĝis alportante kun si ostaĝon, renkontiĝas kun sia frato soldato, viktimo de kontraŭhoma mino enterigita far la gerilo.



La alinomita *David* kaj la alinomita *Ernesto*, gerilanoj kiuj malmobiliziĝis kune kun du ostaĝoj kiujn ili reportis al la libereco.



Trejnado prihumana de soldatoj en ekzercejo pri homaj rajtoj.

En la jaroj milnaŭcentaj, la minaco de la FARK ŝajnis nehaltigebla. Post fiaskinta porpaca procezo, la nova jarcento komenciĝis kun grandega batalantaro kiu sieĝis la grandajn urbojn elde iliaj ĉirkaŭejoj. Tamen, ekde la funkciigo de la Politiko de Demokratia Sekureco, la terorismaj fortoj estas defalantaj. Al Juan Manuel Santos apartenis gvidi ĝin dum tri jaroj elde la Ministerio pri Defendado. Tiel kiel li tion rakontas en tiu ĉi libro, dum tiel mallonga tempo falis tri anoj de la Sekretariaro, pluraj financaj ĉefoj, la plej gravaj liguloj kun la narkotaĵkomerco, la plej harditaj ostaĝigantoj. Simile oni atingis la elliberigon de bona nombro da ostaĝoj per operacoj tiel aŭdacaj kiel *Ŝakon*, kaj la malmobiliziĝo de gravaj kapuloj kiel Karina.

Tiu ĉi estas la atesto far unu el la ĉefroluloj de decida epoko en la historio de la lando.